














LA
S P O R T A
L I N G V O
EN
ESPERANTO



Enkonduko al la interreta versio

Tiu ĉi libro – kiel labora versio por kunlaborantoj – aperis en 1972 en 500 ekzempleroj, dissenditaj al ĉiuj partoj de la mondo. La fakuloj kaj estraroj de landaj Esperanto-Asocioj ricevis la libron antaŭ la Olimpiko en München (Munkeno), kaj surbaze de tiu ĉi libro estis kompilita la trilingva vortareto "*Saluton Amiko*" en formo de broŝuro.

La akcepto de *La sporta lingvo en Esperanto* estis tre favora. La kompilinto-redaktoro ricevis multajn reagojn, konsilojn, tamen la definitivitan version li ne faris pro diversaj kaŭzoj: unue li opiniis ke estas pli da bezono je fakvortaro ol faklibro. Due, la novan eldonon de la libro eblas fari post reverkado de la 30 sportobranĉoj, ĉar dume tiuj reguloj ŝanĝiĝis. Kaj fine, la aŭtoro ekhavis kontakton al *Rüdiger Eichholz*, direktoro de la tiama Terminologia Centro de Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj de la Sekcio Teknikaj Vortaroj de la Akademio de Esperanto, kiu same turnis lian atenton al pretigo de sporta fakvortaro.

En fino de 1976 s-ro Tibor Ujlaky-Nagy komencis ellabori seplingvan fakvortaron, sed tiun laboron la rigora morto distranĉis.

Nun ni denove publikigas la originalan studon sen ŝanĝo. La torĉon oni devas porti plu.

István Mészáros
kaj László Szilvási

Teamo "Eventoj" en Budapeŝto
<http://www.eventoj.hu>

La internacia sporto bezonas internacian lingvon

Tibor Ujlaky-Nagy

LA SPORTA LINGVO EN ESPERANTO

(Projekto)

Hungara Esperanto-Asocio

Budapest VIII, Kenyérmező u. 6. Hungario
1972

ANTAŬPAROLO

La sporto estas unu el tiuj sektoroj de la moderna vivo, kiuj altiras kaj aktivigas plej grandajn homamasojn, parte rekte la sportistojn mem, parte nerekte grandan aron de la simpatiantoj de diversaj sportbranĉoj (spektantojn de sportkonkursoj, zelotojn de sportasocioj, teamoj ktp.), kaj la kunlaborantojn de la informkomunikaj organoj (gazetaro, radio, televido), se ne paroli pri la grandnombra gvida kaj teknika personaro de la aranĝado kaj disvolvo de la diversaj sporteventoj.

Samtempe — devene de ĝia karaktero — la sporto estas unu el tiuj modernaj amasmovadoj, kiuj havas plej multe da internaciaj rilatoj kaj interligoj. Konsekvence kaj nekontesteble ĝi ege bezonas oficialan tutmondan komunan lingvon.

Se Esperanto aspiras esti tiu komuna lingvo — kion ni ĉiuj povas nur jesi — estas nia neprokrastebla devo krei la sportan faklingvon de Esperanto, ĉar la ĝis nun uzata sporta lingvo — se entute oni povas paroli pri tia — estas provizore nefaka, diletanta, kiel faklingvo tute neuzebla. Tion klarigas kompreneble, ke ĝis nun ne estis ellaborita la sporta fakterminologio.

En la jaro 1966 la hungaraj olimpikaj ĉampionoj kaj elstaraj gvidaj personoj de la hungara sporta vivo sendis komunan publikan leteron al la Internacia Olimpika Komitato, petante en tiu letero, ke IOK “helpu, ke ankaŭ la lingvon Esperanto, kiu fariĝas ĉiam pli populara, oni apliku kiel oficialan lingvon en la internaciaj sportaj renkontiĝoj”. La respondo de IOK — kiel sciante — estis negativa. Fakte ni estus estintaj en granda embaraso, se tiam IOK frontus favore la peticion. Ĉar kiel ni estus povintaj pravi, ke sur ĉiuj kampoj de la sporta vivo la sporta faklingvo de Esperanto egalvaloras kun tiuj de la t.n. mondlingvoj, kiam tiu sporta faklingvo de Esperanto — kvankam kelkaj laŭdindaj iniciatoj jam estis — ankoraŭ tute ne estas elformita?

Instigite de la publika letero tuj mi decidis eklabori super pionira verko sur la kampo de la sporta faklingvo, kaj de tiam ĝis nun senhalte mi laboris super ĝi. Jen, ĉi tie estas do la verko, en formo de studo. Ĝi havas la celon meti almenaŭ la fundamenton de la sporta lingvo en Esperanto, proponante terminojn por la plej bazaj nocioj de 50 sportbranĉoj, klopodante dini samtempe la harmonian kaj logikan skeleton de la evoluigenda faklingvo. Por ne dini nuran sekan vortaron kun kelkvortaj klarigaj difinoj, la terminojn mi aplikis en konvena faka kunteksto, kiu estas taŭga ankaŭ doni la plej elementajn fakajn konojn pri la unuopaj sportbranĉoj, kaj samtempe servas kiel modelo de la flua, leĝera, skribe kaj parole facile uzebla, vivanta sporta lingvo. La elfiltrado de la terminoj el la kunteksto kaj ilia listigo estos jam la tasko de la vortaristoj.

Kiel mi diris, la jena studo havas la taskon servi nur kiel fundamento por la iom post iom eldonotaj apartaj faklibroj, traktantaj jam detale po unu sportbranĉon. Espereble baldaŭ troviĝos kaj ambiciaj ellaborontoj kaj eldonistoj por tiuj faklibretoj.

Ĉar estas mia konvinko, ke unu persono — havanta kiel ajn vastan lingvokonon — ne povas havi la kompetenton ellabori lo-la fakterminaron en Esperanto, sed el tio li nepre bezonas la kontribuon de internacia kunlaborantaro, en formo de fakspertaj konsiloj, helpantaj ideoj, bonintencaj kritikoj, — jen mi dissendas tiun el mian studon en formo de projekto, en 500 ekzempleroj, dise en la mondon al internacia faksperta kolegaro esperantista (sportaj fakdelegitoj, anoj de la Akademio de Esperanto, Esperanto-redakcioj, landaj Esperanto-asocioj), petante ilian bonvolan helpon, fakajn kaj prilingvajn rimarkojn. Ĉiun helpivolan respondon ni konsciencie trastudos kaj ĉiun racian proponon ni danke akceptos kaj aplikos en la definitiva studo, kiun mi planas ellabori kaj aperigi post nelonge, surbare de la alvenontaj utilaj konsiloj, konstruaj kritikoj, fake kaj lingve valoraj sugestoj kaj rekomendoj, — kompreneble kun la aprobo de la Akademio de Esperanto.

Sendante al vi, Estimata Adresito, tiun ĉi studprojekton, mi esperas do, ke bonvole Vi akceptos ĝin. Se el sportfaka aŭ lingva vidpunkto tiu ĉi verko interesas vin, bonvolu trastudi ĝin, aŭ almenaŭ tiujn ĉapitrojn, kiujn Vi speciale preferas, kaj bonvolu sciigi al mi Vian opinion, Viajn impresojn, rimarkojn, sugestojn, ideojn kaj aprobajn, kaj kritikajn. Per tio ankaŭ Vi aldonos kelkajn brikojn al la fundamento de la sporta lingvo en Esperanto.

Se eventuale la temo Vin tute ne interesas, ni tre petas Vin sendi almenaŭ mallongan sciigon pri la ricevo de la libro, kaj poste bonvolu transdoni ĝin al samideano aŭ samideanino, kiun la temo interesas, kaj kiun mi petas konsideri la ekzempleron kiel rekte al li aŭ ŝi adresitan.

~~Mia adreso estas: Ujlaky Nagy Tibor, BUDAPEST 112. poste restante, Hungario, Eŭropo.~~

Mi opinias grava mencii, ke mian planon, — nome prezenti miajn terminojn en tiu ĉi studo provizore nur al limita nombro da fakuloj (do al la 500 adresitoj), — iom modifis la olimpikoj en Munkeno. Pli ĝuste tio, ke la samideanoj en Germane Federacia Respubliko decidis (decido komprenebla kaj respektinda) kontribui al tiu granda sportevento en ilia lando per eldono de Esperanta sporta terminaro. Al tio ili petis, ke mi disponigu al ili nian terminostokon.

Komence mi hezitis plenumi ilian — cetere tre honorigan — peton pro du motivoj. Unue tiutempe mi devis koncentri ĉiujn miajn fortojn por povi aperigi la studon ĝustatempe, do antaŭ la someraj olimpikoj. Pro tio mi tute ne havis tempon por elfiltradi la teramojn el la teksto, kaj pretigi la necesan klarigan difinon al ĉiu el ili. — Due, miajn terminojn mi konsideris (kaj ankaŭ nun konsideras) nur kiel provojn, kiel proponojn ankoraŭ ne sankciigitajn flanke de la ekstera mondo. Kiel do ili povu aperi en plurmil-ekzemplera terminaro jam kiel akceptitaj, — por tiel diri — oficialaj terminoj?

Tamen poste tiel mi rezonis: Ankaŭ se mi ne disponigos miajn terminojn al la germanaj samideanoj, ili certe plenumos la celitan entreprenon, kaj ekestos la situacio, ke en la manoj de la esperantistoj baldaŭ troviĝos du sportaj faklibroj, enhavantaj ambaŭ grandan stokon da fakterminoj. Sed — ĉar pro la manko de vivanta sporta lingvo kaj ili kaj mi estis devigitaj enkonduki grandan kvanton da arbitre elektitaj kaj kreitaj vortoj, *originantaj el du, diversaj fontoj*, — por la samaj nocioj la du verkoj havos plejparte tute diversajn fakvortojn. La konfuzon, kiun kaŭzus tiu alternativo, *mi rigardis multe pli danĝera* ol aperigi en ambaŭ fakverkoj la samajn — kvankam nur proponatajn, sed fare de la ĝenerala uzado ankoraŭ ne sankciigitajn — fakterminojn. Mi decidis do, kaj fine de februaro 1972 mi sendis unu kompletan ekzempleron de miaj manuskriptoj al la preparkomitato de la Sporta Terminaro, rajtigante ilin utiligi la materialon laŭ ilia plaĉo kaj bontrovo, sed rezervante la rajton, ke ankaŭ mi aperigos mian studon. Mi povas do esperi, ke la du sportaj verkoj harmonie kompletigos unu la alian.

Kelkaj kromaj mallongaj rimarkoj:

1. Mi klopodis ŝpari neologismojn, tamen certan kvanton da ili mi devis enkonduki. Ĉiun trafan fundamentan vorton anstataŭ ili danke mi akceptos.

2. Dum 5 jaroj kelkaj konkursreguloj certe jam malvalidiĝis. Negative, tio ne tuŝas la esencon: la sportan faklingvon.

3. La studo traktas nur la internaciskalajn sportkonkursojn.

4. La indikoj, troveblaj fine de la ĉapitroj sub la titolo: “Esprimoj”, estas fiktivaj, do neaŭtentikaj.

5. Pro la urĝa laboro en la lastaj monatoj tajperaroj, eventuale malgravaj gramatikaj eraroj estis neeviteblaj. Pro ili mi petas indulgon.

Antaŭ ol fini mian antaŭparolon, mi sentas mia unuaranga devo mencii kaj danki tiujn instituciojn, al kies bonvola helpo estas ŝuldebla la apero ĉe tiu ĉi studprojekto, ĉar sen ilia helpo mi ne povus aperigi kaj senpage sendi 310 paĝan libron al 500 adresoj.

Ankaŭ ĉi tie mi esprimas mian sinceran dankon unuavice al la Hungara Akvoafera Instanco,

kiu finance helpis la aperigon de la libro. En 1966, okaze de la 51-a UK en Budapeŝto, tiu institucio jam pruvis sian simpatian al la Esperanto-movado, financinte la eldonon de valora akvofera broŝuro: “La akvo kaj la homo en Hungarlando”.

Same per konsiderinda monsumo kontribuis al la kovro de la elspezoj la hungara Kleriga Ministerio, helpipreta protektanto de la Esperanto-instruado en Hungarlando, kaj la Hungara Olimpika Komitato, kiu ĉi-maniere rekonis la signifon de la aperigo de Esperantlingva studo pri la olimpikaj sportobranĉoj. Ĉi-loke mi esprimas refoje mian sinceran dankon ankaŭ al tiuj ĉi kontribuintoj.

Kaj fine, sed ne lastavice, mi dankas la estraron de la Hungara Esperanto-Asocio pro la tre efika apogo, gvido kaj konsiloj en mia laboro.

En la espero, ke per mia modesta laboro mi utile kontribuos el la sana evoluo de la Internacia lingvo, jen mi survojjigas mian verkon al ĉiu angulo de Esperantujo, kore salutante ĉiun ricevonton de la libro kaj petante ilian bonvolan kunlaboron kaj helpon:

Budapest, majo 1972.

la aŭtoro.

GRAMATIKAJ RIMARKOJ

(klarigoj, motivadoj)

I.

La sportaj terminoj, troveblaj en tiu ĉi studo, apartenas al kvar grupoj:

1. Vortoj, havantaj la saman sencon en PV (skio, salti, teniso ktp.).
2. Vortoj, kiuj en la sporta faklingvo havas kroman — ĝenerale nur nuancan, sed kelkfoje ankaŭ pli malproksiman — sencon ol en PV (disciplino, lanco, naĝo, martelo ktp.).
3. Novaj um-vortoj (kurumo, ludumo ktp.).
4. Necesaj neologismoj (asalto, trenso, ŝverto ktp.).

II.

En la lingvaĵo de iu ajn fako aŭ metio oni trovas certan nombron da t.n. vulgaraj, t.e. nefakaj, ĉiutagaj esprimoj, kiuj apud sia faktermino-sinonimo estas vaste kaj kun prefero uzataj. Kvankam ne tiel vastaskale, kiel en la naciaj lingvoj, tamen ankaŭ en Esperanto oni povas sperti tion. Ekzemple: miozoto, vulg. neforgesumino kaj melolonto, vulg. majskarabo ktp. En tiu rilato ankaŭ la sporta faklingvo ne estas escepto. Plurloke, kie mi konas, mi prezentis tiujn sinonimojn, indikante per la mallongigo “vulg.”, ke ili estas neoficialaj, sed en nefaka teksto uzeblaj formoj. Ekz.: piedpilkado (vulg. futbolo), flugpilkado (vulg. volejbalo) ktp. Ilia registrado miaopinie ankoraŭ pli substrekas la validecon kaj gravecon de la vera, oficiala termino.

Al la grupo de tiaj vulgaraj sportesprimoj apartenos principe ĉiuj uzataj, sed kiel oficiala sporta termino ne akceptitaj sportaj esprimoj, kondiĉe ke ili estas lingve korektaj kaj ne kontraŭas la spiriton kaj konstruon de la Esperanta sporta lingvo nun naskiĝanta.

Kompreneble estas diskutablaj — eble plej okulfrape ĉe la nomo de la diversaj pilkoludoj — la ĝusteco kaj logikeco de miaj elektoj el esprimoj jen internaciaj (teniso, hokeo), jen esperantigitaj (piedpilkado, korbopilkado ktp.). Tamen mi persistas ĉe mia elekto, sciante, ke por vivantaj lingvoj ankaŭ troa logikeco estas malavantaĝa.

III.

Kiam mi donis nomon al la 30 traktataj kaj 33 menciataj sportobranĉoj kaj al granda nombro da subbranĉoj kaj disciplinoj, min gvidis tri reguloj, konforme al kiuj reguloj la temantaj nomoj estas klasigeblaj en tri grupojn.

1. Al la unua grupo apartenas tiuj sportobranĉo-nomoj, kiuj estas troveblaj en PV kiel memstaraj sportaj terminoj, kiel la vortoj hokeo, ĵudo, gimnastiko, futbolo (vulg.), aŭ kiujn mi enkondukis el la internacia uzado, kiel pentatlono, slalomo, basketbalo (vulg.).

2. La dua grupo de la nomoj de sportobranĉo, subbranĉo aŭ disciplino estas derivebla el tiuj verboj de verbkaraktera radiko, kiuj verboj esprimas la specifan aktivadon (ekz. kuri, rajdi, descendi, skermi ktp.) de la koncerna sportobranĉo ktp. Ĉar la kuristo kuras — kaj ne kuradas — 100 metrojn, la naĝisto naĝas — kaj ne naĝadas — 200 metrojn, la altosalto saltas — kaj ne saltadas — 198 cm-an alton ktp., kiel nomo de sportobranĉo ktp. perfekte taŭgas la terminoj kuro, rajdo descendo, altosalto, diskoĵeto ktp. kaj estas tute superflua la uzo de la sufikso “ad”.

3. La tria grupo deriviĝas el la nomo de la uzataj sportiloj. En tiuj terminoj estas jam nemankebla la uzo de la sufikso “ad”. Jen ekzemploj: biciklado, sabrado, rekado, akvopilkado ktp.

Estas menciinde, ke esprimoj kiel manpilko, piedpilko k.s. ne estas ĝustaj kiel nomoj de sportobranĉo, ĉar ili indikas nur la ilon, sed ne la agadon. Ĝustaj estas do: manpilkado, korbopilkado ktp. Same mi opinias malĝustaj, eĉ konfuzaj esprimojn kiel “manbalo” fuŝe

kunmetitan el manpilkado kaj la vulgara handbalo, aŭ “korbobalo” el korbopilkado kaj basketbalo (vulg.).

Koncerne la nomojn de sportobranĉo, subbranĉo aŭ disciplino, derivitajn el la nomo de la sportilo per la sufikso “ad”, mi sekvis la ĉi suban regulon.

Tiu metodo estas uzebla nur, se la derivita nocio esprimas unusence la determinendan sportan aktivadon, ekz. biciklo — biciklado, skio — skiado. Sed ĝi ne estas uzebla, kiam la derivita vorto havas alian, diverĝan sencon, ekz. martelo — martelado signifas uzi la martelon laŭ ĝia primera celo (marteli la ardantan feron ktp.). La sporta esprimo estas do: martelĵeto. Aŭ alia ekzemplo: disko — diskado: signifas ev. turnadi la numerdiskon de la telefonaparato, sed la ĝusta sporta esprimo estas: diskoĵeto. Jen kelkaj pliaj ekzemploj el ambaŭ variantoj: sledado, motorciklado, aŭtado, kanuado, velado, spadado, sed lancoĵeto, halterlevo, barierkuro, stangosalto ktp.

La listo de la traktataj 30 sportobranĉoj (Ili ĉiuj estas olimpikaj sportobranĉoj, escepte tenison kaj tablotenison.)

- | | |
|----------------------|------------------------|
| 1. Akvopilkado | 16. Manpilkado |
| 2. Arkopafo | 17. Moderna pentatlono |
| 3. Atletiko | 18. Naĝo |
| 4. Biciklado | 19. Pafo |
| 5. Bobado | 20. Piedpilkado |
| 6. Bokso | 21. Plonĝo |
| 7. Flugpilkado | 22. Rajdo |
| 8. Gimnastiko | 23. Remo |
| 9. Glacihokeo | 24. Skermo |
| 10. Halterlevo | 25. Sketado |
| 11. Hokeo | 26. Skiado |
| 12. Ĵudo | 27. Sledado |
| 13. Kajakado-kanuado | 28. Tabloteniso |
| 14. Korbopilkado | 29. Teniso |
| 15. Lukto | 30. Velado |

listo pri kromaj 33 pli signifaj sportobranĉoj nur menciataj

- | | |
|------------------------------|------------------------|
| 1. Akvoskiado | 18. Kriketo |
| 2. Alpinistiko | 19. Leĝera skafandrado |
| 3. Aŭtado | 20. Motorboatedo |
| 4. Badmintono | 21. Motorciklado |
| 5. Bezbalo | 22. Motorsledado |
| 6. Biatlono | 23. Orientiga kuro |
| 7. Biciklohokeo | 24. Paraŝutado |
| 8. Biciklopilkado | 25. Peloto |
| 9. Boŭlo | 26. Plumpilkado |
| 10. Dekatlono | 27. Pugnopilkado |
| 11. Drajvo (jungaĵkondukado) | 28. Rajdhokeo |
| 12. Fiŝhokado | 29. Rugbeo |
| 13. Glacivelado | 30. Rulsketado |
| 14. Gliso | 31. Sablovelado |
| 15. Golfeo | 32. Triatlono |
| 16. Joringo | 33. Turistiko |
| 17. Keglado | |

IV.

Mi malaprobos la ofte renkonteblan formon “ĉampioneco” en la senco de “ĉampionado”. Jen frazo, aplikanta korekte ambaŭ formojn: La ĉampionado estas sporta aranĝo, kie la plej bonaj konkursantoj akiras ĉampionecon.

V.

Direktivoj, kiel apliki la vortojn ĉampiono, — ĉampionado, renkonto, turniro, konkurso, rekordo kaj teamo, en esprimoj koncernantaj sportbranĉojn, subbranĉojn aŭ disciplinojn. Estas du manieroj:

1. **La rekta aŭ vortkunmeta formo:** biciklokonkurso (el biciklado), skiĉampiono (el skiado), halterlevorekordo (el halterlevo), naĝoĉampionado, pentatlonkonkurso (el moderna pentatlon), piedpilko-turniro (el piedpilkado), gimnastoteamo, kajakĉampiono (el kajakado), skermorenkonto ktp. Kiel videblas, ĉe la rekta formo la nomoj de sportbranĉo, subbranĉo aŭ disciplino finiĝantaj per la sufikso “ad” perdas tiun sufikson en la vortkunmeto.

Menciindas, ke ĉe la sportbranĉo-nomoj finiĝantaj per “iko” ŝajnas pli konvena la adjektiva formo: atletikaj rekordoj, gimnastikaj konkursoj ktp.

La vortkunmetoj povas havi ankaŭ epiteton: olimpika luktoĉampionado, tritaga remkonkurso ktp.

2. **La nerekta aŭ prepozicia formo:** konkurso de biciklado (“ad” restas!), ĉampiono de skiado (“ad”!), rekordo de halterlevo, ĉampiono de naĝo, konkurso de moderna pentatlon, teamo de piedpilkado, ĉampiono de kajakado ktp.

Pli longaj esprimoj kun epitetoj: olimpika ĉampionado de pistolpafo, olimpika ĉampionado de manpilkado, internacia ĉampionado de atletiko, olimpika rekordo de 100-metra sprinto, olimpikoĉampiona formacio de la virina unuremlia kvaropa remo kun stiristo, olimpikoĉampiona teamo de la 4x200-metra vira stafeta ebenkuro ktp.

Per la nerekta formo ĉiuj variantoj estas esprimeblaj, sed ne ĉiuj el ili estas transformeblaj en la rektan formon

a) pro senca difektiĝo en kelkaj okazoj, ekz.: Ĉampiono de 3-kilometra virina skikuro. La esprimo estas klara. Sed: 3-kilometra virina skikurĉampiono — jam iome konfuza: ĉu 3-kilometra ĉampiono? Aŭ ekz.: Ĉampionado de vira unuremla okopa remo kun stiristo. Esprimo klara. Sed: Vira unuremla okopa remĉampionado kun stiristo — jam ne estas senerara, ja la remo estas kun stiristo, ne la ĉampionado;

b) pro ekesto de tro plumpaj esprimoj en tiuj kazoj, kiam la vortojn ĉampiono, ĉampionado kaj rekordo, antaŭas kaj kun ili formas komunan vortkunmeton la vortoj mondo, Eŭropo, Ameriko, Azio, Afriko (kun streketo post la kontinentonomoj!), ekz.: Eŭropo-ĉampiono de dorsonaĝo, Ameriko-rekordo de pezglobĵeto, mondĉampionado de keglado, estas esprimoj klaraj kaj facile eldireblaj, sed tri- aŭ kvaroblaj vortkunmetoj, kiel dorsonaĝo-Eŭropo-ĉampiono, aŭ pezglob-ĵeto-Ameriko-rekordo k.s. estas jam formoj malpli elegantaj kaj malpli plaĉaj, kvankam gramatike seneraraj.

En paralele uzeblaj formoj mi rekomendas la rektan formon:

Olimpika virina rapirĉampionado (Olimpika ĉampionado de virina rapirado)

Ameriko-ĉampiona vira gimnastoteamo (Ameriko-ĉampiona teamo de vira gimnastiko)

Pafkonkurso per etkalibra sportfusilo (Konkurso de pafo per etkalibra sportfusilo)

VI.

Pledo por kelkaj esprimoj.

a) Analoge al la vortoj “triunuo”, “triangulo” kaj “tripiedo”, troveblaj en PV, mi rigardas

regulaj ankaŭ la kunmetojn “trisalto” (en la atletiko), “duringo” (en la gimnastiko) kaj “kvarnaĝo” (en la naĝo).

b) La plumpa vortkunmeto “piedfrapi” jam longe necesigas pli simplan vorton por tiu simpla ago. La angla-germana “to kick, kicken” ŝajnas konveni tiucele. La verbo “kiki” signifas do kaj en la sporto, kaj ekster la sporto la agon abrupte, rapide kaj forte movi la piedon antaŭen aŭ malantaŭen, sendepende, ĉu ĝi frapas ion, aŭ batas nur en la aeron. Ekzemploj: En la sporta ludo piedpilkado estas grava kaj punenda malregulaĵo, se iu ludisto vole kikas la alian. La ĉevalo ektimis kaj kikas per ambaŭ postaj piedoj. La bebo kuŝas surdorse kaj kiketadas. La plonĝisto forkikis sin de sur la trampilo. La knaboj lerte kikadis la pilkon unu al la alia.

c) “ŝoti” signifas: aa) kun granda forto, kvazaŭ pafe ĵeti la pilkon por atingi golon en la sportaj ludoj akvopilkado, korbopilkado kaj manpilkado; bb) kun granda forto, kvazaŭ pafe kiki la pilkon por atingi golon aŭ plenumi liberan ŝoton aŭ punŝoton en la sporta ludo piedpilkado; cc) kun granda forto, kvazaŭ pafe frapi per hokeilo la hokepilkon aŭ glacidiskon, por sendi ĝin nepareble en la golejon, respektive per la rakedo la tenis Pilkon nerebateble sur la kontraŭan duonkampon.

ĉ) En Esperanto, precipe en ĝia sporta lingvo, tre senteble mankas esprimoj indikantaj la senperan lokon, la scenejon de diversaj sportaj aktivadoj. La grandaj lingvoj (certe ankaŭ La ceteraj) havas plurajn vortojn por tiu nocio. Anglaj: track, court, alley, field, route, ring, rink, lane, course; francaj: piste, court, parcours, ring ktp.; rusaj: dorojka, ploŝadka, pole, trassa, ring ktp.; hispanaj: pista, terreno, ring, recorrido, cercedo, cuadrilatero ktp.; italaj: campo, ring, quadrato, percorso, pista ktp.; germanaj: Bahn, Spielplatz, Strecke ktp.

Tiucele la universala uzado de la sufikso “ej” ne estas panaceo. Mi opiniis do necese krei adekvatajn terminojn — evidente ne tiel multajn — ankaŭ en Esp. Tamen la tasko ne estis facila kaj la solvo estas diskutibla.

Nome, dum ekz. por la bokso mi akceptis la plej universalan terminon “ringo” kaj por la sportaj ludoj mi enkondukis la vorton “kampo” en formoj de ludkampo kaj duonkampo, konvenan vorton por la nocio “track”, “piste”, “pista”, “Bahn”, t.e. por esprimi la scenejon de la kuro, biciklado, rajdo, eĉ ankaŭ tiun de la remo, skiado, (do la vojon, sur kiu disvolviĝas la movo de la konkursanto al difinita celo) mi ne povis elekti el la supra kolekto de diverslingvaj vortoj, ĉar ĉiuj eventuale taŭgaj havas jam Esp-an varianton, sed kun tute malsama signifo (trako, pisti, bani, kurso, ruto, streko).

Volante eviti homonimion, sed ankaŭ ne volante krei tute arbitran vorton, fine mi transprenis el la germana la vorton “vego” (weg), kiu estas logike tre proksima al la dezirata nocio, semtempe mallonga, simpla, kaj troviĝas en la Esperanta vorttrezoro nur kiel propra nomo de astro: latine = Vega, Esp-e = Vego.

En la Esp-a sporta terminologio la vorto “vego” indikas do unuavice tiun por sporta celo konstruitan, aŭ nur elmezuritan kaj diversmaniere indikatan vojon, vojstrekon, sur kiu la konkursanto disvolvas sian antaŭenmovon, kiu movo estas la ĉefa elemento de la sportaktivado en la koncerna disciplino. Ĝi povas esti:

aa) rekta movo, disvolviĝanta ekz. sur kurvego, naĝvego, remvego ktp.

bb) rondlinia movo, disvolviĝanta ekz. sur sketkurvego, biciklovego, kurvego ktp.

cc) zigzaglinia movo laŭ indikita traco (vojlinio), disvolviĝanta sur rajdsalto—vego, skikurvego, biciklovego ktp.

Per la termino “vego” mi nomis duavice la tutan scenejon de la atletikaj saltaj disciplinoj, kie kaj la komplementa aktivado de la disciplino, nome la svingoakira, impetodona alkuro, kaj la salto mem efektiviĝas same sur certa vojstreko. La esprimoj altosaltovego, trisaltovego ktp. inkluzivas do krom la skorian alkurejon ankaŭ la forsaltilon (forsaltan trabon) kaj la sablan surteriĝejon. Ankaŭ la esprimo skisaltovego apartenas al tiu ĉi grupo.

Triavice, — baze de analogio — la termino “vego” estas la nomo ankaŭ de la scenejo de la

atletikaj ĵetaj disciplinoj (ekz. pezglobĵetovego, martelĵetovego ktp.) kie, escepte la lancoĵeton, temas ne nur pri mallonga movo de la konkursanto, sed pri la movo de la forĵetita sportilo. La senco de la termino inkluzivas do la ĵetejon (ĵetrondon aŭ ĵetrondon kun kaĝo) — ĉe la lancoĵeto ankaŭ la alkurejon — kaj la teritorion de la sektoro, kie la ĵetsportilo povas surteriĝi.

Estas sendube, ke la uzo de tiu ĉi termino estas pli oportuna ankaŭ ĉe la vortkunmetoj (veglongo, vegjuĝisto ktp.) ol ekz. la vortoj konkursejo, disciplinejo aŭ similaj, kaj ankaŭ pli unusenca ol la derivaĵoj skiadejo, kurejo aŭ ekz. rajdejo, kiu lasta estas tute alia nocio ol la rajdsaltovego aŭ terenrajdovego; se ne paroli pri la problemo, kiel esprimi ekz., ke “oni riparis kaj reordigis ĉiujn vegojn de la atletikejo”, se oni ne havas la ĝeneralan formon vego.

Ĉe certa nombro da sportbranĉoj la vorto vego tamen ne estas rekomendebla kiel termino por la scenejo de la tiea sportaktivado.

aa) Kiel jam menciite, por ĉiu sporta ludo kaj por la sketado (arta sketado kaj glacidanco) mi enkondukis la terminon “kampo” en formo de ludkampo kaj duonkampo resp. sketkampo por sketado. Surbaze de analogio mi uzas la terminon ankaŭ por la sporta ludo akvopilkado: akvopilkoludkampo.

bb) Por ĵudo mi kreis la esprimojn “ĵudfaco”, kiu inkluzivas la tutan tapiŝkovritan areon, dum la scenejon de la efektiva, valida aktivado mi nomas “batalfaco”.

La regularo de lukto parolas simple pri tapiŝo kaj ŝirmotapiŝo, kiu diferencigo sufiĉus ankaŭ por ĵudo, sed oni devas konsideri kaj respekti la faklingvon de la unuopaj sportbranĉoj.

cc) Por la bokso, kiel mi jam menciis, mi transprenis la universalan terminon “ringo”.

ĉĉ) Ĉe la skermo la konkursantoj batalas sur “skermoplanko”.

dd) En la sportbranĉo tablotenisio la ludistoj ludas sur kaj super “ludfaco” resp. “duonfacoj”.

La vego ofte estas dividita en plurajn paralelajn striojn (ekz. la kurvego en 6 aŭ 8, la remvego kaj naĝvego en 5-6, la sketkurvego en 2 vegostriojn.) Transpreninte el la slipa vortaro la terminon “leno”, servanta tie kiel termino por la strioj de la moderna plurstria ŝoseo, mi uzas ĝin aŭ sola, aŭ en kunmetoj: kurleno, 6-lena naĝvego, remleno ktp.

d) Vidante la logikan interligon inter La vortoj *gimnasto* kaj *gimnastiko*, mi plivastigis la analogion ankaŭ por la vortoparoj “atleto — atletiko”, “turisto — turistiko” kaj “alpinisto — alpinistiko”.

La termino *atletiko* estas ankaŭ pli internacia.

Koncerne la terminon *turistiko*, ĉe tiu ĉi vorto krom la analogio gvidis min ankaŭ la deziro emfazi la diferencon inter la nocioj *turismo* (= vojaĝo precipe al eksterlando, helpe de diversaj trafikiloj, cele de plezuro kaj por ekkoni La mondon) kaj *turistiko* (= laŭ sportaj reguloj plenumita perpieda ekskurso al belaj pejzaĝoj, cele de plezuro ligita kun sana korpeduko).

La termino *alpinistiko* estas same internacia vorto, sed estas pripensinde, ĉu ne elekti prefere La vorton *alpisto* (alpisto) aŭ eventuale la vorton *montogrimpo* (montogrimpisto).

e) La pli grandan parton de La sportbranĉoj konsiatigas certa nombro da “sportdisciplinoj”, mallonge “disciplinoj”. La disciplino estas tiu plej malsupra subdivido de la sportbranĉo, en kiu oni praktikas nur unu certan specialan, strikte difinitan sportaktivadon, kaj en kiu oni disvolvas konkursojn. Jen kelkaj disciplinoj el diversaj sportbranĉoj: virina altosalto, 4x400-metra vira stafeta ebenkuro (atletiko): teama bicikla persekuto (biciklado); virina unuremila kvaropa remo kun stiristo (remo); vira parluda tablotenisio (tablotenisio).

VII.

Por eviti trimembrajn vortkunnetojn, estas konsilinde uzi la vorton *stafeto* en adjektiva formo: stafeta ebenkuro, stafeta skikuro, stafeta rapidnaĝo ktp., kvankam ankaŭ la esprimoj ebenkurostafeto, rapidnaĝostafeto ktp. ne estas riproĉeblaj. Ĉe duoblaj kunmetoj la substantiva formo estas bone uzebla: stafetbastono, stafetteamo (aŭ stafetoteamo), stafetkuri, stafetkuristo,

stafetnaĝi, stafetsaltigo (ĉe rajdo), kiel ankaŭ kurstafeto, naĝostafeto, trimembra skistafeto ktp.

VIII.

Por distingi inter nocioj, estas necese fiksi la signifon de la vortoj *teamo*, *trupo*, *ensemblo* kaj grupo.

1. La plej striktan signifon havas la vorto *teamo*. *Teamo* estas difinita nombro da konkursantoj

a) batalantaj kolektive en iu sporta ludo, en la sama tempo kontraŭ nur unu *teamo*, havanta la saman anonombron (akvopilokoteamo ktp.);

b) batalantaj kolektive, en la sama tempo kontraŭ unu aŭ pluraj *teamoj*, havantaj la saman anonombron (stafetoteamoj de ebenkuro, naĝo, aŭ skio, luktoteamo, gimnastoteamo ktp.);

c) *teamo* estas ankaŭ la anaro de iu ajn remo- kajak- aŭ kanuformacio, nombranta pli ol du personojn.

Ĉiujn tri *teamospecojn* karakterizas, ke la *teamo* konkuras kolektive ĉiam nur en unu certa disciplino, kaj ke oni taksas kaj premias la suman plenumon de la tuta anaro de la *teamo*.

2. La *trupo* estas

a) certa nombro da individuaj konkursantoj, aŭ

b) individuaj konkursantoj plus unu aŭ pli da *teamoj*, aŭ formacioj, aŭ

c) aŭ pli da *teamoj*, respektive formacioj apartenantaj al unu nacio, aŭ al unu sportklubo (-unuiĝo, -asocio) kaj konkursantaj aŭ en unu, aŭ en pluraj sportobranĉoj (ekz.: hungara nacia atletika trupo, sveda olimpika trupo, Usona olimpika pafotrupo ktp.).

3. La *ensemblo* estas la tuta konkursantaro de iu konkurso aŭ la partoprenantaro de unu el ties kurumoj.

4. La vorto *grupo* havas signifon plej ĝeneralan. En sporta rilato oni uzas ĝin ekz. ĉe la disciplino diskopafo laŭ trapa sistemo, kie la sespersona pafista grupo konsistas el konkursantoj el diversaj landoj; aŭ ekz. ĉe la rondoŭbala sistemo de multaj sportobranĉoj, kiam la ensemblon oni dividas en certan nombron da grupoj, kaj ene de tiuj grupoj ĉiu konkursanto, aŭ ĉiu *teamo* batalas kontraŭ ĉiu.

La *teamestro* estas elektita el la membroj de la *teamo*, fare de la membroj de la *teamo*.

La *trupestro* estas elektita el la membroj de la *trupo*.

La *trupgvidanto* aranĝas certajn aferojn de la grupo, sed ne estas konkursanto.

Skipo estas vulgara esprimo signifanta *teamon*.

IX.

Ofte oni uzas neĝuste, malkorekte la nomon de la plej altaĝrada internacia sportkonkurso aranĝo. Kvankam PV klare donas la du ĝustajn alternativojn: “olimpikoj” kaj “olimpiaj ludoj”, tamen oni ne malofte renkontas la erarajn esprimojn “olimpio”, “olimpiado” aŭ “olimpikaj ludoj”. Kiel oficialan fakterminon mi uzas ĉie en mia studo por la sportaj fakesprimoj sole uzeblan formon: “olimpikoj” kaj ties adjektivan formon. Ekzemple: la olimpikoj de jaro 1972; la Meksikurbaj olimpikoj; olimpika ĉampionado de bokso; olimpikoĉampiona sabroteamo; Olimpika Komitato (internacia kaj naciaj); olimpika flamo; olimpikuloj (La konkursantoj de la olimpikaj ĉampionadoj), ktp.

La esprimon “olimpiaj ludoj” mi konsideras kiel nefakan, tamen tute ĝustan vulgaran esprimon, eble iome solenan vorton, bone uzeblan en la literaturo kaj la ĵurnaloj, sed evitendan en la sportfakaj tekstoj.

Nur unu demando levas sin koncerne la formon “olimpikoj”. Nome, ĉu ne estus jam aktuale rigardi tiun — en la tuta Esperanta vorttrezoro unikan — pluralan formon iom arkaikiĝinta, kaj enkonduki definitive la singularan formon “olimpiko”? Certe tio ĉi estus pli logika, se ne paroli pri la problemo, ĉu diri ekz. pri la olimpikoj en Meksikurbo, ke **ili** estis sukcesaj olimpikoj aŭ ke **ĝi** estis sukcesa olimpikoj? Aŭ ĉu diri ekz.: Ene de kvar jaroj oni aranĝas nur

unu olimpikojn?

Cetere la vorto Olimpio estas la nomo de tiu Greklanda loko, kie la antikvaj olimpikoj — de tie la nomo: olimpiaj ludoj — disvolviĝis. La vorto “olimpiado” signifas la 4-jaran tempointervalon inter du olimpikoj.

X.

Iom malfacila ŝajnas la demando, kiel nomi unuece la sportfederaciojn (unuiĝojn, klubojn ktp.), unuavice tiujn internaciajn. Ĉi-sube mi prezentas tri alternetivojn pri la nomo de la mondfederacio de kelkaj sportobranĉoj. En mia studo mi aplikis ĉie la metodon de la unua varianto.

1. International Judo Federation

a) Internacia Ĵudista Federacio

b) Internacia Ĵudo-Federacio

c) Internacia Federacio de Ĵudo

2. Fédération Internationale de Hockey

a) Internacia Hokeista Federacio

b) Internacia Hoke-Federacio

c) Internacia Federacio de Hokeo

3. Union Internationale de Tir

a) Internacia Pafista Unio

b) Internacia Pafo-Unio

c) Internacia Unio de Pafo

4. Fédération Internationale de Natation Amateur

a) Internacia Amatora Naĝista Federacio

b) Internacia Amatora Naĝo-Federacio

c) Internacia Amatora Federacio de Naĝo

XI.

Ne estas superflue prezenti kelkajn ekzemplojn pri la maniero, kiel esprimi la rezulton de la konkursoj aŭ matĉoj. Jen kelkaj da ili:

La rezulto de la akvopilkomatĉo (akvopilkorenkontiĝo) inter la sveda kaj norvega teamoj estas 5:2 (kvin per du), avantaĝe al la svedoj (al la sveda teamo).

La piedpilkomatĉo inter la teamoj Bologna kaj Juventus finiĝis kun la sendecida rezulto 1:1.

En la olimpika ĉampionado de glaciĥokeo la matĉo inter la elektitaj teamoj de Finnlando kaj Danlando finiĝis kun la rezulto 6:3 avantaĝe al la finnoj.

La nederlanda manpilkoteamo venkis la meksikan teamon en forta batalo kun golproporcio 12:10.

En la disciplino kunmetita pafo per grandkalibra sportfusilo venkis la kvarmembra soveta teamo kun la suma cirklovaloro de 1536 unuoj.

En la finalo (finala kurumo) de la 100-metra vira ebenkuro venkis la Aŭstralia James Smith kun la temporezulto de 10,1 (dek komo unu) sekundoj.

En la tenisĉampionado de Wimbledon, en la disciplino gea parludo venkis la franca paro kontraŭ la angla paro kun la setproporcio 2:1.

XII.

En konkursoj, kiujn partoprenas samtempe kaj egalrajte viraj kaj virinaj konkursantoj (ekz.: gea parluda teniso, pafo per grandkalibra sportfusilo, rajdsalto ktp.) ĉe la laŭnoma mencio de la nomo de la konkursantoj estas laŭcele indiki la virinajn konkursantojn per la vortoj *sinjorino* respektive *fraŭlino*. Ekz. ĉe la gea parluda teniso la parolisto anoncas: “Sekvas la matĉo inter la germana kaj angla paroj. La germanan paron konsistigas s-ino Marta Klein kaj Alfred Mayer. La membroj de la angla paro estas f-ino Irene Tomson kaj Paul Duncan.”

FAKAJ RIMARKOJ KAJ KLARIGOJ

I.

Oni diferencigas *amatorajn* kaj *profesiajn* konkursantojn. Tiu ĉi studo okupiĝas ekskluzive pri la sportaj aktivadoj de la amatoraj konkursantoj.

II.

La amatoraj sportaj konkursoj estas klasifeblaj laŭ pluraj vidpunktoj.

1. *Laŭ specoj* (lokaj, departementaj, tutlandaj konkursoj, simplaj internaciaj konkursoj, pokalkonkursoj, pli altgradaj internaciaj konkursoj).

2. *Laŭ karaktero* (individuaj, teamaj kaj individuaj-teamaj konkursoj).

3. *Laŭ aspektoj* (a) solopaj konkursoj, ekz.: artosketado, gimnastiko, remo ktp.; b) duopaj aŭ paraj konkursoj, ekz.: glacidanco, teniso, remo ktp.; c) grupaj konkursoj, ekz.: moderna gimnastiko, stafetaj konkursoj, remo, sportaj ludoj ktp.).

4. *Laŭ sistemo* (parbatala, rekte elimina, miksa, selekta kaj senselekta sistemoj).

5. *Laŭ konsisto* (a) simplaj aŭ unudisciplinaj konkursoj, ekz.: bokso, naĝo, longosalto, ktp.: b) kunmetitaj aŭ plurdisciplinaj konkursoj, ekz.: moderna pentatlono, gimnastiko, sketkuro, dekdisciplino ktp.).

6. *Laŭ pezkategorioj* (ĉe la konkursoj de lukto, ĵudo, bokso kaj halterlevo).

7. *Laŭ aĝogrupoj* (infanaj, adoleskulaj, junularaj, junioraj, plenkreskulaj).

8. *Laŭ sekso* (viraj, virinaj kaj geaj).

Kiel kompletigo al kelkaj el la supraj punktoj servas la subaj klarigoj

Al 1.

Koncerne la specojn de la konkursoj oni devas diferencigi la du ĉefajn grupojn, nome la enlandajn kaj la internaciajn konkursojn. (Tiu ĉi studo traktas nur internaciajn konkursojn.

En la nomado de la plej malaltgradaj internaciaj konkursoj ne regas unueco inter la diversaj sportbranĉoj kaj pro tio estas malfacile fiksi la unuecan Esp-an formon. En kelkaj sportbranĉoj ni trovas la simplan nocion “internaciaj konkursoj”, aliaj faras diferencon inter “internaciaj konkursoj” kaj “konkursoj inter nacioj”, krome troviĝas “internaciaj klubkonkursoj” alinome “internaciaj konkursoj de klubteamoj”, “internaciaj renkontiĝoj, turniroj”, “amikecaj konkursoj” ktp.

La nomado de la pli altgradaj konkursoj resp. ĉampionadoj estas jam unueca.

Ĉi sube estas vicigitaj kun proponitaj terminoj la ĉefaj subgrupoj de la internaciaj konkursoj.

1.1. *Ordinaraj internaciaj konkursoj, alinome plurnaciaj konkursoj.*

Ili povas havi la jam supre vicigitajn titolojn, sed propre ili havas 3 ĉefajn tipojn.

1.1.1. La “internaciajn konkursojn de klubteamoj” aŭ “klubkonkursojn” partoprenas teamoj aŭ trupoj de sportkluboj, sportunuiĝoj el diversaj landoj, kun la permeso de la landa federacio. La konkurson aranĝas iu sportklubo kun la aprobo de sia landa federacio.

1.1.2. La konkurson (turniron) partoprenas elitaj sportistoj el pli multe da landoj kun la

permeso de siaj klubo kaj landa federacio, aŭ baze de alsendita invitilo aŭ je alvoko per konkursproklamo. Aranĝanto povas esti ĉu sportunuiĝo, ĉu teritoria aŭ landa federacio.

1.1.3. La landa federacio elektas kaj oficiale sendas siajn sportistojn (nacian trupon) aŭ sian nacian teamon, por ke ili reprezentu la “kolorojn” de la nacio en la internacia konkurso, aranĝita de iu landa federacio. La partopreno okazas same baze de invitletero aŭ alvoko en konkursproklamo.

1.2. *Porpokalaj konkursoj, mallonge pokalkonkursoj.*

Aparta speco de la internaciaj sportaranĝoj estas la pokalkonkursoj resp. pokalmatĉoj. Temas pri konkursoj jaro post jaro ripetitaj, en kiuj la partoprenantaj teamoj el certa nombro da landoj, eventuale el pli da kontinentoj batalas por gajni kaj posedi (defendi) dum unu jaro la migran premion, kiu estas altvalora (ora aŭ arĝenta) pokalo (vazo, statuo k.s.) donacita de grandanima persono aŭ institucio por tiu celo. (Ekz.: Pokalo Davis ĉe teniso; Eŭropo-pokalo ĉe piedpilkado; Pokolo Swaythling ĉe tablotenisio ktp.)

1.3. *Pli altagradaj internaciaj konkursoj, alinome konkursoj inter nacioj.*

Al tiu ĉi kategorio apartenas la kontinentĉampionadoj respektive regionaj ĉampionadoj, la mondĉampionadoj kaj la olimpikaj ĉampionadoj.

1.3.1. *Kontinent-ĉampionadoj, regionaj ĉampionadoj.*

Ili estas partopreneblaj por ĉiuj landoj de iu kontinento (ekz.: Eŭropo-ĉampionado, Ameriko-ĉampionado ktp.) respektive por la landoj de certaj regionoj samrangaj kun kontinento (ekz.: Karib-regiona ĉampionado ktp.) Oni indikas ilin per la jaro kaj loko: Eŭropo-ĉampionado de virina korbopilkado de jaro 1963 en Sofio. La ĉampionadon aranĝas unu el la landaj federacioj kun la aprobo de la mondfederacio.

1.3.2. *Mondĉampionadoj.*

La plej altnivelaj internaciaj konkursoj de la diversaj sportbranĉoj estas la mondĉampionadoj, al kiuj ĉiu lando, kiu estas membro de la koncerna mondfederacio, havas la rajton anonci kaj partoprenigi siajn elektitajn konkursantojn aŭ sian nacian teamon. La nombro de la partoprenantoj el unu lando estas difinita. La mondĉampionadon aranĝas la gvidantaro de la mondfederacio, ĉiujare (ekz. sketado) aŭ ĉiun duanjaron (ekz. tablotenisio), aŭ ĉiun jaron krom en la jaro de la olimpikoj (ekz. moderna pentatlon), aŭ nur ĉiun kvaran jaron, meze de la olimpiado (t.e. la kvarjara intervalo inter du olimpikoj).

1.3.3. *Olimpikaj ĉampionadoj kadre de la olimpikoj.*

Por limita nombro da sportbranĉoj krom la mondĉampionado estas disponita ankaŭ alia forumo mondskala, kie la plej avanaj sportistoj de la nacioj povas partopreni diversajn olimpikajn ĉampionadojn kaj vetbatali por la glora titolo de olimpika ĉampiono, alivorte por la olimpika ĉampioneco.

La olimpikoj estas la plej altagrada internacia sportaranĝo, konsistante el la konkursoj de momente 28 akceptitaj sportbranĉoj kaj partoprenebla de la elektitaj konkursantoj kaj naciaj teamoj de ĉiuj landoj de la mondo. Tiu grandioza renkontiĝo de la elito de la tutmonda sportkulturo disvolviĝas ĉiun kvaran jaron en du partoj, nomataj someraj olimpikoj kaj vintraj olimpikoj. Ambaŭ partojn organizas kaj aranĝas la Olimpika Komitato — konsistanta el la reprezentantoj de la kvin kontinentoj — ĉiam en aliaj du landoj, elektitaj el tiuj, kiuj oferis, kaj ŝajnas esti kapablaj doni, konvenan lokon, kontentigantan ĉiujn postulojn kaj bezonojn de tia grandega sportevento.

al 2.

Laŭ karaktero oni distingas *individuajn, teamajn kaj individuajn-teamajn konkursojn.*

2.1. La individuajn konkursojn partoprenas individuaj konkursantoj. Iliajn rezultojn, respektive plenumojn oni registras, taksas kaj certan nombron da avanaj klasitoj (ĝenerale la tri unuajn) oni deklaras kaj premias.

2.2. La teamajn konkursojn partoprenas teamoj kun membronombro fiksita en la aparta regularo de la koncerna sportbranĉo aŭ en la konkursoproklamo. Surbaze ĉe la atingitaj individuaj rezultoj (prezentitaj plenumoj) oni elkalkulas — ĉe ĉiu sportbranĉo laŭ aparte speciala metodo — la suman rezulton (plenumon) de la teamo. Tiun rezulton oni registras, taksas kaj la avane klasitajn teamojn oni deklaras kaj premias.

Ĉe sportbranĉoj, kie la sportaktivado disvolviĝas en formo de parbatalo (bokso, teniso ktp.), ĉiu membro de la teamo batalas kontraŭ ĉiuj membroj de la ceteraj teamoj, se temas pri rondsatala sistemo, respektive kontraŭ ĉiuj membroj de tiuj teamoj, kontraŭ kiuj la teamo devas batali tra la etapo de la elimina sistemo.

Ĉe teamoj plenumantaj kolektivajn sportaktivadojn (gimnastiko, ĉiuj sportaj ludoj kiel akvopilkado, flugpilkado ktp.) estas registrataj, taksataj kaj premiaj kompreneble la komuna plenumo resp. rezulto de la teama kolektivo.

2.3. Ĉe la individuaj-teamaj konkursoj oni registras kaj taksas aparte kaj la individuajn kaj la teamajn plenumojn resp. rezultojn, kaj deklaras kaj premias la avanjajn klasitojn de ambaŭ kategorioj.

al 4.

Koncerne la sistemon de la disvolvo de la konkursoj oni diferencigas *la rondsatalan, la rekte eliminan, la miksan, la selektan kaj la senselektan*, sume kvin sistemojn.

4.1. *La rondsatala sistemo* (rondsatala konkurso) estas aplikebla nur en tiuj sportbranĉoj, kie la sportaktivado disvolviĝas en formo de *parbataloj* (skermo, lukto ktp.)

Ene de la rondsatala sistemo oni distingas *unuetape* kaj *pluretape* konkursojn.

4.1.1. Ĉe *unuetape rondsatala konkurso* ĉiu individua partoprenanto de la konkurso devas batali kontraŭ ĉiuj ceteraj konkursantoj, respektive ĉiu partoprenanta teamo devas batali kontraŭ ĉiuj ceteraj partoprenantaj teamoj. La nombro de la plenumendaj parbataloj estas $(x-1)/2 \cdot x$, kie x estas la nombro de la partoprenantoj. Kaze de 10 partoprenantoj: $(10-1)/2 \cdot 10=45$. En la sama tempo, alinome en la sama *fazo* estas plenumebaj nur duone tiom da parbataloj, kiom nombras la partoprenantoj; do en la ekzempla kazo nur 5 parbataloj. Ĉiuj 45 parbataloj estas plenumebaj en ne malpli ol 9 fazoj. Ekzemple kaze de 4 partoprenantoj la nombro de parbataloj estas $(4-1)/2 \cdot 4=6$ kaj disolveblaj en 3 fazoj. Ĉe kelkaj sportbranĉoj en unu tago estas plenumataj nur unu fazo (ekz. piedpilkado) ĉe aliaj pli da fazoj (ekz. skermo).

La klasigon de la konkursantoj resp. teamoj determinas la nombro de ĉiuj iliaj venkoj kaj malvenkoj. En okazo de *egalstato* inter du aŭ pli da konkursantoj aŭ teamoj, pri la klasigo decidas la t.n. *egalstata konkurso* inter la koncernatoj.

4.1.2. En okazo de granda ensemblo (multnombra partoprenantaro) ĉu en individuaj ĉu en teamaj konkursoj, por preventi tro longedaŭran konkurson, samtempe por eviti troan elĉerpiĝon de la konkursantoj, oni aplikas la *pluretape rondsatalan* manieron. Nome en la unua etapo (unua *antaŭfinalo*) oni formas pli da grupoj kun certa nombro da konkursantoj resp. teamoj. En ĉiu grupo disvolviĝas aparta rondsatalo en necesa nombro da fazoj. Post tio, se necese, el certa procento de la avanjaj klasitoj de la grupoj oni formas denove pli da grupoj por la dua etapo, kaj tiel plu. En la finalo rondsatalas nur fiksita nombro da partoprenantoj: la avanuloj el la grupoj de la duonfinalo.

4.2. En la *rekte elimina sistemo* — aplikata same nur ĉe parbatalaj konkursoj — en la unua etapo oni formas tiom da batalparoj, ke ĉiu konkursanto resp. teamo havu sian unuan kontraŭulon. Tiu parigo okazas per loto, poste oni enskribas la nomon de la konkursantoj en la *lotan tabelon*. (La tabelo havas supran kaj malsupran branĉojn, kiuj renkontiĝas en la finala rubriko de la tabelo.)

Se la anonombro de la ensemblo (anoncitoj) estas senresta potenco de la nombro “2” (4,

8, 16, 32 ktp.), tiam praktike ĉiu partoprenanto komencas la konkurson jam en la unua etapo. Dum la unua etapo elfalas el la konkurso la venkitoj, t.e. la duono de la ensemblo, kaj la venkintoj eniras la duan etapon.

Se la anonombro de la komenca ensemblo ne estas senrestaĵa potenco de la nombro “2”, tiam certa parto de la konkursantoj, nomataj “restuloj” komencas la konkurson nur en la dua etapo. Ilian nombron oni difinas jene: oni subtrahas la nombron de la anoncitoj el la sekva potenco de “2”. Ekz. se estas 27 anoncitoj, tiam la nombro de la restuloj estas $32-27=5$. La unuan etapon eniras do nur 22 konkursantoj (teamoj). En la dua etapo al la 11 venkintoj eliĝas la 5 restuloj, kaj en la loko, fiksita en la lota tabelo, ankaŭ ili komencas la konkurson. Per ili la nombro de la konkursantoj estas jam 16, kiu estas senrestaĵa potenco de “2”. La trian etapon eniras 8, la kvaran etapon t.e. la duonfinalon 4, kaj la *finalon*, t.e. la kvinan etapon 2 konkursantoj (teamoj). Tiuj 2 gajnas la unuan kaj duan lokojn. Por la tria kaj kavara lokoj batalas inter si la du venkitoj de la duonfinalo, aŭ decidas iliaj ĝistiamaj poentoj (ekz. la nombroj de la donitaj kaj ricevataj trafaj ĉe skermo aŭ la nombroj de la donitaj kaj ricevataj goloj ĉe piedpilkado).

Kiel “regulojn” oni elektas laŭeble la plej bonajn konkursantojn resp. teamojn de la ensemblo, kiujn oni nomas *ellevitaj* konkursantoj aŭ teamoj, mallonge “ellevitoj”.

4.3. La *miksa sistemo* uziĝas same ĉe parbatalaj konkursoj. Tie oni aplikas ambaŭ suprajn sistemojn, kombinante ilin diversmaniere. Ekz. la konkurso komenciĝas en rekte elimina sisteno, ĝis restas ok venkintoj. Tiam la ok batalas inter si en rondbatala sistemo. Aŭ en la unuaj etapoj disvolviĝas rondbatalo en grupoj kaj en la lastaj etapoj oni aplikas la rekte eliminan sistemon.

Interesa ekzemplo de la miksa sistemo estis la piedpilko-mondĉampionado de 1970 por la pokalo Jules Rimet. La antaŭfinalojn antaŭis selektaj matĉoj laŭ rekte elimina sistemo en pluraj kontinentoj, rezulte de kio el la ĉ. 50 partoprenantoj venis 16 venkintoj en la okonfinalon. Tie disvolviĝis rondbatalo en 4 apartaj grupoj kaj po 2 avanaĵ teamoj, sume 8, eniris la kvaronfinalon. La kvaronfinalo disvolviĝis laŭ rekte elimina sistemo, nome la venkinto de la 1-a grupo ludis kontraŭ la dualoka klasito de la 2-a grupo, kaj inverse. Same inter la 3-a kaj 4-a grupoj. La duonfinalon eniris la kvar venkintoj. Ankaŭ la duonfinalo disvolviĝis en rekte elimina sistemo, post parigo laŭ regulo fiksita jam antaŭ la komenco de la ĉampionado. En la finalo la du venkintoj batalis por la 1-a kaj 2-a lokoj, kaj la du venkitoj por la 3-a kaj 4-a lokoj.

4.4. Ĉe konkursoj, kie la rezulto estas konkrete mezurebla (pezo, longo, sekundo, trafaj ktp.), tie oni uzas la *selektan sistemon*. Oni starigas nome certan normon, kaj en la unua etapo elfalas tiuj, kiuj ne kapablas plenumi tiun normon. Sekve de tio, ĉe saltoj, ĵetoj, levoj, k.s. la dua etapo estas jam la finalo, kaj la klasigo okazas laŭ la mezuritaj rezultoj. Ĉe kuroj, naĝoj k.s. estas farataj — depende de la anonombro de la ensemblo — pli da antaŭfinaloj, en ĉiu antaŭfinalo kun pli multe da kurumoj. La avanuloj de la kurumoj partoprenas la sekvantan antaŭfinalon, kaj tiel plu, ĝis oni havas la necesan nombron da avanuloj por la finalo.

4.5. La *senselektan sistemon* oni aplikas ĉe tiuj malmultaj disciplinoj, kiuj parte ne altiras multe da konkursantoj, parte la selekta antaŭkurumo bezonus multe da superflua fortostreĉo (ekz.: maratona kuro, longdistancaj skikuroj, biciklado sur ŝoseo ktp.)

al 6.

En la sportobranĉoj lukto, bokso, ĵudo kaj halterlevo la konkursantoj estas grupigitaj laŭ korpopezo, kaj ĝenerale ĉiu rajtas partopreni nur en la konkurso de sia propra *pezkategorio*. En la menciitaj sportobranĉoj estas 8—11 pezkategorioj, havantaj ĉiuj apartan nomon en la naciaj sportlingvoj, kiel ekz.: aerpezo, lanugpezo, rospezo ktp. Sed ĉar la limoj de la pezkategorioj en la supraĵ kvar sportobranĉoj ne kongruas unu kun la alia, kvankam ofte la kategorinomoj estas la samaj, estas evidente, ke sub la sama kategorinomo (ekz.: paperpezo)

oni komprenas malsamajn pezolimojn. Plu implikas tiun staton, ke ĉe la junulaj sportistoj la sama kategorinomo kaŝas aliajn kilogramolimojn, se ne menci, ke la nunaj limoj de la pezkategorioj ne estis ĉiam la samaj dum la historio de la sporto, nek restos neŝanĝitaj en la estonteco.

Rigardante la demandon en internacia skalo, ni devas konstati, ke la supra malordo pliiĝas ĝis preskaŭ kaoso. Nome la diversaj nacioj uzas malsamajn terminojn por la sama kategorio.

Elekti konvenan internacian pezkategorio-nomaron — krom tiun arbitran — ŝajnas neeble. Sed kial insisti koncerne akcepteblan pezkategorio-nomaron, se la afero estas facile solvebla per metodo simpla, logike kaj komprenebla, nome per la indikado de la supra limo de la pezkategorio. Tio estas jam enkondukita en kelkaj naciaj sportlingvoj.

Jen kelkaj ekzemplaj esprimoj: pezkategorio 71; bokskonkurso en la pezkategorio 71; konkurso de la 71-kilogramuloj (vulg.: 71-kiluloj); konkurso en la (pez)kategorio 71. Do ekzemple en la sportobranĉo bokso la nocio “pezkategorio 71” inkluzivas ĉiun konkursanton kun korpopezo inter 67,01 kaj 71,00 kg-oj.

En tiu ĉi studo estas jam aplikata tiu metodo.

al 7.

Laŭ aĝo la amatoraj konkursantoj estas grupigitaj en plurajn aĝkategoriojn: *infana*, *adoleskula*, *junulara*, *juniora* kaj *plenkreskula* (adolta) kategorioj. La aĝolimoj inter la kategorioj varias laŭ sportobranĉoj. La nuna studo traktas nur la sportaktivadojn ktp. de la plenkreskula aĝkategorio.

III.

Ĝenerala skemo, kiel disvolviĝas internacia konkurso.

Konkurson oni entreprenas, preparas, aranĝas kaj disvolvas. La laborojn de la preparo kaj aranĝo entreprenas iu el la naciaj federacioj aŭ unu el ties asocioj (unuiĝoj, kluboj), kiucele tiuj starigas alian *aranĝkomitaton*.

La aranĝlaborojn de mondĉampionado plenumas ĝenerale la mondfederacio mem, dum — kompreneble — la olimpikan ĉampionadon de iu sportobranĉo aranĝas — kune kun la ĉampionadoj de la ceteraj olimpikaj sportobranĉoj — la Olimpika Komitato, en strikta kunlaboro kun la interesataj mondfederacioj.

La aranĝkomitato dissendas sian *konkursproklamon* — eventuale en akompano de *invitilo* — al la koncernataj naciaj federacioj (kluboj, asocioj). La konkursproklamo sciigas la kondiĉojn de la partopreno, la daton de la konkurso kaj diversajn ceterajn kriteriojn.

La partoprenontaj individuaj konkursantoj — kun la permeso de siaj klubo kaj federacio — *anoncas sin* (enskribiĝas) al la konkurso aŭ la nacia federacio *anoncas* ilin (*enskribigas* ilin) al la konkurso. Kies partoprenon oni akceptis, estas nomata *anoncito*.

La partoprenontajn naciajn teamojn aŭ trupojn kaj la klubteamojn la naciaj federacioj anoncas (enskribigas) al la koncerna internacia konkurso.

La konkursantoj alvojaĝas, kaj la konkurso komenciĝas per solena malfermo. Ekfunkcias la *konkursaj juĝistaro*. Ĉiuj ĝiaj membroj kaj la ceteraj fakaj kaj akcesoraj funkciuloj al ĝi subordigitaj zorgas pri la glata disvolvo de la konkurso. La konkursantoj, partoprenantaj en la diversaj disciplinoj, konkursas, t.e. klopodas atingi kiel eble plej bonan rezulton kaj pere de tio akiri laŭeble plej *avanan klasigon*.

La tuton de la konkursantoj, partoprenantaj en iu disciplino aŭ la partoprenantaron de iu *kurumo* oni nomas *ensemblo*.

Pro la granda nombro de la partoprenantoj, en multaj disciplinoj la konkurso estas disvolvata en du aŭ pluraj ŝtupoj, nomataj 1-a, 2-a, ktp. *etapoj* (retrovice: *finalo*, *duonfinalo kvaron-okon-* ktp. *finaloj*), kaj la etapoj dividiĝas plu jen en *kurumojn*, jen en *fazojn*.

Dum la konkurso la konkursantoj kelkfoje *atingas malnovan rekordon*, sed ne *superas* ĝin.

Alifoje ili *superas* alivorte *venkas malnovan rekordon* kaj *starigas novan landan rekordon*, aŭ *kontinentrekordon*, aŭ *mondrekordon*, aŭ *olimpikan rekordon*.

Ĉe sportobranĉoj resp. disciplinoj, kie la rezultoj ne estas senpere mezureblaj, sed necesas aparta subjektiva *prijuĝado* kaj *taksado* fare de fakspertaj juĝistoj (ekz. ĉe gimnastiko, artosketado ktp.), tie ene de la konkursa juĝistaro oni kunmetas *ĵurion* el la tn. *poentjuĝistoj*. La ĵurio *taksas* la plenumojn kaj *aljuĝas poentojn*, alivorte *poentumas*.

Baze de la atingitaj rezultoj ĉu mezuritaj, ĉu poentumitaj, La konkursa juĝistaro *klasigas* la konkursantojn en laŭrezulta vicordo. Sekve de tio post ĉiu finita disciplino (eĉ post ĉiu finita kurumo) ĉiu konkursanto atingas certalokan *klasigon*. Kiu fariĝis la unua, tiun oni nomas *unualoka klasito*, la dua estas la *dualoka klasito* ktp. La plej rezultaj konkursantoj estas la *avanaj klasitoj* aŭ *avanuloj* (“la tri avanuloj” ekz. signifas la unua-, dua kaj trialokan klasitojn).

La konkursa juĝistaro plimalpli solene *deklaras* (publikigas) la klasigojn kaj premias ĝenerale la tri avanajn klasitojn respektive per *ora*, *arĝenta* aŭ *bronza medalo*.

Samokaze oni transdonas ankaŭ la honorpremiojn, kiel ekz. la *migrajn pokalojn*, aŭ aliajn *migrajn premiojn* kaj aliajn valorajn honorobjektojn (plaketojn, statuetojn, ornamobjektojn ktp.).

En pli gravaj konkursoj de multaj sportobranĉoj estas enkondukite starigi la tri avanajn klasitojn — post la deklaro de la konkursrezulto — sur la triŝtupan t.n. venkopodion. Meze, plej alte staras la unualoka klasito, dekstre de li kaj unu ŝtupon pli malalte staras la dualoka klasito, kaj maldekstre de la venkinto, same malpli alte ol li staras la trialoka klasito. Sur la venkopodio ili transprenas la medalon kaj eventualajn ceterajn premiojn.

Kromaj solenaĵoj, akompanantaj la premiotransdonon, estas La ludo de la nacia himno de la venkinto kaj la hiso de la nacia flago ĉe la tri avanaj klasitoj.

Poste oni solene fermas la konkurson.

IV.

La konkursojn en iu ajn sportobranĉo disvolvas, gvidas, kontrolas kaj la rezultojn taksas, registras kaj oficiale deklaras la *konkursa juĝistaro*.

Ĉe ĉiuj sportobranĉoj la konkursa juĝistaro konsistas ĝenerale

a) el la prezidanto de la konkursa juĝistaro, mallonge konkursa prezidanto, el la konkursa vicprezidanto kaj el la konkursa sekretario; krome

b) el certa nombro da gvidaj kaj fakaj juĝistoj (poentjuĝistoj, linijuĝistoj, ludgvidistoj ktp. kaj fine

c) el la konkursa kuracisto kun sanitara personaro kaj el ceteraj funkciuloj.

La gvidaj kaj fakaj juĝistoj havas diversajn specialajn taskojn kaj farendojn, necesajn por la glata kaj sukcesa disvolvo de la diversaj konkursaj disciplinoj. Tiuj taskoj kaj farendoj estas koncize konigitaj ĉe la koncernaj sportobranĉoj, en tiu ĉi verko.

La ceteraj membroj de la konkursa juĝistaro havas ĝenerale similajn — en la konkursa regularo detale antaŭskribitajn — gvidajn, administrajn ktp. taskojn ĉe ĉiu konkurso. La detala konigo de tiuj taskoj jam ne estas la celo de tiu ĉi verko. Menciindas nur, ke en la naciaj lingvoj anstataŭ la terminon “konkursa prezidanto” oni ofte uzas aliajn esprimojn, kiel ekz. konkursa juĝisto, konkursa gvidanto k.s., sed por celi unusencecon estas konsilinde uzi la esprimon: prezidanto de la konkursa juĝistaro, aŭ mallonge: konkursa prezidanto.

V.

En certa nombro de la konkursoj (ekz.: kuroj, ĵetoj, saltoj, halterlevo, pafado ktp*) la sportistoj plenumas konkrete mezureblan sportrezulton (mezuratan en sekundoj, metroj, kilogramoj, cirkloj ktp.).

Ĉe alia parto de la konkursoj la konkursantoj prezentas tiajn ekzercojn (ekz.: gimnastiko, plonĝo ktp.), kie la pritakso baziĝas sur la valoro, sur la kvalito de la enhavo, sur la precizeco

de la plenumo kaj sur la plaĉeco de la ekstera aspekto. La gradon de la valoro kaj kvalito de tiuj kriterioj ĉe la unuopaj disciplinoj kontrolas certa nombro da fakspertaj juĝistoj, kiuj laŭ sia prijuĝo kaj kompreneble laŭ striktaj antaŭskriboj, taksas ĉiun ekzercon per certa poentvaloro. La grupon de la poentjuĝistoj, kiuj poentumas komune en iu disciplino, oni kutimas nomi ĵurio. (Cele de unueca lingvouzo estas konsilinde rezervi la terminon ĵurio, por nomi per ĝi unuavice la grupon de la poentumantaj juĝistoj, kaj eviti nomi tiel la tutan konkursan juĝistaron, kiel tio estas uzo en iuj naciaj lingvoj, ĉe kelkaj sportobranĉoj*)

La tria kategorio estas, kie kaj konkreta mezurado kaj poentumo estas necesaj (ekz.: skisalto).

VI.

Ĉe la definitiva klasigo de la konkursantoj estas konsiderata ĉiam tiu rezulto, kiun ili plenumis en sia laste partoprenita etapo. Se iu ekzemple starigis mondrekordon en unu el la antaŭfinaloj, tiu rekordo estos registrita kiel nova mondrekordo, sed ĝi ne influas la definitivan konkursrezulton de la konkursanto, ĉar oni klasigas lin laŭ lia rezulto en la lasta etapo (ekz. en la finala kurumo).

VII.

Pro grava malregulaĵo la puno estas *eskludo* (vulg. diskvalifo). Oni devas ĉiam indiki, ĉu la esklado koncernas nur eron (kurumon, asaltan, matĉon) de la konkurso, aŭ la tutan konkurson.

La *eskludo el kurumo, asalto* aŭ *matĉo* koncernas nur tiun kurumon ktp., kie la konkursanto kulpis la malregulaĵon, sed en la ceteraj kurumoj, asaltoj aŭ matĉoj li jam povas partopreni. Male, *eskludo el la konkurso* signifas, ke li estas forigita definitive el la plua konkurso. Ĝi tiras post si kompreneble ankaŭ kromajn rigorajn postsekvojn, se la esklado okazis pro grava malobeo al la konkursreguloj, aŭ al la instrukcioj de iu juĝisto (ludgvidisto), aŭ pro kruda, sendisciplina kaj nesporteska konduto kontraŭ alia konkursanto aŭ kontraŭ unu el la juĝistoj (ludgvidistoj) aŭ alia membro de la konkursa juĝistaro.

Alia afero estas la “*elludigo*”. En la pleja parto de la sportaj ludoj la ludgvidisto havas la rajton elludigi iu ajn ludiston, t.e. forigi lin el la ludo por certa tempo (por unu aŭ pli da mimitoj) por tiele puni lin kaj la tutan teamon pro kulpita malregulaĵo.

VIII.

Se iu el la konkursantoj, el la membroj de iu teamo, aŭ iu el la gvidantoj de la konkursantoj, kaj same, se iu membro de la konkursa juĝistaro, opinias iun ajn instrukcion, juĝon aŭ decidon de unu aŭ pli da membroj de la konkursa juĝistaro por si aŭ por alia persono erara aŭ nejusta, aŭ iun ajn detalon de la konkursaj cirkonstancoj por si aŭ por aliaj malavantaĝa, havas la rajton *protesti* kontraŭ tio ĉe la konkursa prezidanto, sekvante la koncernajn antaŭskribojn de la konkursa regularo de la temanta sportobranĉo.

AKVOPILKADO

Naĝante tra la tuta daŭro de la antaŭskribita ludotempo en la akvo de naĝbaseno, ene de elmezurita kaj indikita ludkampo, du teamoj vetludas unu kontraŭ la alia, klopodante ĵeti la pilkon kiel eble plej multajn fojojn en la kontraŭulan golejon, kaj — se necese — malhelpi per tenaca defendludo, ke la kontraŭula teamo ĵetu la pilkon en ilian golejon. Venkas tiu teamo, kiu sukcesis sendi pli multe da goloj en la kontraŭulan golejon.

La mondfederacio de la sportobranĉo akvopilkado (vulgare: akvopolo), kiel ankaŭ tiu de la sportobranĉoj naĝo kaj plonĝo, estas: Fédération Internationale de Natation Amateur (FINA) (Esp-e: Internacia Amatora Naĝista Federacio). Kiel organo subordigita al FINA, la aferojn de la sportobranĉo akvopilkado prizorgas kaj gvidas International Water Polo Committee (Esp-e: Internacia Akvopilkista Komitato).

La sportan ludon akvopilkado ludas aparte viraj kaj virinaj teamoj.

La vetludon inter du *akvopilko-teamoj* oni nomas *akvopilko-matĉo* kaj la ludon ĝenerale: akvopilkado.

La suma ludotempo de la akvopilko-matĉo estas 20 minutoj, kiun tempodaŭron 3 duminutaj interpaŭzoj dividas en 4 *kvarontempojn*. En ĉiu paŭzo la du teamoj lokŝanĝas inter si.

Se matĉo, kiu devas alporti decidan rezulton, finiĝas post la kvara kvarotempo kun sendecida rezulto, nome kun egalstata golproporcio, tiam la ludo estas daŭrigenda. Por tio oni plilongigas la ludotempon per 2x3-minuta t.n. *kromtempo*. La du 3-minutajn *duontempojn* de la kromtempo dividas unuminuta interpaŭzo kun lokŝanĝo inter la du teamoj. Tiun ĉi kromtempo-sistemon — se necese — oni daŭrigas, ĝis estiĝas decida rezulto (nome almenaŭ unugola diferenco).

La sporta ludo akvopilkado disvolviĝas en la akvo de naĝbaseno, ene de longkvadratforma *ludkampo* kun 30 m-a longo kaj 20 m-a larĝo por la viraj matĉoj kaj kun 25x17 m-a amplekso por tiuj virinaj. La profundeco de la akvo devas esti 180 cm-oj.

La *mezlinio* dividas la ludkampon en du *duonkampojn*. La du longaj lateroj de la ludkampo estas la *flanklinioj*, la du malpli longaj nomiĝas *limlinioj*. La limliniojn kaj la flankliniojn — se tiuj lastaj ne estas samtempe la randoj de la baseno — indikas ŝnurego tenata de lignoflosiloj sur la akvospegulo.

Paralele kun la du limlinioj estas elmezuritaj kaj ĉe ambaŭ flankoj de la ludkampo per diversaj koloroj okulfrape indikitaj la du *golejlinioj* (blankaj), la du *2-metraĵ* (ruĝaj) kaj la du *4-metraĵ* (flavaj) *linioj*, kiel ankaŭ la mezlinio (blanka). La golejlinio distancas 30 cm-ojn, la sekvantaj linioj 2, resp. 4 m-ojn disde la limlinio.

Meze de la du golejlinioj estas fiksita po unu *golejo* el po du *golejfojtoj* kaj unu *kverfosto*. La distanco inter la du golejfojtoj estas 3 m-oj kaj la alteco de la kverfosto super la akvospegulo estas 90 cm-oj. La kversekco de la fojtoj estas 7,5x7,5 cm-oj. Loza reto malfermas malantaŭe la golejon.

La *akvopilkoteamo* konsistas el 7 aktivaj ludistoj (inkluzive la golulon) kaj 4 *rezervaj* ludistoj. Unu el la ludistoj — elektita fare de la membroj de la teamo — estas la *teamestro*. Li zorgas pri la disciplino kaj la harmonia kunlaboro inter la membroj de la teamo. Antaŭ la komenco de la matĉo la du teamestroj — en la ĉeesto de la ludgvidisto — lotumas pri la elektorajto koncerne la golejon kaj la ĉapkoloron.

La *trejnisto* akompanas sian teamon al la matĉo. Lia tasko estas zorgi dum la matĉo pri la ŝanĝo de la ludistoj, laŭ la neceso, respektive laŭ la vidpunktoj de la ludotaktiko.

Je la ludkomenco la du teamoj devas ekludi kun po 7 membroj. Se pro akcidento aŭ vundiĝo iu el la ludisto, devas forlasi la ludon, rezerva ludisto ŝanĝas lin tuj, por la plua daŭro de la matĉo. Cetere iu ajn el la komencaj 7 ludistoj estas ŝanĝebla per rezerva ludisto, laŭ la

intenco de la trejnisto. La ŝanĝita ludisto pli malfrue povas denove enludiĝi, ŝanĝinte aŭ la rezervan ludiston, kiu pli frue lin ŝanĝis, aŭ iun ajn alian ludiston. La ŝanĝojn ordonas la trejnisto, sed la ŝanĝoj — escepte la tujan ŝanĝon de ludisto fariĝinta batalsenpova — estas efektivegeblaj aŭ dum la interpaŭzoj, aŭ post golo, aŭ antaŭ la eventuala kromtempo.

Por povi distingi dum la ludo la du teamojn unu de la alia, la membroj de unu el la teamoj portas malhelbluan, la aliaj blankan ĉapon, krom la du goluloj, kiuj surhavas ruĝan ĉapon. La ĉapoj estas fiksitaj sub la mentono per rubando. Ambaŭflanke sur la ĉapo, do dekstre kaj maldekstre, ĉiu ludisto havas sian ludnumeron. Cetere la viraj ludistoj portas mallongan bankalsonon, sub kiu ili devas havi kroman triangulan bankalsoneton. La virinaj akvopilkiŝtoj portas regulan virinan sportan banveston.

La *pilko*, per kiu oni ludas la matĉon, estas plumblovita kaj globforma kaj havas memferman klapon. Ĝi konsistas el la gumveziko (pilko-internaĵo) kaj el la leda kovrilo (pilkoeksteraĵo). Periferio: 68-71 cm-oj; pezo: 400-450 gr-oj.

Al la proklamitaj akvopilko-ĉampionadoj la koncerna sportfederacio aŭ -klubo sendas konkursan juĝistaron, konsistantan el prezidanto, vicprezidanto, el konkursa sekretario kaj du konkursaj juĝistoj. La ĉefaj taskoj de la konkursa juĝistaro estas: difini per loto la vicordon de la matĉoj, fiksi la daton de la matĉoj kaj zorgi pri ilia disvolvo, kiucele al ĉiu matĉo ĝi delegas unu ludgvidiston kaj la antaŭskribitajn vicjuĝistojn (helpjuĝistojn) nome 2 golindikistojn, 2 tempomezuristojn kaj 2 sekretariojn.

La akvopilkomatĉon gvidas la *ludgvidisto* de neniu influite. La ludistoj devas obei lin, dum ili restadas en la baseno. Lia loko estas apud unu el la flanklinioj. Al la gvido de la ludo li disponas pri akrasona fajfilo kaj du (malhelblua-blanka) flagoj muntitaj sur la du ekstretoj de 70 cm-ojn longa bastono. La grandeco de la flagoj estas 35x20 cm-oj. Ĉe ludkomenco, ludrekomencoj kaj postgola ekludo, krome kaze de punŝoto, golula elĵeto, angulŝoto kaj ludhaltigo pro malregulaĵo aŭ alia kaŭzo li signas per unuopa, kaj kaze de golo kaj kvarontempo-fino per duopa fajfilsono. Samtempe per la antaŭskribita flagosigno li klarigas la kaŭzon de la fajfilsigno.

En siaj juĝoj la ludgvidisto devas esti decida. Rimarkitan malregulaĵon nepre li ne preterrigardu, sed punu la kulpulon. Nur tiel li povas realigi disciplinitan ludon. Li havas la rajton elludigi la kulpintan ludiston por 1 minuto. Se la elludita ludisto ne forlasas la ludkampon, la ludgvidisto devas ĉesigi la matĉon.

Nepre kondiĉo de la bona ludgvidado estas, ke la ludgvidisto ĝuste komprenu kaj efike apliku la t.n. *avantaĝ-regulon*. Por povi tiel agi, dum la ludo li devas observi la tutan ludkampon, por preventi tian juĝon, kiu — eĉ se cetere regula -estus favora por la kulpinta teamo. La aplikado de la avantaĝregulo necesigas do, ke a) la ludgvidisto atentu ne influi malfavore la elformiĝon de la regula ludo; b) li ne faru juĝon malfavoran por la nekulpinta teamo; c) ne perturbu per sia enmiksiĝo la elvolviĝantan atakon.

Havante sian postenon ĉe la basenrando kontraŭa al la ludgvidisto, la du *golindikistoj* restadas dum la tuta ludotempo en la imagita plilongigo de po unu golejlinio kaj atente observas la ludon disvolviĝantan tra la tuta ludkampo. Ili havas enmane po unu ruĝan kaj blankan flagojn kun grandeco de 35x20 cm-oj, fiksitajn sur 50 cm-ojn longaj stangoj. Ilia tasko estas indiki per levo de la blanka flago la golulan elĵeton, per la ruĝa la angulŝoton kaj per ambaŭ flagoj la golon. Gravajn malregulaĵojn, kiujn la ludgvidisto eventuale ne vidis, same ili devas indiki, flirtante la ruĝan flagon. Kromaj taskoj, koneksaj kun la golejo al ili komisiita, estas la sekvantaj: registri la golojn; antaŭ ludkomenco kaj ludrekomencoj sciigi al la ludgvidisto — per levo de la ruĝa flago — ke la ludistoj en ordo posteniĝis laŭlonge de la golejlinio; kontroli, ke la por unu minuto elluditaj ludistoj — kiuj devas restadi laŭvice apud ili — reenludiĝu regule, konforme al la signo donita de la dua sekretario de apud la vicjuĝista tablo.

Dum la matĉo funkcias du *tempomezuristoj*. Ĉiu el ili havas sian apartan taskon.

Unu el ili mezuras la *efektivan ludotempon*. Al tio li manipulas tian konkurson horloĝon, kiu estas haltigebla kaj poste plufunkciigebla, t.e. ĝi adicias la partajn tempojn de la efektiva ludotempo kaj ne mezuras la t.n. *mortajn tempojn*, kiam la pilko ne *estas en ludo*. Li ŝaltas la horloĝon je la ludkomenco kaj je la postpaŭzaj ludrekomencoj, kiam la ludgvidista fajfilsigno eksonis. Same li devas ŝalti la horloĝon kaze de libera ŝoto, angulŝoto, golula elĵeto kaj punŝoto, en tiu momento, kiam la pilko forlasas la ĵetantan manon. Ĉe neŭtra (ludgvidista) ĵeto li ŝaltas la horloĝon, kiam la pilko forlasas la manon de la ludgvidisto. Male, li devas malŝalti la horloĝon ĉiun fojon, kiam la ludgvidisto fajfas (escepte la ludkomencon kaj ludrekomencojn). Lia kroma tasko estas kontroli la forpason de la unuminuta puntempo ĉe la elluditaj ludistoj kaj sciiĝi tion al la dua sekretario.

La dua tempomezuristo mezuras la permesitan 45-sekundan tempodaŭron de la kontinua pilkoposedo. Tiucele li havas *nulumeblan* horloĝon, t.e. post malŝalto la montrilo reŝaltas al la cifero nulo. Je ludkomenco kaj je la postpaŭzaj ludrekomencoj, kiel same ankaŭ kaze de neŭtra (ludgvidista) ĵeto, li devas ŝalti la horloĝon nur tiam, kiam unu el la ludistoj, naĝantaj al la pilko, ektuŝas (ekposedas) la surakviĝintan pilkon. En la ceteraj kazoj, nome ĉe postgola ekludo, angulŝoto, golula elĵeto kaj punŝoto, li rajtas ŝalti la horloĝon nur tiam, kiam la pilko forlasis la ĵetantan manon.

Male, li devas nulumi (do malŝalti) la horloĝon en la sekvantaj kazoj.

a) Kiam la ludon haltigas la fajfilsigno de la ludgvidisto aŭ la (altona) sonsigno de la unua tempomezuristo, kiam tiu lasta signas la finon de iu kvarontempo.

b) Kiam iu ludisto ŝotas al la kontraŭula golejo kaj per tio efektive li finas la pilkoposedon.

c) Kiam la pilko bone videble transiras en la posedon de la kontraŭula teamo.

ĉ) Kaj fine, kiam la tempodaŭro de la pilkoposedado fare de unu el la teamoj superpasis la permesitajn 45 sekundojn. En tiu lasta kazo li devas ankaŭ doni sonsignon.

Ambaŭ tempomezuristoj aŭ havas fajfilon rimarkeble alitonan ol tiu de la ludgvidisto, aŭ donas sonsignon per alia sonestiga aparato (sonorilo, elektra fajfilo ktp.). La loko de ili ambaŭ estas ĉe tablo, staranta apud la flanklinio samflanka kun la ludgvidisto.

Konsidere de la vicordo de graveco, la aktivado de la du *sekretarioj* sekvas tuj post tiu de la ludgvidisto.

Unu el ili havas la taskon noti ĉiun gravan eraron (malregulaĵon), kiun la ludgvidisto juĝis tia, kaj ordonis sankcion (punŝoton). Li devas noti la tempopunkton de la kulpado, krome la koloron kaj numeron de la ĉapo. Li havas ruĝan flagon, kiun levante li signas, kiam iu ludisto kulpis trian gravan eraron. Samtempe ankaŭ voĉe li sciiĝas el la ludgvidisto, ke la ludisto devas forlasi definitive la ludkampon. Nome post la tria grava eraro la ludiston oni elludigas por la tuta plua daŭro de la matĉo, alivorte oni eskcludas lin el la matĉo. Sed tio ne estas eskcludo ankaŭ el la konkurso, ĉar en la sekvantaj matĉoj de la akvopilko-konkurso aŭ -ĉampionado li jam povas ludi. Elludita ludisto ne estas anstataŭigebla per rezerva ludisto.

La dua sekretario havas po unu blankan kaj malhelbluan flagojn. Li kontrolas la puntempo de la por unu minuto elluditaj ludistoj (baze de la mezurado de la unua tempomezuristo), kaj per levo de flago samkolora kun la ĉapo de la elludito li signas la forpason de la puntempo kaj donas permeson al reenludiĝo.

La loko de la du sekretarioj estas ĉe la tablo de la tempomezuristoj.

Je la komenco de la kvarontempoj (ludkomenco kaj ludrekomencoj) la ludistoj devas posteniĝi laŭlonge de la golejlinio tiamaniere, ke la interdistanco inter du ludistoj, kaj tiel same inter la golejfojtoj kaj la ludistoj estu minimume po 1 metro. Inter la du golejfojtoj povas restadi ne pli ol 2 ludistoj. Kiam ĉiu okupis sian komencan posteniĝon, kaj la golindikisto komunikis tion per levo de la ruĝa flago, tiam la ludgvidisto fajfilsignas kaj ĵetas la pilkon en la mezon de la ludkampon.

Oni nomas ludkomenco la komencon de la unua kvarontempo kaj nomas ludrekomenco la komencon de la ceteraj tri kvarontempoj kiel, ankaŭ la komencon de la duontempoj de la eventualaj kromtempoj.

Per la ludkomenco komenciĝas kaj per la ludrekomencoj plu daŭras la vetbatalo inter du teamoj, dum kiu ili ambaŭ klopodas atingi — per lerta kaj harmonia interludo — kiom eble plej multe da goloj, aŭ almenaŭ unu *golon* pli ol la alia.

Por malhelpi, ke la pilko estu tro longe en la posedo de unu ludisto aŭ teamo, regulo antaŭskribas, ke ekde la pilkoekposedo la teamo rajtas havi la pilkon ne pli longe ol 45 sekundojn. Ene de tiu tempodaŭro ili devas provi atingi golon, ĉar se ne, sekvas puno, nome libera ŝoto kontraŭ tiu ludisto, kiu posedis la pilkon en la momento de la fajfilsigno de la dua tempomezuristo. La ludistoj klopodas do — se eble, el kiel eble plej favora pozicio — ŝoti al la golejo ene de 45 sekundoj, por atingi golon.

La ludgvidisto *koncedas* la golon (akceptas ĝin, opinias ĝin valida), se la pilko kun sia tuta volumeno transpasis la golejlinion inter la du golejfojtoj. Oni povas plenumi golon pere de ajna parto de la korpo, escepte la pugnitan manon, kondiĉe ke post la komenco, resp. rekomenco almenaŭ du ludistoj ektuŝis pli frue la pilkon.

Post golo sekvas postgola ekludo. Al tiu ambaŭ teamoj devas posteniĝi en sia propra duonkampo. Je la fajfilsigno de la ludgvidisto la meza ludisto de tiu teamo, kiu ricevis la ĵusan golon, ĵetas la pilkon al unu el siaj samteamanoj. Per tio la ludo estas daŭrigata.

Se la pilko transiras la golejlinion ie ajn ekster la golejo, la ludgvidisto fajfilsignas kaj sekvas *golula elfeto*, kiun plenumas la golulo el la golejlinio, inter la du golejfojtoj. La elfetita pilko devas surakviĝi aŭ atingi iun ludiston ankoraŭ en la propra duonkampo.

Se la golulo *paratis* la pilkon, ŝotitan al la golejo, tiam li simple reĵetas ĝin al la ludkampo, laŭeble al iu proprateama ludisto, atentante, ke la pilko ne transpasu la mezlinion. Do en tiu lasta kazo la ludgvidisto ne fajfas, kaj tiu lasta ago de la golulo ne estas konsiderata golula elfeto.

Tiel longe, dum la golulo restadas ene de la 4-metra linio, por li ne estas devigaj la sekvantaj — por la ceteraj ludintoj devigaj — malpermesoj: stari kaj iri sur la basenfundo; pugne bati la pilkon; suprensalti de sur la basenfundo; ektuŝi la pilkon samtempe per ambaŭ manoj. Aliparte al la golulo estas malpermesite naĝi trans la mezlinion, ektuŝi la pilkon troviĝantan trans la mezlinio, aŭ ĵeti la pilkon trans la mezlinion, ĉar ĉio-ĉi sekvigas liberan ŝoton kontraŭ lian golejon.

Se pro trapasa malbonfarto aŭ negrava vundiĝo la golulo devas forlasi la ludkampon por iom da tempo, la ludgvidisto permesas, ke intertempe unu el la ludistoj, troviĝantaj en la akvo, anstataŭ lin, kun ĉiuj privilegioj kaj limigoj de efektiva golulo. La teamo ludas do kun manko de unu ludisto ĝis lia reenludiĝo. La reveninta golulo rajtas ludi poste ie ajn, do ĉu kiel golulo, ĉu kiel kampludisto, laŭ la instrukcio de la trejnisto.

Se sekve de akcidento la golulo devas definitive forlasi la ludkampon, tian unu el la rezervaj ludistoj transprenas la golulan postenon kun ties privilegioj kaj limigoj.

Se la ludgvidisto elludigas la golulon por 1 minuto, unu el la ceteraj aktivaj ludistoj anstataŭas lin dum tiu tempo, sen la specialaj golulaj privilegioj kaj limigoj.

Se la ludgvidisto eskludas la golulon el la plua matĉo, tion li faras aŭ permesante ties anstataŭigon per rezerva ludisto kun la golulaj privilegioj kaj limigoj, aŭ sen tio, kiukaze unu el la kampludistoj ekfunkcias kiel golulo, sen ties privilegioj kaj limigoj.

La malregulaĵojn; regulmalobeojn, sendisciplinajn sintenojn, krudan sintenon kontraŭ la kontraŭulo k.s., kulpitajn dum la matĉo, la regularo nomas eraro kaj distingas simplajn, gravajn kaj personajn erarojn.

La sekvantaj malregulaĵoj estas konsiderataj simplaj eraroj.

a) Je ludkomenco aŭ ludrekomenco starti el de la golejlinio antaŭ la ludgvidista fajfilsigno.

- b) Dum la ludo helpi la samteamanon.
- c) Krampi sin al la golejfosto aŭ cetera akcesoraĵo de la golejo, aŭ forpuŝi sin de tiuj. Dum la efektiva ludotempo krampi sin al la basenrando aŭ forpuŝi sin de ĝi.
- ĉ) Starante sur la fundo, aktive partopreni en la ludo.
- d) Atakate porti la pilkon sub la akvon aŭ teni ĝin tie.
- e) Pugne ekbati la pilkon.
- f) Ŝpruci akvon en la vizaĝon de la kontraŭulo.
- g) Ektuŝi la pilkon enĵetitan de la ludgvidisto, antaŭ ol ĝi atingus la akvon.
- ĝ) Intence malhelpi la kontraŭulon en lia libera movo, kiam tiu ne posedas la pilkon. (La ludisto posedas la pilkon, se li tenas ĝin en sia levita mano, aŭ tuŝas la pilkon flosantan sur la akvo. Pilkokondukado ne estas rigardebla pilkposedado flanke de la unuopa ludisto, sed jes, vidpunkte de la tuta teamo.) Cetere tiu malhelpado havas multajn formojn en la regularo detale traktatajn.
- h) Tuŝi la pilkon samtempe per ambaŭ manoj.
- i) Apogi sin sur la kontraŭulon, aŭ forpuŝi sin de li mane an piede. (Ĉi tie oni devas distingi inter du specoj de sinforpuŝo per piedo. Unu el ili estas, kiam la piedo tuŝas la korpon de la kontraŭulo, kaj el tiu tuŝanta pozicio sekvas la sinforpuŝo. La alia kazo estas, kiam la ludisto estas en tuja proksimeco, sed piede ne tuŝas la kontraŭulon, kaj el tiu netuŝanta pozicio li piede ekpuŝas, t.e. kikas la kontraŭulon, kio estas jam rigardenda grava eraro.
- j) Kulpi ofsajdon, alivorte veni en ofsajdon (en ofsajdan pozicion). Ofsajdas (estas en ofsajdo, en ofsajda pozicio) tiu, kiu restadas ene de la 2-metra linio de la kontraŭulo, escepte se li troviĝas post la linio de la pilko. (Linio de la pilko estas imagita linio trairanta la pilkon paralele kun la golejlinio.)
- ĵ) Perdadi la tempon, t.e. kiam la teamo ekposedinte la pilkon, ene de 45 sekundoj ne ŝotas al la golejo.

k) Plenumi neregule la liberan ŝoton kaj la punŝoton.

La puno por simpla eraro estas ĉiam *libera ŝoto* avantaĝe al la nekulpinta teamo, plenumata de tiu ludisto, kiu troviĝis plej proksime de la loko de la kulpita eraro. La liberan ŝoton oni devas plenumi el la loko de la kulpita eraro, krom se la eraro okazis ene de la 2-metra linio, kiukaze la liberan ŝoton oni plenumas el de la 2-metra linio. El libera ŝoto oni povas atingi golon nur, se post la forĵeto de la pilko almenaŭ du ludistoj (krom la golulo) ludis per ĝi, aŭ ektuŝis ĝin intence. Neniu rajtas perturbi la plenumon de la libera ŝoto.

Gravaj eraroj estas:

a) Se la ludisto kaptas, subpremas aŭ retotiras sian kontraŭulon, kiam tiu ne posedas la pilkon. La puno estas libera ŝoto kaj 1-minuta elludigo de la kulpinto. Se la eraro okazis ene de la 4-metra linio, anstataŭ liberan ŝoton la nekulpinta teamo plenumas punŝoton.

b) Se la ludisto batas mane aŭ kikas (piedfrapas) la kontraŭulon, se li retrobatas kubute, aŭ retropuŝas la kapon en la vizaĝon de la kontraŭulo. Se la ludgvidisto juĝas tion intenca, tiam li ordonas liberan ŝoton, kaj eskaldas la kulpinton el la plua matĉo. Se la eraro okazis ene de la 4-metra linio, la puno estas punŝoto.

c) Ene de la 4-metra linio ĉiu eraro, kiu malhelpas antaŭvideble certan golon. Puno: libera ŝoto, plus 1-minuta elludigo. Se iu malsuprentiras la golejon aŭ se kampludisto ene de la 4-metra linio paratas la pilkon per ambaŭ manoj aŭ pugne, kulpas tiel gravan eraron, ke la puno estas punŝoto.

ĉ) Se ludisto malobeas al la ludgvidisto, kondutas malrespekte, nedisciplinite. Puno: libera ŝoto kaj esklado el la matĉo.

d) Se ludisto malhelpas liberan ŝoton, golulan elĵeton aŭ angulŝoton, kio sekvigas liberan ŝoton kaj 1-minutan elludigon, aŭ se li malhelpas punŝoton, kion sekvas libera ŝoto plus esklado el la matĉo.

e) Neregula reenludiĝo, nome reenludiĝo sen la permeso de la sekretario, aŭ per salto en la akvon, aŭ per forpusiĝo for de la basenrando, aŭ se la reiro al la akvo okazas ne preter la golejindikisto, ene de la 2-metra linio. Puno: libera ŝoto kaj 1-minuta elludigo. Se la ludisto kulpas la eraron en la lasta minuto de iu el la kvar kvarontempoj, aŭ en tiu de la du duontempoj de la kromtempo, tiukaze la kulpinto estas eskludenda el la matĉo sen ŝanĝo, kaj krome la ludgvidisto devas aljuĝi punŝoton avantaĝe al la kontraŭula teamo.

La punŝoton rajtas plenumi iu ajn ludisto de la teamo el de ajna punkto de la kontraŭula 4-metra linio. Dum la plenumo de la punŝoto krom la golulo ĉiu devas forlasi la zonon inter la golejlinio kaj 4-metra linio, kaj por ĉiu estas malpermesite veni al la ĵetanto pli proksimen ol 2 m-oj. El punŝoto oni povas atingi rekte golon.

Ĉiu grava eraro, kiun la ludisto kulpas, estas konsiderata ankaŭ kiel *persona eraro*. Post tri personaj eraroj oni eskludas la ludiston el la plua matĉo.

Se la pilko — ektuŝite laste fare de defendanta ludisto — transpasas la golejlinion ie ajn ekster la golejo, la atakanta teamo plenumas *angulŝoton*. Ĝi estas plenumenda de ĉe la indiko, montranta la finon de la 2-metra linio sur la flanklinio. El la du flanklinioj temas pri tiu, inter kiu kaj la golejo la pilko transpasis la golejlinion. Dum la plenumo de la angulŝoto neniu el ambaŭ teamoj rajtas restadi ene de la 2-metra linio escepte la golulon.

Se ludisto ĵetas la pilkon ekster la ludkampon, la kontraŭula teamo plenumas liberen ŝoton tie, kie la pilko forlasis la ludkampon.

Laŭ specoj la internaciaj akvopilko-konkursoj povas esti:

a) Internaciaj akvopilko-turniroj de klubteamoj. (Tiujn aranĝas sportkluboj kun la aprobo de sia landa federacio, kaj ilin partoprenas la klubteamoj de du aŭ pli da landoj.)

b) Akvopilko-turniroj inter nacioj. (Tiujn aranĝas la landaj federacioj de la sportbranĉo akvopilkado por la naciaj akvopilko-teamoj de du aŭ pli da landoj.)

c) Kontinent-ĉampionadoj de akvopilkado (nur por viroj).

c) Olimpika ĉampionado de akvopilkado (nur por viroj).

Esprimoj: Olimpikoĉampiona akvopilko-teamo. La unualoke klasita teamo de la Eŭropo-ĉampionado de akvopilkado. La venkinta teamo de la kvarnacia akvopilko-turniro de Antverpeno en 1956. La nacia teamo de la finnoj venkis tiun de la svedoj en la internacia akvopilkoturniro de Budapeŝto en 1960.

ARKOPAFO

Uzante sian pafarkon, la arkopafisto pafas certan nombron da sagoj aŭ sur cirklaĵojn, starigitajn en diversaj difinitaj celdistancoj de regula arkopafejo, aŭ parte sur cirklaĵojn, parte sur bestfigurajn celtabulojn, duonkaŝite dislokitajn sub arbedojn de teritorio kovrata de varia vegetaĵo, kaj per bone celitaj pafoj klopodas atingi kiel eble plej altan suman trafvaloron.

Konforme al tiuj malsamaj sportaktivadoj de la arkopafisto, en la sportobranĉo arkopafado oni distingas du subbranĉojn:

- A) cirklotabula arkopafado,
- B) terena arkopafado.

Ambaŭ subbranĉojn povas partopreni kaj viraj kaj virinaj arkopafistoj en apartaj disciplinoj.

La mondfederacio de la sportobranĉo arkopafado estas: Fédération Internationale de Tir à l'Arc (FITA) (Esp-e: Internacia Arkopafista Federacio).

A) Cirklotabula arkopafado

La trejnoj kaj konkuretoj de la cirklotabula arkopafado disvolviĝas en subĉielaj arkopafejoj regule instalitaj. Ĉe de cirklotabula arkopafejo servas ĝenerale herbokovrita teritorio kun antaŭskribita areo. La ĉefaj elementoj de la regula cirklotabula arkopafejo estas:

- a) la paflinio
- b) la cellinioj de la diversaj pafdistancoj
- c) la (eventuala) sagoŝirma muro
- c) la atendlinio
- d) la danĝerzono kaj
- e) la spektejo.

a) la *paflinio*, indikita per ŝnuro aŭ farbita linio, estas rekta linio, kunliganta la *paflokojn*, kie la pafaktivado de la konkursantoj disvolviĝas. La vicnumeron de la paflokoj, lokitaj po 5 m-ojn distanco unu de alia, indikas nura tabuleto sur la grundo.

Ĉiu disciplino de la sportobranĉo arkopafado konsistas el 36 pafoj, kiujn la konkursantoj plenumas en 3-pafaj, ĉe pli grandaj distancoj en 6-pafaj serioj.

La konkursanto devas pafi en stara pozicio, apogante sin al nenio. Antaŭ ekpafado la konkursanto ekstaras super la paflinio, flanke al la celo, en diskurata pozicio, tiele, ke unu el la pledoj staras antaŭ, la alia post la paflinio. Dum la pafado li ne rajtas ĝeni ĉiajn najbarojn, nek ŝanĝi la paflokon.

Ĉiun konkursotagon la konkursanto rajtas plenumi unufoje 2x3 provpafojn, 15 minutojn antaŭ la komenco de la konkurso, sub la kontrolo de la gvida juĝisto. Dum la konkurso ĉiaj provpafoj estas malpermesitaj.

En la sama pafloko rajtas pafi alterne maksimume 4 konkursantoj, nome ili ŝanĝas unu la alian post ĉiu 3-pafa, respektive 6-pafa serio. La vicordo de la ŝanĝoj estas la jena: kaze de 2 konkursantoj = AB, BA, AB... ktp.; kaze de 3 konkursantoj: ABC, CAB, BCA ... ktp.; ĉe 4 konkursantoj: ABCD, DABC, CDAB, BCDA ... ktp. Tiuj ĉi vicordoj estas provizore modifeblaj okaze de kordoŝanĝo aŭ aliaj malgrandaj riparoj al la pafarko.

Dum la disciplino la konkursanto devas pafi ĉiam sur la saman celtabulon. La 3 sagojn de la serio la arkopafisto devas elpafi ene de 2,5 minutoj. Post la unua transpaŝo de tiu tempolimo sekvas atentigo fare de la teknika komitato. Kaze de dua transpaŝo la posttempe elpafitaj sagoj valoras nulan trafon.

b) La *cellinio* de la 30- kaj 50-metra (mallongaj), respektive tiu de la 60-, 70- kaj 90-metra (longaj) pafdistancoj — nomataj 30-metra, 70-metra ktp. cellinioj — estas paralelaj kun la paflinio kaj kunligas la *celtabulojn* de la koncerna pafdistanco. La celtabuloj staras po 5 m-ojn

distance unu de la alia. La imagita linio inter la pafloko kaj la rilata celtabulo estas perpendikla al la paf- kaj cellinio.

La celtabuloj havas du formatojn, konforme al la du grandecoj de la *pafofolioj*, kiujn oni fikasa kaj ŝanĝas sur la celtabuloj dum la daŭro de la konkurso. Tripieda *postamento* subportas la celtabulon tiel, ke la ebena de la tabulo kliniĝas 15 gradojn malantaŭen disde la vertikalo kaj la centro de la celtabulo estas 130 cm-ojn alte super la grundo.

La celtabulon oni pretigas el mola materialo, ĝenerale ĝi estas plata disko volvita el pajloŝpinaĵo. Ankaŭ la postamenton oni faras el molligno, aŭ kovras ĝin per molligno, por preventi, ke la pinto de la sagoj ĝin trafintaj difektiĝu.

De maldekstre dekstren la celtabuloj estas numeritaj. La numertabuloj estas maks. 30x30 cm-ojn ampleksaj kaj portas la numeron de la respektiva pafloko. Senpere post ĉiu celtabulo, en ties vertikala mezlinio, staras flago, leviĝanta 40 cm-ojn super la celtabulon (aŭ super la numertabulon, se tiu estas super la celtabulo), por indiki la ventodirekton. La flago estas el malpeza akrakolora materialo, inter la mezuroj de 25x25 - 30x30 cm-oj.

Ĉiujn sagojn de la 12 (eventuale 6) serioj de la disciplino la arkopafisto pafas sur la saman pafofolion. La pafofolio estas gluita sur krustpaperon kaj oni fiksas ĝin sur la celtabulon antaŭ la komenco de la disciplino. Por la celtabuloj de la mallongaj (30- kaj 50-metraj) pafdistancoj oni uzas la malgrandformatan pafofolion, la diametro de kies plej granda *trafcirklo* estas 80 cm-oj. La diametro de la plej granda cirklo de la pafofolio por la longaj (60-, 70-, 90-metraj) pafdistancoj estas 122 cm-oj.

Sur ambaŭ tipoj de pafofolio troviĝas po 5 koncentraj cirkloj, ĉirkaŭfermantaj samlarĝajn *trafkampojn*. Male al tiuj de la pulvaj aŭ gaspremaj pafiloj, la pafofolioj, kovrantaj la celtabulon, estas plurkoloraj. (Por eviti miskomprenon: sur la postamento troviĝas la tn. *segokapta tabulo*. Kiam ĝin kovras jam la pafofolio, ĝia nomo estas jam celtabulo. (Nome la interna cirklo estas orflava, la sekvaj estas: ruĝa, helblua, nigra kaj la plej ekstera estas blanka. Ĉiu trafkampo (alinome cirklokampo) estas dividita en egallarĝajn internan kaj eksteran trafkampojn. La trafvaloro de la unuopaj internaj kaj eksteraj trafkampoj estas la sekvantaj:

Orflava interna trafkampo	= 10 poentoj
Orflava ekstera trafkampo	= 9 poentoj
Ruĝa interna trafkampo	= 8 poentoj
Ruĝa ekstera trafkampo	= 7 poentoj
Helblua interna trafkampo	= 6 poentoj
Helblua ekstera trafkampo	= 5 poentoj
Nigra interna trafkampo	= 4 poentoj
Nigra ekstera trafkampo	= 3 poentoj
Blanka interna trafkampo	= 2 poentoj
Blanka ekstera trafkampo	= 1 poento

c) Post la 90-metra cellinio troviĝas kelkfoje tn. sagoŝirma muro. Se tia ne ekzistas, la malantaŭa limo de la arkopafejo devas etendiĝi iom pli longe ol la atendeble plej longa pafado de la konkurso.

ĉ) 5 m-ojn malantaŭ la paflinio, paralele kun ĝi, kuras la *atendlinio*. Ĉe la paflinio rajtas restadi nur la pafanta konkursanto, ĉiuj ceteraj arkopafistoj havas sian lokon malantaŭ la atendlinio. Plenuminte sian pafserion, la konkursanto devas tuj retiri sin malantaŭ la atendlinion.

d) Po 10 m-ojn maldekstre de la unua kaj dekstre de la lasta pafloko, ekde la paflinio ĝis la sagoŝirma muro, respektive ĝis la atendeble plej longa sagopafado etendiĝas la tn. *danĝerzono*, indikita per flavaj flagoj.

e) Loko dividita per barilo 10 m-ojn malantaŭ la atendlinio kaj duflanke ekster la danĝerzono estas disponigita kiel spektejo por la publiko.

La arkopafisto pafas per pafarko, tenante ĝin vertikale dum la pafado. En konkurso uzo de ajnatipa kaj ajnamezura pafarko, bezonanta ian ajn tirtorton, estas permesita.

Koncerne la formon, la sportaj pafarkoj estas aŭ *rektaj* aŭ *refleksitaj*.

La rekta pafarko estas simpla, ĉ. 170-180 cm-ojn longa arko, kiun la *fusto* — per kiu oni tenas la pafarkon dum la pafado — dividas en supran kaj malsupran branĉojn. Por ne malhelpi la elpafon de la sago, la fusto troviĝas iom sub la mezlinio de la arko. Tio rezultigas, ke la supra branĉo de la arko estas iom pli longa ol tiu malsupra. La fusto estas polmolarĝa sekcio de la arko. Ĝi estas tegita per ledo aŭ korko, aŭ volvkovrita simple per fadeno aŭ ŝnuro.

La grandefikaj modernaj sportaj pafarkoj estas ĝenerale tn. refleksitaj pafarkoj, nome ili havas refleksitajn ekstremojn, la tn. *kornojn*. Tiuj kornoj estas arkitaj kontraŭdirekte ol la ĉefa arko mem de la pafarko, kaj ĉar ili estas plejparte elastaj, aktive ili kontribuas al la elpafa forto de la pafarko.

La ĉefa materialo de la sportaj pafarkoj estis ĝis la plej lastaj tempoj la ligno, kiel tio estis dum la plurmiljara historio de tiu plej praa pafilo. La plej uzata ligno en Eŭropo tiucele estas tiu de la frakseno, sed oni bone uzas ankaŭ aceron, bambuon ktp.

Ĉe la nuntempaj arkopafokonkursoj oni uzas aŭ gluitajn lignajn pafarkojn, aŭ tiujn kunmetitajn aŭ metalajn.

La *gluitaj lignaj* pafarkoj estas kungluitaj el pluraj maldikaj lignotavoloj. La tn. *kunmetitaj* pafarkoj estas kunmuntitaj el ligno kaj artmaterialo, dum la *metalajn* pafarkojn oni pretigas el ŝtalo aŭ duraluminio. La kunmetitaj kaj metalaj pafarkoj longas 160-170 cm-ojn.

Kiel pafaĵo servas la sago, kun pinta metala finaĵo ĉe la antaŭa ekstremo kaj kun tn. plumaja, t.e. tri, kvar aŭ ses plumaj-direktiloj en speciala stelforma aranĝo, ĉe la posta ekstremo. La modernaj konkursaj sagoj pretiĝas el metalo aŭ el vitrofibro, kun 5-8 mm-a diametro. Ilia longo varias depende de la brakolongo de la konkursanto. Ĉe la posta ekstremo de la sago, malantaŭ la plumaja, troviĝas la “kolo”, t.e. la plejfino de la sago kun kelkmilimetrojn larĝa kaj profunda noĉo, nomata “buŝo”.

La *kordo* de la pafarko estas fadenfasko el lino, aŭ plasto aŭ ŝtalo. Estas tre grave precize elmezuri la konvenan longon de la kordo, por ke ĝi estu nek superajzita, nek subajzita. Nome antaŭ la komenco de la konkurso la arkopafisto ajzas la pafarkon, t.e. unu el la du maŝoj de la kordo, troviĝantaj ĉe ties du ekstremoj, li kroĉas en la enranĉaĵon de unu el la arkofinoj, kaj poste fleksinte la arkon necesgrade li enigas ankaŭ la alian kordomaŝon en la alian enranĉaĵon. Per tio la pafarko estas ajzita, t.e. ĝi estas pafopreta.

La pafarko estas provizebla per simpla celilo (nadlo, celgrajno, cirklo- aŭ duoncirkloforma celilo), sed uzo de lensa aŭ prisma celilo, aŭ ajna cellorno estas malpermesita. Inter la pafaĵoj uzo de binoklo estas permesita.

Aksesoraj ekipaĵoj de la arkopafisto estas la sagujo kun gurto, por teni la sagojn, krome fingroŝirmilo, pafganto, brako- kaj brustoŝirmilo kaj fine okulvitroj; ili ĉiuj havas la celon ŝirmi certajn, dum la arkopafado-konkurso facile vundeblajn korpopartojn.

Tuj antaŭ la pafado la arkopafisto prenas la fuston de la pafarko per la maldekstra mano (maldekstruloj male), prenas la sagon el la sagujo per la dekstra mano kaj metas ĝin sur la pafarkon tiel, ke ĝi kuŝu sur la *sagotenilo*, troviĝanta tuj super la fusto, kaj sidigas la “buŝon” de la sago sur la kordon. Poste — kiam la signo por pafado estis donita — grade tirante la kordon kune kun la sago retrodirekte, trankvile kaj malrapide, kaj la celon konstante celante, li streĉas ĝin ĝis la necesa streĉeco. En la plej konvena momento li delasas la kordon kaj la sagon, por lasi elflugi, elpafi ĝin tiun lastan fulmrapide ale al la celo.

Pri la regula aranĝo kaj disvolvo de la arkopafado-konkursoj zorgas kaj respondecas la konkursa aranĝkomitato kaj la konkursa juĝistaro, kiun lastan helpas ankaŭ la trejnistoj, la trupgvidantoj kaj la teamestroj.

Specialajn taskojn havas la membroj de la konkursa juĝistaro, nome la gvida juĝisto, la

startjuĝisto, la celtabulju-ĝisto kaj la trafnotistoj.

La *gvida juĝisto* estas la ĉefa inspektoro de la tuta disvolviĝanta konkurso, al li estas subordinataj ĉiuj funkciuloj de la konkurso.

La *startjuĝisto* zorgas interalie ankaŭ pri tio, ke la sekvontaj konkursantoj ĝustatempe okupu la paflokojn. Per fajfilo li signas la komencon kaj finon de la pafserioj. Ĝenerale lia tasko estas glate kaj senakcidente disvolvi la unuopajn disciplinojn.

La *celtabul-juĝisto* kontrolas la ĝustan uzadon de la celtabuloj kaj traffolioj (nome la indikadon per trastreko aŭ la forgluon de la jam taksataj traftruoj, la ŝanĝon de la traffolioj por la nova disciplino ktp.)

Al ĉiu pafloko apartenas po unu *trafnotisto*, kiu kune kun la konkursanto aliras la celtabulon post la plenumita pafserio, registras sur *rezultfolio* la trafvalorojn, poste glukovras aŭ per farba trastreko indikas la jam registritajn traftruojn, por ke la traffolio estu uzebla ankaŭ plu, ĝis la lasta serio de la disciplino. Post la plenumita disciplino ili ambaŭ subskribas la rezultfolion kaj la trafnotisto transdonas ĝin al la gvida juĝisto.

La *teknika komitato* konsistas el la gvida juĝisto, kiel prezidanto, kaj el 3 aŭ 5 membroj elektitaj el la trupgvidantoj kaj trejnistoj de la partoprenantaj nacioj.

Koncerne la internaciajn arkopafo-konkursojn oni aranĝas

a) ordinarajn internaciajn konkursojn, kiujn aranĝas la landaj arkopafistaj federacioj kaj partoprenas invititaj teamoj aŭ individuaj konkursantoj de propralantaj kaj eksterlandaj arkopafistaj sportunuiĝoj;

b) pli altgradajn internaciajn konkursojn, alinome konkursojn inter nacioj, kiaj estas

aa) la kontinent-ĉampionadoj de arkopafo, aranĝataj de unu el la landaj federacioj, kun la aprobo de la mondfederacio,

bb) la mondĉampionadoj de arkopafo, aranĝataj de la mondfederacio mem, kaj

cc) la olimpikaj ĉampionadoj de arkopafo, aranĝataj de la Olimpika Komitato.

La pli altgradajn internaciajn konkursojn de arkopafo partoprenas naciaj arkopafoteamoj aŭ elitaj arkopafistoj, elektitaj fare de la landa federacio, por ke ili reprezentu la kolorojn de la nacio.

Laŭ karaktero oni diferencigas individuajn kaj teamajn konkursojn. La arkopafo-teamo konsistas el 3-6 membroj, el kiuj oni taksas la rezulton de la 3 plej sukcesaj teamanoj. Disciplinoj:

1. *Vira arkopafo al 30 metroj.*
2. *Virina arkopafo al 30 metroj.*
3. *Vira arkopafo al 50 metroj.*
4. *Virina arkopafo al 50 metroj.*
5. *Arkopafo al 60 metroj.* (nur por virinoj)
6. *Vira arkopafo al 70 metroj.*
7. *Virina arkopafo al 70 metroj.*
8. *Arkopafo al 90 metroj.* (nur por viroj)

Esprimoj:

Arkopafo-konkurso aŭ konkurso de arkopafo. La unualoka klasito de la disciplino vira arkopafo al 70 metroj en la Eŭropo-ĉampionado de arkopafo de la jaro 1968 en Antverpeno, aŭ pli mallonge: la Eŭropo-ĉampiono de la virina 50-metra arkopafo. Mondĉampiona teamo de arkopafo, aŭ mondĉampiona arko-pafo-teamo. Per 348 poentoj ŝi akiris la trialokan klasigon en la disciplino virina arkopafo al 30 metroj. Olimpikoĉampiona arkopafo-teamo, aŭ olimpikoĉampiona teano de arkopafo.

B) Terena arkopafo

(Manke de fontoj ne estas ellaborita)

ATLETIKO

La atleto — depende de siaj elektitaj unu aŭ pli da favorataj disciplinoj — kuras difinitajn distancojn, saltas alton aŭ longon (alivorte altosaltas aŭ longosaltas), krome ĵetas diskon, lancon, pezglobon aŭ martelon kaj fine plenumas sportan marŝon.

Konforme al tiuj ĉi aktivadoj la sportobranĉo atletiko dividiĝas en la sekvantajn subbranĉojn:

- A. Kuroj;
- B. Saltoj;
- C. Ĵetoj;
- Ĉ. Marŝoj;
- D. Kunmetitaj disciplinoj.

La atletikaj aktivadoj (trejnoj kaj konkursoj) disvolviĝas en — plej ofte subĉielaj — atletikejoj, instalitaj per la specialaj vegoj (kurvego, altosaltovego, longosalto-vego, lancoĵeto-vego, diskoĵeto-vego, pezglobĵeto-vego, martelĵeto-vego) de la diversaj disciplinoj.

La tutan areon de la atletikejo, alinome atletika vegaro, plej ofte ĉirkaŭzonas spektejo el plurŝtupa benkosistemo kaj la mezan parton de la areo okupas piedpilko- aŭ alicela ludkampo. Tiajn kompletajn atletikejojn oni nomas stadiono.

Ĉiu atleto apartenas al iu atletika sportklubo. La atletikaj sportkluboj de ĉiu lando havas ĝenerale sian nacian atletan federacion, kies tutmonda reprezentanto estas: International Amateur Athletic Federation (IAAF) (Esp-e: Internacia Amatora Atleta Federacio, vulgare: atleta mondfederacio) en Londono.

La internaciaj atletikaj konkursoj, same kiel plejparte la konkursoj de la ceteraj sportobranĉoj, — koncerne ilian specon — povas esti:

- a) *ordinaraj internaciaj konkursoj, alinome plurnaciaj konkursoj*, kaj
- b) *plialtagradaj internaciaj konkursoj, alinome konkursoj inter nacioj* (kontinent-, mond-kaj olimpikaj ĉampionadoj).

Konkerne la karakteron oni distingas individuajn, teamajn kaj individuajn-teamajn konkursojn.

La atletoj plenumas sian sportaktivadon en antaŭskribita sportvesto, sur kiu ili devas porti du bone videblajn startnumerojn, unu sur la brusto kaj unu sur la dorso.

Konsidere, ke la sportobranĉo atletiko inkluzivas la plej multajn kaj plej variajn disciplinojn, la konkursa juĝistaro de atletiko konsistas el multaj membroj kun la plej diversaj taskosferoj.

La konkursa juĝistaro dividiĝas en tri partojn:

- 1. La apelkomitato
- 2. La gvidaj konkursaj juĝistoj, mallonge gvidaj juĝistoj
- 3. La fakaj konkursaj juĝistoj, mallonge fakjuĝistoj

1. La *apelkomitato* estas tiu organo de la konkursa juĝistaro, kiu decidas nepluapeleble pri protestoj levitaj al ĝi flanke de konkursantoj, respektive de ties reprezentantoj, aŭ flanke de membroj de la konkursa juĝistaro kontraŭ konkursantoj, resp. ties reprezentantoj, aŭ kontraŭ membroj de la konkursa juĝistaro. La apelkomitato konsistas el diversnaciaj konkursaj juĝistoj delegitaj el la partoprenantaj nacioj. La afergvidanto de la apelkomitato estas la sekretario de la konkursa juĝistaro.

2. La taskoj de la *gvidaj konkursaj juĝistoj* — kiujn taskojn la regularo detale fiksas, — estas tre similaj al tiuj de la gvidaj juĝistoj de la ceteraj sportobranĉoj.

2.1. La *prezidanto de la konkursa juĝistaro*, helpate de la *vicprezidanto*, gvidas la konkurson kaj direktas la konkursajn juĝistojn,

2.2. La *teknika gvidanto* respondecas pri la bona uzeblo kaj sufiĉa kvanto de la bezonataj sportiloj kaj sportinstalajoj. En la laboro lin helpas

2.3. la *veginspektoro*, kiu kontrolas la laboron de la *veglaboristoj* kaj direktas la aktivadon

de la *vegjuĝistoj*.

2.4. La *sekretario* (konkursa sekretario) direktas la administran kaj teknikan disvolvojn de la konkurso, en kiu laboro lin helpas

2.5. la *konkursa intendanto*, kiu estas samtempe la gvidanto de la konkurso.

3. Same detala instrukciaro reguligas la aktivadon de la *fakjuĝistoj*. La pli gravaj el ili estas la sekvantaj.

3.1. La *gvida juĝisto por la kuraj disciplinoj*,

3.2. La *gvida juĝisto por la saltaj kaj ĵetaj disciplinoj* (disciplinoj de lerteco),

3.3. La *gvida juĝisto por la marŝaj disciplinoj*.

Ili tri, ĉiu sur sia propra agadkampo, direktas la laboron de la ĉi-sube vicigitaj fakjuĝistoj, al ili subordigitaj kaj zorgas pri tio, ke kaj tiuj fakjuĝistoj kaj la konkursantoj aperu akurate sur la vego.

3.1.1. La *ĉefstartisto*, helpe de siaj necesnombraj helpantoj, plenumas la farendojn koneksajn kun la startigo. Li startigas la konkursantojn per pistolpafo, kiun antaŭas atentigaj komandvortoj. Kaze de ŝtupigita starto li uzas laŭcele megafonon.

3.1.2. La *helpantoj de la ĉefstartisto* kontrolas la membronombrojn de la sekvantaj kurumoj; lote distribuas la kurlenojn; kontrolas la startnumerojn, la regulan, al la loto kaj kurumo konforman posteniĝon de la konkursantoj ĉe la startejo; la regulan startpozicion ktp.

3.1.3. La *revoka startisto* revokas per signo (pistolpafo) la ensemblon, se la starto ne estis regula.

3.1.4. La *gvida tempomezuristo* direktas la aktivadon de La tempomezuristoj. Ankaŭ li partoprenas en la tempomezurado, sed la rezulton de sia mezurado li konsideras nur, se iu el la mezuristoj — ajnakaŭze — ne mezuris.

3.1.5. La *tempomezuristoj* mezuras per stophorloĝo la tempon, dum kiu la kuristo aŭ marŝisto plenumis sian konkursdistancon. Ĝis 800 m-oj oni mezuras kun 0,1-sekunda precizeco, ĉe pli grandaj distancoj oni mezuras nur 0,2 sekundojn. Ĉiun alceliĝanton mezuras po tri tempomezuristoj. Se du horloĝoj el la tri montras la saman tempon, tiu tempo estas ekceptenda. Se ĉiuj tri montras malsame, estas ekceptenda la meza tempo inter la du plej malproksimaj valoroj.

Ankaŭ oficiale aprobitaj tempomezuraj aparatoj estas aplikeblaj.

La tempomezuristoj sidas sur la plurŝtupa tn. *gvidjuĝista altano*, lokita en la plilongita cellinio, kun rando 5 m-ojn distance de la pli proksima celkolono. Plej alte sidas tiuj, kiuj mezuras la temporezulton de la unua alceliĝanto. Ili atentigas la starton kaj ŝaltas sian stophorloĝon, kiam ili ekvidas la fumon aŭ faŭkofajron de la pistolo, aŭ la komencon de la ekmovo de la startoflago. Ili elŝaltas la stophorloĝon, kiam ajna parto de la trunko de la mezurata konkursanto (brako ne!) atingas la celebenon.

3.1.6. La *celjuĝistoj* difinas la vicordon de la alceliĝintaj kuristoj resp. marŝistoj. Ili sidas sur la plurŝtupa *celjuĝista altano*, ĉe la kontraŭa flanko de la celo. Plej alte sidas tiu, kiu observas la unuan alceliĝanton. Se eble, oni aplikas ankaŭ celfotilon.

3.1.7. La *cirkonombristoj* nombras la plenumitajn cirklojn de maksimume 4 konkursantoj, ĉe kur- aŭ marŝdistancoj pli longaj ol 1500 m-oj, kaj registras la tempon de ĉiu plemimita cirklo. Aparta cirkonombristo havas la taskon sciigi al la konkursantoj la nombron de la ankoraŭ kurendaj cirkloj.

3.1.8. La *vegjuĝisto* kontrolas la regulan kuron (kuro en la propra leno ktp.) de la kuristoj kaj la regulan transpason super la barieroj kaj obstakloj ĉe barier- kaj obstaklokuroj. Ĉe konkursoj ekstervegaj (maratona kuro, landvojoj marŝoj) li notas la startnumeron ĉe la preterpasantaj konkursantoj kaj atentigas, ke ili ne devojiĝu de sur la indikita vojlinio.

3.1.9. La *stafetjuĝisto* kontrolas la regulan ŝanĝon de la stafetkuristoj.

3.2.1. Por ĉiu unuopa salto- aŭ ĵetodisciplino oni formas apartan *juĝbrigadon*, konsistantan

el unu fakjuĝisto, kiel gvidanto de la brigado (brigadestro), el pluraj spacmezuristoj kaj unu notisto.

3.2.2. La *saltaj brigadestroj* kaj la *ĵetaj brigadestroj* kontrolas la regulecon de la saltoj resp. ĵetoj kaj la precizecon de la mezurado, tenante ili mem tiun parton de la ŝtalrubando, kiu mezuras la rezulton.

3.2.3. La *spacmezuristoj* mezuras la alton aŭ longon de la saltoj kaj la distancon de la ĵeto. Ili indikas per speciala indikilo (piktabuleto, pikilo) la lokon, kie la surteriĝa spuro de la saltinto aŭ ĵetsportilo komenciĝas, kaj dum la mezurado ili tenas la komencan ekstremon de la mezurrubando.

3.2.4. La *notistoj* registras la konkursrezultojn en sia notlibro.

3.3.1. La *marŝjuĝistoj* kontrolas la regulecon de la marŝo. La konkursantajn marŝistojn akompanas unu gvida marŝjugisto kaj certa nombro da marŝjuĝistoj. Se la gvida juĝisto kaj unu marŝjuĝisto aŭ tri marŝjuĝistoj tiel opinias, ke la konkursanto marŝas malregule, oni devas eskcludi lin el la plua konkurso. La eskcludon la gvida marŝjuĝisto sciigas al la eskcludenda konkursanto dum aŭ post la konkurso. La eskcludon povas antaŭi nur unu atentigo. La eskcludito devas tuj forlasi la vegon, respektive demeti la startnumerojn kaze de marŝo sur landvojo. La atentigon kaj eskcludon oni signas per flagsigno blanka, resp. ruĝa.

3.4. La *konkurskuracisto* kun siaj helpantoj zorgas pri la eventualaj malsaniĝintaj aŭ vundiĝintaj konkursantoj. Sen kuracisto licas disvolvi nenian konkurson.

A. Kuroj

La disciplinoj de la subbranĉo kuroj disvolviĝas sur speciala kurkonkursejo, nomata atletika kurvego, mallonge kurvego. Por ke la kurvego estu uzebla por mez- kaj longdistancaj kurdisciplinoj, ĝi havas ĝenerale ovalan formon, pli precize formon de longkvadrato, kies du pli mallongajn laterojn duoncirklo anstataŭas. La mezuroj de tiu ovala kurvego ne estas unuecigitaj, nur ĝia longo devas esti minimume 400 m-oj. La longo de la diversaj kurdistancoj estas partoj aŭ plurobloj de la tuta ovala kurvego, kun startejoj kaj celo precize elmezurita.

La kurvego larĝas almenaŭ 7,32 m-ojn kaj estas dividita per blankaj kalklinioj en 6 kurlenojn, mallonge lenojn minimume 1,22 m-ojn larĝajn. En pli signifaj konkursoj (kontinentĉampionadoj, olimpikoj) ĝi havas 8 lenojn.

La internan randon de la kurvego limas po 5 cm-ojn alta kaj larĝa cementa, ligna aŭ alimateria, blankakalkita borderaĵo. La grundo de la kurvego estas el skorio aŭ el ia taŭga artmaterialo (tartano, rekortano).

En ĉiu kurdistanco la kuro okazas tiel, ke la maldekstra mano rigardas al la interno de la ovalo.

Principo estas, ke la lasta fortostreĉo antaŭ la alceliĝo, nomata finiŝo, okazu sur unu el la du rektaj sektoroj de la kurvego. Kuroj de pli longa distanco ol 100 m-oj okazas parte jam sur la kurba sektoro de la kurvego. Ĉar la celo por ĉiuj lenoj estas en la sama cellinio, estas evidente, ke la startejoj de la unuopaj konkursantoj devas esti ŝtupe dislokitaj je precize elmezurita distanco unu post la alia. La efektiva longo de la plej interna kurleno estas elmezurita 30 cm-ojn (ĉe la ceteraj lenoj 20 cm-ojn) distance de la interna lenlimo.

La kuristoj surhavas krom la kutima atleta sportvesto ankaŭ specialajn kurŝuojn, kies plandumo estas provizita per elstaraj pintaj najloj.

La starton signalas startpistoĉo ĉe ĉiuj kurkategorioj. La celo estas atingita, kiam la konkursanto tranapasis la cel-linion, la venkinto de la kurumo krome forŝiris la celrubandon. Ĉe pli gravaj konkursoj la unuaecon kaj la vicordon de la alceliĝintoj registras speciala aparato (celfotilo).

En la kurdisciplinoj kun elmezuritaj lenoj povas samtempe kuri nur tiom da kuristoj, kiom da lenoj la kurvego havas. Ankaŭ ĉe la disciplinoj kun neelmezuritaj kurlenoj la nombro de la

samtempe startantoj estas limita.

Se la ensemblo de iu konkursdisciplino nombras nur tiom aŭ malpli da kuristoj, kiom da lenoj la kurvego havas — respektive kiom da kuristoj povas starti en disciplinoj kun neelmezuritaj kurstrioj, — tiam la diaciplino konsistas el unusola kurumo, nomata finalo. Sed se la membronombro estas pli granda ol la lenonombro — respektive ol la nombro de la samtempe startigeblaj konkursantoj — tiam la disciplino dividiĝas en plurajn antaŭkurumojn kaj unu finalon. Ekz. kaze de 18 konkursantoj en sprinta disciplino oni aranĝas tri antaŭkurumojn kun po 6 kuristoj. Tio ĉi estas nosata unua etapo de la konkurso. Po 2 avanaj kuristoj el la plenumitaj tri antaŭkurumoj eniras la finalan kurumon, mallonge finalon, kiu estas la dua etapo de la konkurso. Kaze de ekz. 12 membra ensemblo — same en mallongdistanca disciplino — estas nur du antaŭkurumoj kaj po tri avanlokaj klasitoj el ambaŭ plenumitaj kurumoj eniras la finalon. La du etapojn oni kutimas nomi ankaŭ duonfinalo kaj finalo.

Se la membronombro estas tiel granda, ke tri antaŭkurumoj ne estas sufiĉaj, tiam oni disvolvas pli multe da antaŭkurumoj, sed jam en du gradoj, nomataj selektaj kurumoj (unua etapo, nomata ankaŭ kvaronfinalo) kaj mezaj kurumoj (dua etapo aŭ duonfinalo). Nur post tiuj sekvas la finalo (tria etapo).

Ekz. kaze de 40-membra ensemblo en sprinta disciplino oni formas 7 selektajn kurumojn (kvaronfinalo) el 5x6 kaj 2x5 konkursantoj. El la 7x2 avanuloj de la plenumitaj 7 selektaj kurumoj oni formas tri mezajn kurumojn: 5, 5 kaj 4 konkursantoj. (Duonfinalo.) La 3x2 avanuloj de la plenumitaj mezaj kurumoj eniras la finalon.

Ĉe la mezdistancaj kaj longdistancaj ebenkuroj en internaciaj konkursoj oni aranĝas plejparte nur finalon, ĉar — kiel jam menciite — tie povas starti pli multaj konkursantoj (10-15) ol la nombro de la kurlenoj, kvankam okaze de pli granda nombro da konkursantoj ankaŭ tie estas imageblaj duetapaj konkursoj. Tamen, por ŝpari tempon kaj la forton de la konkursantoj, oni ĝenerale evitas la duetapan konkurson ĉe la mez- kaj longdistancaj ebenkuroj, formante plurajn tn. tempokurumojn. La konkursanto kuras nur unu fojon en unu el la tempokurumoj kaj laŭ la absoluta vicordo de la atingitaj temporezultoj oni kunmetas la klasigan rangliston, kaj baze de ĝi deklaras la klasigojn kaj premias la tri plej sukcesajn konkursantojn. Ĉe sprintoj tio ne estas ebla, ĉar la momentaj vetercirkonstancoj (vento, pluvo ktp.) de la unuopaj kurumoj ne estas samaj, kio sekvigis dubeblajn rezultojn ĉe mallongdistancaj kuroj.

Ĉe la maratona kuro estas nur unu, finala kurumo.

Se post la plenumo de iu kurumo, inter du aŭ pluraj konkursantoj ekestis egalstato (t.e. se ili atingis la saman temporezulton), kaj de tiu rezulto dependas, kiu eniru la sekvan etapon, tiam — se eble — ĉiu egalstatulo pluiru. Se tio ne eblas, ili plenumas novan kurumon.

Se en la finalo, ĉe la unualoka klasigo ekestas egalstato, tiam — se eble — la konkursantoj kuras ankoraŭfoje la finalon. Sed se tio ne estas ebla, kaj same se la egalstato estas ĉe la ceteraj klasigoj de la finalo, tiam la egalstatuloj ricevas la saman klasigan vicnumeron. Ekz. jene: 1., 1., 3., 4., 5., 6. aŭ jene: 1., 2., 3., 3., 5., 6.

Cetere estas menciinde, ke ĉe pli gravaj konkursoj, kie celfotilo fotas la alceliĝon, oni povas konstati sendube kaj nekontesteble la precizan alvenan vicordon, kio ekskludas egalstatecon.

Al la subbranĉo kuroj apartenas la disciplinoj de 7 diversaj kurkategorioj. La kurdistancoj de tiuj disciplinoj varias inter 80 kaj 42 195 m-oj.

a) Mallongdistancaj ebenkuroj, alinome sprintoj

Por atingi kiel eble plej bonan temporezulton dum la relative mallonga distanco, la mallongdistanca kuristo, alinome sprintisto startas el speciala startpozicio, per helpo de startkavetoj aŭ startapogilo. La sprintaj disciplinoj estas disciplinoj kun elmezuritaj kurlenoj, kio signifas, ke ekde la starto ĝis la celo la konkursanto devas kuri en sia propra leno, tiun li ne rajtas forlasi.

Disciplinoj:

1. *100-metra vira ebenkuro aŭ 100-metra vira sprinto.*
2. *100-metra virina ebenkuro aŭ 100-metra virina sprinto.*
3. *200-metra vira ebenkuro aŭ 200-metra vira sprinto.*
4. *200-metra virina ebenkuro aŭ 200-metra virina sprinto.*
5. *400-metra vira ebenkuro aŭ 400-metra vira sprinto.*
6. *400-metra virina ebenkuro aŭ 400-metra virina sprinto.*

b) Mezdistancaj kuroj

La mezdistanca kuristo kuras mezajn distancojn, nome 800 aŭ 1500 metrojn. La starto okazas en stara pozicio, sen starthelpilo. Ĉe la 800-metra ebenkuro la startejo estas ĉe la komenco de unu el la du vegokurboj. La unuan kurbon ĉiu konkursanto devas kuri en sia propra leno, poste ili rajtas daŭrigi la kuron en la plej interna leno.

Ĉe la 1500-metra ebenkuro la starto okazas en stara pozicio, sen starthelpilo. Ĉe la startejo startas pli multaj konkursantoj ol kiom da lenojn havas la kurvego. Ili startas en unu, eventuale en du vicoj kaj post la starto ili tuj enkuras la plej internan kurlenon.

Disciplinoj:

1. *800-metra vira ebenkuro*
2. *800-metra virina ebenkuro*
3. *1500-metra ebenkuro* (nur por viroj)

c) Longdistancaj kuroj (nur por viroj)

La longdistanca kuristo kuras longajn distancojn, nome 5000 kaj 10 000 metrojn, aŭ la 42 195-metran maratonan distancon. La starto okazas kiel ĉe la 1500-metra ebenkuro.

Disciplinoj:

1. *5000-metra ebenkuro*
2. *10 000-metra ebenkuro*
3. *Maratona kuro*

Ĉe tiu ĉi lasta disciplino la starto kaj la celatingo okazas en la atletikejo (stadiono), la ceteran distancon la konkursanto kuras laŭeble sur landvojo aŭ sur apudvoja pado, sena je malhelpaĵoj kiel digo, fosoj ktp. La vojlinio devas esti precize indikita. Ĉe la 11-a km kaj poste ĉe ĉiu 5a km la aranĝistoj devas instali refreŝigajn staciojn, kie la konkursantoj ricevas refreŝigan nutraĵon kaj povas lavi sin.

c) Stafetkuroj

La kuristoj de la kvarmembra stafetteamo, nomataj stafetkuristoj, stafetkuras, t.e. kuras po 100, 200 aŭ 400 metrojn, ĉe kies fino ili kurante transdonas la stafetbastonon al la sekva kuristo, respektive la lasta kuras en la celon. Ĉe ĉiuj kurdistancoj la kuristoj devas plenumi la tutan kurumon ne forlasante sian propran kurlenon.

La limoj de la partaj distancoj, t.e. de la distancoj kurendaj fare de unu kuristo (100, 200, aŭ 400 m) estas indikitaj per kalkolinio kruce tra la kurvego. Po 10 m-ojn antaŭ kaj post tiuj limlinioj aliaj, alikoloraj linioj indikas la tn. ŝanĝozonon. La transprenonto rajtas ekkuri jam 10 m-ojn antaŭ la ŝanĝozono, sed la bastontransdono, nomata bastonŝanĝo, mallonge ŝanĝo, devas okazi nepre ene de la ŝanĝozono.

La stafetbastono estas ĉ. 30 cm-ojn longa, ĉ. 4 cm-ojn diametra, almenaŭ 50 gr-ojn peza, glata, ambaŭekstremer fermita ligna aŭ metala tubo.

La unua stafetkuristo rajtas uzi starthelpilon.

Disciplinoj:

1. *4x100-metra (kvaroble centmetra) vira stafeta ebenkuro*
2. *4x100-metra virina stafeta ebenkuro*
3. *4x200-metra vira stafeta ebenkuro*
4. *4x200-metra virina stafeta ebenkuro*

5. *4x400-metra vira stafeta ebenkuro*
 6. *4x400-metra virina stafeta ebenkuro*
- d) *Barierkuroj*

Ekde la starto ĝis la celo ne forlasante sian kurlenon, la barierkuristo kure transpasas super 10 (ĉe la 80-metra distanco: super 8) renverseblaj barieroj kaj klopodas atingi la celon kiel eble plej rapide. La neintenca ektuŝo, surpaŝo aŭ renverso de la bariero ne rezultigas malavantaĝajn poentojn. Al ĉiu kurdistanco apartenas alia barielalteco. La interdistanco inter la barieroj kaj la distanco de la unua kaj lasta barieroj disde la startejoj resp. celo estas precize antaŭskribitaj.

Disciplinoj:

1. *80-metra barierkuro* (nur por virinoj) Barieralteco: rondcifere 76 cm-oj.
 2. *100-metra barierkuro*. (nur por virinoj) Barieralteco: rc. 84 cm-oj.
 3. *110-metra barierkuro*. (nur por viroj) Barieralteco: rc. 107 cm-oj.
 4. *200-metra vira barierkuro*. Barieralteco: rc. 76 cm-oj.
 5. *200-metra virina barierkuro*. Barieralteco: rc. 76 cm-oj.
 6. *400-metra barierkuro*. (nur por viroj) Barieralteco: rc. 91 cm-oj.
- e) *Obstaklokuro* (nur por viroj)

La obstaklokuristo kuras certan distancon kaj dume li lerte transpasas difinitan nombron de obstakloj, klopodante atingi la celon kiel eble plej rapide.

La obstaklokonkurso disvolviĝas ĝenerale sur la uzata, minimume 400 m-ojn longa ovala kurvego de la ceteraj kuraj disciplinoj, kun iom modifo, nome la akvofoso (unu el la du uzataj obstaklotipoj) situas aŭ ekster la kurlenoj de la konstanta kurvego, aŭ interne de ili, ĉe unu el la du kurboj de la ovalo. Proksimiĝante al la akvofoso, la obstaklokuristo forlasas do la skorian kurvegon, transpasas la akvofoson kaj poste daŭrigas la kuron, reirante sur la skorian kurvegon. La ceteraj obstakloj — sume kvar — estas lokitaj sur la kurvego mem, sur ties interna flanko tiamaniere, ke 30 cm-a parto de la obstaklo kuŝas ekster la interna rando de la kurvego.

Dum la 3000 metrojn longa kuro la obstaklokuristo devas sukcese transpasi 35 obstaklojn, nome 7 akvofosojn kaj 28 obstaklojn. Praktike li kuras sep rondojn kaj tiel li transpasas sepfoje la akvofoson kaj la kvar obstaklojn.

La obstakloj estas ĉ. 91 cm-ojn altaj kaj 396 cm-ojn larĝaj samformaj trabobarieroj konsistantaj el 13x13 cm-ojn dika trabo sur stabila postamento. Ili pezas 80-100 kg-ojn kaj estas transporteblaj de unu loko al la alia.

La akvofoso estas po 366 cm-ojn longa kaj larĝa. Ĉe ĝia antaŭa ekstremo (rigardanta al la proksimiĝanta kuristo) staras ĉ. 91 cm-ojn alta heĝo. Tuj post ĝi sekvas la foso kun 76 cm-a komenca profundeco, kiu deklive malpliĝas, ĝis tute ĉesas ĉe la transa ekstremo. La foso estas plena de akvo.

En unu kurumo kuras laŭeble 12 konkursantoj. La starto okazas el komuna startlinio. Post la starto la konkursantoj daŭrigas la kuron en la plej internaj kurlenoj.

La unua obstaklo situas 200-270 m-ojn distanca de la startejo. Atinginte tiun unuan obstaklon la ensemblo jam konsiderinde distiriĝis, ke la konkursantoj povas transpasi ĝin sen tumulto, unu post la alia aŭ 2-3 konkursantoj samtempe, laŭ alvena vicordo.

La obstaklokuristo venkis la obstaklon, se li transpasis ĝin ĉu transsalte, ĉu surpaŝe. Tio ĉi koncernas ankaŭ la heĝon de la akvofoso, ĉar ene de la heĝo troviĝas ligna kadro fiksita en la grundo.

Kiam la ensemblo trakuris tiun unuan 200-270 m-an komencan sekcion de la veĝo, nur tiam oni metas la kvaran obstaklon sur ĝian definitivan lokon ene de tiu sekcio.

Disciplino:

3000-metra obstaklokuro

B. Saltoj

Sur specialaj saltovegoj, post svingodona alkuro, la saltisto — konfome el sia disciplino — saltas alton aŭ longon kun, respektive sen helpilo. Post la plenumita salto la teratingo okazas sur mola sabla aŭ artmateria grundo. Cetere la saltovego devas esti instalita konforme al la specialaj bezonoj de la koncerna saltodisciplino kaj devas havi alkurejon kun antaŭskribita longo.

La rezulton de la salto, nome la saltitan longon oni mezuras per ŝtala mezurrubando, mallonge stalrubando (ĉe altosalto ev. ankaŭ per ŝtala mezurstango), aprobita de ŝtata mezurilaproba instituto. Tiun parton de la ŝtalrubando, kiu montras la rezulton, devas teni ĉiam oficiala konkursa juĝisto, nome ĉe la forsalta linio. Mezurante oni akceptas ĉiam la pli malgrandvaloran entjeran centimetron. Frakcian centimetron (t.e. milimetron) oni ne registras.

Kaze de egalstato ĉe la altosaltoj disciplinoj tiu saltisto antaŭas la alian, kiu transsaltis kun malpli multe da provoj tiun alton, ĉe kiu ekestis la egalstato. Se tio ne ĉesigas la egalstaton, tiam oni ekzamenas, kiu el la egalstatuloj havis dum la tuta konkurso plej malmulte da sensukcesaj provoj, inkluzive de la lasta transsaltita alto. Se ankaŭ post tio restas la egalstato, oni ekzamenas, kiu el la egalatuloj havis sume plej malmulte da ĉu sukcesaj ĉu senrezultaj provoj. Se ankaŭ tiu ekzameno ne donas solvon, tiam oni dividas la klasigon inter la egalstatuloj (ekz. 1., 2., 2., 2., 5., 6.) escepte, se temas pri unualoka klasigo. Tiukaze la egalstataj konkursantoj saltas la koncernan alton ankaŭ kvaran fojon. Se tio ne donas solvon, oni metas la laton pli malalten, en la antaŭlastan pozicion, kaj tiel daŭras plu la konkurso ĝis decido.

Kaze de egalstato ĉe la longosaltoj disciplinoj oni konsideras la duan, se necese, la trian ktp. provojn.

Por limigi la membronombron de la ensemblo de iu konkurs-disciplino kaze de tro multaj sinanoncintoj, oni aplikas la tn. selektan antaŭkonkurson. Ekzistas du elekteblaj variantoj: la efektivan konkurson eniras nur, kiuj atingis certanivelan rezulton, aŭ la efektivan konkurson eniras nur difinita nombro da konkursantoj.

La subbranĉo saltoj dividiĝas en kvar grupojn: a) altosalto, b) stangosalto, c) longosalto, ĉ) trisalto.

a) Altosalto

Post 15-18 metra svingodona alkuro (de antaŭe aŭ de flanke) la altosalto — sen ajna helpilo — transsaltas laton tenatan de du postamentoj en certa alto. Li saltas ekz. 185 centimetrojn, alivorte 185-centimetran alton. La forsalto okazas de sur la forsalta trabo, ĉiam per unu piedo. La altosalto rajtas komenci la salton aŭ ĉe la komenca alto (ĉe kiu alto oni komencas la konkurson), aŭ ĉe iu ajn pli supera alto. Ĉe ĉiu alto la konkursanto havas rajton pri tri saltoprovoj, mallonge provoj kaj post unu sukcesa transsalto de iu alto li povas daŭrigi la salton ĉe la sekva alto. (La centimetro-valoroj de la sinsekvaj transsaltendaj altoj estas jam antaŭ la konkurso oficiale difinitaj.) Post tri sinsekvaj malsukcesaj saltoj la altosalto elfalas el la konkurso. La restintaj ses avanaj konkursantoj kaj la egalstatuloj de la sesa loko havas jam ses provojn.

La salto validas ankaŭ, se la saltisto transsaltante ektuŝas la laton, sed tiu ne falas. La altosalto rajtas, eĉ estas rekomendinde, ke li precize elmezuru la alkuran distancon, por ke li sukcesu forsalti per la ĝusta piedo, el la ĝusta saltopunkto.

La latotenaj postamentoj — faritaj el ajna materialo — devas esti stabilaj. Sur ili ortangule elstaras 6x4 cm-a glitebla kaj fiksebla latotena plato. La du postamentoj devas esti tiel lokitaj, ke la du platoj staru vid-al-vide unu kontraŭ la alia, kio ebligas, ke la lato facile povas fali antaŭen aŭ malantaŭen, se la saltisto ektuŝis ĝin.

La lato estas 3,64 — 4 m-ojn longa, maks. 2 kg-ojn peza, kaj estas farita el ligno. Ĝia transversa sekco estas cirklo kun 25-30 mm-a diametro aŭ triangulo kun 30 mm-aj lateroj.

La mezuro de la sablokavo — aŭ artmateria surteriĝejo — estas almenaŭ 5x4 m-oj.

Disciplinoj:

1. *Vira altosalto.*

2. *Virina altosalto.*

b) Stangosalto (nur por viroj)

Post 40-45 metra svingodona alkuro sur skorikovrita alkurejo la stangosaltisto — helpante sin per longa, elasta stango — transsaltas laton tenatan de du postamentoj en certa alto. Post la plenumita salto la stangosaltisto atingas la teron sur 5x5 metrojn area surteriĝejo kovrita dike per molaj sablo aŭ artmaterio.

Difinitan distancon antaŭ la rando de la surteriĝejo estas sinkita en la tero — kun supra eĝo samnivela kun la tersurfaco — la tn. apogkesto. Ĉe la fino de la alkuro la stangosaltisto — ne bremsante sian impeton — puŝas la antaŭan ekstremon de la ambaŭmane kunportita saltostango en la apogkeston, kiu donas el la stango firman apogon dum la transsalto.

La saltisto havas la rajton transloki la du postamentojn maksimume 60 cm-ojn antaŭ aŭ post la linion de la malantaŭa ekstremo de la apogkesto.

La saltostango povas esti farita el ajna konvena materialo kaj longas laŭ la bezono de la stangosaltisto.

Sensukcesa estas la salto resp. la provo de la konkursanto, sed validas kiel provo,

aa) se li debatis la laton;

bb) se li jam forkikis sin, kaj leviĝis en la aeron, sed ne transsaltis la laton;

cc) se post la forsalto de sur la tero li translokas la malsupran manon super la supran manon, aŭ se per la supra li faras novan, pli supran prenon;

ĉĉ) se antaŭ la forsalto li ektuŝas ĉu per la korpo, ĉu per la stango ajnan parton de la teritorio situanta post la imagita linio ĉe la malantaŭa kestovando, inkluzive ankaŭ la surteriĝejon.

La nombro de la provoj kaj la procedo kaze de egalstato estas la sama kiel ĉe altosalto.

Disciplino:

Stangosalto

c) Longosalto

Post 40-45-metra svingodona alkuro la longosaltisto saltas sen ajna helpilo certalongan distancon, konforman al sia forto. Li saltas ekz. 620 centimetrojn, alivorte 620 centimetran longon. La forsalto okazas de sur 122 cm-ojn longa, 20 cm-ojn larĝa kaj 10 cm-ojn dika forsalta trabo, kiu estas sinkita en la tero, 1 m-on antaŭ la rando de la sablokavo, samnivele kun tiu kaj kun la skoriokovrita alkurejo. La sablokavo estas minimume 2,75 m-ojn larĝa, 9 m-ojn longa kaj enhavas sablon almenaŭ 50 cm-ojn profundan.

La kavoflanka rando de la forsalta trabo estas la forsalta linio. La longon de la salto oni mezuras — ĉiam perpendikle — ekde la forsalta linio ĝis la plej proksima spuro en la sablo.

Erara, sensukcesa estas la salto resp. la provo, se la longosaltisto post la forsalto, sed antaŭ la teratingo, aŭ post la senforsalta alkuro, per ajna parto de la korpo ektuŝas la grundon malantaŭ la forsalta linio.

Tuj post la forsalta trabo, laŭ ties tuta longo estas lokita sur la tero mallarĝa tabulo kovrita per plastileno aŭ sablo delikate glatigita samnivela kun la trabo. Se la konkursanto ĉe la forsalto “enpaŝas”, lia piedspuro postrestas sur la mola materialo. Tia salto estas sensukcesa, sed kiel provo validas. Male al ĉi tio: la forsalto de antaŭ la trabo estas valida, nur la longon oni mezuras ankaŭ ĉikaze ekde la forsalta linio.

Ĉiu longosaltisto havas la rajton fari 3 saltojn, inkluzive enkaŭ la sensukcesajn provojn. Oni taksas la plej bonan rezulton. Kaze de malpli ol 6 konkursantoj ĉiu havas 6 saltojn.

Disciplinoj:

1. *Vira longosalto.*

2. *Virina longosalto.*

ĉ) *Trisalto (nur por viroj)*

La trisalto estas speco de longosalto, kie la konkursanto, nomata trisaltisto, — sen ajna helpilo — post 40-45 metra alkuro faras tri sinsekvajn saltojn, farante la unuan kaj duan saltojn per la sama, kaj la trian per la alia piedo. La forsalta trabo estas lokita 11 m-ojn distance de la pli proksima rando de la sablokavo. La salto ne estas regula, konsekvence ne estas valida, se la vicordo de la forsaltantaj piedoj ne estas laŭ la antaŭskribo; krome kiel ĉe longosalto. Koncerne ĉion ceteran validas same la reguloj de la subgrupo longosalto.

Disciplino

Trisalto.

C. Ĵetoj

La konkursanto de la ĵetaj disciplinoj, alinome ĵetisto, konforme al sia disciplino — ĵetas iun el la kvar ĵetsportiloj: lanco, disko, pezglobo kaj martelo. La ĵeto okazas sur speciala ĵetvego, konsistanta el alkurejo plus ĵetarko por la lancoĵeto kaj el ĵetorondo por la ceteraj ĵetdisciplinoj.

La ĵetarko estas 4 m-ojn longa ligna aŭ fera arko de 16 m-ojn diametra cirklo.

La ĵetrondo konsistas el 6 mm-ojn dika, 76 mm-ojn alta kaj 2,135 m-ojn (pezglobo, mertelo) resp. 2,5 m-ojn (disko) diametra fera aŭ ŝtala ringo, sinkita en la grundon, ĝis la supra rando samnivelas kun la tero. La interna grundo de la ĵetrondo estas 16-26 mm-ojn profundita kaj skoriita.

Krom la ĉefa ĵetdirekto estas difinita ankaŭ la angulo (lancoĵeto: 30; disko- kaj martelĵeto: 60; pezglobĵeto: 65 gradoj), ene de kies sektoro la ĵetita ĵetsportilo devas atingi la teron. La sektorlimojn flagoj indikas.

Dum la ĵeto la ĵetisto rajtas ektuŝi nur la internan flankon de la ĵetrondo aŭ ĵetarko. La ektuŝo de la supro de la rondorando, aŭ “elpaŝo” sur la eksterrondan grundon signifas sensukcesan ĵetprovon.

Post la plenumita ĵeto la ĵetisto ne rajtas forlasi la ĵetrondon, resp. la alkurejon pli frue ol kiam la sportilo atingis la teron. Post tio — el firma ekvilibra pozicio — li devas retrodirekte forlasi la ĵetlokon.

La ĵetitan sportilon oni devas reporti al la ĵetloko, ĝia reĵeto estas severe malpermesita.

La rezulton, alinome longon de la ĵeto oni mezuras ekde la pli proksima ekstremo de la postlasita spuro de la ĵetsportilo sur la tero ĝis la interna flanko de la rondorando, resp. arkorando. Dum la mezurado la mezurrubando devas trairi la centron de la ĵetrondo, resp. la cirklocentron de la ĵetarko. La mezurado okazas per aprobita ŝtala mezurrubando. Tiun parton de la ŝtalrubando, kiu montras la rezulton, tenas ĉiam la gvidanto de la juĝbrigado ĉe la interna rando de la ĵetrondo aŭ ĵetarko. Du spacmezuristoj tenas krome la streĉitan ŝtalrubandon: unu ĉe la spuro de la surteriĝinta ĵetsportilo, la alia ĉe la centro de la ĵetrondo (ĵetarko). Ĉe pezglobĵeto oni mezuras kun unucentimetra, ĉe la ceteraj ĵetdisciplinoj kun ducentimetra precizeco. Frakciajn centimetrojn (milimetrojn) oni ne registras, sed akceptas ĉiam la pli malgrandan centimetran, resp. ducentimetran valoron el la du plej proksimaj.

Kaze de egalstato tiu konkursanto antaŭas la alian, kies dua, eventuale tria provo estis pli bona ol tiu. de la alia.

Se la nombro de la konkursantoj, t.e. la ensemblo de iu ĵetdisciplino estas pli granda ol 6, tiam ĉiu havas rajton pri 3 ĵetoj. La ses avanaj ĵetistoj kaj la eventualaj egalstataj sesalokaj konkursantoj havas rajton pri 3 kromaj provĵetoj. Oni taksas la plej bonan rezulton el la 3 resp. 6 ĵetoj. Se la ensemblo nombras malpli ol 6 konkursantojn, tiam ĉiu havas rajton pri 6 ĵetoj.

Koncerne selektan antaŭkonkurson validas la regulo trovebla en la ĉapitro saltoj.

El la suprediritaj evidentas, ke la subbranĉo ĵetoj dividiĝas en kvar grupojn: a) lancoĵeto, b)

diskoĵeto, c) pezglób-ĵeto, ĉ) martelĵeto.

a) Lanĉoĵeto.

Post svingoakira alkuro la lanĉoĵetisto ĵetas la ĵetsportilon nomatan lanĉo per unu mano al kiel eble plej granda distanco, tiel, ke ĝia fera pinto atingu unua la grundon.

La lanĉoĵeto-vego — mallonge lancovego — havas de 30 (se eble 33,5) ĝis 36,5 m-ojn longan kaj 4 m-ojn larĝan alkurejon.

La lanĉo estas pretigita el ligno aŭ metalo kaj havas la antaŭskribitan longon, pezon kaj transversan sekcon. La pinto estas ĉiam el metalo. La mezan parton de la lanĉo kovras tn. ligaĵo aŭ volvaĵo, survolvita el ŝnuro en 14-16 cm-a longo. ElĵetonTe la lanĉoĵetisto tenas la lanĉon ĉe tiu ligaĵo kaj elĵetas ĝin super la ŝultro.

Disciplinoj:

1. *Vira lanĉoĵeto.*

Lanĉomezuroj: longo: 260-270 cm-oj; pezo: 800 gr-oj; diko en la mezo (sub la ligaĵo): 2,5-3 cm-oj.

2. *Virina lanĉoĵeto.*

Lanĉomezuroj: longo: 220-230 cm-oj; pezo: 600 gr-oj; diko en la mezo: 2-2,5 cm-oj.

b) *Diskoĵeto.*

Tenante la ĵetsportilon nomatan disko en unu mano, la diskoĵetisto faras unufojan energian kaj impetan ĉirkaŭturnon kaj per la helpo de la centrifuga forto li ĵetas la diskon al kiel eble plej granda distanco.

La ĵetsportilo disko estas de la rando ĝis la mezo grade plidikiĝanta ligna disko kun alfiksita metala ringo ĉirkaŭ la rando kaj kun rondej plipezigaj metalplatoj ambaŭflanke de la mezo.

Disciplinoj:

1. *Vira diskoĵeto.*

Diskomezuroj: diametro 220 mm-oj; pezo: 2 kg-oj.

2. *Virina diskoĵeto.*

Diskomezuroj: diametro: 180 mm-oj; pezo: 1 kg,

c) *Pezgloób-ĵeto*

La pezglób-ĵetisto ĵetas metalan globon nomatan pezglóbo per unu mano al distanco konforma al sia forto. La ĵeto okazas el la pli frue jam priskribita ĵetrondo, kiun antaŭe bone fiksita, 1,22 m-ojn longa, 114 mm-ojn larĝa arkoforma randoligno borderas. Ĝi elstaras 80 mm-ojn super la fera rando de la ĵetrondo, kun kiu ringo ĝia interna flanko formas kvazaŭ koheran, 100 mm-ojn altan vandon. La surpaŝo sur la blankakalkitan randolignon malvalidigas la ĵeton.

La pezglób-ĵetisto puŝe ĵetas la pezglóbon el de la ŝultro, dum la movon de la mano sinkrone akompanas laŭcela helpa movo de la trunko kaj de la piedoj.

La pezglóbo estas fera aŭ latuna globo kun difinitaj pezo kaj diametro.

Disciplinoj:

1. *Vira pezglób-ĵeto.*

Globmezuroj: pezo: 7,257 kg-oj; diametro: 11-13 cm-oj.

2. *Virina pezglób-ĵeto.*

Globmezuroj: pezo: 4 kg-oj; diametro: 9,5-11 cm-oj.

ĉ) *Martelĵeto (nur por viroj)*

La martelĵetisto, tenante ambaŭmane la fuston de la ĵetsportilo nomata martelo, faras plurajn (3-4) impetajn ĉirkaŭturnojn en la ĵetrondo kaj per la helpo de la centrifuga forto li ĵetas la martelon kiel eble plej malproksimen.

Por preventi akcidentojn, la ĵetrondon ĉirkaŭbaras 7 m-ojn diametra, minimume 5,35, se eble 4 m-ojn alta ŝirmokrado kun 5 m-a malfermaĵo en la ĵetodirekto. La du flankoj de la malfermaĵo kaj la centro de la ĵetrondo determinas la antaŭskribitan 60-gradan ĵetsektoron.

La ĵetsportilo martelo konsistas el la kapo, la tigo kaj la fusto.

La martelkapo estas 102-120 mm-ojn diametra regula globo el fero aŭ alia metalo ne pli mola ol latuno. Sur ĝia surfaco sammateriala elstara maŝeto ebligas alkroĉi la tigon.

La tigo estas unufadena, almenaŭ 3 mm-ojn dika kaj ĉ. 110 cm-ojn longa ŝtaldrato, ambaŭekstreme maŝe kroĉiganta al la kapo kaj al la fusto.

La fusto estas triangulforma, ĉ. 10 cm-ojn ampleksa rigida tenilo el unu- aŭ duobla kablo ĉ. 10 mm-ojn dika. La tuta martelo pezas 7,257 kg-ojn.

Disciplino:

Martelĵeto.

Ĉ. Marŝoj (nur por viroj)

La marŝisto marŝas diverslongajn difinitajn marŝdistancojn sur vego (ĝenerale sur kurvego) aŭ landvojo, kaj klopodas atingi la celon kiel eble plej frue aŭ plenumi kiel eble plej longan marŝon dum difinita tempodaŭro, irante per rapidaj paŝoj, sen fari kurajn movojn. La kriterio de la sporta marŝo estas, ke la marŝisto devas teni seninterrompan kontakton kun la grundo, t.e. la antaŭa piedo devas ektuŝi la grundon pli frue ol la malantaŭa forlasis ĝin. Kroma postulo estas, ke la surgrunda piedo — eĉ se nur por momento — devas esti rektigita. Malregulan marŝon — post unu averto — sekvas eskludo el la konkurso.

Ĉe pli longaj marŝdistancoj ol 20 km-oj, en certaj distancoj apud la vojlinio estas starigitaj refreŝigaj stacioj, kie la konkursantoj ricevas refreŝigan nutraĵon kaj povas lavi sin. Tio validas ankaŭ ĉe marŝoj sur vego. Disciplinoj:

1. *5-kilometra marŝo sur vego.*
2. *10-kilometra marŝo sur vego.*
3. *15-kilometra marŝo sur vego.*
4. *20-kilometra marŝo sur vego.*
5. *25-kilometra marŝo sur vego.*
6. *30-kilometra marŝo sur vego.*
7. *50-kilometra marŝo sur vego.*
8. *1-hora marŝo sur vego.*
9. *2-hora marŝo sur vego.*
10. *15-kilometra marŝo sur landvojo.*
11. *20-kilometra marŝo sur landvojo.*
12. *25-kilometra marŝo sur landvojo.*
15. *50-kilometra marŝo sur landvojo.*
14. *50-kilometra marŝo sur landvojo.*

D. Kunmetitaj disciplinoj

La disciplinoj de la subbranĉo kunmetitaj disciplinoj konsistas el 5 aŭ 10 difinitaj subdisciplinoj ĉerpitaj el la disciplinoj de la subbranĉoj kuroj, saltoj kaj ĵetoj. Tiuj konkursoj postulas de la konkursantoj elstaran lerton kaj praktikon en nombro de diverskarakteraj sportaktivadoj, do altgrade harmonie interkompensitajn universalajn atletikajn kapablojn. Ĉiu atingita rezulto respondas al certa poentonombro kaj venkas, kiu akiris plej altan poentonombro.

Ĉiu konkursanto havas rajton pri 3 ĵeto- kaj saltoprovoj. La plenumo de ĉiu subdisciplino estas nepra postulo por povi atingi klasigon. La neplenumo de unu el la subdisciplinoj eskludas la konkursanton el la plua konkurso.

Disciplinoj:

1. *Vira kvindisciplino.*

Ĝi inkluzivas 5 subdisciplinojn plenumendajn laŭ la sekvanta deviga vicordo: longosalto, lanĉoĵeto, 200-metra sprinto, diskoĵeto kaj 1500-metra ebenkuro.

La disciplino estas plenumenda ene de unu tago. Estas konsilinde intermeti 30-minutajn paŭzojn inter la unuopajn subdisciplinojn, precipe post la tria subdisciplino.

2. Virina kvindisciplino.

Ĝi estas plenumenda dum du tagoj, laŭ la sekvanta deviga vicordo:

1-a tago: 80-metra barierkuro, pezglob-ĵeto, altosalto;

2-a tago: longosalto, 200-metra sprinto.

30-minutaj paŭzoj inter la subdisciplinoj estas konsilindaj.

5. Dekdisciplino. (nur por viroj)

La dek subdisciplinoj estas plenumendaj dum du tagoj laŭ la sekvanta deviga vicordo:

1-a tago: 100-metra sprinto, longosalto, pezglob-ĵeto, altosalto, 400-metra sprinto;

2-a tago: 110-metra barierkuro, diskoĵeto, stangosalto, lancoĵeto, 1500-metra ebenkuro.

30-minutaj paŭzoj, precipe post la 4a, 6a kaj 8a subdisciplinoj estas konsilindaj.

Esprimoj: Konkurso de atletiko, aŭ atletokonkurso, aŭ atletika konkurso. Olimpika ĉampionado de atletiko de jaro 1972, aŭ olimpika atletika ĉampionado de jaro 1972. Ĉampiono de 400-metra virina sprinto. Venkintoj de la duonfinalaj kurumoj de la disciplino 200-metra vira sprinto. Ĉampiono de la olimpika maratona kuro, aŭ olimpika ĉampiono de maratona kuro. Venkinto de la 5000-metra ebenkuro de la Eŭropo-ĉampionado de atletiko de 1970, aŭ venkinto de la Eŭropo-ĉampiona 5000-metra ebenkuro de jaro 1970. La mondĉampiona teamo de la 4x200-metra virina stafetkuro de jaro 1970. Eŭropo-ĉampiono de la 200-metra vira barierkuro. Nordameriko-rekordo de 3000-metra obstaklokuro. Unualoka klasito de olimpika altosalto-konkurso. Olimpika rekordo de stangosalto. Mondrekordo de martelĵeto, aŭ martelĵeto-mondrekordo. Olimpika ĉampiono de 50-kilometra marŝo. Eŭropo-ĉampiono de virina kvindisciplino (de jaro 1968); ktp. ktp.

BICIKLADO

Biciklante sola, aŭ en grupo (ensemblo), aŭ en teamo, aŭ kondukate de motociklo, kaj sekvante la regulojn de la konkerna disciplino, la biciklisto klopodas atingi kiel eble plej avanan klasigon por si, respektive por sia teamo.

La sportilo de la biciklisto estas la konkursbiciklo, mallonge *biciklo*. La ĉefaj partoj de la konkursbiciklo estas la *framo* kaj la du *radoj*. Al la fronta parto de la framo estas alĝustita la turnebla *forko*. Inter la du malsuprajn ekstremojn de la forko estas muntita la *akso* de la antaŭa rado, nomata *frontrado*. Helpe de la *stirilo*, fiksita sur la supra ekstremo de la forko, tiu lasta — kaj kune kun ĝi ankaŭ la frontrado — estas turnebla dekstren kaj maldekstren, per kiu maniero la biciklo estas stirebla. Al la du malsuprajn ekstremojn de la forkoforma malantaŭa parto de la framo estas muntita la akso de la malantaŭa rado, nomata *postrado*. Ĉirkaŭ la du menciitaj aksoj turniĝas dum veturo la tuboforma nabo de la du radoj. Fiksitaj per unu el iliaj ekstremoj alterne jen al la dekstra, jen al la maldekstra rando de la nabo, kaj same fiksitaj per la alia ekstremo al la interna surfaco de la *radrando*, la *spokoj* (ĉ. 36 pecoj da ĉ. 26 cm-ojn longaj kaj ĉ. 3 mm-ojn diametraj ŝtalstangetoj — nomataj vulgare: radioj) tenas ĉiun punkton de la radrando en egala distanco disde la akso.

Pneŭmatiko (tiuj interna kaj ekstera) ĉirkaŭzonas la eksteran flankon de la radrando kaj plenpumpita per *aerpumpilo*, ĝi havigas la necesan elastecon al la rapidanta biciklo, eliminante pli fortan skuigon. La pumpita aero eniras tra la *valvo*, kiu enlasas la aeron, sed malhelpas ĝian eliron.

Al la supra, malantaŭa parto de la framo estas fiksita la *selo*, sur kiu sidas la biciklisto.

Dum biciklado la biciklisto konstante turnadas la *grandan ĉenradon*, troviĝantan ĉe la meza, malsupra parto de la framo, pere de alterna treta premo sur la du *pedalojn*, muntitajn sur la du ekstremojn de la *kranko*. Rondĉeno, mallonge *ĉeno* interligas la grandan ĉenradon kun la *malgranda ĉenrado*, fiksita ĝenerale al la dekstra rando de la posta nabo. La turnado de la granda ĉenrado rezultigas konsekvence la turniĝadon de la malgrande ĉenrado, kiu turnas kun si ankaŭ la postradon.

Gravaj akcesoraj ekipaĵoj de la biciklo estas la du *bremsoj*, nome tiu de la frontrado kaj tiu de la postrado. Ili konsistas el la *bremsosŭoj*, frotbremsantaj la respektivan radon, el la *bremsomaniloj*, muntitaj sur la stirilo, kaj la necesaj *boŭdenkabloj* (Bowden).

Por esti senaj je superflujaj pezaĵoj, la konkursbicikloj ne havas la sekvantajn — en la ĉiutaga uzado havatajn — akcesoraĵojn:

kotŝirmiloj, *ĉenŝirmilo*, *pakaĵportilo*, *reflektoro*, *postlumo* kaj *tintilo*.

La biciklisto surhavas sportveston konforman al la antaŭskriboj.

La disciplinoj de la sportobranĉo biciklado konsistigas kvar subbranĉojn:

- A) Biciklado sur vego
- B) Biciklado sur ŝoseo
- C) Biciklado sur tereno
- Ĉ) Biciklado en ĉambrego

A) Biciklado sur vego

La disciplinoj de tiu ĉi subbranĉo disvolviĝas en tegmentita aŭ subĉiela biciklokurejo konstruita speciale por biciklokonkursoj. Ĝia ĉefa parto estas la 6-8 metrojn larĝa betona biciklovego, mallonge vego, havanta la formon de ovalo, pli precize de longkvadrato, kies du mallongajn laterojn duoncirklo anstataŭas. La du rektaj partoj de la ovalo nomiĝas celrekto kaj kontraŭrekto. En la kurboj la vego havas antaŭskribitan deklivangulon.

Ĉe la disciplinoj estas aplikata unu el la du regulaj startomanieroj, nome la *stara starto* (la

konkursanto sidas sur la staranta biciklo, tenate de helpanto aŭ konkursjuĝisto ĝis la starto), aŭ la *fluga starto* (la konkursanto jam pli frue ekbiciklas kaj je donita signo transkuras la startolinion kun plena rapideco).

Disciplinoj:

1. *Vira biciklosprinto*

Post stara starto la konkursantoj ne komencas tuj sprinti, sed kun atento gvatas kaj per lertaj manovroj malhelpas ĉies ajn provon erupti el la ensemblo kaj okupi avanan lokon. La sprinto komenciĝas ĝenerale nur 200 m-ojn antaŭ la celo, pro kio oni registras nur la temporezulton de la lastaj 200 m-oj de la konkursdistanco, kiu — depende de la longo de la vego — estas du aŭ tri rondo.

En la okonfinalaj kurumoj konkursas ne pli ol kvar konkursantoj, el kiuj nur la unualokaj pluiras al la kvaronfinalo. En la kvaronfinalo, duonfinalo kaj finalo la kurumojn partoprenas po du konkursantoj.

2. *Virina biciklosprinto*

Same kiel la vira.

3. *Tendema biciklosprinto* (nur por viroj)

La konkursdistanco estas 4 vegorondoj. Post la selektado en la necesnombraj antaŭfinalaj kurumoj (en kiuj partoprenas maks. 4 tendemoj) la duonfinalon partoprenas jam nur la 4 avanj tendemoj. En la duonfinalaj kaj finala kurumoj konkursas po du tendemoj. Tendema biciklo aŭ mallonge tendemo estas dupersona biciklo, sur kiu la konkursantoj sidas unu post la alia, sur apartaj sidiloj. La tendema biciklo havas same nur du radojn kiel la normala biciklo.

Cetere kiel la vira biciklosprinto.

4. *Vira bicikla persekuto*

Startinte per stara starto, nome unu ĉe la celrekto, la alia ĉe la kontraŭrekto, samtempe konkursas du konkursantoj. En la okonfinalo ĉiu finkuras 4000 metrojn, kaj venkas, kiu atingas pli bonan temporezulton. La parigo okazas per lotumo. En la kvaronfinalo, duonfinalo kaj finalo oni jam ne mezuras la tempon. Venkas, kiu preterkuras la alian (kio jam signifas ankaŭ la finon de la kurumo) aŭ, se tio ne sukcesas, kiu pli frue plenumas la 4000 metrojn.

5. *Virina bicikla persekuto*

Same kiel ĉe la vira.

6. *Teama bicikla persekuto* (nur por viroj)

Po du teamoj el kvar konkursantoj kuras samtempe la 4000 metran konkursdistancon. La preterkurita teamo elfalas, tamen la venka teamo devas finkuri la distancon por havi temporezulton. Cetere kiel ĉe la vira bicikla persekuto.

7. *Vira starostarta bicikla tempokuro*

Startinte per stara starto je pistola signo, la konkursantoj kun plene rapideco biciklas 1 kilometron, klopodante atingi kiel eble plej bonan temporezulton. Venkas la plej bona tempo.

(Estas aranĝataj ankaŭ flugostartaj tempokuroj, kie la konkursantoj biciklas du vegorondojn por ekiri rapidecon, kaj poste ili transkuras la startlinion de la mezurata distanco. En la olimpikoj kaj mondĉampionado tiu disciplino ne estas en la programo.)

3. *Virina starostarta bicikla tempokuro*

Same kiel ĉe la vira.

9. *Postmotora biciklado sur vego* (nur por viroj)

Fostsekvante en strikta interspaco motociklon de permesita tipo, kaj tiamaniere eluzante la minimuman aerreziston, la biciklisto klopodas atingi kiel eble plej bonan temporezulton. La sekurecon de la strikta postsekvo certigas 60 cm-ojn longa maldike horizontala cilindro turnebla sur akso, elstaranta 40 cm-ojn el la malantaŭa parto de la motociklo.

Ĉe la starto la biciklistoj ekstaras unu post la alia en lotumita vicordo antaŭ la startlinio. La motociklistoj kuras kelkajn vegorondojn por varmigi la motoron, kaj dume posteniĝas laŭ la

vicordo do la biciklistoj. Kiam la tiel posteniĝinta motociklista ensemblo atingas la kontraŭrekon, la startisto donas signon por la starto. La helpantoj, starantaj apud la surbiciklaj startontoj, donas svingon al la bicikloj, kaj la biciklistoj unu apud la alia aliĝas post sian motocikliston, kiam tiu atingis lian linion. Kiam ĉiu konkursanto aliĝis al sia kondukanto, nur tiam ili rajtas antaŭi unu la alian.

Venkas, kiu unua atingas la celon, respektive — se temas pri konkurso kun fiksa tempdaŭro — kiu post la forpaso de tiu tempo la unua transpasas la cellinion.

B) Biciklado sur ŝoseo

La konkursoj en tiu ĉi subbranĉo disvolviĝas sur publikaj ŝoseoj inter loĝataj lokoj. La ŝoseojn oni sentrafikigas por la daŭro de la konkurso.

Disciplinoj:

1. Vira ŝosea biciklado

La konkurso komenciĝas per grupa starto (en komuna ensemblo). La distanco estas 150-200 km-oj, sed la konkursoj disvolviĝas ĝenerale en pluraj rondoj sur la sama, 15-20 km-ojn longa rondvojo kun konsiderinda niveldiferenco. Venkas, kiu la unua transpasas la cellinion.

2. Virina ŝosea biciklado

Same kiel ĉe tiu vira.

3. Teama ŝosea biciklado (nur por viroj)

En tiu ĉi disciplino konkuras po unu kvarpersona teamo de la pertoprenantaj landoj. La starto okazas po teamoj, kun fiksita intertempo. Venkas tiu teamo, kies tria alceliĝinto havas la plej bonan temporezulton.

C) Biciklado sur tereno (nur por viroj)

La konkursantoj de tiu ĉi subbranĉo forlasas la konstruitajn vojojn (ŝoseojn) kaj plenumas la konkurson sur la tereno, nome sur teraj landvojoj, ĉarvojoj aŭ padoj. Kelkfoje eĉ tiujn ili forlasas por trapasi pli malfacilajn naturajn obstaklojn, kio postulas persiston kaj lerton. Ne licas devojigi de la indikita vojlinio.

Disciplino:

1. Vintra terena biciklado

La konkurso, kies maksimuma longo ne estas pli al 24 km-oj, disvolviĝas en sia kvarona longo sur senvoja varia tereno (kampo, arbaro), dum en sia trikvarona parto sur bicikleblaj teroj kaj padoj. La vojlinio kondukas tra pluraj naturaj melhelpaĵoj (ekz. ravinetoj, riveretoj ktp.), kiujn la konkursantoj devas senĉirkaŭire transpasi. Post samtempa grupa starto la rezulton de la konkurso donas la vicordo de la celatingoj.

C) Biciklado en ĉambrego

Disciplinoj:

1. Biciklopilkado

2. Arta biciklado.

(Manke de fontmaterialo tiu ĉi subbranĉo ne estas ellaborita.)

La mondfederacio de la sportobranĉo biciklado estas: Union Cycliste Internationale (UCI), Esp-e: Internacia Biciklista Unio.

Esprimoj: Konkurso de biciklado sur vego, aŭ biciklokonkurso sur vego, aŭ survega biciklokonkurso. — Konkurso de virina biciklosprinto. — Olimpika ĉampionado de vira bicikla persekuto. — Unualoke klasitaj teamoj de la kvaronfinalo de la konkurso de vira teama bicikla persekuto. — Eŭropo-rekordo de virina startostarta bicikla tempokuro. — Mondĉampionado de postmotora biciklado sur vego, aŭ mondĉampionado de survega postmotora biciklado. — Konkurso de biciklado sur ŝoseo, aŭ ŝosea biciklokonkurso. — Vintra terena biciklokonkurso.

— Ĉampiono de vintra terena biciklado.

BOBADO

Sidante duope aŭ kvarope kun alaj sambobanoj sur speciala glitveturilo, nomata bobo, la bobisto lerte kaj kuraĝe traveturas la rektojn kaj kurbojn de konstruita bobvego, kaj disciplinita kunagante kun alaj kunuloj li faras ĉion ablan, por ke lia formacio atingu kiel eble plej grandan rapidecon kaj alceliĝu kun bona temporezulto.

La mondfederacio de la sportobranĉo bobado estas Fédération Internationale de Bobsleigh et de Tobogganing (FIBT) (Esp-e: Internacia Bobista kaj Toboganista Federacio).

La internaciajn bobkonkursojn povas partopreni nur viraj konkursantoj.

La internaciaj bobkonkursoj disvolviĝas sur specialaj konstruitaj bobvegoj. Tiujn vegojn oni konstruas simile al la sportsled-vegoj, kiuj servas la celojn de la sportobranĉo sledado. La diferenco estas, ke la bobvego havas relative malpli multe da kurboj, konsekvence pli longajn rektojn, sekve de kio sur la bobvego oni povas atingi pli grandan, ofte eĉ 120 kilometran rapidecon per horo. Tiu pli granda rapideco necesigas pli altajn — nome ĝis 6 metrajn — kurbovandojn, por eviti, ke en la kurbo la svingo de la malsuprenlito, alivorte descendo eljetu la bobon de sur la vego.

La longo da la bobvegoj por internaciaj konkursoj estas inter 1000 kaj 2000 m-oj. La plej konata internaciskala bobvego estas tiu de St. Moritz (Svislando), kun 1510 m-a longo kaj 130 m-a niveldiferenco. Elatare bonaj bobvegoj troviĝas ankaŭ en L'Alpe d'Huez (Francio), Cortina d'Ampezzo (Italio), Oslo (Norvegio), Zakopane (Pollando), Tatranska Lomnica (Ĉeĝoslovakio), Lake Placid (Usono) kaj Igls (Aŭstrio).

La sportilo da la sportobranĉo bobado estas la bobo. Ĝi estas speciala, tre malalta-konstruita sledotipo, diferencanta disde la sportsledo precipe per tio, ke anstataŭ unu, ĝi havas du glitilparojn unu post la alia. La glitiloj estas faritaj ĝenerale el fraksenligno kaj la suban facon de la glitiloj kovras alŝraŭbita ŝtala lameno, nomata *glitplando*. Ŝtala kadro kuntenas la du glitilparojn kaj lignotabulo, nomata *sidtabulo*, kovras la ŝtalan kadron en la tuta longo de la bobo. Metala ŝirmostango ĉirkaŭborderas la sidtabulon al ĝi fikse almontite. Sur la ŝirmostango troviĝas krampiloj, helpe de kiuj la bobanaro kroĉas sin fikse al la sledo, kiel ankaŭ piedteniloj cele de pli sekura sido.

La sekuran stiradon de la bobo ebligas tio, ke la antaŭa glitilparo estas turnebla dekstren kaj maldekstren helpe de stirŝnuro aŭ stirorado. Ambaŭ metodoj havas avantaĝon kaj malavantaĝon. Nome, sur malmola, sentrua vego la ŝnurstirado estas pli laŭcela, dum sur mola kaj supozeble truhava bobvego la boboj kun stirorado estas pli sekuraj. Nuntempe dominas tamen ĝenerale la radostirado, ĉar la bobistoj, kiuj plejparte kondukas ankaŭ aŭton, preferas la stiroradon.

Grava parto de la bobo estas la *bremso*. La regularo de la internaciaj bobkonkursoj antaŭskribas tn. segilbremson, konsistantan el ŝtala bremsorubando kun larĝaj, triangulaj dentoj. La bremsa estas funkciigebla per du bremsoleviloj, muntitaj al la bobo ambaŭflanke de la sidtabulo, ĉe ties malantaŭa parto, kie la bremsisto sidas.

En internaciaj bobkonkursoj oni uzas du bobospecojn: la *dusidlokan* bobon por la *bobduopoj* kaj la *kvarsidlokan* bobon por la *bobkvaropoj*. Neoficiala speco estas la *sessidloka* bobo por *bobsesopoj*. La bobo kune kun ĝia anaro (bobanaro) estas nomata *formacio*.

La karakterizaj mezuroj de la du oficialaj bobospecoj estas la sekvantaj. La dusidloka bobo longas 270, la kvarsidloka 380 cm-ojn. Ili pezas 165, respektive 230 kg-ojn. La spurdistanco de ambaŭ specoj estas 67 cm-oj kaj la larĝo de la glitiloj (glitilplandoj) estas minimume 12 mm-oj ĉe la dusidloka kaj 14 mm-oj ĉe la kvarsidloka boboj.

En la bobo la bobanoj sidas unu post la alia. Plej antaŭe sidas la *stiristo*, de kies stirkapablo dependas la sukceso aŭ fiasko de la formacio. Lastaloke sidas la bremsisto, kiu devas rigore sekvi la instrukciojn de la stiristo. Nur en la pleja danĝero li rajtas agi memstare. Li kaj la

ceteraj bobanoj, sidantaj inter la stiristo kaj li, havas la taskon kiel eble plej rapide havigi al la bobo la necesan veturrapidecon ĉe la starto. Tiucele ĉe la bobkvaropo oni aplikas la tn. *triopan starton*, t.e. la stiristo sidas sur sia loko kaj la tri ceteraj bobanoj ekŝovas la bobon kaj kurante pluŝovas ĝin, ĝis la glitveturilo ekhavas la konvenan komencan rapidecon. Nur tiam ili saltas sur la bobon unu post la alia. Ĉe bobduopo oni aplikas ofte la t.n. *duopan starton*, kiu postulas multe da lerto, ĉar ankaŭ la stiristo ŝovas la bobon, kurante apud ĝi, ĝis la bobo havas la necesan komencan impeton. Sukcesa konkurso jam ĉe la starto kondiĉas tre ekzercitan, precize kunagantan bobanaron, ĉar ĉiu eraro kostas valorajn dekonsekundojn.

Kiam la bobanoj jam sidas fikse sur la bobo, je la komandvorto de la stiristo ili ĉiuj — escepte de la stiristo — klinas la supran korpon malrapide malantaŭen. Je la sekva komandvorto ili rapide kaj samtempe reklinas sin en la rektan sidan pozicion. La puŝon, kiun rezultigas tiu subita, samtempa rekliniĝo de la bobanoj, transprenas la bobo, kaj per tio ĝi ricevas certan rapideckreskon. Tiun ekzercon, nomatan *bobumado*, la bobanoj ripetas en certa ritmo laŭ la komando de la stiristo, ĝis la bobo atingis la rapidecon de 50 km-oj per horo (50 km/h). Tiam la bobanaro ĉesas bobumi, ĉar bobumado super 50 km-a rapideco jam kaŭzas ŝanceliĝon al la sledo, kio rezultigas tempoperdon.

En kurboj la bobumado kaj bremsado estas malpermesitaj, ĉar ili povas kaŭzi danĝerajn renversojn kaj falojn, ja la bobo rapidegas tra la kurboj kun 100 ĝis 120 km-a rapideco per horo.

Sur la modernaj bobvegoj, provizitaj per konstruitaj kurboj kaj en la bone risortitaj, flekseblaj glitveturiloj la pli frue aplikata elkliniĝo de la bobanaro en la kurboj estas jam superflua, eĉ danĝera, ĉar ĝi nur ŝancelas la bobon kaj kaŭzas renversion.

Ĉiu bobano devas surhavi ŝirmkaskon kaj laŭcelajn ŝuojn kaj veston. Inkluzive de la suma ekipaĵo la bobkvaropo ne povas superpasi la pezon de 400 kg-oj, la bobduopo tiun de 210 kg-oj. Ĝis tiu limo ankaŭ balasto estas aplikebla. La perdo de la balasto sekvigas eskludon el la konkurso. Disciplinoj:

1. *Duopa bobado.*
2. *Kvaropa bobado.*

Esprimoj: Mondĉampionado, Eŭropo-ĉampionado de bobado. Li estis la stiristo de la olimpikoĉampiona bobduopo. La formacio de Norvegio venkis en la mondĉampionado de kvaropa bobado. En la vintraj olimpikoj ĉe 1968 ok landoj partoprenis la ĉampionadon de bobado, ĉiu per po du bobduopoj kaj bobkvaropoj. La unualoke klasita formacio de la disciplino duopa bobado en la Eŭropo-ĉampionado de bobado en Zakopane.

BOKSO

(Nur por viroj)

Uzante la forton de siaj muskoloj kaj aplikante krome konvenan teknikon akiritan per longa sintrejnado, la boksisto enregula boksomatĉo strebas loki kiel eble plej multe da fortaj batoj (rektajn batojn kaj hokbatojn) per la regula batfaco de ambaŭ siaj pugnoj sur la validan korposurfacon de sia kontraŭulo, Klopodante samtempe ankaŭ defendi sian propran korpon, alivorte *parati* la batojn de la atakanta kontraŭulo helpe de regulaj ekmoveoj (brakligo, batŝirmo, dekliniĝo, depaŝo ktp.) kontraŭ la batoj de la kontraŭulo, dum konstante li atentigas ne kulpi malregulaĵon. La valida korposurfaco estas la antaŭa parto de la kapo kaj de la trunko ĝis la linio de la zono. Venkas tiu, kiu en matĉo el 3x3-minutoj rundoj (kun 2x1-minutaj paŭzoj) nokaŭtas sian kontraŭulon aŭ akiras pli da poentoj.

En la sportobranĉo bokso konkuras nur viroj.

La boksomatĉo disvolviĝas en la *ringo*, kiu estas 4,9x4,9 ĝis 6,1x6,1 metrojn ampleksa areo ĉirkaŭzonita 40, 80 kaj 130 centimetrojn alte per ŝnuro kovrita per mola materio en 3-5 cm-a dikeco. La plankon kovras felto, meto, gumo aŭ alia simile elasta materialo, superkovrita per streĉe sternita veltola kovrilo.

La boksisto surhavas antaŭskribitan sportvestaĵon kaj regulajn *boksogantojn*. Sub la gantoj la manoj (la polmo kaj la mandorso) devas esti ĉirkaŭvolvitaj per molŝtofa bandaĝo. Deviga estas krome la porto de *profundbatŝirmilo*, mallonge *ŝirmkonko*, por ŝirmi la testikojn, kaj estas permesate uzi *dentŝirmilon*.

La bokskonkursoj povas esti individuaj, teamaj kaj individuaj-teamaj. La teamoj konsistas el 11 membroj, nome el po unu konkursanto el ĉiuj 11 pezkategorioj. La individuaj konkursoj disvolviĝas laŭ rondbatala sistemo, kondiĉe ke la nombro de la partoprenantoj en la konkerna pezkategorio ne estas pli multe ol 5. Kaze de pli granda nombro da partoprenantoj la konkurso disvolviĝas laŭ elimina sistemo precize difinita. La teamaj konkursoj disvolviĝas laŭ rondbatala sistemo aparte en ĉiuj 11 pezkategorioj. La konkursantoj povas partopreni en unu tago nur unu boksomatĉon.

Dum la matĉo la parbatalon gvidas la kontrolas la gvida juĝisto. Se vidas neregulan aktivadon, li haltigas la konkursantojn, kaj sciigas la kulpinton pri la farita malregulaĵo helpe de internacie difinitaj oficialaj mansignoj. Post la unua malregulaĵo li atentigas kaj post la dua kaj tria li admonas la konkursanton. Pro malregulaĵo post la dua admono la gvida juĝisto eskldas la konkursanton el la plua konkurso. La eskldo el la konkurso tiras post si disciplinan proceduron, kies verdikto ĝenerale estas malpermeso al la boksisto partopreni konkursojn dum difinita tenpodaŭro.

Pli milda sankcio de la gvida juĝisto estas la eskldo el la matĉo (ekz. okaze de decida superforto, vundiĝo, neprepariteco ktp.).

La eskldo el la matĉo nur senrajtigas la konkursanton daŭrigi la matĉon, sed ne eskldas lin el la plua konkurso. Kaze de eskldo kaj el la matĉo kaj el la konkurso venkas la kontraŭulo.

En okazo de sterno aŭ nokaŭto la gvida juĝisto ĝiskalkulas la sternitan resp. nokaŭtitan konkursanton laŭ la sekvanta msniero. *Sterno* (nokaŭto) estas pugnobato, kiu igas la kontraŭulon por kelka tempo batalsenpova. La gvida juĝisto tuj komencas laŭte kalkuli en pounusekunda ritmo, svingante samtempe la brakon de supre malsupren ĉe ĉiu eldirita nombro, alivorte, li ĝiskalkulas la sterniton. Se dum kalkulo ĝis ok la konkursanto regajnas sian batalpovon, la matĉo estas daŭrigeble. Se la kalkulo daŭras ĝis dek, kaj la konkursanto restas plu batalsenpova, la sterno estas konsiderata jam *nokaŭto*, kiu finas la matĉon kaj decidas pri ĝia rezulto.

En okazo de neceso la gvida juĝisto havas la rajton ankaŭ ĉesigi la matĉon.

Apartigitaj disde la publiko, la poentjuĝistoj sidas kontraŭ diversaj flankoj de la ringo, atentis la parbatalon, kaj sendepende unu de la alia ili poentumas la konkursantojn.

Sidante proksime de la ringo, la tempomezuristo mezuras la daŭron de la rundoj kaj signas la komencon kaj finon de la rundoj per unu, respektive la finon de la tria rundo per du gongobatoj.

La konkursantoj havas po unu *sekundanton* kaj ev. unu *vicsekundanton*. La sekundanto preparas la konkursanton al la parbatalo antaŭ la rundoj, zorgas pri lia refreŝigo kaj donas al li taktikajn konsilojn en la paŭzoj, kiam li havas la rajton ankaŭ eniri la ringon. En kazo de neceso li rajtas ĵeti la viŝtukon en la ringon (signo de rezigno) dum la gvida juĝisto ĝiskalkulas la sterniton, por deklari anstataŭ sia senkonscia zorgato la rezignon pri la plua batalo.

La matĉon antaŭas kuracista kontrolo kaj pesado. Nome la boksisto rajtas konkursi nur en la kategorio de sia korpopezo.

Ekzistas 11 pezkategorioj por la boksistoj.

		korpopezo en kilogramoj	
		super	inkluzive ĝis
1. Pezkategorio 48 (pezkategorio kvardek ok)	48	45	48
2. Pezkategorio 51	51	48	51
3. Pezkategorio 54	54	51	54
4. Pezkategorio 57	57	54	57
5. Pezkategorio 60	60	57	60
6. Pezkategorio 63,5 (pk. sesdek tri komo kvin)	63,5	60	63,5
7. Pezkategorio 67	67	63,5	67
8. Pezkategorio 71	71	67	71
9. Pezkategorio 75	75	71	75
10. Pezkategorio 81	81	75	81
11. Pezkategorio super 81	super 81	81	-

La mondfederacio de la sportbranĉo bokso estas: Association Internationale de Box Amateur (AIBA) (Esp-e: Internacia Amatora Boksista Asocio).

Esprimoj: Boksokonkurso aŭ konkurso de bokso. (Boks)konkurso en la pezkategorio 81. (vulg.: la (boks)konkurso de la 81 kilogramuloj). Eŭropo-ĉampionado de bokso. Olimpika ĉampiono de bokso (aŭ olimpika boksĉampiono) de jaro 1968 en la pezkategorio 48. Venkinte per nokaŭto ĉiujn siajn kontraŭulojn en la finalo, li akiris la ĉampionecon en la pezkategorio 63,5 de la Eŭropo-ĉampionado de bokso de jaro 1959. La pezkategorion 71 de la mondĉampionado de bokso ne partoprenis belga konkursanto. Alternativoj: a) Ĉampiona (unualoke klasita) teamo de la Eŭropo-ĉampionado (mondĉampionado, olimpika ĉampionado) de bokso. b) Eŭropo-ĉampiona (mondĉampiona, olimpikoĉampiona)boksoteamo.

FLUGPILKADO

Sur regula ludkampo dividita en du duonkampojn per retostrio, streĉita pli ol metron alte, du teamoj de difinita nombro da ludistoj — obeante la ludregulojn — vetludas unu kontraŭ la alia, kaj per momentaj, viglaj manfrapoj pasigante pilkon super reto alterne de unu al la alia duonkampo, ili klopodas rebatadi la alvenintan pilkon tiamaniere, ke la kontraŭulaj ludistoj ne sukcesu resendi ĝin regule, atentante samtempe, ke la alvenanta pilko ne falu sur la grundon de la propra duonkampo.

La sporta ludo flugpilkado (vulg. volejbalo) disvolviĝas subĉiele aŭ en ĉambrego, sur longkvadratforma *ludkampo* dividita per reto en du 9x9 metrojn ampleksajn *duonkampojn*. Sekve la ludkampo havas du 18-metrajn *flankliniojn* kaj du 9—metrajn *bazliniojn*. La ludkampon ĉirkaŭas 3 metrojn (en ĉambrego 2 m) larĝa *elkurejo*.

La supra rando de la 1 metron larĝa reto estas streĉita 2,43 m-ojn alte por viraj kaj 2,24 m-ojn alte por virinaj teamoj.

La pilko uzata ĉe la pilkado, estas globforma, pumpita mezmalmola je aero, kaj havas periferion de 66 centimetroj kaj pezon de 250 gramoj. La pilko konsistas el la interna gumveziko kaj la ekstera ledkovrilo.

Ĉe la komenco unu el la teamoj enludigas la pilkon, mane tranabatante ĝin trans la reton, sur la kontraŭan duonkampon. Tiun agon oni nomas *serviro*, la ludiston serviranto kaj la difinitan lokon, kie li serviras, *servirejo*.

La ludistoj de la alia teamo malhelpas per manbato, ke la afluganta pilko ektuŝu la grundon de ilia duonkampo, kaj klopodas rebati ĝin tiel, ke transe ĝi tuŝu la grundon de la duonkampo, aŭ ke la tieaj lundistoj ne povu resendi ĝin per regula priludo.

Regule oni priludas la pilkon, se sur la propra duonkampo ĝi ne ektuŝas la grundon, kaj dum unu *pilkoveno* la pilko estas mane ektuŝata ne pli ol tri fojojn. La sama ludisto rajtas ektuŝi la pilkon dufoje, sed nur tiukaze, se inter la du ektuŝoj ankaŭ alia samteamano ektuŝis ĝin.

La ludanta teamo akiras unu poenton tiam, kiam la kontraŭulo kulpis eraron (t.e. ne povas regule resendi la pilkon, aŭ lasis fali ĝin sur sia propra grundo), sed nur en tiu kazo, se la servirrajto estas ĉe ĝi. Servirrajta teamo kulpinte eraron perdas la servirrajton. Tiam la servirrajton ricevas la kontraŭulo, sed poenton ne akiras, ĉar nur servirrajta teamo povas ricevi poenton.

La batalon inter du teamoj oni nomas *flugpilko-matĉo*. La matĉo estas plenumita, kiam unu el la du teamoj gajnis tri *setojn*. La seton gajnas tiu teamo, kiu akiris 15 poentojn, kondiĉe ke la kontraŭulo havas almenaŭ dupoentan malavantaĝon. Se la diferenco estas nur unu poento, la seto estas daŭrigenda, ĝis iu ajn el la du superas la alian per 2 poentoj. Post ĉiu seto kaj meze de la decida seto la du teamoj ŝanĝas lokon reciproke.

Ambaŭflanke 3 metrojn paralele kun la mezlinio (la linio sub la reto) estas indikitaj la *ataklinioj*, kaj la 3 metrojn larĝaj zonoj inter la mezlinio kaj la ataklinioj estas la *atakzonoj*.

Sur la areo de la duonkampo estas 6 difinitaj ludistopostenoj (mallonge postenoj) aranĝitaj en du vicoj paralelaj kun la mezlinio. De dekstre maldekstren la postenoj estas jene numeritaj: 2a, 3a, 4a en la atakzono kaj 1a, 5a, 6a en la posta zono.

Antaŭ la komenco de ĉiu opa seto oni skribe (protokole) fiksas, ke kiu ludisto kiunumeran postenon devas okupi. En la momento de la unua serviro de la seto ambaŭflanke la ludistoj devas satari sur tiuj asignitaj postenoj. Post la farita servilo la ludistoj jam rajtas ludi sur la tuta areo de la propra duonkampo, kun kelkaj limigoj por la postazonaj ludistoj koncerne la manieron de la pilkorebato.

Dum la daŭro de la seto ĉiun fojon kiam iu el la du teamoj ricevis la servirrajton, la ludistoj de tiu teamo devas ŝanĝi inter si la postenojn laŭ la movdirekto de la horloĝmontrilo (kiu estis

sur la posteno 4a, iras al la 3a, el la 2a al la 1a, el la 5a al la 6a ktp.), kaj devas stari sur la nova posteno dum la momento de la serviro. Tiu laŭ regula turnordo alternanta pozicio, okupenda fare la ludistoj de ambaŭ teamoj en la momento de ĉiu serviro de la seto, estas nomata servirpozicio.

La serviranto devas serviri en aparta *servirejo*, kiu estas 3 metrojn larĝa kaj almenaŭ 2 metrojn (sed ĝenerale pli) longa strio, kondukanta ortangule for de la dekstra ekstremo de la bazlinio.

El la multaj antaŭskriboj de la regula ludo (ĉi tie ne detaligitaj) aparte menciinda permesita taktika procedo estas la *blokado*, kiam unu aŭ pli da atakzonanoj, suprensaltanta kun alte etenditaj brakoj, kvazaŭ formas muron tuj proksime super la reto, kaj sen fari batan movon blokas tiamaniere la alflugantan pilkon, kia refrapiĝas de sur la brakoj al la kontraŭa duonkampo.

Sidante meze de la flanklinio, en alta sidloko, kun okulalteco 50 centimetrojn super la retnivelo, la *ludgvidisto* gvidas la matĉon. En tio lin helpas la ceteraj membroj de la ludgvida komitato, nome la *vicludgvidisto*, la *protokolisto* kaj 2 aŭ 4 *linijuĝistoj*.

Krom pli da aliaj farendoj (ekz. kontroli la grundon de la ludkampo kaj la sportvestaĵon de la ludistoj) la ĉefa tasko de la ludgvidisto estas direkti la matĉon, kion li faras kunage kun la ceteraj membroj da la ludgvida komitato, donanta instrukciojn helpe de fajfilo kaj antaŭskribitaj mansignoj. La ĉefaj eraroj aŭ malregulaĵoj, pro kiaj li deprenas la servirrajton disde la kulpinta teamo, respektive donas unu poenton al la kontraŭulo, se tiu estas la serviranto, estas la sekvantaj:

Se iu el la ludistoj tenas aŭ portas la pilkon; se li ektuŝas la reton; se li ektuŝa la pilkon sinsekve du fojojn; se li paŝas sur la kontraŭan duonkampon: se suprensaltante li ekbatas la pilkon per mano etendita trans la reton; se li ricevas personan admonon; se la pilko ektuŝas la grundon sur la propra duonkampo; se la pilko tranabatita ektuŝas la grundon aŭ ian ajn objekton transflanke, ekster la limoj de la kontraŭa duonkampo, sen tio, ke la tieaj ludistoj ektuŝis ĝin; se la sendita pilko pasas sub la reto; se la teamo ektuŝas la pilkon pli ol tri fojojn en la sama pilkovenio: se la servirpozicio ne estas regula en la momento de la serviro; kaj ankoraŭ pluraj aliaj. La ludgvidisto havas krome la rajton en motivitaj kazoj eskludi iun ludiston el la seto aŭ el la tuta matĉo, kaj necesokaze li rajtas interrompi la ludon por certa tempo aŭ ĉesigi ĝin definitive.

La vicludgvidisto sidas kontraŭ la ludgvidisto, samalte ĉe la alia ekstremo de la reto kaj partoprenas — same helpe de fajfilo kaj mansignoj — en la direktada laboro de la ludgvidisto. Ankaŭ liaj agosfero kaj specialaj taskoj estas detale antaŭskribitaj.

En la protokolo la protokolisto registras ĉiun fazon, detalon kaj okazintaĵojn de la ludata matĉo.

La 2 resp. 4 linijuĝistoj staras ĉe la du diagonalaj (neservirejaj) anguloj resp. ĉe ĉiuj kvar anguloj. Ili atentis la movon de la pilko laŭlonge de siaj bazlinio kaj (aŭ) flanklinio, kaj signas per flageto, se la pilko transpasis la limlinion.

Kune kun la teamestro la plena teamo havas 12 membrojn, el kiuj ĉiam 6 pertoprenas la ludon, la ceteraj 6 estas la *ŝanĝludistoj*. Dum unu seto estas plenumbla maksimume 6 ŝanĝoj, al kio oni uzas aŭ ĉiujn 6 rezervajn ŝanĝludistojn, aŭ parte tiujn kaj parte denove la jam ŝanĝitajn. Dum la ludo la ŝanĝludistoj — kune kun la trejnisto — devas sidi proksime al la ludkampo, vid-al-vide al la ludgvidisto, sed por kelka tempo ili rajtas alterne forlasi ĉi lokon cele de sinvarmigo (muskolvarmigo), kiam ili varmigas sin per varmigaj (muskolvarmigaj)korpekzercoj. Pri permeso ŝanĝi unu aŭ pli da ludistojn la teamestro petas la ludgvidiston aŭ la vicludgvidiston en ludopaŭzo. Kiam la teamestro intencas ŝanĝi unu el la ludistoj per ŝanĝludisto, tiam li atendas la plej proksiman fojon, kiam la *pilko estas morta*, kaj tiam li sciigas al la ludgvidisto aŭ al la vicludgvidisto sian deziron pri ŝanĝo. La ludgvidisto aŭ

vicludgvidisto ordonas *mortan tempon*, kiu daŭras, ĝis la ŝanĝo okazis.

La pilko estas ĉiam morta inter du aktivadoj, t.e. ekde la fajfilsono signanta la finon de unu aktivado, ĝis la sekvanta fajfilsigno, donanta permeson al pli nova serviro.

La ludgvidisto aŭ vicludgvidisto rajtas doni permeson pri ludinterrompo, alinome ludpaŭzo aŭ morta tempo, en la sekvantaj kazoj:

1. Se unu el la teamestroj petas mortan tempon cele de ludistoŝanĝo, tiam la permesita paŭzo daŭras, ĝis oni plenumis la ŝanĝon.

2. Se la teamestro petas ripozpaŭzon. En ĉiu seto la teamo disponas pri po du duonminutaj mortaj tempoj cele de ripozo. Dum la paŭzo la ludistoj ne rajtas paroli, sed la trejnisto povas doni al ili taktikajn instrukciojn el ekster la ludkampoj.

3. Se iu ludisto vundiĝis, la teamo povas ricevi kroman 3-minutan ludinterrompon, kondiĉe ke ĉiuj eblecoj pri ludistoŝanĝo estas jam elĉerpitaj.

4. Inter la setoj estas maksimume 2-minutaj interpaŭzoj, kiuj inkluzivas kaj la duonkampoj-interŝanĝon kaj la enskribon de la nova posteniĝo de la teamo en la notlibron.

La mondfederacio de la sporta ludo flugpilkado estas: Fédération Internationale de Volleyball (FIVB) (Esp-e: In-ternacia Flugpilkista Federacio).

La flugpilko-konkursoj povas disvolviĝi laŭ rondoĉambalo, laŭ rekte elimina kaj laŭ miksa sistemoj.

En konkurso laŭ rondoĉambalo sistemo — mallonge en rondoĉambalo konkurso — estas aplikataj aŭ unuetapa aŭ duetapa konkursoj. Dum en la unuetapa konkurso ĉiu teamo ludas kontraŭ ĉiu teamo unufoje, en la duetapa konkurso, post la farita rondoĉambalo en la unua etapo, la teamoj denove, t. e. ankaŭ duan fojon ludas kontraŭ ĉiuj teamoj. La klasigo okazas surbaze de la suma rezulto de ambaŭ etapoj.

En la Eŭropo- kaj mondĉampionadoj oni formas pli da grupoj aŭ surbaze de la kvalito de la teamoj, aŭ per loto. Ene de la grupoj okazas rondoĉambalo. Po unu aŭ du avanuloj de la grupoj eniras la sekvantajn etapojn. La finalon eniras 6 teamoj, por rondoĉambali por la ses avanaj lokoj.

Disciplinoj:

1. *Vira flugpilkado*

2. *Virina flugpilkado.*

Esprimoj: Mondĉampionado de vira flugpilkado. La dualoke klasita teamo de la Kopenhaga internacia turniro de vira flugpilkado. La 2-an de majo disvolviĝos la dua fazo de la unua etapo de la virina flugpilko-ĉampionado por la Eŭropo-pokalo de la ĉampionaj teamoj.

GIMNASTIKO

La mondfederacio de la sportbranĉo gimnastiko estas: Fédération Internationale de Gymnastique (FIG). Esp-e: Internacia Gimnasta Federacio.

La sportbranĉo gimnastiko havas tri subbranĉojn:

- A) Gimnastila gimnastiko (aparatgimnastiko)
- B) Moderna gimnastiko
- C) Akrobata gimnastiko.

A) Gimnastila gimnastiko

(vulg. gimnastilado aŭ ilgimnastiko)

La gimnastila gimnasto (aparatgimnasto, vulg. gimnastilisto aŭ ilgimnasto), mallonge gimnasto, prezentas diversajn ekzercojn el valoraj elementoj kaj plenumas tiujn sur specialaj sportaparatoj nomataj gimnastiloj. Ĉiun eron de la ekzercoj li klopodas fari senerare, kun modela kaj plaĉa korpoteno, kunigante harmonie lerton kaj forton kun svingo kaj ritmo.

La gimnastikaj konkursoj (gimnastokonkursoj) disvolviĝas en ĉambregoj. La gimnastoj portas purajn kaj bongustajn sportvestojn. En konkursoj inter diverslandaj sportuniĝoj la konkursanoj portas la sportan uniformon de sia unuiĝo. En konkursoj inter du aŭ pli da nacioj la konkursantoj, kiel elektitaj gimnastoj de sia lando, portas sialandan sportan uniformon kun la nacia blazono.

En internaciaj konkursoj la viroj partoprenas 6, la virinoj 4 disciplinojn kaj plenumas po unu devigan kaj libere elektitan ekzercon sur la sekvaj gimnastiloj.

a) Viroj:

1. *Paralelo*: paro da paralelaj elsataj lignostangoj kun 51x41 mm-a ovala transversa sekco, 3,5 m-a longo kaj min. 42 cm-a interdistanco. La stangoparon subportas en 1,7 m-a alto po du feraj kolonoj elstarantaj el masiva gisfera soklo.

2. *Ĉevalo*: 1,6 m-ojn longa, 1,1 m-ojn alta kaj 35 cm-ojn larĝa cilindroforma ligna korpo kun remburita kaj ledtegitaj surfaco. La gimnastilo staras en horizontala pozicio sur kvar iome oblikvaj lignaj piedoj. Meze de la dorsa parto estas fiksita paro da duoncirklaĵaj lignaj ansoj kun 3 cm-a dikeco kaj 40-45 cm-a interdistanco.

3. *Senansa ĉevalo* (cele de gimnasta salto): kiel la ĉevalo, sed sen ansoj, kaj kun variebla alteco de 110 ĝis 135 cm-oj.

4. *Reko*: 28 mm-ojn dika kaj 2,4 m-ojn longa elasta ŝtalstango tenata en 2,5 m-a alto de du ŝtalaj postamentoj, kiujn fiksas streĉeblaj ŝtalkabloj al hokoj en la planko.

5. *Duringo*: paro da lignoringoj ĉ. 3 cm-ojn dikaj kun 18 cm-a interna diametro, pendantaj sur 5,5 m-ojn longaj ŝnuroj aŭ kabloj, en 2,5 m-a alto, kun 50 cm-a interdistanco.

6. *Grundgimnasta speco*: 14x14 metra libera areo kovrata de felto aŭ elasta planko kaj konvene superkovrata. Uzebla areo: 12x12 m-oj kun bone indikitaj limlinioj.

7. *Tramplilo*: 120 cm-ojn longa, 60 cm-ojn larĝa, 12 cm-ojn alta ligna podieto helpanta la forsalton (tramplon) en la disciplino gimnasta salto. Nome la gimnasto *trampas*, kiam post alkuro ambaŭpiede li sursaltas la tramplilon, por piede forpuŝi sin energie de tie en la sekva momento, kaj helpe de tiu svingo transalti la koncernan saltgimnastilon. La loko de la forsalto kaj la malsupra surfaco de la tramplilo estas tegita per glitŝirma substanco.

8. *Tapiŝo*: 8-10 cm-ojn dika, laŭeble el plasto. Ĝi helpas elastan kaj sekuran desalton de sur la gimnastilo.

b) Virinoj:

1. *Ŝtupa paralelo*: la du lignostangoj havas malsaman alton, nome 2,3 kaj 1,5 m-ojn. Cetere kiel ĉe paralelo.

2. *Trabo*: ligna trabo en 80-120 cm-a alto. Ĝia transversa sekco: larĝo: 10-13 cm-oj, alto: 16 cm-oj.

3. *Senansa ĉevalo*: kiel ĉe viroj, kun alteco de 110 cm-oj.

4. *Grundgimnasta spaco*: kiel ĉe viroj.

5. *Tramplilo* kaj 6. *tapiŝo*: kiel ĉe viroj.

Ceteraj gimnastiloj neuzataj en internaciaj konkursoj: grimpostango, grimpoŝnurego, saltokesto, saltoboko, risorta tramplilo, spaliero, benko ktp.

Laŭ karaktero la konkursoj povas esti individuaj, teamaj kaj individuaj-teamaj.

Se individuaj konkursantoj de iu lando partoprenas internacian konkurson, ilin akompanas unu trejnisto por la viraj kaj unu trejnistino por la virinaj konkursantoj. La teamojn akompanas krom la trejnisto ĝenerale ankaŭ aparta trupgvidanto, sed ofte la trejnisto mem estas samtempe ankaŭ la trupgvidanto.

La teamoj konsistas el 6 gimnastoj, el kiuj unu estas la teamestro.

La trupgvidanto resp. la trejnisto direktas la aktivadon de la konkursantoj antaŭ kaj dum la konkurso, helpas ilin ĉe la komenco de la ekzercoj sur altaj gimnastiloj (reko, duringo) kaj staras apud ili dum la ekzerco, sen helpi al ili, sed por interveni ĝustatempe kaj preventi eventualan akcidenton (defalon, vundiĝon, elartikiĝon ktp.)

La individuaj gimnastikaj konkursoj, alinome gimnastokonkursoj, havas du tipojn:

a) *Kunmetita individua konkurso*. Ĝi konsistas el la 6 — ĉe virinoj 4 — oficialaj disciplinoj de la subbranĉo gimnastila gimnastiko. La konkursantoj prezentas po unu devigan kaj libere elektitan ekzercojn. La sumo de la poentnombroj de ĉiuj 12 (8) ekzercoj donas la rezulton de la konkursantoj kaj determinas ilian klasigon en la kunmetita konkurso. La ses avanajn klasitojn oni proklamas kaj la tri avanajn premias per medalo kaj diplomo.

b) *Kunmetita kaj pogimnastila individua konkurso*. Post la disvolvo de la kunmetita konkurso (unua etapo) oni elektas la po 6 avanajn plenumintojn de ĉiuj 6 (4) disciplinoj. En la dua etapo, alinome finalo, la elektitoj prezentas po unu libere elektitan (novan aŭ la jam prezentitan) ekzercon en ĉiu disciplino. Surbaze de la rezulto en la kunmetita konkurso kaj de tiu en la finalo oni elkalkulas la definitivan rezulton aparte en ĉiu disciplino por ĉiu partoprenanto de la finalo. Oni proklamas la 6 kaj premias la 3 avanajn klasitojn de kaj la kunmetita kaj la pogimnastila etapoj (do sume 7x3 premiitoj ĉe viroj kaj 5x3 ĉe virinoj).

En internaciaj konkursoj oni aplikas tiun ĉi duan konkursotipon.

Ĉe teamaj konkursoj en internaciaj rilatoj oni aplikas la *kunmetitan teaman konkurson*. La sumo de la pogimnastilaj teamrezulto donas la definitivan rezulton de la teamo. Ankaŭ ĉi tie oni proklamas 6 kaj premias 3 avanajn teamojn.

En okazo de egalstato la egalstataj konkursantoj (teamoj) atingas la saman klasigon kaj ricevas samvaloran medalon. Ĉe migrapremiaj internaciaj konkursoj, kie necesas decidi pri klasigo inter egalstataj konkursantoj (teamoj), oni decidas laŭ apartaj antaŭskriboj.

Krom la prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario al la konkursa juĝistaro apartenas gvidaj juĝistoj, poentjuĝistoj, (venintaj ankaŭ el aliaj landoj) kaj po unu konkursaranĝisto kaj informisto.

Krom siaj multaj aliaj farendo, la *prezidanto* de la konkurso (konkursprezidanto) havas la taskon kunmeti la poentumajn komitatojn mallonge ĵuriojn, konsistantajn el unu gvida juĝisto kaj kvar poentjuĝistoj — por la unuopaj disciplinoj. Virajn gimnastojn poentumas vira ĵurio, gimnastinojn — virina.

La *gvida juĝisto* direktas la laboron de la ĵurio kaj donas detalajn instrukciojn koncerne la praktikan disvolvon de la konkurso. Li povas aparteni al neniu lando partoprenanta la konkurson.

La *poentjuĝistoj*, kine kun la gvida juĝisto, havas la taskon kontroli la gimnastilojn, la vestaĵon de la konkursantoj kaj poste poentumi la ekzercojn prezentitajn sur diversaj

gimnastiloj. Post ĉiu prezentita ekzerco la poentjuĝisto taksas la ekzercon per nombro inter 0 kaj 10 ĝis dekonaj valoroj (ekz. 8,6) kaj tiun aljuĝitan poentvaloron poste li ankaŭ fiksas sur sia poentmontra aparato. Je la alvoko de la gvida juĝisto li turnas la poentmontrilon, kune kun la ceteraj, unue al la oficiala *poentregistristo* kaj poste al la publiko.

Ĉe la taksado oni eliminis la du ekstremajn poentvalorojn kaj validas nur la mezaj poentoj.

La poentjuĝistoj rekrutiĝas el la partoprenantaj nacioj kaj krome ankaŭ el tiuj neŭtralaj.

Disciplinoj (laŭ la deviga vicordo en kunmetitaj konkursoj):

a) por viroj

1. *Vira grundgimnastiko*

2. *Ĉevalado*

3. *Duringado*

4. *Vira gimnasta salto*

5. *Paralelado*

6. *Rekado*

b) por virinoj

1. *Virina gimnasta salto*

2. *Ŝtupa paralelado*

3. *Trabado*

4. *Virina grundgimnastiko*

Esprimoj: Konkurso de gimnastiko; gimnastokonkurso; gimnastika konkurso. Konkurso de kunmetita kaj po-gimnastila virina individua gimnastiko, aŭ kunmetita kaj po-gimnastila virina individua gimnastokonkurso. Eŭropo-ĉampionado de kunmetita kaj po-gimnastila vira teama gimnastiko. Mondĉampiono de individua ŝtupa paralelado. Olimpikoĉampiona teamo de vira gimnastiko, aŭ olimpikoĉampiona vira gimnastoteamo. La trialoka klasito de la disciplino trabado en la mondĉampionado de virina gimnastiko de jaro 1970, en Vieno.

B) Moderna gimnastiko

(vulg. mangimnastilado)

(nur por virinoj)

Parigante la elastecon kaj lerton, akiritan dum longtempa sintrejnado, kun la beleco de la juna, sana virina korpo, la gimnastino de la moderna gimnastiko, alinome iom malpli longe, moderngimnastika gimnastino, prezentas ekzercojn de arta nivelo kun movoj plenaj de ĉarmo kaj harmonio kaj akompanataj de muziko. Dum la ekzercoj ŝi uzas iun el la diversaj helpobjektoj nomataj mangimnastiloj. En internaciaj konkursoj estas permesitaj disciplinoj kun la apliko de unu el la sekvantaj oficialaj mangimnastiloj: pilko, ludringo, saltoŝnuro kaj rubando. Kromaj neoficialaj mangimnastiloj estas la klabo, bastono, flago, vualo, ŝalo ktp.

La moderngimnastikaj konkursoj disvolviĝas en ĉambrego, sur 12x12 m-ojn area planko kun aŭ sen tapiŝo.

La konkursantoj plenumas la ekzercojn solope aŭ grupe en 6-membraj grupoj. La solopaj konkursoj povas esti individuaj, teamaj kaj individuaj-teamaj, la grupaj kompreneble nur teamaj, la solopaj ekzercoj daŭras 1,5-2 minutojn (ĉe saltoŝnurado 1,5 min.), la grupaj ekzercoj daŭras 3-3,5 minutojn. Pro tro longaj aŭ mallongaj ekzercoj oni deprenas difinitan nombron da dekonaj poentoj.

Disciplinoj:

1. *Solopa pilkado*

La pilko estas el gumo, kun 18-20 cm-a diametro.

2. *Grupa pilkado*

3. *Solopa ludringado*

La ludringo estas el ligno, kun interna diametro de 80-90 cm-oj.

4. *Grupa ludringado*

5. *Solopa saltoŝnurado*

La saltosnuro estas el kanabo, sen teniloj. Ĝia duona longo etendiĝas de la planko ĝis la mezlinio de la brusto de la uzanto.

6. *Grupa saltoŝnurado*

7. *Solopa rubandado*

La rubando estas el kolora silko, kun 6 m-a longo kaj 4-10 cm-a larĝo. Ĉe unu ekstremo ĝi estas fiksita sur 60-70 cm-ojn longa bastono aŭ bambuo.

3. *Grupa rubandado*

Esprimoj:

Konkurso de moderna gimnastiko. Konkurso de grupa saltoŝnurado aŭ grupa saltoŝnurkonkurso. Eŭropo-ĉampionado de moderna gimnastiko. Mondĉampiono de la disciplino ludringado. Unualoke klasita grupo de la disciplino grupa pilkado, en la Eŭropo-ĉampionado de moderna gimnastiko de 1964 en Varsovio.

C) Akrobata gimnastiko

(Neellaborita)

GLACIHOKEO

Sur regule preparita kaj precize elmezurita spaco de glacio — nomata glacihoke-ludkampo — du teamoj el po 6 ludistoj, provizitaj per antaŭskribitaj speciala korpoŝirma vestaĵo, sketo kaj hokeilo, vetludas unu kontraŭ la alia, nome helpe de harmonia kunludo ili klopodas sendi la hokediskon en la kontraŭulan golejon, respektive per tenaca defendludo malhelpi, ke la kontraŭula teamo povu atingi golon, ne forgesante zorgeme sekvi dumtempe la ludregulojn.

La sporta ludo glacihokeo disvolviĝas sur longkvadratforma glacikovrita *ludkampo* kun longo de 56-61 kaj larĝo de 26-31 m-oj. La kvar anguloj estas rondigitaj per 5,2-6 m-ojn radiusaj kvaroncirkloj. La ludkampon limas kontinua senbreĉa *barilo* kun 1-1,22 m-a alto, kun du pordetoj kondukantaj al la vestejo. La du pli longaj lateroj de la barilkvarangulo estas la *flankbariloj* kaj la du pli mallongaj estas la *finbariloj*.

3,5-4,5 m-ojn paralele kun la finbariloj 5 cm-ojn larĝa ruĝa linio signas la du *golejliniojn*. Meze de la golejlinioj staras la du ruĝkoloraj *golejoj* kun 1,22 m-a alto kaj 1,80 m-a larĝo kaj estas provizitaj per reto. Ruĝa duoncirklo kun 1,80 m-a radiuso tuj antaŭ la golejo indikas la *golejkorton*.

Inter la du golejlinioj, paralele kun ili, du bluaj linioj 30 cm-ojn larĝaj dividas la glacisurfaco en tri samgrandajn trionkampojn mallonge *trionojn*. La linioj daŭras ankaŭ sur la flankbariloj ĝis ties supro. La triono plej proksima al la propra golejo estas la *defenda triono*, la meza estas la *neŭtrala triono* kaj la tria estas la *ataka triono*. Ili estas nomeblaj ankaŭ defenda, neŭtrala kaj ataka *zonoj*.

30 cm-ojn larĝa ruĝa *mezlinio*, kondukanta de unu flankbarilo ĝis la alia (daŭranta same ĝis la barilsupro), dividas la ludkampon en du *duonkampojn*. Meze de la mezlinio troviĝas la 30 cm-ojn diametra blua *meza enludiga punkto*, kiun ĉirkaŭas la 4,5 m-ojn radiusa *meza enludiga cirklo*.

En la neŭtrala triono troviĝas kromaj du ruĝaj, 30 cm-aj t.n. *flankaj enludigaj punktoj* situantaj ambaŭflanke de la meza enludiga cirklo, 1,5 m-ojn distance de la du bluaj linioj.

Kaj fine po du simetrie lokitaj enludigaj punktoj kun enludiga cirklo troviĝas en la du defendaj trionoj, 6 m-ojn distance de la golejlinio kaj 14 metrojn unu de la alia. En ĉiuj kvar enludigaj cirkloj, troviĝantaj en la du defendaj zonoj, estas tirataj sur la glacio simetrie po du 90 cm-ojn longaj rugaj linioj paralelaj kun la golejlinio kaj 90 cm-ojn fore de la centro de la enludiga punkto. Krome el la rando de la kvar cirkloj ambaŭflanke elstaras po unu 60 cm-ojn longa linio, kuŝanta sur la interliga akso de la du samzonaj enludigaj punktoj.

Ekster la barilo, proksime de la mezo de unu el la flankbariloj staras du *porludistaj benkoj* kun almenaŭ 2x16 sidlokoj. Ĉe la kontraŭa flanko de la ludkampo, malantaŭ la mezo de la alia flankbarilo staras 8-sidloka *punbenko* por la punataj ludistoj, krome por la *puntempomezuristoj*, la *ludtempomezuristo* kaj la oficiala *notisto*.

Tuj antaŭ la sidloko de la puntempomezuristoj 3 m-ojn radiusa duoncirklo sur la glacio indikas la *teritorion de la ludgvidistoj*, kiun duoncirklon neniu ludisto rajtas eniri krom koste de tuja definitiva eskludo.

La vetludon inter du teamoj oni nomas *glacihoke-matĉo*. La ludotempo de unu matĉo konsistas el tri dudekminutaj triontempoj kun po 10-minutaj paŭzoj. Dum la matĉo ambaŭ teamoj havas la celon plenumi kiel eble plej multe da goloj; venkas, kiu atingas pli da goloj dum la daŭro de la matĉo. Kaze de egalstato ĉe la fino de la tria triontempo oni plilongigas la matĉon per certa tempodaŭro.

La *glacihoke-teamo* konsistas el 17 ludistoj, el kiuj la ludon partoprenas alterne ĉiam nur maksimume 6 ludistoj, la ceteraj estas la *ŝanĝludistoj*. La nomo de la 6 ludistoj estas: *golulo*, *dekstra defendanto*, *maldekstra defendanto*, *dekstra alulo*, *mezludisto*, *maldekstra alulo*. Ĉiu teamo mem elektas el siaj membroj la *teamestron* kaj du *victeamestrojn*. La teamestroj portas

literon C, la victeamestroj literon A sur la antaŭa parto de sia ludvesto aŭ sur la brako. Nur ili havas la rajton demandi la ludgvidiston pri la kaŭzo de ajna *ludinterrompo*. Pro tio unu el ili tri devas esti ĉiam inter la ludantoj. Punate ili ne havas la estrajn rajtojn.

La sportiloj, kiujn la ludistoj uzas dum la ludo, estas la *hokeilo* (vulg. bastono), la *sketo* kaj la *hokedisko*, mallonge disko. La ceteraj antaŭskribitaj ekipaĵoj estas la *ludvesto*, la *krurŝirmilo*, la *brustŝirmilo*, la *gantoj*, la *kapŝirmilo* kaj la *golula masko*. La hokeilo estas 153 cm-ojn longa ligna bastono kun 37 cm-ojn longa kaj 7,5 cm-ojn larĝa, same ligna *alo* ĉe la malsupra ekstremo. Ankaŭ la sketo kaj la ceteraj ekipaĵoj havas strikte antaŭskribitajn mezurojn, formon kaj kvaliton.

La hokedisko, nomata ankaŭ glacidisko aŭ mallonge disko, estas el gumo aŭ alia permesita materialo, kun 7,62 cm-a diametro, 2,54 cm-a dikeco kaj 156-170 gr-a pezo.

La matĉo kaj la unuopaj triontempoj komenciĝas per la enludigo de la disko, mallonge *enludigo*, en la mezo de la ludkampo, ĉe la meza enludiga punkto. La enludigon antaŭas regula postenigo de la teamoj ambaŭflanke de la meza enludiga punkto. Nome, po unu ludisto el ambaŭ teamoj ekstaras vizaĝe al la kontraŭula golejo, en kunkrura staro, proks. unu hokeilon distance de la meza enludiga punkto, tenante la hokeilon tiel, ke ties alo tuŝu la pli proksiman randon de la punkto. Tiel ili staras, ĝis la enludigo okazis, t.e. ĝis la ludgvidisto faligis la diskon sur la enludigan punkton. La ceteraj ludistoj devas stari almenaŭ 4,5 m-ojn distance de tiuj du ludistoj. Post la farita enludigo la du posteniĝintaj ludistoj klopodas fulmrapide akiri la diskon por sia teamo.

La plua ludo konsistas el serio de aktivadoj forte ligitaj sekve de multaj atentendaj reguloj, el kiuj ĉi sube estas kelkaj koncize prezentataj. Vice de tiuj aktivadoj la membroj de ambaŭ teamoj klopodas teni la diskon en la posedo de sia teamo, aŭ priludante ĝin ili mem, t.e. kondukante, alivorte *driblante* ĝin antaŭ si per la alo de la hokeilo kaj dume konstante proksimiĝante al la kontraŭula golejo, aŭ *pasigante* ĝin alterne unu al la alia, celante veni en favoran situacion por *ŝoti* golon. Dum la ludo ili atentigas kaj sekvas la *regulon de la pasigo*, laŭ kiu regulo oni rajtas pasigi la diskon unu al la alia nur ene de iu triono kaj la disko rajtas transpasi el unu en la alian trionon nur, se la ludisto mem transkondukas ĝin — antaŭ si — trans la bluan linion. La alia ebleco estas, se post la pasigo de iu ludisto alia samteamano el la sama triono postsekvas la diskon de zono al zono, en kiu kazo li havas la rajton priludi ĝin en iu ajn triono, eĉ malantaŭ la golejo, krom en kazo de tn. *malpermesita liberigo*. Escepto estas, se defendanta ludisto pasigas la diskon el la defenda triono en la neŭtralan trionon, al samteamo ludanto. Tiam la disko rajtas transpasi la bluan, sed ne la ruĝan mezlinion, kompreneble kondiĉe ke la akceptanto estas ankoraŭ interne de la *ofsajdlinio*.

Same ili atentigas la regulon pri *ofsajdo*, kiu regulo antanskribas, ke atakanta ludisto rajtas transiri unua el sia teamo la mezlinion aŭ la linion de la ataka zono nur, se la disko jam pli frue (antaŭ li) transpasis la ruĝan resp. bluan linion. Se li transpasas pli frue ol la disko, tiam li venas per tio en ofsajdan pozicion, mallonge li estas *en ofsajdo*. Same estas konsiderenda ofsajdo tio, se iu ludisto el iu ajn triono pasigas la diskon en alian trionon al samteamo ludisto, kiu en la momento de la pasigo ne restadis en la triono de la pasiganto.

Kompreneble samtempe la alia teamo — ene de la eblecoj donitaj per la reguloj — klopodas malhelpi la sisteman, kunagan ludon de la kontraŭuloj, preventi golon en sia golejo, kaj akiri la diskon por transpreni la superecon kaj atingi golon en la kontraŭula golejo.

La golo validas nur, se a) la ludisto batas la diskon per sia hokeilo en la golejon; b) la disko frapiĝis de sur defendanto — de sur lia hokeilo, sketo aŭ vesto — en la golejon, kondiĉe ke tuj antaŭe unu el la atakantoj batis per hokeilo aŭ kiki la diskon; c) la disko frapiĝis de sur atakanto en la golejon, kondiĉe ke tuj antaŭe alia atakanto per hokeilo batis resp. ŝotis la diskon. Sed ne validas la golo, se unu el la atakantoj batis la diskon en la aero, aŭ puŝis ĝin per mano, eĉ se poste la disko ektuŝis unu el la defendantoj. — Ĉiu, kiu plenumis golon, kaj unu aŭ

du samteamanoj, kiuj partoprenis en la aktivado antaŭ la golo — la kunhelpantoj — ricevas po unu poenton kaj estas registrataj en la *golŝota listo*.

Dum la matĉo okaze de kulpitaj malregulaĵoj la ludgvidisto interrompas la ludon. Post la aljuĝita puno (aŭ ev. sen tio) la ludo estas daŭrigata post nova enludigo, kiu okazas aŭ sur unu el la enludigaj punktoj, aŭ en la loko de la kulpita malregulaĵo, laŭ la koncerna ludregulo.

El la konkursa juĝistaro la sekvantaj funkciuloj partoprenas en la disvolvo de la glaciĥokematĉoj:

a) Po unu *goljuĝisto* restadas malantaŭ ambaŭ golejoj, post la barilo, en sia *kaĝo*. Ili havas la taskon atenti la golejon, kaj komuniki el la ludgvidisto la plenumitan golon, resp. sciigi lin en dubaj kazoj, ĉu la golo validas aŭ ne.

b) La *ludtempo-mezuristo* registras la komencon, la finon kaj la efektivan ludotempon de la matĉo helpe de taŭga *stophorloĝo*. Per la disponata signilo (gongo, sireno, fajfilo aŭ aŭtomata signilo) li signas la finon de la matĉo, resp. de la triontempoj.

c) La *puntempo-mezuristoj* devas kontroli la puntempon de ĉiu punata ludisto. Se eble, per megafono ili anoncas la nomon de la punato, la kulpitan malregulaĵon kaj la aljuĝitan punon.

c) La *notisto* registras la golojn, la golŝotintojn, kaj la punojn kun la nomo de la kulpintoj. Estas lia devo transpreni de la trejnistoj aŭ gvidantoj de la du teamoj kaj transdoni al la ludgvidisto la laŭnoman *komencan pozicion* de la ludantoj, kiun pozicion — ĝis la komenco de la matĉo, — la teamoj ne rajtas ŝanĝi.

d) Skete sekvante la manovrojn de la ludantoj kaj streĉe atentante ĉiun momenton de la ludo, du *ludgvidistoj* gvidas samtempe la matĉon en harmonia kunagado. Krom multe da ceteraj farendoj la ludgvidistoj havas kiel ĉefan taskon fakscie gvidi kaj regule disvolvi la matĉon, prijuĝi la validecon de la goloj, okaze de kulpoj kontraŭ la ludreguloj aljuĝi la antaŭskribitan punon kaj ĉe certaj malregulaĵoj, kiel ekz. ofsajdo, malpermesita liberigo, *blokita disko* ktp. interveni la ludon kaj igi ĝin daŭrigi per nova enludigo.

Dum la ludo, en okazoj, por kiuj la regularo tion antaŭskribas, la ludgvidistoj rajtas resp. devas aljuĝi la sekvantajn punojn:

a) *Malgrandpuno*: la kulpinta ludisto devas forlasi la glacieron por 2 minutoj kaj eksidi sur la punbenko. Dum tiu tempo neniu rajtas anstataŭi lin en la ludo. Golulo ne estas punebla per malgrandpuno.

b) *Teknikan malgrandpunon* aplikas la ludgvidisto, se ne iu ludisto, sed la teamo kolektive kulpis (faris malregulaĵon). Tiam la trejnisto elektas unu el la ludantoj, kaj tiu eksidas sur la punbenko por 2 minutoj, simile kiel ĉe malgrandpuno.

c) *Grandpuno*: la ludisto, ricevinte la unuan grandpunon dum la matĉo, devas pasigi — sen anstataŭado — 5 minutojn sur la punbenko.

Okaze de dua grandpuno aljuĝita al la sama ludisto la kulpinto devas forlasi la glacieron kaj eksidi sur la punbenko, jam por 15 minutoj, ĉar pro la ripetita kulpo li ricevas krom la 5-minuta grandpuno ankaŭ plusan 10-minutan

ĉ) *disciplinan punon*. Post paso de 5 minutoj lin rajtas anstataŭi ŝanĝludisto en la ludo.

Se iu ludisto ricevas grandpunon la trian fojon, tiam li ricevas krome ankaŭ

d) *definitivan disciplinan punon*, per kiu la ludgvidisto eskludas lin el la matĉo. Tio signifas, ke li devas definitive forlasi la glacieron, kaj iri en la vestejon ĝis la fino de la matĉo. Post 5 minutoj ŝanĝludisto anstataŭas lin en la ludo. Se iu ricevas duan disciplinan punon, tiu puno fariĝas aŭtomate definitiva disciplina puno.

e) La *definitiva eskludo* devigas la ludiston forlasi la glacieron por la tuta daŭro de la matĉo, sed eĉ poste li ne rajtas partopreni pluajn matĉojn, tiel longe, dum lia propra supera instanco ne traktis lian aferon.

La golulo ne estas punebla per malgrandpuno, grandpuno aŭ disciplina puno, tial se li kulpis, unu el la ludistoj — kiun la teamestro elektas — eksidas sur la punbenko, por pasigi tie

la puntempon. Se la golulo ricevas definitivan disciplinan punon, tiam la teamestro lin ŝanĝas per unu el la ŝanĝludistoj.

Se la ludgvidisto ordonas *punŝoton*, tiam oni metas la diskon sur la mezan enludigan punkton, kaj unu el la ludistoj de la nekulpinta teamo, komisiita ĉe la teamestro, je la signo de la ludgvidisto ekiras, kondukante antaŭ si la diskon, kaj kontinue proksimiĝante al la kontraŭula golejo klopodas ŝoti tiun en la golejon. Dum tiu aktivado ambaŭ teamoj staras post la ruĝa mezlinio, sur la duonkampoj de la punŝotanta teamo kaj neniu rajtas malhelpi la ŝoton. Escepto estas nur la kontraŭula golulo, kiu devas stari en sia golejo, ĝis la punŝotanto transpasis la bluan linion. Nur tiam li rajtas fari provon por haltigi la diskon aŭ la punŝotanton.

Jen kelkaj el la multaj sperteblaj malregulaĵoj, pro kiuj la ludgvidisto devas aljuĝi iun el la supraj punoj al la kulpinta ludisto aŭ teamo.

Intence vundigi la kontraŭulan ludiston aŭ provi tion; faligi la kontraŭulon sur la barilon per kubuto aŭ tuta korpo, per atako aŭ stumbligo; *perkorpa ludo* (vulg.: bodiĉeko), t.e. kuri aŭ salti kontraŭ la kontraŭulon aŭ neregule ekpuŝi lin (kontraŭkuro pli longa ol 2 paŝojn estas rigardata jam perkorpora ludo); intenca transversa glito, aŭ falo antaŭ la diskokondukanton, por ke tiu perdu la diskon; stumbligo, bato aŭ ekpuŝo per la hokeilo; intenca tempopasigo; falo sur la diskon, bokso, kruda sinteno; mane levi la diskon de sur la glacio; alte tenita hokeilo; reteni la kontraŭulon per mano aŭ hokeilo; kiki la kontraŭulon; forlasi la porludistan benkon aŭ la punbenkon; obscena parolo ktp.

En kelkaj okazoj la ludgvidisto ne aljuĝas punon, sed interrompas la ludon kaj faras novan enludigon ĉe iu enludiga punkto. Tiaj okazoj estas ekz. la ofsajdo jam traktita, kaj la tn. *malpermesita liberigo*, kiam iu ludisto ŝotas la diskon el malantaŭ la ruĝa linio trans la kontraŭulan golejlinion dekstre aŭ maldekstre de la golejo, krom se tio okazas ĉe enludigo, aŭ se iu el la kontraŭuloj estus povinta transpreni la diskon, aŭ se la disko ektuŝis kontraŭulon antaŭ ol transiri la golejlinion.

Koncerne la sistemon de la internaciaj konkursoj estu ĉi tie konigata la sistemo aplikita dum la lasta mondĉampionado.

Surbaze de la rezultoj, resp. klasigoj atingitaj en la antaŭa mondĉampionado oni formis unu grupon el la ses avanaj klasitoj, duan grupon el la sekvantaj ok teamoj kaj trian grupon el la ceteraj, kies nombro ĝenerale ne estas pli ol 6-8.

Ene de la 2-a kaj 3-a grupoj disvolviĝis simpla rondoĉampionado, dum en la 1-a grupo oni aranĝas duoblan, alinome revenĝan rondoĉampionadon, nome ĉiu teamo ludas po du matĉojn kontraŭ ĉiuj ceteraj en la grupo.

La definitivan klasigan vicordon donas la vicordo atingita en la 1-a grupo, poste sekvas laŭ klasiga vico la teamoj de la 2-a grupo kaj fine tiuj de la 3-a grupo. Nur por la sesa loko ludas ankoraŭ unu matĉon la lastaloka klasito de la 1-a grupo kontraŭ la unualoka klasito de la 2-a grupo kaj same por la dektria kaj dekkvara loko la du lastaj teamoj en la 2-a grupo kontraŭ la du unuaj teamoj de la 3-a grupo.

En la sporta ludo glaciĥokeo partoprenas nur viraj teamoj.

La mondfederacio de la sportobranĉo glaciĥokeo estas: Ligue Internationale de Hockey sur Glace (LIHG). Esp-e: Internacia Glaciĥokeista Ligo.

Esprimoj: la Kanada nacia glaciĥoketeamo venkis la pasintjaran mondĉampionan teamon de la svedoj kun golproporcio 6:3 (ses per tri). La unualoka klasito de la ĉampionado por la Eŭropo-pokalo de la Ĉampionaj Teamoj. Kun sendecida rezulto, nome kun golproporcio 2:2 finiĝis la glaciĥokerenkontiĝo inter la naciaj Teamoj de Francio kaj Nederlando. La Eŭropo-ĉampionadon ĉe glaciĥokeo ĉijare partoprenis ankaŭ transmaraj glaciĥokeo-teamoj. La olimpikoĉampiona soveta glaciĥokeo-teamo kun senŝanĝa anaro partoprenas la baldaŭ komenciĝontan mondĉampionadon de glaciĥokeo. En la decida matĉo inter la svisa kaj norvega glaciĥokeo-teamoj, disvolvita dum la Eŭropo-ĉampionado de glaciĥokeo de 1968 en Oslo, La

ludgvidisto punis per definitiva disciplina puno po unu svisan kaj norvegan ludistojn pro perkorpa ludo.

HALTERLEVO

En serio de levoj, en kiuj la pezo estas grade pligrandigata per certaj fiksj mezuroj, la halterlevisto klopodas levi kiel eble plej grandan pezon helpe ĉe la sportilo nomata haltero. La levoj okazas en tri — kelkfoje en kvar aŭ kvin — diversaj levekzercoj, kiuj estas:

- A) Dumana etendo
- B) Dumana ŝiro
- C) Dumena puŝo
- C) Unumana ŝiro
- D) Unumana puŝo

La definitivan finrezulton donas la sumo de la atingitaj plej grandaj pezoj levitaj en la tri — respektive kvar aŭ kvin — levekzercoj.

La konkursoj povas esti individuaj aŭ teamaj, sed ĉiam nur por viroj.

Laŭ korpopezo la konkursantoj estas grupigitaj en la sekvantaj pezkategorioj.

	korpopezo en kilogramoj	
	super	inkluzive ĝis
1. Pezkategorio 56 (pezkategorio kvindek ses)		56
2. Pezkategorio 60	56	60
3. Pezkategorio 67,5 (sesdek sep komo kvin)	60	67,5
4. Pezkategorio 75	67,5	75
5. Pezkategorio 82,5	75	82,5
6. Pezkategorio 90	82,5	90
7. Pezkategorio super 90	90	

La determino de la korpopezo okazas pere de pesado senpere antaŭ la komenco de la konkurso.

La levekzercoj disvolviĝas sur podio kun areo de 4x4 m-oj kaj 10 cm-a alto.

La haltero konsistas el 220 cm-ojn longa elasta ŝtalstango, sur kies ekstremojn estas grade surmetataj la gisferaj krompezoj de diversa difinita pezo.

La konkurson gvidas unu gvida juĝisto kaj du flankjugistoj.

Ekzercoj

A) Dumana etendo (dufaza ekzerco)

I. fazo. Starante en baza pozicio (bazostaro), nome en kunkrura aŭ en flanke diskurra staro, la halterlevisto per laŭplaĉa preno ambaŭmane prenas la stangon de la haltero, kuŝanta antaŭ li sur la podio, kaj sen tuŝi la korpon (ventron aŭ bruston), per unu eksvingo li translokas ĝin sur la bruston, en la alteco de la ŝultroj, helpante sin dume per diversaj piedmanovroj, kiel ekz. per tondilado, subsido aŭ genuflekso, kaj posta tutkorpa rektiĝo. Post ia surbrustigo li staras rektakorpe, en kunkrura aŭ flanke diskurra, rektapieda staro ĉ. 2 sekundojn, ĝis la signo de la gvida juĝisto.

II. Je la donita signo kun kontinua malrapida movo, sen svingo aŭ povertra puŝo li etendas la halteron super la kapon ĝis plene etenditaj brakoj, kaj tenas ĝin tie rektabrake kaj rektakorpe ĉ. 2 sekundojn, ĝis la pli nova signo de la juĝisto. Tiam li remetas la halteron sur la podion.

B) Dumana ŝiro (unufaza ekzerco)

Starante kiel ĉe la ekzerco etendo, la halteristo prenas ambaŭmane la halteron, kaj sen tuŝi la korpon ie ajn, per ununura seninterrompa ekmovado li svingas ĝin super la kapon en rektabrakan pozicion, helpante sin dum la ekzerco per plifaciligaj piedmanovroj (tondilado, subsidio).

Starante ĉ. 2 sekundojn rektakorpe kun etenditaj piedoj kaj brakoj, je la signo de la gvida juĝisto li remetas la halteron sur la podion.

C) Dumana puŝo (dufaza ekzerco)

I. Kiel ĉe la ekzerco etendo, la halterlevisto lokas la halteron sur la bruston en la alteco de la ŝultroj.

II. Je la signo de la gvida juĝisto li fleksas, poste rektigas la genuojn, kaj la risortan movon, rezultitan ĉi-maniere, li eluzas por puŝi la halteron per unu seninterrompa svingo rekte supren, super la kapon, ĝis plene etenditaj brakoj. Dum la puŝo li povas fari tondiladon aŭ genuflekson. Poste kiel ĉe la ekzercoj etendo kaj ŝiro.

D), E) Unumanaj ŝiro kaj puŝo

La ekzercoj disvolviĝas same laŭ antaŭskribitaj reguloj, ĝenerale analogie al la dumanaj ŝiro kaj puŝo.

En la olimpikoj tiuj ĉi du ekzercoj mankas, sed en la mondĉampionadoj ili povas esti eroj de la konkurso.

La mondfederacio de la sportobranĉo halterlevo estas: Fédération Internationale Haltérophile et Poids (FIH) (Esp-e: Internacia Halterlevista Federacio).

Esprimoj:

Superinte (venkinte) la malnovan rekordon de 135 kg-oj, plenumitan de Irana halterlevisto antaŭ du jaroj, li starigis 137,5 kg-an novan mondrekordon en la levekzerco etendo, en la kunmetita konkurso de la pezkategorio 60. Atinginte unualokan klasigon en la levekzerco etendo kaj dua- kaj trialokan klasigojn en puŝo kaj ŝiro, la bulgara konkursanto venkis en la konkurso de la pezkategorio 82,5, en la olimpika ĉampionado de halterlevo. Mondĉampionado de halterlevo, aŭ halterlevo-mondĉampionado. Turka konkursanto venkis en la pezkategorio super 110 de la Eŭropo-ĉampionado de halterlevo en 1962.

HOKEO

Sur ludkampo kun antaŭskribitaj mezuroj, dum difinita ludotempo, la ludistoj de du teamoj, ekipitaj ĉiuj per la sportilo hokeilo, — obeante la ludregulojn — klopodas per lertaj teama interludo kaj fintoj superruzi la kontraŭulan teamon kaj sendi la malgrandan hokepilkon kiel eble plej multajn fojojn en ties golejon, respektive — se necese — per tenaca defendludo malhelpi, ke la kontraŭula teamo povu atingi golon.

La sportan ludon hokeo ludas viraj teamoj kontraŭ viraj teamoj, aŭ virinaj teamoj kontraŭ virinaj teamoj.

La mondfederacio de la sportobranĉo hokeo estas: Fédération Internationale de Hockey (FIH) (Esp-e: Internacia Hokeista Federacio).

La sportobranĉo hokeo dividiĝas en du subbranĉojn kun apartaj ludreguloj. Tiuj du subbranĉoj estas:

- A) Subĉiela hokeo,
- B) Ĉambrega hokeo.

A) Subĉiela hokeo

La sporta ludo subĉiela hokeo — nomata ĝenerale nur hokeo, kontraste al la ĉambrega hokeo — disvolviĝas sur longkvadrata *ludkampo* kun razena aŭ senrazena, sed por hokeo taŭga grundo. La du 90,40 m-ojn longaj lateroj de la ludkampo estas la *flanklinioj* kaj la du 55 m-aj malpli longaj lateroj estas la *gollinioj*. La mezon de la du flanklinioj kunligas la *mezlinio*, dividante la ludkampon en du *duonkampojn*. Meze de la duonkampoj, paralele kun la mezlinio estas indikitaj la du *kvaronlinioj*, dividantaj la duonkampojn en po du *kvaronkampojn*, 6,40 m-ojn paralele kun kaj interne de la du flanklinioj estas indikata la tn. *sepjarda linio*.

Ĉe la pinto de la kvar anguloj de la ludkampo kaj krome ĉe la du ekstretoj de la mez- kaj kvaronlinioj — 90 cm-ojn ekster la flanklinioj — staras po unu, almenaŭ 120 cm-ojn alta flago.

Meze de la gollinioj staras po unu *golejo*. Ĝi konsistas el du 2,14 cm-ojn altaj, 5x7,5 cm-ojn dikaj vertikalaj fostoj, 3,66 m-ojn distance unu de la alia. Samdika horizontala kverfosto kunligas la supron de la du vertikalaj fostoj. *Golejreto*, fiksita al la *golejfostoj* kaj al la grundo formas la malantaŭan flankon de la golejo.

14,63 m-ojn antaŭ la golejo, paralele kun ĝi estas indikita 3,66 m-ojn longa linio. Ekde la du ekstretoj de tiu linio kuras ĝis la gollinio du kvaroncirkloj kun 14,63 metra radiuso, havantaj kiel cirklocentron la malsupron de la du vertikalaj golejfostoj. La tiamaniere ĉirkaŭlimita areo antaŭ la golejo nomiĝas *ŝotocirklo*. 7,3 m-ojn antaŭ la mezo de la golejo 15 cm-ojn diametre cirklo indikas la lokon de la *punŝoto*.

Ĉiuj supremenciitaj linioj estas indikitaj sur la ludkampo per blanka farbo. La kvaronliniojn kaj la sepjardajn liniojn indikas intermita blanka linio.

La ludon inter du teamoj oni nomas *hokematĉo*. La *ludotempo* de la matĉo konsistas el du 35-minutaj duontempoj kun 5-minuta interpaŭzo kaj kun *duonkamp-interŝanĝo* post la paŭzo. La ludotempo inkluzivas nur tiujn tempodaŭrojn, dum kiuj la pilko *estas en ludo*. Ceterajn tempodetalojn — en la regularo precize difinitajn — la ludgvidistoj dekalkulas el la duontempo.

La *pilko*, uzata en la ludo, estas el korko aŭ fadenbulo, kovrita per blanka- aŭ nigrakolora ledo, kaj pezas 156-163 gr-ojn.

La *hokeilo* — per kiu la hokeisto kondukas la pilkon antaŭ si, aŭ pasigas ĝin al samteamano, aŭ ŝotas ĝin al la kontraŭula golejo — estas el ligno, kaj havas siajn antaŭskribitajn formon kaj mezurojn. Ĝiaj partoj estas la *kapo* (hokeilkapo) kaj *fusto* (hokeilfusto). Unu flanko de la tuta hokeilo estas plata, la alia estas konvekca.

Ceteraj ekipaĵoj de la hokeistoj estas la ŝirmilaro (ŝirmekipaĵo) de la golulo (krur-, pied-,

ventroŝirmilo kaj specialaj gantoj), la uniforma sportotrikoto de la kampludistoj (alikelora ol tiu de la golulo), sportkalsono, tibiŝirmilo kaj ŝuoj de tipo permesita.

La hoketeamo konsistas el 11 ludistoj, nome el unu golulo kaj 10 kampludistoj. Ili ĉiuj havas sian difinitan lokon kaj taskon ene de la posteniĝo de la teamo. Ĝis antaŭ nelonge la teamo devis traludi la tutan duontempon en neŝanĝita posteniĝo, sed la plej nova regularo jam permesas libervolan lokŝanĝon inter la ludistoj de la teamo daŭre de la tuta matĉo. Sed ŝanĝi ludiston pere de rezerva ŝanĝludisto ne estas permesite.

Ĉiu teamo elektas *teamestron* el inter siaj membroj. Tiu reprezentas la teamon kaj plenumas certajn taskojn, kiel ekz. loti por la duonkampo antaŭ la matĉo ktp.

La du. duontempoj kaj ĝenerale la plua ludo post ĉiu ludinterrompo komenciĝas per *enludigo* (t.e. pilkoenludigo), vulgare bulio. Komence de la duontempoj kaj post ĉiu golo la enludigo okazas en la mezo de la ludkampo. Por plenumi la enludigon po unu ludisto el ambaŭ teamoj ekstaras en la mezo de la ludkampo, vid-al-vidu unu al la alia, vizaĝe al la flanklinio, tiel, ke la propra golejo estu dekstramane al li. La ludgvidisto metas la pilkon sur la grundon inter ili. Je lia fajfilsigno la du ludistoj ektuŝas la teron dekstre de la pilko per la malsupra eĝo de la hokeilo kaj poste ili intertuŝigas reciproke la platan flankon de la hokeilkapo super la pilko. Tion ĉi ili ripetas ankoraŭ du fojojn. Post la tria intertuŝigo, per la bato de unu el la du enludigantoj (buliantoj) la pilko *venas en ludon*, alinone la pilko *iĝas enludita*.

Enludigo sekvas ankaŭ tiam, kiam ambaŭ teamoj samtempe kulpis malregulaĵon, aŭ la ludgvidisto kulpis eraron, aŭ okazis io, pro kio la ludo estis interrompita. Tia enludigo okazas loke de la ludinterrompo, escepte enludigon ene de la ŝotocirklo, en kiu kazo ĝi estas plenumbla nur almenaŭ 4,55 m-ojn distance de la gollinio.

Dum kaze de enludigo, plenumata ĉe la ludkampomezo (t.e. komence de duontempo, aŭ post golo), la teamo okupas la bazan, ludkomencan posteniĝon, kaze de enludigo en ajna cetera punkto de la ludkampo la ludistoj devas posteniĝi inter sia propra gollinio kaj la imagita linio traŭranta la pilkon paralele kun la gollinio.

Uzante sian hokeilon, la ludisto rajtas bati la pilkon nur per ĝia plata flanko (inkluzive kaj la kapon kaj la fuston). Dum la bato neniu parto de la hokeilo leviĝu super la ŝultron de la ludisto. Estas malpermesite bati sub la kuŝantan aŭ ruliĝantan pilkon (nomata *kupirta* bato), ĉar tio estas danĝera ludo. Cetere la *levita* pilkobato (kiam post la bato la pilko leviĝas en la aeron, kaj kiun oni nomas *ŝlenco*) estas permesita. Same licas bati la pilkon en la aero, kondiĉe ke la hokeilo ne leviĝas super la ŝultron, kaj la bato ne estas danĝera por alia ludisto. Malpermesitas porti aŭ saltigadi la pilkon sur la hokeilo. Tian ludon sekvas puno. Licas haltigi la pilkon kaj en la aero kaj sur la grundo ankaŭ per la mano, sed post la haltigo oni devas ĝin tuj delasi. Plupasigi la pilkon licas nur per la hokeilo. Kapte levi la pilkon permane de sur la tero aŭ kiki (piedbati) ĝin, ĵeti aŭ kunporti ĝin estas same malpermesite.

Dum la ludo estas malpermesite bati, aŭ krampe kapti per la propra, la hokeilon de la kontraŭulo. Same ne estas permesitaj ĉiaj aktivadoj krude kaj perforte malhelpantaj la liberan ludon de la kontraŭulo aŭ minacantaj ties korpan sekurecon.

La golulo rajtas kike parati la pilkon aŭ haltigi ĝin krom per la hokeilo ankaŭ per ajna parto de sia korpo, sed nur ene de la ŝotocirklo.

Obeante la suprajn ludregulojn, permesojn kaj malpermesojn, la ludistoj de unu el la du teamoj pasigadas la pilkon unu al la alia en disciplinita kolektivema interludo kaj kun lerta taktiko, kaj venante ĉiam pli proksimen al la kontraŭula golejo klopodas atingi golon. (Teamon momente, aŭ pli longtempe atakantan la kontraŭulan golejon oni nomas *atakanta teamo*. Ĝian ludon oni nomas *atakado* kaj ĝiajn ludistojn — *atakantaj ludistoj* aŭ *atakantoj*.) Per tenaca kaj persista kontraŭstaro la alia teamo klopodas haltigi kaj fiaskigi la disvolviĝantan atakon de la kontraŭulo (teamon momente aŭ pli longtempe defendantan sian golejon oni nomas *defendanta teamo*, ĝian ludon — *defendado*, kaj ĝiajn ludistojn — *defendantaj ludistoj* aŭ *defendantoj*)

kaj post sukcesa defendludo transiri en atakan manovron, celante same golon. Venkas tiu el la du teamoj, kiu fine de la du duontempoj atingis pli multe da goloj.

La teamo atingis *golon*, respektive la ludgvidisto *koncedas* la golon, kiam la pilko — sekve de ŝoto, bato, puŝo, rulo aŭ devojigo per la hokeilo de atakanta ludisto — en sia plena volumeno transiris la gollinion inter la du golejfostoj, senkonsidere de tio, se eventuale ankaŭ unu aŭ pli da ludistoj de la defendanta teamo ektuŝis la pilkon poste, antaŭ ol ĝi atingis la gollinion, post enludigo plenumita ene de la ŝotocirklo oni atingas golon nur, se la hokeilo de ankaŭ atakanta ludisto ektuŝis la pilkon.

Dum la ataklado de iu el la du teamoj, disvolvita sur la kontraŭula duonkampo, povas okazi situacio, kiun oni nomas *ofsajdo*. Ĉiu senpilka ludisto de la atakanta teamo estas en ofsajdo, se ne troviĝas almenaŭ tri defendantaj ludistoj, aŭ iu el liaj samteamanoj kun la pilko, pli proksime al la gollinio ol li. La fakto de la ofsajdo mem ne estas punenda, krom se per tiu pozicio la ludisto havigis al si avantaĝon, aŭ malfavore influas la ludon de la kontraŭulo. La ludisto ĉesis esti en ofsajdo, se unu el la kontraŭulaj ludistoj kun rezulto priludis la pilkon.

Kiam la pilko transiris la flanklinion, sekvas tn. *enbato*, nome oni resendas la pilkon per bato en la ludkampon. La enbato ne povas esti forta bato, nur simpla repuŝo de la pilko. La enbaton plenumas iu el la ludistoj de la alia teamo ol kiu teamo la lasta ektuŝis la elirontan pilkon. La enbaton li devas plenumi sur la ekstera flanko de la flanklinio, tie, kie la pilko transiris ĝin. Dum la enbato la ceteraj ludistoj devas restadi inter la du sepjardaj linioj de la ludkampo.

Por puni eventualajn malregulaĵojn la ludgvidistoj disponas pri certaj sankcioj. Tiuj sankcioj estas la *libera ŝoto*, la *punŝoto*, la elludigo de la kulpinta ludisto por certa tempodaŭro, aŭ lia definitiva *eskludo* el la plua parto de la matĉo.

La liberan ŝoton plenumas unu el la kontraŭulaj ludistoj de la kulpinta teamo, ĝenerale loka de la kulpita malregulaĵo, escepte kelkajn specialajn formojn de la libera ŝoto pli sube traktatajn. La plenumanto de la libera ŝoto rajtas aŭ bati la pilkon, aŭ nur forpuŝi ĝin. Dum la plenumo de la libera ŝoto al neniu ludisto estas permesite veni pli proksimen ol 4,55 m-ojn al la ŝotanto. Neregule plenumita libera ŝoto sekvigas pli novan punon.

Specialaj kazoj de la libera ŝoto estas la enludiga ŝoto, la *granda angulŝoto* kaj la *puna angulŝoto*.

Se la pilko transpasis la gollinion ekster la golejo, estas tri variantoj:

a) se atakanta ludisto sendis ĝin trans la gollinion, aŭ se la pilko frapiĝis tien senintence de sur tia ludisto de la defendanta teamo, kiu ludisto troviĝis inter la kvaron- kaj mezlinio, la plua ludo estas enkondukata per la tn. enludiga ŝoto (ne konfuzenda kun la enludigo — bulio — jam konigita), mallonge *elŝoto* (nome oni ŝotas ĝin *el* la golejzono ale al la mezo de la ludkampo). La enludiga ŝoto, alinome elŝoto estas speco de la libera ŝoto, kiun plenumas unu el la defendantaj ludistoj, 14,63 m-ojn distance de la gollinio, vid-al-vide al tiu punkto, kie la pilko transiris la gollinion. Dum la plenumo de la elŝoto la golulo kaj 5 ludistoj de la defendanta teamo posteniĝas ĉe la gollinio kaj ĝiaj ceteraj ludistoj devas stari trans la mezlinio (pretaj kompreneble kiel eble plej rapide enmiksigi en la ludon post la plenumita elŝoto). La membroj de la atakanta teamo rajtas restadi dume ie ajn en la ludkampo krom ene de la ŝotocirklo de la defendantoj.

b) se defendanta ludisto, troviĝanta maltrans la kvaronlinio, sendis la pilkon senintence trans la gollinion, la ludgvidisto aljuĝas grandan angulŝoton, mallonge grandangulon. La grandan angulŝoton, kiu estas speco de libera ŝoto, plenumas unu el la atakantaj ludistoj. La loko de la grandangulo estas aŭ sur la gollinio, aŭ sur la flanklinio, 2,80 m-ojn distance de tiu angulflago, kiuflanke de la golejo la pilko transpasis la gollinion. En la momento de la granda angulŝoto ĉiuj ludistoj de la defendanta teamo posteniĝas vice malantaŭ la gollinio, dum la ludistoj de la atakanta teamo — krom la ŝotanto — restadas sur la ludkampo, ekster la

ŝotocirklo de la defendantoj. Post plenumita granda angulŝoto ŝoti la pilkon (aŭ sendi ĝin ajnmaniere) en la golejon licas nur, se iu el la atakantoj jam haltigis la pilkon sur la tero, aŭ se iu el la defendantoj ektuŝis ĝin per la hokeilo aŭ per la korpo.

c) se defendanta ludisto el iu ajn parto de la ludkampoj intence sendis la pilkon trans sian gollinion, la ludgvidisto aljuĝas punan angulŝoton, mallonge *punangulon*. La punan angulŝoton, ankaŭ kiu estas speco de libera ŝoto, plenumas same unu el la atakantaj ludistoj el de iu ajn parto de la gollinio, minimume 9,14 m-ojn distance de la golejfo. Dum la ŝoto ne pli ol 6 ludistoj de la defendanta teamo rajtas posteniĝi malantaŭ la gollinio, la ceteraj devas restadi trans la mezlinio, ĝis ankaŭ alia ludisto ektuŝis la pilkon aŭ la pilko forlasis la ŝotocirkolon.

Punŝoton aljuĝas la ludgvidisto avantaĝe al la kontraŭulo, kiam

a) ludisto de la defendanta teamo, ene de la ŝotocirklo, intence kulpas malregulaĵon, por malhelpi golon (ekz. kiam la kontraŭulo plenumas liberen ŝoton ene de la ŝotocirklo de la defendanta teamo);

b) kvankam neintence, ene de la ŝotocirklo, la defendanta teamo kulpas malregulaĵon, sen kio la kontraŭula teamo verŝajne estus atinginta golon (ekz. kruda kaj danĝera ludo, aŭ ĝenerale ĉia ajn kulpo kontraŭ la regula, disciplinita ludmaniero).

La punŝoton plenumas unu el la ludistoj de la atakanta teamo el de la loko de la punŝoto (7,30 m-ojn antaŭ la mezo de la golejo). Svingodona alkuro antaŭ la ŝoto ne estas permesita. La golulo (aŭ lia anstataŭanto, se li vundiĝis aŭ la ludgvidisto elludigis lin) devas stari sur la gollinio meze de la golejo, kaj ne rajtas sin formovi eĉ per unu piedo, dum oni plenumas la punŝoton.

La hokematĉon gvidas samtempe 2 *ludgvidistoj*. Ĉiu el ili devas kontroli po unu duonkampon kaj unu el la flanklinioj en ties plena longo. Angulŝoton ili rajtas aljuĝi nur sur sia propra duonkampoj.

La ludgvidisto signas per fajfilo la komencon kaj finon de la duontempoj, krome li fajfilsignas, kiam li volas puni malregulaĵon, aŭ pro ajna kaŭzo li volas interrompi la ludon, fine, kiam li signas golon, kiam li signas la transiron de la pilko trans la gollinion, aŭ kiam li rekomencigas la ludon per nova enludigo post punŝoto ne rezultiginta golon.

Post la fajfilsono li klarigas per internacie interkonsentitaj brakosignoj la kaŭzon de la ludinterrompo, nome la enludigon, piederaron, perkorpan malhelpadon, golon, ofsajdon, liberan ŝoton, grandan aŭ punan angulŝoton, punŝoton kaj la danĝeran ludon.

Du *flankjuĝistoj* kaj unu *tempomezura juĝisto* helpas al la du ludgvidistoj dum la matĉo. Ili ĉiuj estas membroj de la konkursa juĝistaro, kies pluaj membroj estas la prezidanto, la vicprezidanto, la konkursa sekretario kaj la kuracisto.

Esprimoj:

Internacia hokekonkurso. Internacia konkurso de hokeo. Mondĉampionado de hokeo. Olimpikoĉampiona hoketeamo. La franca nacia hoketeamo gajnis la ĉijaran mondĉampionecon venkinte ĉiujn siajn rivalojn en la ĉampionado. La Eŭropo-ĉampionadon de hokeo partoprenis la naciaj teamoj de 15 landoj.

B) Ĉambrega hokeo

Oni ĝin ludas laŭ regularo iom diverĝa disde tiu de la subĉiela hokeo.
(Nur menciite, sed ne traktate.)

ĴUDO

Aplikante krom la forto de siaj muskoloj ankaŭ tre vastan serion de permesitaj kaj dum longatempa eksercado lernitaj prenoj, fintoj, korpoĝetoj kaj ganĉoj (stumbligoj), la ĵudisto klopodas venki sian kontraŭulon en korpo-kontraŭ-korpa batalo. Venkas, kiu ene de la fiksita matĉotempo igas sian kontraŭulon batalsenpova, aŭ la unua atingas la maksimuman poentonombro, aŭ montras teknikan supervaloron dum la daŭro de la batalo.

Ĵudo estas japandevena sportobranĉo, kion demonstras la deviga japanstile ĵudovesto de la konkursantoj, kiel ankaŭ la japana nomo de la diversaj teknikoj kaj aktivadoj, eĉ japanaj komandovortoj, kiujn la konkursantoj devas koni kaj la konkursaj juĝistoj devas uzi dum la matĉoj. Certa kvanto da tiuj japanaj vortoj estas troveblaj pli sube, disemite en la teksto. Tiuj vortoj aperas en la oficiala latinlitera angla-japana transskribo kaj post ĉiu vorto staras parenteze la Esp-a prononco. Dupunkto post vokalo signifas, ke ĝi estas prononcenda longa. Kie la fonetika formo ne troviĝas, tiu vorto estas prononcenda laŭ la Esp-a legoregulo. Post la fonetika formo staras la Esp-a traduko de la japana vorto.

(Post la pleja parto de tiuj japanaj vortoj staras du diverĝaj tradukoj. La tradukoj post la mallongigo “jap.” estas rektaj tradukoj el la japana en Esperanton, — bonvola kontribuo de s-ro T. Nakamura. La tradukoj post la mallongigo “ang.” venis el la anglalingva regularo de la mondfederacio en la hungaran regularon, kaj post tia duobla transplantado sekvis la traduko en Esperanton. Pro tio — bedaŭrinde — la du Esperantaj tradukoj de la samaj japanaj vortoj ĝenerale ne kovras unu la alian, konsekvence la lastaj tradukoj ne estas rigardeblaj aŭtentaj kaj fidelaj.)

Estas supozebla kun granda verŝajneco, ke ĉie en la ĵudistaj medioj — escepte tiujn japanajn — estas konataj kaj uzataj la neaŭtentaj tradukoj, transprenitaj el la oficiala, anglalingva regularo. Prezentas sin do la demando, kiun el la du tradukoj akcepti kiel oficialan.)

La ĵudokonkursoj estas aranĝataj en ĉambregoj puraj kaj konvene vastaj por la disvolvo de la ĵudomatĉoj.

La pli strikta scenejo de la konkurso estas la 14x14, maks. 16x16 m-ojn area ĵudofaco, kovrita per tatamo aŭ alia akceptebla ĵudotapiŝo. En internaciaj konkursoj estas antaŭskribita la uzo de tatamo (5 cm-ojn dika mato), kunmetita el strioj 183x91x5 cm-ojn volumenaj. En la ceteraj konkursoj oni ĝenerale uzas ĵudotapiŝon konsistantan el fortike teksita tegilo remburlita 5 cm-ojn dika per strioj el ĉevalharo. Estas uzataj ĵudotapiŝoj ankaŭ el plasto.

La tutan ĵudotapiŝon kovras tapiŝkovrilo el artefarita led, lin- aŭ veltolo. Cele de pureco ĝi estas ofte lavenda.

Por preventi kontuzojn aŭ vundiĝojn ĉe konkursantoj elfalintaj aŭ elglitintaj de sur la ĵudotapiŝo, 2,5 m-ojn larĝa, laŭeble alikolora *sirmotapiŝo* ĉirkaŭzonas la ĵudotapiŝon ĉe ĉiuj flankoj.

La ĵudofaco, plene kovrata de la ĵudotapiŝo, havas du zonojn, nome la 9x9 aŭ 10x10 m-an *batalfacon*, alinome *luktofacon*, kaj la eksteran zonon, nomatan *sekurfaco*. La du zonojn dividas unu de la alia 7 cm-ojn dika ruĝa rubando gluita sur la tapiŝkovrilo.

Dum la konkurso la ĵudistoj devas porti la antaŭskribitan, japandevenan ĵudoveston nomatan “ĵūdōgi” (ĵu:do:gi = ĵudovesto). Ĝi konsistas el blankaj, tolaj jako kaj pantalono. La jako longas ĝis la genuoj kaj havas nek poŝojn, nek butonojn aŭ agrafojn. La manikoj estas tiel longaj, ke ili kovras pli ol duonon de la antaŭbrako kaj havas 3-5 cm-an plivastecon ĉe la ekstremo. 4 cm-ojn larĝa zono, havanta la koloron de la kvalifa kategorio de la konkursanto, premas la jakon fikse al la korpo. Duoble ĝi ĉirkaŭvolvas la talion kaj dorse ĝi estas nodligita tiel, ke ĝiaj du ekstremoj 15 cm-ojn longe libere ŝvebas. Por la daŭro de la matĉo la du ĵudistoj devas kovri sian zonon per la tiucele disponigita tn. indikzono, kiu estas same 4 cm-ojn larĝa

ruga (por unu el la konkursantoj) respektive blanka (por la alia) rubando.

La senbutonan, senagrafan pantalonon fikasas laĉoj ĉirkaŭ la talio.

Dum la batalo uzo de ŝuoj ne estas permesita.

Sub la ĵudovesto la viroj devas surhavi bankalsonon aŭ testikujon, krome nenion alian. La virinoj havas kalsoneton sub la pantolono kaj korpomezuran trikoton sub la jako.

Antaŭ la komenco de la matĉo la du konkursantoj ekstaras meze de la batalfacoj, 4 m-ojn unu kontraŭ la alia kaj reciproke salutas unu la alian.

Okaze de teama konkurso la membroj de la du kontraŭulaj teamoj venas al la mezo de la batalfacoj, viciĝas en du linioj 4 m-ojn vid-al-vide unu al la alia. Je la signo de la gvida juĝisto ĉiu turnas sin al la tablo de la konkursa juĝistaro kaj je lia komandovorto “rei” (= Riverencu! Salutu!) ĉiu klinas sin. Poste ĉiu returnas sin vid-al-vide unu al la alia kaj je la pli nova komandovorto “rei” la du teamoj salutas unu la alian per klino, poste forlasas la tapiŝon.

La matĉo komenciĝas ĉiam en stara pozicio, je la komandovorto “hajime” (hajime = Komencu!) de la gvida juĝisto. La daŭro de la matĉo estas antaŭe difinita: ĝi ne povas esti malpli ol 3, nek pli ol 20 minutoj. La finon de la matĉo signas la tempomezura juĝisto per fortatona gongo.

La matĉo daŭras malpli longe ol la difinita matĉotempo, se unu el la konkursantoj plenumis certan aktivadon resp. teknikon valorantan unu poenton, nomatan “ippon” (= jap.: Venko unu! — ang.: unu poento). Tiu unu poento konsistas el 10 subpoentoj.

Same finiĝas la batalo antaŭ la fino de la matĉotempo, se unu el la konkursantoj plenumis dufoje tian aktivadon, resp. sukcese aplikis tian teknikon, por kiu la gvida juĝisto aljuĝas “waza-ari”-on (ŭaza-ari = jap.: Fiksita la formo! — ang.: duonpoento), valorantan 7 subpoentojn.

Ekzistas ankoraŭ du kromaj frakciaj poentoj, nome “waza-ari-nichikai-waza” (ŭaza-ari-niĉikai-ŭaza = jap.: ? — ang.: preskaŭ duonpoento), valoranta 5 subpoentojn kaj “kinsa” (jap.: etdiferenco; apenaŭa diferenco — ang.: malgranda avantaĝo), valoranta 3 subpoentojn. Sed tiuj du lastaj frakciaj poentoj — kiom ajn foje aljuĝitaj dum la daŭro de la matĉo — kiel ankaŭ la eventuala aljuĝo de unufoja “waza-ari” estas sumigeblaj nur post la fino de la antaŭskribita plena matĉotempo, kiam el la proporcio de la sumo de la adiciitaj subpoentoj oni elkalkulas, kiu venkis en la matĉo kun teknika supervaloro, nomata “yusei-gachi” (jusei-gaĉi = jap.: ? — ang.: venko kun teknika supervaloro).

Venkas tiu konkursanto,

a) kies kontraŭulo forestis sian matĉon, kion oni nomas “fusen—gachi” (husen-gaĉi = jap.: ? — ang.: venko pro fores-to), aŭ kies kontraŭulo rezignas la matĉon, kion oni nomas “fusen-sho” (husen-ŝo = jap.: senlukta gajno de venko — ang.: venko pro rezigno), aŭ kies kontraŭulo kapitulacas dum la matĉo, kion oni nomas “kiken-gachi” (kiken-gaĉi = jap.: ? — ang.: venko pro kapitulaco);

b) kiu antaŭ la fino de la matĉotempo akiris iun el la sekvantaj rezultoj, sufiĉaj por tuj fini la matĉon:

aa) “ip-pon”, valoranta unu poenton,

bb) “awasete ippon” (aŭasete ip-pon = jap.: Sume, venko unu! — ang.: du duonpoentoj), kiun oni atingas plenuminte la duan “waza-ari”-on, kaj kiu valoras same 1 poenton, kaj fine

cc) “nihon” (= Venko dua! — ang.: du poentoj; du “ippon”-oj) valoranta 2 poentojn;

c) kiu post la paso de la matĉotempo havas iun el la avantaĝoj: “waza-ari”, “waza-ari-nichikai—waza” aŭ “yusei-gachi”.

Dum la matĉo la konkursantoj komence batalas starante, poste, sekve de ia aplikata tekniko, ili ŝangas pozicion, kaj la batalo transiras en tn. terbatalon, nomatan “ne-waza” (ne-ŭaza = jap.: kuŝpozicia formo — ang.: terbatalo), kie la lukto estas daŭrigata en kuŝa, surgenua ktp. pozicioj. Se la aplikata tekniko al la transiro en “ne-waza”-n ne estis kontinua, t.e. regula,

tiam la gvida juĝisto rajtas ordoni al la konkursantoj repreni denove la staran pozicion.

Pli da regulaj eblecoj estas por la transiro el la stara batalo en la terbatalon. Tiaj estas ekzemple:

— se unu el la du kontraŭuloj, atinginte certan rezulton per ĵetotekniko, seninterrompe, kontinue faras “ne-waza” teknikon kun ataka intenco;

— se unu el la du falas sur la tatamon post sensukcesa ĵetotekniko, la alia havas la eblecon postsekvi lin sur la tatamon;

— se la konkursanto atingas konsiderindan rezulton per apliko de “shime-waza” (ŝime-ŭaza = jap.: strangola formo (ang.: strangola tekniko), aŭ “kansetsu-waza” (kansecu-ŭaza = jap.: artiktorda formo — ang.: brakostreĉa tekniko) en stara pozicio kaj seninterrompe daŭrigas la aktivadon en “ne-waza”-on. Dum tiu transiro li rajtas uzi nur unu el la ĵetoj permesitaj en ĵudo.

La gvida juĝisto anoncas “osaekomi”-on (= jap.: subpremado; formoj de subpremado — ang.: subpremo), kiam unu el la konkursantoj sukcesis trudi certatempan senmovecon al la kontraŭulo en la pozicio resp. preno fiksteno, alinome alfikso, japane “katame-waza” (katame-ŭaza = jap.: formoj ĉe alfikso — ang.: subpremo). En la pozicio (per la preno) fiksteno, alinome alfikso, la konkursanto premas sian kontraŭulon dorse sur la tapiŝon, klopodante, ke ties ambaŭ ŝultroj tuŝu la tapiŝon. Validas la preno ankaŭ, se nur unu ŝultro de la fikstenato tuŝas la tapiŝon, kondiĉe, ke la akso de la du ŝultroj ne dekliniĝas de la tapiŝo pli ol 90 gradojn. Esence estas, ke la fikstenata kontraŭulo ne povas esti danĝera al la fikstenato laŭ regula maniero.

30 sekunda fiksteno rezultigas “ippon”-on, 25 sekunda -”waza-ari”-on.

Kiam la senmoveco ĉesis, la gvida juĝisto anoncas “toketa”-on (= jap.: Elturnita! — ang.: ?). La tempomezura juĝisto mezuras la tempon inter “osaekomi” kaj “toketa”, kaj komunikas tiun al la gvida juĝisto.

Se la gvida juĝisto anoncas “osaekomi”-on kaj Tiel opinias, ke la konkursanto dum la posta lukto venos eventuale ekster la batalfacon, tiam li komandas “sono-mama”-on (= jap.: Restu tiel! — ang.: Ne moviĝu!). Poste, bone observinte ilian pozicion, sendas ilin en la mezon de la tapiŝo, kaj kune kun la du flankjuĝistoj li lokas ilin en la saman pozicion. Post tio li komandas: “yoshi” (joŝi = jap.: Daŭrigu! — ang.: daŭrigi la batalon post “sono-mama”).

La gvida juĝisto aljuĝas “ippon”-on, kiam liaopinie la ĵeta aŭ ataka aktivado, kiun la konkursanto aplikis, meritas “ippon”-on. Tiam la gvida juĝisto haltigas la matĉon per la komandovorto “sore-made” (= jap.: Senplue!; Fino — ang.: Haltu!; finiĝis la batalo), kaj deklaras la venkinton.

En tiu kazo, se ambaŭ konkursantoj samtempe elmeritis “ippon”-on, la gvida juĝisto anoncas egalstaton, japane “hiki-wake”-on (hiki-ŭake = jap.: Egalapartiĝo! — ang.: sendecide) kaj la konkursantoj havas la rajton komenci denove la batalon, t.e. rekomenci novan matĉon.

La gvida juĝisto anoncas “waza-ari”-on, se liaopinie la aplikata aktivado ne meritas “ippon”-on, kvankam estis valoro aktivado. Du “waza-ari”-oj valoras unu “ippon”-on.

La matĉo povas finiĝi ankaŭ per “sōgōgachi” (so:go: gaĉi = jap.: totala venko — ang.: kunmetita venko), kiam unu el la du jam ricevis “waza-ari”-on, kaj poste la kontraŭulo ricevas la punon (keikoku) (= jap.: admono — ang.: admono), aŭ inverse, se la puno venis pli frue.

Se ĝis la fino de la matĉotempo neniu el la du konkursantoj atingis “ippon”-on, je la gongosigno la gvida juĝisto haltigas la matĉon per “sore-made”, kaj la du batalantoj forlasas la tapiŝon por reiri al sia loko. Ĉi-kaze la rezulton oni difinas baze de la plenumitaj “nage-waza”-oj (nage-ŭaza = jap.: formoj de ĵetado; ĵetformoj — ang.: ĵetotekniko), “katame-waza”-oj, “shime-waza”-oj kaj “kansetsu-waza”-oj.

La gvida juĝisto anoncas “hantei”-on (= jap.: decido — ang.: decidi) per altenlevo de sia dekstra mano. Responde la helpjuĝistoj levas tableton aŭ flageton samkoloran kun la zonkoloro de tiu, kion ili opinias venkinto. Post la decido la gvida juĝisto anoncas “yusei-

gachi”-on.

Se inter la konkursantoj ne evidentiĝis teknika diferenco, tiam la vicjuĝistoj levas samtempe ambaŭ tabuletojn resp. flagetojn. Tiam la gvida juĝisto anoncas “hikiwake”-on.

En certaj okazoj la gvida juĝisto trovas necese haltigi la batalon. Tion li faras anoncante “matte”-on (= jap.: Atendu!; Momenton! ang.: Heltu! Ĉesigu la batalon!). La daŭrigo de la lukto okazas post la komandovorto “hajime”.

Tia ĉi haltigo estas ebla en la jenaj kazoj:

— kiam unu aŭ ambaŭ konkursantoj elpaŝis aŭ estas tuj elpaŝontaj el de la batalfacoj;

— kiam unu aŭ ambaŭ konkursantoj aplikas, aŭ ŝajnas, ke aplikos malpermesitan teknikon aŭ aktivadon;

— kiam unu aŭ ambaŭ konkursantoj vundiĝis aŭ malsaniĝis;

— kiam necesas, ke la konkursanto ordigu al si la vestaĵon;

— kiam en “ne-waza” estas elformiĝanta nenia konkreta aktivado, aŭ kiam la konkursantoj estas en pozicio “ashigarami” (aŝigarami = jap.: piedimplikado — ang.: piedstreĉo), el kiu nenia elvolviĝo estas ebla;

— kaj en ĉiu cetera kazo, se la gvida juĝisto tion opinias necesa.

Longa listo (ĉ. 25 reguloj) en la regularo traktas la malpermesitajn aktivadojn kaj teknikojn, kies aplikantojn la gvida juĝisto punas unu- aŭ plurfoje per disciplina puno aŭ per eskludo el la matĉo.

Jen kelkaj el tiuj malpermesitaj aktivadoj kaj teknikoj:

— apliki “dōjime”-on (do:ĵime = jap.: torsostrengado – ang.: piedkrampo) sur la trunko, kolo aŭ kapo de la kontraŭulo;

— apliki “kansetsu-waza”-on aliloke ol ĉe la kubuto;

— kiki (piedfrapi) piede aŭ genue la manon aŭ brakon de la kontraŭulo, por ke tiu rezignu la prenon;

— levi la kontraŭulon de sur la tapiŝo kun la celo reĵeti lin sur la tapiŝon;

— per unu aŭ ambaŭ manoj teni daŭre kaptita la kolumon, la alon aŭ la manikon de la ĵudojako de la kontraŭulo, aŭ lian zonan.

Tri disciplinaj punoj ekzistas: “shidō” (ŝido: jap.: gvido, gvidado — ang.: rimarkigo), “chūi” (ĉu:i =: jap.: atentigo, rimarkigo — ang.: atentigo) kaj “keikoku” (= jap.: admono – ang.: admono).

La gvida juĝisto donas la punon “shidō” al tiu konkursanto, kiu liaopinie intencas kulpi unu el la listigitaj malpermesoj, aŭ jam kulpis ĝin etgrade. “Shido”-n li anoncas dum la lukto, loke de la kulpita misago.

La punon “chūi” ricevas tiu konkursanto, kiu ripetite kulpas etgrade aŭ unufoje mezgrade unu el la listigitaj malpermesoj. Kaze de elmeritata “chūi” la gvida juĝisto interrompas la batalon, al la konkursantoj li ordonas repreni la staran pozicion, en kiu ili komencis la batalon, kaj laŭte anoncante “chūi”-on li mane surmontras la kulpinton.

Kiam unu el du ĵudantoj ricevis “chūi”-on, tiam la alian devas konsideri tia, kiu atingis “waza-ari-nichikai-waza”-on.

“Keikoku”-on ricevas tiu konkursanto, kiu ripetite kulpas mezgrade aŭ unufoje kulpas konsiderinde unu el la listigitaj malpermesoj. Kaze de punado per “keikoku” la gvida juĝisto same ordonas al la du batalantoj repreni la komencan staran pozicion, tie li surgenuigas ilin kaj mane surmontras la kulpinton, laŭte anoncante “keikoku”-on.

Kiam unu el la du konkursantoj ricevis “keikoku”-on, tiam la kontraŭulo estas rigardenda atinginto de rezultato “waza-ari”.

La poenton “ippon” oni devas aljuĝi,

— kiam la konkursanto — ĉu proprainciate, ĉu dum la parato de la kontraŭula ataka tekniko — aplikas “nage-waza”-on, t.e. ĵetas la kontraŭulon sur lian dorson kun granda svingo,

plenumante la ĵeton laŭ unu el la diversaj regulaj teknikoj;

— kiam la kontraŭulo diras “maitta”-on (= jap.: Venkita! — ang.: mi kapitulacas), aŭ ekbatas leĝere mane aŭ piede du aŭ pli da fojoj la korpon de la kontraŭulo aŭ la tapiŝon (kio signifas same rezignon pri la plua batalo);

— kiam la konkursanto sukcese aplikas “katame-waza”-on kaj igas sian kontraŭulon senmova dum 30 sekundoj;

— kiam la rezulto de iu “shime-waza” aŭ kansetsu-waza” estas bone konstatebla.

“Waza—ari” estas aljuĝenda,

— kiam unu el la konkursantoj faras “nage-waza”-on, sed kiu ne plene meritas “ippon”-on;

— kiam unu el la konkursantoj igas sian kontraŭulon senmova almenaŭ dum 25, sed malpli longe ol 30 sekundoj.

Post la supra, nekompleta konigo de la plej esencaj elementoj kaj reguloj de la batalo inter du konkursantaj ĵudistoj, jen fine la listo de la plej ofte aplikataj ĵudoĵetoj:

— “ōgoshi” (o: goŝi = jap.: perkoksa alpendigo — ang.: granda koksoĵeto),

— “uchi mata” (uĉi mata — jap.: interfemura krurenŝovo – ang.: interna femurĵeto),

— “harai-goshi” (harai-goŝi = jap.: krurforskua perkoksa ĵeto — ang.: falĉomova koksoĵeto),

— “tai-otoshi” (tai-otoŝi = jap.: korpa faligo — ang.: apogata ganĉoĵeto),

— “ō-soto-gari” (o:-soto-gari = jap.: kontraŭgamba alpendigo — ang.: dorsa ganĉoĵeto), (menciindas, ke “ganĉi” estas nova vorto, t.e. neologismo por la koncepto “stumbligi”, kiun aktivadon oni aplikas kaj en ĵudo, kaj en la liberstila lukto)

— “seoi-nage” (= jep.: transŝultra ĵeto — ang.: subbrak-apoga ŝultroĵeto),

— “makikomi” (= jap.: ĉirkaŭtordo — ang.: brakotiro kun sinĵeto),

— “tomoe-nage” (= jap.: kirloĵeto — ang.: ĵeto trans la kapon),

— “kata-guruma” (= jap.: surŝultrigo — ang.: leva ŝultro-ĵeto),

— “ko-uchi-gari” (ko-uĉi-gari = jap.: alpendiga piedfor-skuo de internaflanke — angl.: malgranda interna hoko),

— “ō-uchi-gari” (o:-uĉi-gari = jap.: alpendigo per inter-femura gambentruo — ang.: granda interna hoko),

— “deashi-barai” (deaŝi-barai = jap.: forskuo al elpaŝa piedo — ang.: maleolkapta flankenĵeto).

Krom la estraro (prezidanto, vicprezidanto, konkursaj sekretarioj) la konkursa juĝistaro konsistas el gvidaj juĝistoj, help- aŭ flankjuĝistoj, tempomezuraj juĝistoj, informdonaj juĝistoj, juĝistoj disponitaj al la konkursantoj, fine el la konkursa kuracisto kaj el la konkursa aranĝistaro.

La *gvida juĝisto* antaŭ la konkurso kontrolas la scenejon de la konkurso, nome la regulan lokigon kaj mezurojn de la ĵudotapiŝo kaj ŝirmotapiŝo. Dum la matĉo li restadas ene de la batalfaco, laŭ la antaŭskriboj de la konkursa regularo li gvidas la batalon kaj estas plene respondeca pri ties glata disvolvo. Dum la gvido li uzas japanlingvajn komandovortojn, anoncas kaj prijuĝas aktivadojn, aŭ punas malpermesitajn agojn, aplikante same la koncernajn japanajn esprimojn. Helpe de la du helpjuĝistoj li difinas la rezulton de la matĉo. La rezulton de la batalo ili difinas baze de la plenumitaj teknikoj “nage-waza”, “katame-waza”, “shime-waza” kaj “kansetsu-waza”.

En la internaciaj konkursoj la gvida juĝisto portas uniforman vestaĵon, nome malhelbluan jakon, grizan pantalonon kaj blankan ĉemizon kun kravato. La batalfacon li rajtas suriri nur en ŝtrumpoj aŭ en maldikaj gimnastaj pantofloj.

Dum la matĉo la laboron de la gvida juĝisto helpas du *helpjuĝistoj*, nomataj ankaŭ *flankjuĝistoj*. Ili sidas ĉe du diagonalaj anguloj de la batalfaco, ene de la sekurfaco. Se necese, ili povas formovi sin de tiu loko, kunportante sian seĝon.

Baze de la konkursa regularo ili helpas al la gvida juĝisto pritaksi la konkursrezultojn, precipe kiam neniu el la konkursantoj atingis poenton “ippon” aŭ “awazate-ippon” ĝis la fino de la matĉotempo. Kaze de venko kun teknika supervaloro (“jusei-gachi”) ili indikas la venkinton levmontrante la tabuleton aŭ flageton samkoloran kun ties zonkoloro. Kaze de egalstato (“hiki-wake”) ili levas ambaŭ tabuletojn (flagetojn). Kiam ili ne samopinias kun la gvida juĝisto pri la aljuĝo aŭ nealjuĝo de unu poento (“ippon”) aŭ duonpoento (“waza-ari”), ili ekstaras, kaj komunikas sian opinion al la gvida juĝisto, kiu konsultinte kun ili, aliĝas al ilia komuna opinio. Dum tio la batalo paŭzas.

La helpjuĝistoj surhavas la saman uniforman vestaĵon, kian la gvida juĝisto.

La *tempomezura juĝisto* havas sian lokon ĉe la tablo de la konkursa juĝistaro. Antaŭ li staras la ĵudhorloĝo, la gongo kaj la stophorloĝo. Je la komandovorto “hajime!” de la gvida juĝisto li ŝaltas (ekfunkciigas) la ĵudhorloĝon kaj per la gongo li signas la komencon de la matĉo. Je la fino de la matĉotempo li donas denove gongosignon, je kio la gvida juĝisto ĉesigas la batalon.

Okaze de interrompo de la matĉo — je la signo de la gvida juĝisto — li haltigas (elŝaltas) la ĵudhorloĝon kaj per la stophorloĝo mezuras la tn. indulgotempon (ekz. pro negrava vundiĝo de iu konkursanto) respektive la tn. mortan tempon (ekz. okaze de la disciplinaj punoj “chui” aŭ “keikoku”, kiam la batalo estas interrompita kaj la konkursantoj devas iri en la mezon de la batalfaco). La efektivan luktotempon donas la daŭro de la matĉotempo, plus la eventualaj kromtempoj: indulgotempo aŭ morta tempo.

Se la gvida juĝisto anoncas fikstemon (“katane-waza”), li ŝaltas la stophorloĝon, kaj mezuras la daŭron de la fiksteno. La finon de la antaŭskribita fikstentempo (30 sek.) li sciigas per gongobato. Se la fiksteno ĉesas pli frue ol la antaŭskribita tempo, li haltigas la stophorloĝon kaj laŭte diras la daŭron (ekz.: “la fiksteno daŭris 17 sekundojn”).

La taskojn de la ceteraj funkciuloj same antaŭskribas la konkursa regularo.

El la konkursa trupo oni elektas unu aŭ du *trupestrojn*, kies tasko estas zorgi pri ordo kaj disciplino en la trupo, krome reprezenti la trupon antaŭ la konkursa juĝistaro, se ili plenumas samtempe ankaŭ la taskon de la trupgvidanto.

La *trejnisto* akompanas sian trupon al la konkurso. Tie li havas asignitan lokon apud la tapiŝo. Li havas la rajton doni konsilojn kaj instrukciojn al la konkursantoj. Li decidas la grupigon de la konkursantoj laŭ pezkategorioj, la kunmeton de la teamo(j) kaj li elektas la rezervulojn.

Ĉiu sportunuiĝo aŭ nacia federacio deziĝas unu *trupgvidanton* por la konkursa trupo. Lia devo estas interalie zorgi pri la vojaĝo, loĝigo ktp. de la trupo. Li respondecas, ke la konkursantoj ĝustatempe alvenu al la loko de la konkurso kaj estas lia tasko transdoni la nomliston de la konkursantoj al la konkursa juĝistaro.

La internacia federacio de la sportbranĉo ĵudo estas: International Judo Federation (IJF).
Esp-e: Internacia Ĵudista Federacio.

Antaŭ la konkurso la konkursanto trairas kuracistan ekzamenon kaj poste oficialan peson. Rezulte de la peso oni indikas la pezkategorion, al kiu la pesita konkursanto apartenas. La ĵudisto rajtas konkursi en sia pezkategorio, aŭ en iu ajn pli alta pezkategorio. La plenkreskaj viraj ĵudistoj havas la sekvantajn pezkategoriojn:

	korpopezo en kilogramoj	
	super	inkluzive ĝis
1. Pezkategorio 63 (pezkategorio sesdek tri)		63
2. Pezkategorio 70	63	70
3. Pezkategorio 80	70	80
4. Pezkategorio 93	80	93
5. Pezkategorio super 93 (pk. super naŭdek tri)	93	

La pezkategorioj de la virinaj ĵudistoj:

	korpopezo en kilogramoj	
	super	inkluzive ĝis
1. Pezkategorio 53	-	58
2. Pezkategorio 65	58	65
3. Pezkategorio 75	65	75
4. Pezkategorio 85	75	85
5. Pezkategorio super 65	85	-

Krom en unu el la supraj pezkategorioj la viraj ĵudistoj estas envicigitaj ankaŭ en tiu kvalifajn kategoriojn. Ĉiu kvalifan kategorion, alinome gradon la ĵudisto povas atingi sendepende de siaj konkursrezultoj, ekskluzive nur baze de sia teknika scio, demonstrita kaj rekonita en ĉiam pli novaj kaj pli altgradaj sukcesaj ekzamenoj. Ĉiu metita ekzameno rajtigas lin porti sur la ĵudovesto tiakoloran ĵudozonon, kiu estas la koloro ĉe la atingita grado (kvalifa kategorio).

Ekzistas 15 gradoj, el kiuj 5 gradoj estas por lernantoj, nomataj *kjuoj* (termino Esperantigita el “kyū” [kju: = jap.: klaso]), kaj 10 gradoj estas por la majstroj, nomataj *daneoj* (termino Esp-igita el “dan” [= jap.: grado]).

Ĉiu konkursanto, trejnisto kaj konkursa juĝisto devas meti certan, por li devigan minimuman teknikan (zonakiran) ekzamenon. (Ekz.: la plej alteklasaj, t.e. la landaj konkursaj juĝistoj devas havi minimume la gradon daneo 1. [unuagrada daneo].)

La zonkoloro de la komencantoj estas blanka.

La kjuo-gradoj estas la sekvantaj (kun inversa numerigo, t.e. la pli altaj gradoj havas pli malgrandan numervaloron):

Kjuo 5. (kvinagrada kjuo) = citronflava zono

Kjuo 4. — oranĝflava zono

Kjuo 3. = verda zono

Kjuo 2. = blua zono

Kjuo 1. = bruna zono

La daneo-gradoj estas la sekvantaj:

Daneo 1. (“Shō-dan” = ŝo:-dan) = nigra zono

Daneo 2. (“Ni-dan”) = nigra zono

Daneo 3. (“San-dan”) = nigra zono

Daneo 4. (“Yō-dan” = jo:-dan) = nigra zono

Daneo 5. (“Gō-dan” = go:-dan) = nigra zono

Daneo 6. (“Roku-den”) = ruĝa-blanka zono

Daneo 7. (“Hichi-dan” = hiĉi-dan) = ruĝa-blanka zono

Daneo 8. (“Hachi-dan” = haĉi-dan) = ruĝa-blanka zono

Daneo 9. (“Ku-dan”) = ruĝa zono

Daneo 10. (“Ju-dan” = ju-dan) = ruĝa zono

Koncerne la tipon ĉe la konkursoj en la sportobranĉo ĵudo estas aranĝeblaj principe

a) konkursoj laŭ pezkategorioj (aparte por viroj kaj virinoj);

b) konkursoj laŭ kvalifaj kategorioj, nome laŭ gradoj (nur por viroj);

c) konkursoj sen kategorioj, alinome absolutaj ĵudkonkursoj, en kiuj ĉiu konkursanto povas batali kontraŭ iu ajn alia konkursanto, senkonsidere de pezkategorio aŭ grado (nur por viroj).

Praktike ĉiam pli dominas la konkursoj laŭ pezkategorioj. Por doni al tiuj konkursoj pli altvaloran teknikan nivelon, en la konkursproklamo oni kutimas antaŭskribi por la partoprenontaj konkursantoj certan pli altvaloran gradon (ekz. kjuo 1. aŭ daneo 1.), kiel postulatan minimuman gradon.

Koncerne la *karakteron*, la internaciaj ĵudkonkursoj povas esti individuaj, teamaj kaj

individuj-teamaj. Teamo konsistas ĝenerale el 5 membroj, nome po unu el ĉiu pezkategorio.

Koncerne la *sistemon*, la internaciaj ĵudkonkursoj estas aranĝataj ĝenerale laŭ rekte elimina sistemo, kvankam la regularo mencias kiel aplikeblajn, ankaŭ la nerekte eliminan, la rondbatalan kaj la miksan sistemojn.

Koncerne la *specon*, la internaciaj konkursoj povas esti

a) Ordinara internaciaj konkursoj (alinome plurnaciaj konkursoj);

b) Pli altgradaj internaciaj konkursoj (alinome konkursoj inter nacioj). Al tiuj lastaj apartenas kompreneble la kontinent- kaj mondĉampionadoj de ĵudo kaj la olimpikaj ĵudĉampionadoj.

Esprimoj:

Eŭropo-ĉampiono de ĵudo en la pezkategorio 75 (la pezkategorio indikas, ĉu temas pri vira aŭ virina ĉampiono!); virina ĵudkonkurso; (vira) ĵudkonkurso de la 80-kilogramuloj; (virina) ĵudkonkurso de la 58-kilogramuloj; olimpika ĉampionino de ĵudo aŭ olimpika judĉampionino en la pezkategorio super 85; — alternativoj: a) ĉampiona (unualoke klasita) teamo de la vira (virina) Eŭropo-ĉampionado (mondĉampionado, olimpika ĉampionado) de ĵudo; b) vira (virina) Eŭropo-ĉampiona (mondĉampiona, olimpikoĉampiona) ĵudoteamo.

KAJAKADO-KANUADO

Kaj la kajakado kaj la kanuado apartenas al la familio de la remosporto, tamen la diverĝa formo de la uzataj boatoj, sed ankoraŭ pli la aplikata speciala remomaniero — nome la remo vizaĝe al la veturdirekto kaj la uzo de remiloj nefiksitaj al la rando de la boato kaj fine la eksterordinare malfacilaj konkurskondiĉoj, ofte eĉ vivdanĝero ĉe iuj subbranĉoj de tiu sportobranĉo (konkurso sur torenta, rokoplana montrivero) — motivas, ke la kajakado-kanuado estas memstara sportobranĉo, kun aparta regularo kaj propra mondfederacio.

La mondfederacio de la sportobranĉo kajakado-kanuado estas: International Canoe Federation (ICF). Esp-e: Internacia Kanuista Federacio.

La sportobranĉo kajakado-kanuado havas kvar subbranĉojn:

- A) Trankvilakva kajakado-kanuado
- B) Sovaĝakva kajakado-kanuado
- C) Sovaĝakva kajak-kanu-slalomo
- C) Velkajakado

A) Trankvilakva kajakado-kanuado

La trankvilakva kajak- kaj kanukonkursoj disvolviĝas sur almenaŭ 3 m-ojn profunda stagna (laga) aŭ rivera akvo, sur 500-, 1000- kaj 10 000-metraĵ (mallong-, mez- kaj longdistancaĵ) remvegoj, mallonge vegoj, signitaj per bone videblaj buoj flagumitaj kaj tabuloj.

La vego inkluzivas la akvosekcion de la respektiva longo, la startejon kaj la celon. Ĉe la startejo oni devas disponigi almenaŭ 9 m-ojn larĝan remolenon por ĉiu partoprenanta boato, alinome formacio, kiu lasta esprimo inkluzivas la boaton kun la remantoj en ĝi.

La vego povas esti a) buokoridora vego, kie la remlenoj, alivorte koridoroj — aparte por ĉiu formacio — estas signitaj per buoj; b) senkoridora vego, kie la konkursantoj mem devas atenti, ke ili ne forlasu sian lenon aparte ne signitan.

La mallong- kaj mezdistancaĵ vegoj estas rektaj, ne havas turneojn. La longdistancaĵ vegoj estas aŭ rektaj, aŭ povas havi turneojn, minimume 1000 m-ojn distance unu de la alia, disde la startejo kaj disde la celo. En mondĉampionadoj kaj olimpikoj la distanco inter la turneoj estas minimume 2000 m-oj, same inter la startejo kaj la unua turnejo. La minimuma radiuso de la turneoj estas 50 m-oj. Krome la vego povas esti ankaŭ rondvego, respondanta al la antaŭskriboj de la regularo. La terneojn signas 4 surbuaj flagoj diagonale duone ruĝaj, duone flavaj.

Minimume 10 m-ojn larĝa trapasa akvostrio inter la vego kaj la bordo certigas, ke la konkursantoj — sen ĝeni la disvolviĝantajn kurumojn, nek la posteniĝantajn formaciojn antaŭ la startejo — povu libere pasadi de la boatdeponejo al la antaŭstartejo aŭ al la muskolvarmigejo, resp. de la celo al la boatdeponejo.

Malantaŭ la startejo konvene granda akvospaco, nomata antaŭstartejo, donas eblecon, ke la antaŭstartigisto ordigu laŭ startnumeroj la startontojn de la sekva kurumo. (Kurumo estas ero de la konkurso, nome unufoja vetremo de certa nombro da formacioj tra difinita distanco, de la startejo ĝis la celo, kun taksataj rezultoj.)

Ne malproksime de la busignita vego aparta akvospaco estas je la dispono de la konkursantoj, por fari muskolvarmigadon antaŭ la kurumo.

Estas necese zorgi krome pri loko por la antaŭstartigisto kaj startigisto, kie ili neĝenate povas plenumi sian taskon, pri loko por la celjuĝistaro (proksime de la celo, sur la bordo aŭ sur flosaĵo) kaj por la konkursa juĝistaro (ne pli ol 300 m-ojn distance, en subtegmenta ejo), pri deponejo por la konkursa boatoj (laŭ nacioj grupigitaj) kaj pri enboatiĝa flosaĵo apudborda, kie la konkursantoj eniras la boatojn antaŭ la kurumo kaj eliras ilin post la kurumo. Ĉe la startejo po unu ankrita flosaĵo aŭ pontono troviĝas en ĉiu startloko, kie la startontaj boatoj estas firmitenataj

fare de helpantoj ĝis la momento de la starto.

Ambaŭflanke rande de la veĝo po unu ruĝa flago indikas la ekstrecojn de la startlinio kaj cellinio.

Krom la *konkursprezidanto*, kiu decidas en aferoj, pri kiuj la regularo ne instrucas, kaj krom la *konkursintendanto*, kiu respondecas pri la bone organizita, laŭprograma, senprokrasta disvolviĝo de la konkurso, ktp., la plej gravaj membroj de la konkursa juĝistaro estas la sekvantaj.

a) La *ĵurio*. En la olimpikaj ĉampionadoj kaj mondĉampionadoj ĝi konsistas el 5 membroj nomitaj fare de la kontoro de la mondfederacio de la sportobranĉo kaj 2 membroj nomitaj fare de la aranĝanta nacia federacio. La prezidanto de la ĵuri estas la konkursprezidanto mem. La ĵurio estas la plej supera forumo de la konkurso. Se konkursanto aŭ iu el la partoprenantaj nacioj levas proteston pro ajna kaŭzo, en la afero unue decidas la konkursa juĝistaro. Se la decido ne kontentigas la protestanton, li rajtas apeli el la ĵurio, kies decido estas jam definitiva. (Ĉe aliaj sportobranĉoj oni nomas ĝin apelkomitato.)

b) La *startigisto* — konforme al la konkursreguloj — startigas la kurumojn per startpisto. Li devas esti en konstanta kontakto kun la funkciuloj ĉe la celo. Antaŭ la starto li kontrolas la regulan, laŭstartnumeran vicordon de la formacioj kaj ke la boatoj staru en rekta linio. Se la starto okazis neregule, li revokas la ensemblon kaj ripetigas la starton.

c) En distanco de 40-50 m-oj en stagna akvo, resp. 200-240 m-oj en rivera akvo la *antaŭstartigisto* ordigas la partoprenontojn de la sekvonta kurumo. Li kontrolas la startnumerojn kaj la boatklasojn (unupersona, dupersona ktp. boatoj), listigas la ĉeestantajn formaciojn. La pretan ensemblon li startigas ĉe la tn. antaŭstartlinio, kaj per tio li transdonas ĝin al la startigisto.

ĉ) La *vegjuĝisto* postsekvas la ensemblon en motorboato, kaj atentis dum la tuta kurumo, ke la konkursantoj ne kulpu kontraŭ la konkursreguloj. Okaze de kulpita malregulaĵo post la finita kurumo li levmontras ruĝan flagon. Se tiu ne okazis, li levmontras blankan flagon.

Ĉe longdistanca kurumo pli da vegjuĝistoj postsekvas la ensemblon, unu el ili postsekvas — sen ĝeni la ceterajn — la avanan svarmon, t.e. la grupon de la plej antaŭaj formacioj.

d) La vegjuĝiston akompanas *notisto* kaj notas liajn rimarkojn.

e) Po unu turnojuĝisto havas lokon ĉe ĉiu turnejo, se la konkurso disvolviĝas sur unu- aŭ plurturneja veĝo, kaj atentis, ĉu la formacioj regule turnas sin ĉe la turnejo. Ankaŭ la turnojuĝiston akompanas notisto, notas liajn rimarkojn kaj la preterremantajn formaciojn.

f) Ĉe stafetaj konkursoj la turnojuĝisto funkcias kiel stafetjuĝisto apud la startjuĝisto kaj kontrolas la regulan ŝanĝon.

g) La *celjuĝistaro* konsistas el la gvida *celjuĝisto* kaj du *celjuĝistoj*. Havante sian lokon sur la celaltano, resp. en la celturo, ili havas la taskon precize difini la vicordon de la alceliĝintoj. Kiel helpilon ili havas specialan celrigardon, sed en pli gravaj konkursoj unuavice celfotilon.

ĝ) La *tempomezuristoj* restadas ĉe la celo kaj mezuras la temporezulton de la kurumoj per speciala tempomezura instrumento konsistanta el 6-8 stophorloĝoj. Je la flagosigno aŭ pistolfumo, — ĉe longdistancaj disciplinoj je radiosigno, — ili ekfunkciigas la instrumenton kaj poste transdonas ĝin kun la tempomezura listo de la kurumo al alia tempomezuristo, kiu sidas sur la celaltano, resp. en kelkaj konkursoj en la celturo, kaj laŭ la ricevitaj signoj haltigas unu post la alia la koncernajn horloĝojn.

h) Ceteraj funkciuloj estas la lotuma grupo, la *kvalifika juĝisto*, la *pesisto*, la *teknika juĝisto* kaj la *informisto*.

La vicordon de la boatoj ĉe la startejoj oni determinas per loto. Laŭ tio ĉiu boato ricevas sian startnumeron, kiun la konkursantoj devas aliksi bone videbla al la flanko de la boato. La unuanumera boato havas sian startlokon plej maldekstre, apud ĝi la dua, la tria ktp. la boatoj okupas sian lokon ĉe la startejoj en rekta linio kun la pruo. Antaŭ la starto la startisto — helpe

de laŭparolilo — atentigas (se ne estis antaŭe alie interkonsentite) en angla lingvo: “Are you ready” (prete!) kaj post 3 sekundoj li startigas la kurumon per pialpafo akompanata per la vorto “go!” (ek!). Se iu boato startas antaŭ la pafo, la startisto revokas la ensemblon kaj la starto estas ripetenda per nova pafo. Ĝis la celo la formacioj devas resti en sia remleno. Se iu formacio la trian fojon eliras pli ol 2 m-ojn el sia leno, ĝi estos eskludata el la kurumo. Ĉe konkursdistancoj ĝis 1000 m-oj estas malpermesite proksimiĝi en ajna direkto pli ol 5 m-ojn al alia boato. Ĉe pli granda konkursdistanco ol 1000 m-oj estas permesite veni en la proksimecon de alia boato, kondiĉe ke en la remo ili ne perturbas unu la alian, sed atinginte la lastan 1000 m-ojn — pri kio oni atentigas ĉiun formacion per aŭdebla signo (sonorilo) — la konkursantoj devas sekvi la regulon validan ĉe 1000-metra distanco. Se la lenon signas buovico, t.e. se la formacio remas en buokoridoro, la boato devas pasi meze de la leno.

Ĉe turnejoj la boato devas turniĝi kontraŭdirekte al la horloĝmontrilo, precize sekvante la vojon signitan per la buo en la turnopunkto. La konkursantaj formacioj havas la rajton antaŭ alian boaton, kaj tiu lasta ne rajtas malhelpi tion. La boato atingis la celon, se ĝia pruo atingis la cellinion kaj ĝi trapasis inter la celflagoj.

Ĉe stafeta disciplino la unuaj kajakoj de la konkursantaj teamoj devas pesi samdirekte, unu apud la alia, ĉiu en sia leno. La duaj kajakoj revenas kontraŭdirekte, ktp. la reciproke sin ŝanĝantaj kajakoj de la sama teamo devas preterpasi unu la alian ĉiam maldekstramane unu de la alia. Ĉe la ŝanĝo la startigon de la unuopaj kajakoj faras startisto, kriante la numeron aŭ nomon de la teamo, kiam la alvenanta samteamo boato atingis la cellinion. La regulan ŝanĝon kontrolas la ŝanĝjuĝisto alinome stafetjuĝisto.

En la konkursoj de kajakado-kanuado oni uzas du tipojn de boato, nome kajakojn kaj kanuojn. En la kajako la remistoj remas per dupadela pagajo kaj en la kanuo per unupadela pagajo. Ne estas permesite fiksi aŭ apogi la pagajon al la rando de la boato. Kaj la kajako kaj la kanuo havas pli da klasoj, nome; unu-, du- kaj kvarpersona kajako, unu-, du- kaj sespersona kanuo.

La materialo, el kiu oni konstruas la boatojn, ne estas difinita, sed koncerne la formon de la boatoj, la stirilo kaj la pagajoj, kiel ankaŭ koncerne la minimumajn aŭ maksimumajn mezurojn ekzistas certaj limigoj kaj normoj.

Antaŭ ĉiu kurumo la boatoj devas esti pesataj. Antaŭ pesado ĉiu nealfiksita akcesoraĵo devas esti apartigita. La kvar avanajn boatojn de la finalo kaj ĉiujn plupasantajn boatojn de la antaŭfinaloj oni pesas ankaŭ post la kurumo.

Laŭ karaktero la konkursoj estas individuaj krom tiuj stafetaj, kiuj kompreneble estas teamaj. Kelkfoje ankaŭ la suma rezulto de la nacia trupo estas taksata.

Koncerne la specojn de la konkursoj estas rimarkinde, ke ekde 1971 oni ne plu aranĝos kontinent-ĉampionadojn.

En ĉiu disciplino ĉe la mondĉampionado kaj olimpikoj rajtas partopreni nur po unu formacio el ĉiu nacio. La partopreno en la ceteraj internaciaj konkursoj ne estas limigita, respektive dependas de la konkursproklamo. Ĉiu konkursanto rajtas partopreni — kaj en la konkursoj kaj en la ĉampionadoj — en laŭplaĉa nombro da disciplinoj.

La internaciaj konkursoj disvolviĝas laŭ rekte elimina sistemo. Al la disvolvo de iu kurumo necesas la partopreno de minimume tri formacioj, sed ilia nombro en neniu kurumo, do nek en la antaŭfinaloj, nek en la finalo povas superi la nombron 9, respektive en la stafeta disciplino la nombron 6. Se en la mallonga kaj meza distancoj la nombro ĉe la anoncoj superas tiujn nombrojn, la konkurso disvolviĝas — depende de la nombro, de la partoprenantoj (anoncitoj) — en du, tri (se necese, pli da) etapoj, tiamaniere organizite, ke el la du, maks. tri duonfinalaj kurumoj venu 2x4 resp. 3x3 avanaj formacioj (en la stafeta disciplino 2x3 aŭ. 3x2 formacioj) en la finalan kurumon. La olimpikaj disciplinoj malsamas nur en tio, ke por ĉiu konkursanta formacio, kiu ne elbatalis avanan klasigon en la unua etapo, estas donita ankoraŭ unu ŝanco en

la tn. esperkurumoj, el kiuj po 3 avenaj klasitoj (ĉe stafeto po 2) same eniras la duonfinalon.

En la longdistancaj disciplinoj ne estas antaŭkurumoj, t.e. antaŭfinalaj kurumoj, sed ĉiu partoprenanta formacio devas starti en la sama — finala — kurumo. Se la veglarĝo tion ne ebligas, estas permesita unuopa startigo kun regulaj intertempoj.

Estas grava regulo de la kajak-kanu-konkursoj — en kelkaj aliaj sportobranĉoj ne aplikata — ke la temporezultoj atingitaj en la antaŭfinalaj kurumoj tute ne influas, ke kiu formacio venas en la sekvan etapon. Tion determinas ĉiam la klasigo laŭ alvena vicordo, nome, kiu estis la unua, dua ktp. en la kurumo.

La sportobranĉo kajakado-kanuado — kiel jam la nomo mem indikas — konsistas el du subbranĉoj, nome el kajakado kaj el kanuado. La disciplinoj de tiuj ĉi du boatotipoj, respektive iliaj kurumoj estas disvolvataj kadre de la sama konkurso aŭ ĉampionado, en la sama loko kaj tempo, miksite alterne unu post la alia, laŭ antaŭskribita vicordo.

a) Kajakado (por viroj kaj virinoj)

Sidante en boato nomata kajako, vizaĝe al la veturdirekto, solope, duope aŭ kvarope unu post la alia, la kajakistoj remas per sia dupadela pagajo, alterne jen triborde, jen baborde, ĉiuj samritme kaj samflanke kun la ceteraj samboatanoj, kaj per komuna fortostreĉo ili klopodas atingi la celon dum kiel eble plej mallonga tempo.

Disciplinoj en la internaciaj konkursoj kaj mondĉampionadoj: (La olimpikaj disciplinoj estas aparte indikitaj ĉe la koncernaj disciplinoj.)

Mallongdistancaj disciplinoj (por viroj kaj virinoj):

1. *500-metra vira solopa kajakado*

Mallonge: K-1 500 m vira (prononcu: ko unu per kvincent metroj, vira)

Nomo de la formacio: vira kajaksolopo

2. *500-metra virina solopa kajakado (ankaŭ en olimpikoj)* Mallonge: K-1 500 m virina

Formacio: virina kajaksolopo

3. *500-metra vira duopa kajakado (ankaŭ en olimpikoj)*

Mallongigite: K-2 500 m vira

Formacio: vira kajakduopo

4. *500-metra virina duopa kajakado*

Mallongigite: K-2 500 m virina

Formacio: virina kajakduopo

5. *500-metra kvaropa kajakado (nur por virinoj)*

Mallonge: K-4 500 m

Formacio: kajakkvaropo

6. *4x500-metra stafeta solopa kajakado (nur por viraj naciaj elektitaj teamoj)* Mallonge: K-1 4x500 m (prononcu: ko unu per kvaroble kvincent metroj)

Mezdistancaj disciplinoj: (nur por viroj)

7. *1000-metra solopa kajakado (ankaŭ en olimpikoj)* Mallonge: K-1 1000 m

8. *1000-metra duopa kajakado (ankaŭ en olimpikoj)*

Mallonge: K-2 1000 m 9. *1000-metra kvaropa kajakado (ankaŭ en olimpikoj)*

Mallonge: K-4 1000 m

Longdistancaj disciplinoj (nur por viroj)

10. *10 000-metra solopa kajakado*

Mallonge: K-1 10 000 m

11. *10 000-metra duopa kajakado*

Mallonge: K-2 10 000 m

12. *10 000-metra kvaropa kajakado*

Mallonge: K-4 10 000 m

Esprilmoj:

Kajakkonkursoj, aŭ konkursoj ĉe kajakado; konkurso de 10 000-metra solopa kajakado, aŭ 10 000-metra solopa kajakkonkurso, aŭ 10 000—metra konkurso de la kajaksolopoj; mondĉampiona formacio de la 500-metra virina duopa kajakado, aŭ mondĉampiona formacio de la virinaj kajakduopoj en 500 m-oj (subkomprenate: en distanco de 500 m-oj); Eŭropoĉampiona teamo de la 4x500-metra stafeto de kajaksolopoj; olimpikoĉampiona formacio de la 1000-metra kvaropa kajakado, aŭ olimpikoĉampiona formacio de la kajakkvaropoj en 1000 m-oj. La kajakisto, la kajakkonkursanto kajakas.

b) Kanuado (nur por viroj)

En boato nomata kanuo, genuante sur unu genuo, vizaĝe al la veturdirekto, solope aŭ duope unu post la alia, la kanuistoj remas per sia unupadela pagajo konstante triborde aŭ baborde, ĉe la duopo unu malsamflanke ol la alia, kaj per (komuna) fortostreĉo ili klopodas atingi la celon dum kiel eble plej mallonga tempo.

Disciplinoj en la internaciaj konkursoj kaj mondĉampionadoj: (La olimpikaj disciplinoj estas aparte indikitaj ĉe la koncernaj disciplinoj.)

Mezdistancaj disciplinoj:

1. *1000-metra solopa kanuado* (ankaŭ en olimpikoj)

Mallonge: C-1 1000 m (prononcu: co unu per mil metroj)

Formacio: kanusolopo

2. *1000-metra duopa kanuado* (ankaŭ en olimpikoj)

Mallonge: C-2 1000 m

Formacio: kanuduopo Longdistancaj disciplinoj:

3. *10 000-metra solopa kanuado*

Mallonge: C-1 10 000 m

4. *10 000-metra duopa kanuado*

Mallonge: C-2 10 000 m

Esprimoj:

Kanukonkursoj aŭ konkursoj de kanuado; konkurso de 10 000-metra solopa kanuado, aŭ 10 000-metra solopa kanukonkurso, aŭ 10 000-metra konkurso de la kanusolopoj; mondĉampiona formacio de la 1000-metra duopa kanuado, aŭ mondĉampiona formacio de la kanuduopoj en 1000 m-oj (subkomprenate: en distanco de 1000 m-oj); la kanuisto, la kanukonkursanto kanuas.

B) Sovaĝakva kajakado-kanuado

(por viroj kaj virinoj)

La disciplinoj de tiu ĉi subbranĉo disvolviĝas sur rapidfluaĵoj, jen torentaj, jen kaskadaj, rokoplenaj, sovaĝaj montriveroj, kie la sekura direktado de la boato — inter ofte vivdanĝeraj situacioj — postulas altagradan lerton, memcertecon kaj kuraĝon.

Por disvolvi la konkursojn oni elektas 10-15 km-ojn longan riversekcion, kie la flurapideco estas almenaŭ 20 km-oj per horo, konsekvence la daŭro de la kurumoj estas ĉ. 40-50 minutoj.

La riveroj estas klasigitaj en 6 gradojn de rapideco. La grado 6 estas la plej rapida. La internaciaj konkursoj disvolviĝas ĝenerale sur riveroj de 4-6 rapidecgradoj, la olimpikaj konkursoj kaj la mondĉampionadoj sur riversekcioj de 5-6 rapidecgradoj. Ĝuste pro tio ĉi en tiuj du plej gravaj ĉampionadoj jam estas deviga ankaŭ la uzo de savoveŝto kaj ŝirmkasko. Pro la granda danĝero pri boatrompiĝo, en la du sovaĝakvaj subbranĉoj estas uzebraj nur plastoboatoj. (Eĉ tiuj ofte rompiĝas.)

Disciplinoj:

3. *Sovaĝakva vira solopa kajakado*

2. *Sovaĝakva virina solopa kajakado*

3. *Sovaĝakva solopa kanuado* (nur por viroj)
4. *Sovaĝakva vira duopa kanuado*
5. *Sovaĝakva gea duopa kanuado* (en olimpikoj mankas)

En la disciplinoj de la mondĉampionado oni aparte taksas kaj premias ankaŭ la teamojn (konsistantajn el 3 formacioj) de la partoprenantaj nacioj, surbaze de la individuaj rezultoj de iliaj formacioj.

C) Sovaĝakva kajak-kanu-slalomo

La disciplinoj de ankaŭ la subbranĉo kajak-kanu-slalomo disvolviĝas sur sovaĝaj montriveroj, inter la samaj danĝeraj cirkonstancoj, kiel tiuj de la sovaĝakva kajakado-kanuado. La diferenco estas, ke la veglongo estas nur 800 m-oj, kaj la konkursantoj en sia rapide descendanta boato dumvoje devas trapasi certan nombron da tn. pordoj, lokitaj laŭlonge de zigzage kondukanta veturlinio kaj signitaj per po du flagumitaj palisoj fiksitaj en la fundo de la rivero, aŭ per po du buoj same flagumitaj. La preterpaso de ĉiu unuopa pordo rezultigas punpontojn al la konkursantoj. El la temporezulto kaj la poentoj oni elkalkulas la definitivan rezulton kaj la klasigon de la konkursanto.

Disciplinoj:

1. *Vira solopa kajakslalomo*
2. *Virina solopa kajakslalomo*
3. *Solopa kanuslalomo* (nur por viroj)
4. *Vira duopa kanuslalomo*
5. *Gea duopa kanuslalomo* (en olimpikoj mankas)

En la mondĉampionadaj disciplinoj oni aparte taksas kaj premias ankaŭ la teamojn (konsistantajn el 3 formacioj) de la partoprenantaj nacioj, surbaze de la individuaj rezultoj de iliaj formacioj.

KORBOPILKADO

Batalante sur regule elmezurita kaj preparita ĉambrega aŭ subĉiela korbopilko-ludkampoj kaj obeante rigore la ludregulojn, du teamoj vetludas unu kontraŭ la alia, nome helpe de harmonia interludo ene de la teamo ili ambaŭ klopodas sendi la pilkon — dum la daŭro de difinita ludotempo — kiel eble plej multajn fojojn en la korbon-golejon de la kontraŭula teamo, respektive, per tenaca defendludo klopodas malhelpi, ke la kontraŭula teamo povu ĵeti la pilkon en ilian korbon, t.e. povu atingi golon.

En la sporta ludo korbopilko la pilkoludo okazas ekskluzive per mano. Kiki (piedfrapi) aŭ pugni (pugnobati) la pilkon ne estas permesite. Sed la nevola ektuŝo al la pilko per la piedo ne estas eraro.

La ludistoj povas pasigi la pilkon transdone, ĵete, bate aŭ rule unu al la alia, aŭ konduki ĝin antaŭ si, ade resaltigante ĝin sur la grundo, ne preteratentante la koncernajn regulojn.

La sporta ludo korbopilko (vulgare: basketbalo) estas ludata sur longkvadratforma ludkampoj kun 26 m-a longo kaj 14 m-a larĝo, — se en ĉambrego: kun almenaŭ 7 m-ojn alta plafono. La du pli longaj lateroj de la ludkampoj nomiĝas *flanklinioj* kaj la du malpli longaj estas la *bazlinioj*. *Mezlinio* dividas la ludkampon en du egallongajn *duonkampojn*.

Meze de la bazlinioj staras po unu fera postamento, fiksita en la grundo 40 cm-ojn ekster la duonkampoj kaj altetenas per du feraj brakoj la *golejon*. La golejo konsistas el la *korbotabulo* kaj la *korbo*, kies partoj estas la *korboringo* kaj la *korboreto*.

La korbotabulo estas 180 cm-ojn longa, 120 cm-ojn alta vertikala, blanka, durligna tabulo kun malsupra rando 275 cm-ojn super la grundnivelo kaj 120 cm-ojn interne de la bazlinio. En la mezo de la tabulflanko, rigardanta al la mezo de la ludkampoj, estas desegnita 45x59 cm-ojn ampleksa horizontala longkvadrato kun 5 cm-ojn dikaj nigraj lateroj. Al la mezo de la malsupra latero de la longkvadrato estas fiksita — tenate de 15 cm-a fera stangeto — la 45 cm-ojn diametra fera korboringo, sur kiu runde pendas la 40 cm-ojn longa korboreto: iom konusforma, senfunda retsako.

Por ĉiu teamo la propra duonkampoj estas la *defenda* duonkampoj, la alia estas la *ataka* duonkampoj.

Meze de la ludkampoj estas indikita sur la grundo la *meza cirklo* kun 1,8 m-a radiuso. 5,8 m-ojn interne de kaj paralele kun la bazlinioj estas la du *punĵet-linioj*, situantaj meze, simetrie, kun po 5,6 m-a longo. Ambaŭ punĵetliniojn, kiel diagonalon, ĉirkaŭas la du *flankaj cirkloj*.

Sur ambaŭ duonkampoj estas indikita krome po unu t.n. *severigita areo*, kiun limas a) 6 m-ojn longa meza parto de la bazlinio, b) la punĵetlinio, c) la linioj kunligantaj la ekstremaĵojn de a) kaj b), ni nomu ilin: flanklimoj de la severigita areo.

La severigita areo plus la flankaj cirkloj kune formas la punĵetstrion.

La *pilko*, uzata en la korbopilko, estas globforma kaj pumpita je aero tiom malmola, ke falite el 180 cm-a alto sur durlignan plankon ĝi resaltas 120-140 cm-ojn alten. Ĝi konsistas el interna gumveziko kaj ekstera ledkovrilo kaj havas plenkompite periferion de 75-78 cm-oj.

La korbopilko-teamo konsistas el 12 *ludistoj*, el kiuj la ludon partoprenas samtempe nur 5 ludistoj, kaj la ceteraj estas la *ŝanĝludistoj*. Ili ĉiuj devas porti bone videblan *ludistnumeron* surdorse kaj surbruste.

Kiam ajn kaj kiom ajn foje la trejnisto opinias necese aŭ laŭcele ŝanĝi iun el la ludantaj ludistoj per ŝanĝludisto, tiam li elektas unu el la ŝanĝludistoj kaj ordonas al li ŝanĝi la koncernaton. La komisiita ŝanĝludisto anoncas sin ĉe la notisto de la matĉo. La notisto atendas la unuan okazon, kiam la pilko fariĝis morta (kaj la matĉhorloĝo haltadas) kaj donas signon al la ŝanĝonto por la ŝanĝo. Tiam la ŝanĝludisto anoncas sin ĉe unu el la du ludgvidistoj, sciigas al li sian nomon kaj ludistnumeron kaj la nomon de la ŝanĝenda ludisto. La ludgvidisto donas permeson pri la ŝanĝo. La ŝanĝo devas disvolviĝi ene de 20 sekundoj. La ludo havas certajn

situaciojn, kiuj momente ne ebligas la ŝanĝon; tiujn kazojn la regularo sciigas.

Unu el la ludistoj estas la *teamestro*, la reprezentanto de la teamo. Nur li havas la rajton levi damandon al la ludgvidisto koncerne la ludon.

La ludon, nomatan *korbopilko-matĉo*, direktas du *ludgvidistoj*, nome la *ĉefludgvidisto* kaj la *viĉludgvidisto*, en ludgvidista uniformo: tenisŝuoj, grizaj pantalono kaj ĉemizo aŭ pulovero.

La ĉefludgvidisto havas certajn apartajn taskojn, el kiuj menciindas la sekvantaj: komence de la matĉo, en la meza cirklo li suprenĵetas la pilkon; okaze de opinidiverseco kontraŭ la viĉludgvidisto, estas li, kiu decidas la validecon ĉe la golo; li havas la rajton ĉesigi la matĉon, se necese; li decidas en kazoj, pri kiaj la regularo ne instrukcias.

La du ludgvidistoj dividas inter si la ludkampon kaj kune gvidas la matĉon. Post ĉiu punĵeto kaj suprenĵeto ili lokŝanĝas inter si. Iliaj ĉefaj taskoj dum la matĉo estas: enludigi la pilkon; difini, kiam fariĝis la pilko morta; se necese, per fajfilsigno kvalifi la pilkon morta; efektiviĝi la punojn; ordoni la mortan tempon; permesi al la ŝanĝludistoj fari la ŝanĝon; transdoni la pilkon al la ludisto plenumonta la enĵeton.

Ili fajfas ĉiuokaze, kiam estas necese konigi sian decidon. La golojn, originantajn ĉu el kampoludo (*kampogoloj*) ĉu el punĵeto (*punĵetgoloj*) ili ne signas per fajfilo, sed sciigas alimaniere al la notisto, ke la golon ili juĝas valida, alivorte, *koncedas* ĝin.

Kiam iu el la ludistoj kulpis eraron, tiam la ludgvidisto perfingre montras la numeron de la kulpinto al la notisto. Se la eraron devas sekvi punĵeto, tiam la ludgvidisto montras klare al la punĵetlinio kaj elektas tiun ludiston, kiu plenumos la punĵeton. Se punĵeto ne sekvos, la ludgvidisto donas la pilkon al tiu ludisto, kiu plenumos la enĵeton.

La *notisto* precize registras ĉiun momenton de la matĉo en la oficiala notlibro de la matĉo. Kun kontinua sumigo li notas la atingitajn poentojn, la kampogolojn, la sukcesajn kaj malsukcesajn punĵetojn. Li notas krome la personajn kaj teknikajn erarojn de la ludistoj kaj sciigas tuj al la ĉefludgvidisto, se iu kulpis kvinan fojon eraron. Al tio li havas kvin indiktabuletojn numeritajn per ciferoj de 1 ĝis 5. Kiam iu el la ludistoj kulpis eraron, li levmontras tiun tabuleton, kiu sciigas, kioman eraron tiu kulpis.

La notisto faras siajn komunikojn al la ludgvidisto tiam, kiam la pilko estas morta, la matĉhorloĝo haltadas.

La *tempomezuristo* signas la komencon de ambaŭ duontempoj. Li mezuras la *ludotempon* kaj la *mortan tempon* laŭ la antaŭskriboj de la reguloj. Tiucele li havas du stophorloĝojn. Unu el ili estas la *matĉhorloĝo*, por mezuri la ludotempon, t.e. la tempodaŭron de la efektive ludo. La alia stophorloĝo servas por mezuri la mortan tempon, t.e. la tempodaŭron de tiuj flankaktivadoj, kiuj — laŭ la reguloj — ne estas alkalkuleblaj al la efektiva ludotempo. Konsekvence, dum la *mortatempo-mezura horloĝo* mezuras, la matĉhorloĝo haltadas (estas malŝaltita) kaj inverse, kun la diferenco, ke la mortatempo-mezura horloĝo mezuras ĉiun mortan tempon aparte, de komence (nome post malŝalto la horloĝo *nulumas*, t.e. la montrilo resaltas al la cifero nulo), dum la matĉhorloĝo ĉiam daŭrigas la mezuradon, do tie ĉi la partaj tempoj adiciigas.

La tempomezuristo signas per gongo, sonorilo aŭ pistolpafo la finon de la duontempoj kaj tiun de la eventualaj plilongigoj.

Aparte funkciulo, la *30-sekunda tempomezuristo* manipulas la *30-sekundan tempomezurilon* resp. horloĝon cele de la validigo de la 30-sekunda regulo.

La ludo de du korbopilkomatĉoj, en kiu ili batalas unu kontraŭ la alia por la venko, havas la nomon *korbopilkomatĉo*, mallonge matĉo, kaj konsistas el du 20-minutaj *duontempoj* kun 10-minuta interpaŭzo.

La matĉo komenciĝas per suprenĵeto de la pilko, mallonge suprenĵeto, kiun la ĉefludgvidisto plenumas en la meza cirklo. Tion li faras ankaŭ komence de la dua duontempo kaj komence de la eventualaj plilongigoj. Okaze de suprenĵeto po unu ludisto el ambaŭ teamoj

devas stari en la meza cirklo, ĉiu en sia proprateritoria duoncirklo. Ili estas la *saltludistoj*. Ili rajtas forbati la suprenĵetitan pilkon nur kiam ĝi jam atingis la plej altan punkton de sia levigo (morta punkto) kaj komencis fali. Dum la suprenĵeto la ceteraj 8 ludistoj restadas ekster la cirklo.

Post la okazinta suprenĵeto ambaŭ teamoj klopodas ekposedi la pilkon kaj venigi ĝin — per diversaj regulaj manovroj kaj teknikoj — kiel eble plej rapide en la kontraŭulan korbon. Tiom pli, ĉar estas ĝenerela regulo, ke ĉiun fojon, kiam la teamo ekposedis la pilkon, ene de 30 sekundoj ili devas plenumi korboĵeton (kiu kompreneble aŭ rezultigas golon, aŭ malsukcesas), se ne, ili ricevas punon. La plenumon de tiu ĉi regulo (30-sekunda regulo) kontrolas la 30-sekunda tempomezuristo.

La ludisto *posedas la pilkon*, se li tenas, aŭ kondukas la vivan pilkon. Teni la pilkon sen konduko, aŭ plupasigo li rajtas,

a) se oni atakas lin, ne pli longe ol 5 minutojn, poste li devas ekkonduki ĝin, aŭ transpasigi ĝin al alia samteamano;

b) se oni ne atakas lin, maksimume 30 sekundojn, ĉar la 30-sekunda regulo antaŭskribas korboĵeton ene de tiu tempo- daŭro.

La ludisto *kondukas la pilkon*, kiam post la akiro li ekmovas ĝin ĵete, polmobate, aŭ rule kaj poste denove ektuŝas ĝin, kaj tion li ripetas, sen ke intertempe alia ludisto — ĉu propra, en kontraŭula — ektuŝus la pilkon. Inter du tiaj *pilkokontaktoj* li rajtas fari tiom da paŝoj (kurpaŝoj) kiom li volas aŭ povas. Dum *pilkokonduko* inter du ektuŝoj la pilko devas ĉiun fojon ektuŝi la grundon, escepte la unufojan tn. *aerkondukon* (enaeran kondukon), kiam la ludisto tiel komencas la pilkokondukon, ke li ĵetas ĝin en la aeron kaj denove ektuŝas ĝin, antaŭ ol la pilko falis sur la teron. Dum la konduko la ludisto ne rajtas ektuŝi la pilkon samtempe per ambaŭ manoj, nek lasi, ke la pilko haltu en unu el liaj manoj. Tiuj lastaj agoj signifas la finon de la pilkokonduko, kiu nun jam ne estas denove komencebla, sed la ludisto devas tuj transpasigi ĝin al alia samteamano, aŭ fari *ĵeton al la korbo*, mallonge *korboĵeton*.

La *teamo posedas la pilkon*, se iu el la teamo posedas la pilkon, aŭ se la teamanoj pasigas ĝin ĉu transdonante, ĉu ĵetante, ĉu polmobatante aŭ rulante unu al la alia, klopodante malhelpi por lerta teama interludo, ke la kontraŭulaj ludistoj akiru la pilkon.

Se dum la ludo la pilko pasas ekster la ludkampon, la ludgvidisto ekzamenas, kiu el la ludistoj ektuŝis la lasta la pilkon kaj ordonas al la kontraŭula teamo *enludigi* la pilkon per *enĵeto*. Se tio ne estas determinebla, sekvas suprenĵeto.

Oni nomas enĵeto tiun aktivadon, kiam — instrucie de la ludgvidisto — iu ludisto, starante ĉe la ekstera flanko de la *limlinio* de la ludkampo, enĵetas la pilkon en la ludkampon. Tio okazas unuavice kaj ĉiun fojon, kiam la pilko ajnakaŭze forlasis la ludkampon. La enĵeto okazas principe tie, kie la pilko transpasis la limlinion de la ludkampo. Ankaŭ post golo ĝenerale sekvas enĵeto, de sur iu ajn punkto de la rilata bazlinio. La enĵeton plenumas ĉiam unu al la ludistoj de la alia teamo, ol tiu, kies ludisto ektuŝis la pilkon la lastan fojon antaŭ ol ĝi forlasis la ludkampon, respektive ol kiu teame atingis golon.

La fina celo de la teama interludo estas atingi golon. *Golo*, nomata ankaŭ *korbo*, estas atingita, alivorte plenumita aŭ ĵetita tiam, kiam la pilko falis de supre en la korbon, restas en ĝi, aŭ elfalas sube.

La ludantaj teamoj povas atingi (akiri) golon laŭ du manieroj. Unu el ili estas la golo ĵetita dum la batalo el iu ajn punkto de la ludkampo. Tiun golon oni nomas *kampogolo* kaj ĝi valoras du poentojn. La alia estas la tn. *punĵetgolo*, atingita el punĵeto. La *punĵeto* estas puno pro eraro, kulpita de iu el la batalantaj teamoj kaj aljuĝita fare de la ludgvidisto avantaĝe al la kontraŭula teamo, kiu per tio ricevas la ŝancon atingi facile golon. La elektita ludisto plenumas la punĵeton, starante meze de la punĵetlinio, sur ties flanko pli proksima al la mezlinio de la ludkampo. Li plenumas la ĵeton neperturbate de la kontraŭulaj ludistoj. Dum la punĵeto la

ludistoj de ambaŭ teamoj staras disemite sur la du duonkampoj, sed estas permesite ankaŭ, ke ili formu spaliron ambaŭflanke de la severigita areo, ekster ties du longaj flanklinioj, starante unu apud la alia, alterne jen unu el tiu, jen unu el la alia teamo. 1,8 m-a parto de la du flanklimoj de la severigita areo, mezurita ekde la bazlinio, devas resti libera. Plenumite punĵetgolo valoras unu poenton.

En la korbopilko-matĉo venkas tiu teamo, kiu fine de la dua duontempo havas pli da poentoj. Kaze de egalstato ĉe la fino de la dua duontempo oni plilongigas la matĉon je 5 minutoj, resp. je tiomoble 5 minutoj, kiom da ili estas necesaj por atingi rezulton. Ĉiun plilongigon antaŭas 2-minuta paŭzo kaj duonkampe-interŝanĝo.

Por la lastaj tri minutoj de la dua duontempo kaj por la tuta daŭro de la plilongigoj validas ekstraj reguloj. Tiuj estas:

a) Ĉiun personan eraron oni devas konsideri kiel tiun kulpitan kontraŭ ludisto plenumanta ĵeton al la korbo, kaj la puno estas du punĵetoj aŭ enĵeto ĉe la mezo de flanklinio, laŭ la decido de la teamestro de la ĵetraĵa teamo.

b) La atakanta teamo devas transporti la pilkon en la atakan duonkampon ene de 10 sekundoj ekde ĝia ekposedo.

La pilko, per kiu oni ludas dum la matĉo (korbopilko) havas tri statojn.

1. La pilko *fariĝas enludita*, alivorte oni *enludigas* la pilkon, kaj poste *ĝi estas en ludo*, kiam

a) la ludgvidisto okupas sian lokon por plenumi suprenĵeton;

b) la ludgvidisto okupas sian lokon antaŭ punĵeto; c) okaze de enĵeto la ĵetonto ekhavas la pilkon.

2. La pilko *fariĝas viva* kaj *poste estas viva*, kiam

a) ĉe suprenĵeto la unua ludisto regule forbatas ĝin;

b) la ludgvidisto transdonas ĝin al iu ludisto cele de punĵeto;

c) post enĵeto ĝi ektuŝas la unuan ludiston.

3. La pilko *fariĝas morta* kaj poste estas *morta*, kiam

a) oni atingis golon;

b) ĉe punĵeto jam estas videbla ke la pilko ne trafos la korbon;

c) ĝi pasis ekster la limlinion de la ludkampoj;

ĉ) punĵeton sekvas pli nova punĵeto;

d) ĝi estas tro longe mantenata, aŭ ĝi haltas kaj eksidas sur la tenilo de la korboringo;

e) la ludgvidisto fajfilsignas, dum ĝi estas en ludo, escepte, se samtempe okazas ĵeto al la korbo kaj la pilko estas ankoraŭ en la aero;

f) finiĝis la duontempo, resp. la plilongigo;

g) oni kulpas malregulaĵon aŭ eraron, same escepte la kazon en e).

Morta tempo komenciĝas kaj la tempomezuristo saltas la mortatempo-horloĝon, samtempe malŝaltante la matĉhorloĝon en la jenaj kazoj:

a) malregulaĵo aŭ

b) eraro, kulpita de iu ludisto;

c) longe mantenata pilko;

c) troprokrasto ĉe la enludigo;

d) vundiĝo;

e) elsendo de unu el la ludistoj el la ludkampoj fare de la ludgvidisto;

f) ajnakaŭza interrompo de la matĉo fare de la ludgvidisto;

g) signo post paso de la 30 sekundoj, kiam tio estas mezurata.

Ĝenerale estas akceptebla kiel principo, ke morta pilko sekvigas ĉiam mortan tempon, sed dum morta tempo la pilko ne estas ĉiuokaze morta.

Dum la matĉo ambaŭ teamoj disponas pri po duminuta morta tempo en ambaŭ duontempoj kaj pri po unuminuta en la plilongigoj. Tiujn mortajn tempojn ili povas eluzi por fari teknikajn kaj taktikajn preparojn ene de la teamo. En certaj okazoj la ludgvidisto aljuĝas mortan tempon ŝarĝe de unu aŭ la alia el la du teamoj. La daŭron de tiuj mortaj tempoj oni dekalkulas el la supra mortatempo-kontigento. Male, estas aliaj okazoj, kiam la morta tempo ŝarĝas neniun el la du teamoj. Pri ĉio ĉi la regularo detale instrukas.

La mortan tempon pli nova enludigo ĉesigas. La pilko povas esti enludata laŭ 3 diversaj manieroj, depende de la kaŭzoj, kiuj igis la pilkon morta (ekz. malregulaĵo, eraro, fino de la duontempoj, kampogolo aŭ punĵet-golo, eksterlima pilko, tro longe mantenata pilko ktp.). Jen la 3 manieroj:

- a) suprenĵeto en unu el la tri cirkloj;
- b) enĵeto;
- c) punĵeto.

Sekve de malobeo al la ludreguloj la ludisto kulpas *malregulaĵon*, kies minimuma puno estas la perdo de la jam posedata pilko. Nome pro la malregulaĵo la pilko fariĝas morta, kaj ĝin igas viva unu el la kontraŭulaj ludistoj per enĵeto, aŭ la ludgvidisto per suprenĵeto.

Se la malregulaĵo estas pli grava, nome se temas pri persona aŭ teknika eraroj, tiam la puno estas jam aljuĝo de unu aŭ pli da punĵetoj plenumendaj fare de la kontraŭula teamo. Kroma, akcesora puno estas tio, ke la notisto notas laŭpersone ĉiun kulpitan personan aŭ teknikan eraron. Post 5 kulpitaj eraroj la ludisto devas aŭtomate forlasi la ludkampon kaj dum la matĉo li jam ne rajtas partopreni plu en la ludo, alivorte, li iĝis eskludita el la matĉo. La trejnisto zorgos pri lia anstataŭigo per ŝanĝludisto.

Persona eraro estas tia eraro, kiun kulpas la ludisto, kiam proprakaŭze li intertuŝiĝas kun kontraŭula ludisto. Estas malpermesite kapti aŭ preni, tiom pli fiksteni la kontraŭulan ludiston, aŭ puŝi lin, iri aŭ kuri kontraŭ lin, ganĉi (stumbliĝi) lin, obstrukci (malhelpi) lian antaŭenmovon per brako, ŝultro, kokso, genuo aŭ tutkorpe, aŭ apliki ian ajn krudan teknikon. La ludisto ne rajtas mane ektuŝi kontraŭulan ludiston, krom ties surpilkan manon cele de akiri la pilkon. La regularo faras distingon kaj pli rigore punas tiujn kontraŭregulajn aktivadojn (personajn erarojn), kiuj estas direktataj kontraŭ ludiston plenumantan korboĵeton. Cetere la regularo detale listigas ĉiujn eblajn kontraŭregulajn, konsekvence malpermesitajn aktivadojn de kaj la atakantaj kaj la defendantaj ludistoj. Ĉiun personan eraron la notisto notas je la ŝarĝo de la kulpinto, krome la ludgvidisto punas la teamon per simpla enĵeto, aŭ per unu aŭ du punĵetoj.

La ludisto kulpas *teknikan eraron*, se li malatentas la atentigojn de la ludgvidisto, aŭ aplikas nesportaskan taktikon, kiaj estas ekzemple la sekvantaj: malrespekte konduti kontraŭ la ludgvidisto; maldece, mallaŭde aŭ ofende paroli; embarasi la kontraŭulan ludiston, malhelpi lin en la vidado flirtante la manon antaŭ liaj okuloj; prokrasti per obstrukco (perkorpa malhelpado) la enludigon; ne levi la manon, kiam la ludgvidisto konstatas ĉe li malregulaĵon; paŝi sur la ludkampon kiel ŝanĝludisto, sen anonci sin ĉe la notisto aŭ unu el la ludgvidistoj, ktp. ktp. Ankaŭ la trejnisto povas kulpi teknikan eraron per malrespekta konduto, ktp. Ĉiu teknika eraro estas notenda en la notlibro ŝarĝe de la kulpinto, kaj krome la ludgvidisto aljuĝas du punĵetojn kontraŭ la kulpinta teamo.

Grave nesportaskan personan aŭ teknikan eraron la ludgvidisto devas konsideri tn. *eskluda eraro*. Kaze de eskluda eraro la ludgvidisto tuj eskludas la kulpinton el la plua ludo kaj forigas lin el la ludkampon.

Disciplinoj:

1. *Vira korbopilado*

2. Virina korbopilkado

La mondfederacio de la sportobranĉo korbopilkado estas: Fédération Internationale de Basketball Amateur (FIBA) (Esp-e: Internacia Amatora Korbopilkista Federacio).

Esprimoj:

Eŭropo-ĉampionado de virina korbopilkado. Internacia vira korbopilko-turniro. La venkinta teamo de la olimpika ĉampionado de virina korbopilkado. La olimpiko-ĉampiona vira korbopilko-teamo de jaro 1972. Mondĉampiona virina korbopilko-teamo. Vira korbopilko-ĉampionado por la Pokalo de la Foirurboj. Unualoke klasita teamo de la Eŭropo-ĉampionado de virina korbopilkado.

LUKTO

Uzante ekskluzive la forton kaj lerton de siaj muskoloj kaj obeante la regulojn de la koncerna disciplino, la luktisto havas la decidan celon venki sian kontraŭulon en korpo-kontraŭ-korpa batalo, klopodante sterni lin sur liajn ambaŭ ŝultrojn, t.e. atingi tuŝumon, aŭ almenaŭ akiri pli multe da poentoj ol tiu, pere de pli multaj kaj pli valoraj luktoprenoj.

Luktokonkurson povas partopreni nur viroj.

La mondfederacio de la sportobranĉo lukto estas: Fédération Internationale de Lutte Amateur (FILA) (Esp-e: Internacia Amatora Luktista Federacio).

La luktokonkursojn oni aranĝas ĝenerale en ĉambrego, kvankam kaze de konvena vetero oni povas aranĝi konkurson ankaŭ subĉiele. En la loko de la konkurso — krom pri la spaco, destinita por la disvolvo de la lukto, — oni devas zorgi pri spektejo por la publiko kun apartigita parto rezervita por la konkursa juĝistaro, pri aparta ĉambro por la disvolvo de la propesado kaj oficiala pesado, fine, sed ne lastavice pri vestejo, banejo kaj necesejo por la konkursantoj.

Al la regula disvolvo de la luktokonkurso estas necesaj la sekvantaj ekipaĵoj.

1. *Luktotapiŝo, tapiŝkovrilo kaj ŝirmtapiŝo.*

Disvolvi luktokonkurson estas permesite nur sur regula *luktotapiŝo*, kies anplekso estas 8x8 m-oj. Remburita per marherbo (lat.: fucus) aŭ haro, la luktotapiŝo devas esti min. 10. cm-ojn dika, sed samtempe necesgrade elasta. Kaze de tapiŝo el plasto, ĝi povas esti malpli dika. La tapiŝo konsistas el pluraj memstaraj tapiŝostrioj kunfiksataj per rimenoj.

La tapiŝon kovras *tapiŝkovrilo* el molteksita veltolo aŭ plasto. Ĝi devas esti fikse glattirita, sena je ajnaj akcesoraĵoj povantaj eventuale kaŭzi vundon. La mezo de la tapiŝkovrilo estas indikita per 10 cm-ojn dika, 1 m-on diametra cirklo, farbata per okulfrape malsama koloro. Krome la du diagonale kontraŭaj anguloj de la kovrilo estas indikitaj per blua, resp. ruĝa koloroj.

Por certigi la korpan sekurecon de la konkursantoj kaj publiko, la plankon (grundon) ĉirkaŭ la luktotapiŝo ĉirkaŭkovras 1,40 m-ojn larĝa, rimarkeble alikolora tn. *ŝirmtapiŝo*, sam- aŭ proksimume samdika.

La luktotapiŝon, la tapiŝkovrilon kaj la ŝirmtapiŝon oni devas malinfekti kaj senpolvigi antaŭ (se necese, dum) la konkurso.

2. *Malseka piedviŝilo* ĉe la du farbindikitaj kontraŭaj anguloj de la luktotapiŝo.

3. Unu aŭ pli da *decimalaj pesiloj* en la pesoĉambro.

4. La *konkursa horloĝo* devas esti tiaspeca, ke sen nulumo (resalto de la montrilo al la cifero nulo) ĝi estu haltigeble (elsaltebla) kaj plufunkciigebla (ŝaltebla), por mezuri kontinue la sumon de la detaltempoj.

5. Po unu *gongo* por ĉiu tapiŝo.

6. *Elektra rezultindikilo*, por publiko la suman rezulton de la unuopaj konkursantoj.

7. *Aparato* aŭ *tabulo*, por indiki, kiom da poentoj oni aljuĝis por la unuopaj prenoj.

8. 10x10 cm-aj ruĝaj, bluaj kaj blankaj *voĉdon-tabuletoj* kun tenilo por la poentjuĝisto kaj tapiŝĉefo, por indiki la tuŝumon aŭ aljuĝendan admonon, aŭ sian kontraŭopinion.

9. *Ceteraj* akcesoraj ekipaĵoj.

Luktokonkursoj estas aranĝeblaj en du stiloj, nome en klasika stilo, nomata ankaŭ grekaromia stilo, kaj en libera stilo.

En la klasikstila lukto ne licas preni la kontraŭulon sub la interlinio de la koksoj, nek ganĉi (stumbligi) lin, nek preni liajn piedojn aŭ krurojn, kaj ĉe la plenumo de la prenoj ajna aktiva uzo de la piedoj estas malpermesita.

En la liberstila lukto estas permesite kaj preni la kontraŭulon sub la talio, kaj ganĉi lin, kaj preni liajn piedojn, kiel ankaŭ aktive uzi la piedojn dum plenumo de prenoj.

Luktokonkursojn oni aranĝas ĝenerale aŭ nur en klasika, aŭ nur en libera stiloj.

Disciplinoj:

1. *Klasikstila lukto*

2. *Liberstila lukto*

Por elimini malproporciajn, sekve maljustajn avantaĝon kaj malavantaĝon, kiujn rezultigus batalo inter luktistoj kun konsiderinde diversaj korpopezoj, la konkursantoj de la sportobranĉo lukto estas grupigitaj — baze de pesado — en diversajn *pezkategoriojn* kaj ĉiu el ili rajtas batali nur en sia propra aŭ eventuale en iu pli alta, sed neniam en pli malalta pezkategorio.

La pezkategorioj de la plenkreskaj (adoltaj) luktistoj estas la sekvantaj:

	korpopezo en kilogramoj:	
	super	inkluzive
1. Pezkategorio 48 (pezkategorio kvardek ok)	-	48
2. Pezkategorio 52	48	52
3. Pezkategorio 57	52	57
4. Pezkategorio 62	57	62
5. Pezkategorio 68	62	68
6. Pezkategorio 74	68	74
7. Pezkategorio 82	74	82
8. Pezkategorio 90	82	90
9. Pezkategorio 100	90	100
10. Pezkategorio super 100	100	-

Koncerne ĝian *karakteron*, la luktokonkurso povas esti individua, individua-teama kaj teama konkurso.

En la individuaj konkursoj la konkursantoj batalas ene de sia pezkategorio por individua klasigo kiel eble plej avana. Tiun batalon konsistigas certa nombro da parbataloj, disvolviĝantaj inter po du luktistoj. La parbatalon oni nomas luktomatĉo, mallonge matĉo, kaj ĝi konsistas el 3x3-minutaj *rundoj* kaj unuminutaj interpaŭzoj, nomataj *ripoztempoj*.

Dum la matĉo la konkursantoj povas akiri diversvalorajn poentonombrojn per sukcese plenumitaj prenoj aŭ teknikoj kaj krome ankaŭ sekve de tn. admonoj aljuĝitaj kiel puno al la kontraŭulo pro kulpitaj eraroj. Se dum la 3x3 minutoj ne okaze tuŝumo (tuŝumo estas atingita, kiam unu el la du konkursantoj — per lerta tekniko kaj necesa fortostreĉo sukcesas sterni, t.e. kuŝigi la kontraŭulon por la daŭro de almenaŭ unu sekundo surdorsen tiel, ke ambaŭ ŝultroj tusu la tapiŝon), venkas tiu, kiu akiris pli multe da poentoj. Post plenumita tuŝumo la matĉo tuj finiĝas.

La rezulto de plenumita matĉo estas esprimata per tn. punpoentoj, malsamspecaj ol la ordinaraj poentoj, aljuĝitaj por sukcesaj prenoj. Jen la aljuĝa sistemo de la punpoentumado:

a) Se la matĉo finiĝis per tuŝuma venko, tiam la venkinto ricevas 0 punpoentojn kaj la venkito 4 punpoentojn.

b) Se la matĉo finiĝis per poentuma venko (unu el la konkursantoj havas pli multe da poentoj ol la alia), la venkinto ricevas 1, la venkito 3 punpoentojn.

c) Kaze de venko kun decida superforto, la venkinto ricevas 0,5, la venkito 3,5 punpoentojn.

ĉ) Kaze de sendecida matĉo ambaŭ luktistoj ricevas po 2 punpoentojn. Se dum la matĉo la konkursantoj ne plenumis eĉ unu prenon aŭ teknikon taksatan per poento, tiukaze ili ambaŭ ricevas po 2,5 punpoentojn.

d) Se iu el la du kontraŭuloj ne aperas en la scenejo de la matĉo, kiam sekvas lia vico, aŭ se

li rezignas pri la matĉo, se pro ajna kaŭzo oni eskludas lin el la matĉo aŭ el la konkurso, tiam li ricevas 4 punpoentojn kaj la kontraŭlo 0 poentojn. Se ambaŭ konkursantojn oni eskludas el la matĉo, tiam ili ambaŭ ricevas po 4 punpoentojn.

Koncerne la *sistemon*, la individua konkurso povas disvolviĝi aŭ laŭ rekte elimina sistemo, aŭ laŭ rondsistemo (kondiĉe ke en neniu pezkategorio, reprezentata en la konkurso, konkuras pli ol 8 luktistoj).

La konkurso laŭ rekte elimina sistemo konsistas el certa nombro da selektaj (antaŭ)matĉoj (1-a, 2-a, 3-a ...n-a, aŭ lasta selektaj etapo) kaj el la finalo (finala etapo).

La selektajn matĉojn oni disvolvas laŭ oficiala konkurstabelo, kunmetita per loto. Kiu dum la vico de la sinsekvaj matĉoj ricevis pli ol 6 punpoentojn, falas (eliminigas) el la plua konkurso, escepte tiujn en la lasta etapo, el kiuj iuj eventuale eniros la finalon. La selektaj matĉoj daŭras tiel longe, dum en la koncerna pezkategorio batalas pli ol 3 konkursantoj havantaj malpli ol 6 punpoentojn. la finalon eniras la restintaj 3 luktistoj kun malpli ol 6 punpoentoj, aŭ — se tiaj estas nur 1 aŭ 2 — la finalon eniras krome el la lasta etapo tiuj 2 resp. 1 konkursantoj, kiuj havas malplej multe da plusaj punpoentoj super la 6 punpoentoj. La tri luktistoj en la finalo batalas plu por la tri avanaj klasigoj, laŭ specialaj reguloj.

Kaze de rondsistemo la tuta konkurso disvolviĝas en unu etapo en certa nombro da fazoj. Ĉiu luktisto batalas kontraŭ ĉiu cetera kaj la klasigan vicordon oni elkalkulas laŭ apartaj antaŭskriboj.

La individuajn-teamajn kaj la teamajn konkursojn partoprenas teamoj konsistantaj el po unu konkursanto en ĉiu reprezentata pezkategorio.

En la individuateama konkurso oni disvolvas unue la individuan konkurson laŭ la supraj reguloj, kaj poste, baze de la individuaj klasigoj oni difinas la klasigan vicordon ankaŭ de la teamoj, laŭ specialaj — ĉi tie ne traktataj — reguloj, aplikataj aparte ĉe la rekte elimina kaj ĉe la rondsistemoj.

La disvolvo de la teamaj konkursoj same havas sian propran metodon, detale antaŭskribitan en la regularo de la mondfederacio.

La malfermo de internaciaj luktokonkursoj okazas solene. Sub sonoj de marŝo la individuaj konkursantoj, grupigite po nacioj, respektive la teamoj, aparte unu de la alia, en ordo kaj vico almarŝas la lokon indikitan. La naciajn trupojn aŭ teamojn ĉekape kondukas la trupgvidanto kaj la trejnisto, kiujn postsekvas konkursanto el la plej peza pezkategorio kun la nacia flago. Ankaŭ la membroj de la konkursa juĝistaro okupas sian asignitan lokon. Post la finita posteniĝo la prezidanto de la konkursa juĝistaro malfermas la konkurson, prezentas la membrojn de la konkursa juĝistaro kaj komunikas la programon de la konkurso. Poste la trupoj demarŝas kaj komenciĝas la matĉoj.

Vokite de la konkursa sekretario, la du konkursantoj ekstaras sur la du diagonale kontraŭaj, per ruĝa kaj blua koloroj indikitaj anguloj de la luktotapiŝo. Ili ambaŭ surhavas maleolrubandon samkoloran kun la koloro de sia angulo. Je la alvoko de la gvida juĝisto ili venas en la mezon, reciproke manpremas, poste reiras al sia angulo. Je la fajfilsono de la gvida juĝisto la matĉo komenciĝas. En ĉiu rundo la batalo komenciĝas en stara pozicio, nur poste unu el la konkursantoj portas la alian sur la tapiŝon helpe de ia permesita preno aŭ tekniko, kaj de nun la batalo estas daŭrigata jam alterne en kuŝa, sida, surgenua, stara aŭ alia pozicio.

La interrompoj kaj daŭrigojn, kiel ankaŭ la haltigojn ĉe la rundo- kaj matĉofino — kiujn lastajn la gongobato sciigas al li — la gvida juĝisto signas same per fajfilo.

Oni mezuras nur la efektivan bataltempon, t.e. tiujn tempodetalojn, kiuj pasas inter du fajfilsonoj. Tiujn tempopartojn oni nomas “pura tempo”. Ĉiuj prenoj kaj aliaj aktivadoj, plenumitaj ekster la mezurata tempo, estas nevalidaj. Se iu konkursanto venis en tn. tuŝumdanĝeron proksime antaŭ gongobato, la aljuĝota poentokvanto dependas de tio, kiom da tempo pasas ĝis tiu gongosigno.

Pro malpli grava vundiĝo, trapasa malbonfarto, vestoŝiriĝo ktp. la konkursanto povas ricevi plurfoje, sed sume ne pli ol 5 minutojn da “indulgotempo”. Se post tiu tempodaŭro la luktisto ne estas ree batakapabla, li estas konsiderata kiel tuŝume venkita.

La gvida juĝisto devas interrompi la batalon interalie: se unu el la du konkursantoj venis en tuŝuman pozicion; — se la bataltempo forpasis; — se li volas atentigi aŭ admoni unu aŭ ambaŭ luktistojn; — se iu el la du luktistoj vundiĝis aŭ ekmalbonfartis; — kaj en pluraj kromaj kazoj, en la regalaro detale listigitaj.

La matĉo finiĝas aŭ pli frue ol la regula matĉotempo pro venko per tuŝumo, aŭ ĝi daŭras 3x5 minutojn kaj finiĝas kun poentrezulto.

Per tuŝumo venkas tiu konkursanto, kiu sternas (kuŝigas) sian kontraŭulon sur la dorson tiel, ke ties ambaŭ ŝultroj tuŝas la tapiŝon samtempe, almenaŭ daŭre de 1 sekundo, kondiĉe ke la gvida juĝisto kaj la poentjuĝisto trovis regula kaj aljuĝas, alivorte koncedas la tuŝumon. En dubaj kazoj decidas la tapiŝĉefo.

Ne estas konsiderebla tuŝumo, nur estas poentumata la tn. momenta tuŝumo, kiu daŭras malpli longe ol 1 sekundo. Same poentumataj estas la kazoj de la tuŝumdanĝera pozicio.

La konkursanto atingas venkon egalvaloran kun tuŝumo, se lia kontraŭulo ne aperas loke de la matĉo je la fiksita tempo, aŭ se rifuzas la matĉon (voĉe, antaŭ la komenco), aŭ se rezignas pri la matĉo (dum la daŭro de la batalo), krome ankaŭ, se oni eskludas la kontraŭulon el la matĉo aŭ el la konkurso.

Kun poentumo finiĝas tiu matĉo, kie la konkursantoj luktas ĝis la fino de la 3x3-minuta bataltempo kaj venkas tiu, kiu ricevis pli multe da poentoj. Aparta ĉapitro de la regularo detale traktas la regulojn de la poentumado. Mallonge sufiĉas jeno:

Oni devas poentumi: a) la plenumitajn prenojn; b) la supreniĝojn (kiam la luktisto el suba pozicio venas en supran pozicion, do venas super la kontraŭulon); c) la arbitrajn tapiŝforlasojn; ĉ) la admonojn. Estas aljuĝeblaj 1, 2 aŭ 3 poentoj, laŭ la respektivaj specialaj instrukcioj. La aljuĝita poentvaloro validas nur, se kaj la gvida juĝisto kaj la poentjuĝisto konsentas pri ĝi. En mala kazo decidas la tapiŝĉefo.

Se la nombro de la poentoj ĉe la du konkursantoj estas egala, tiam la rezulto de la matĉo estas sendecida.

Lige kun la disvolvo de la luktobataloj oni registras tri grupojn de aktivadoj aŭ sintenoj, kiaj en la luktomatĉoj ne estas tolereblaj, kaj pro tio ili sekvigas tujan sankcion en formo de atentigo, admono aŭ eskludo el la matĉo.

Tiuj tri grupoj estas la fermita lukto, la malregulaĵoj kaj la malpermesitaj prenoj.

1. *Fermita lukto* estas ĉiu tia sinteno de la konkursanto, kies celo estas nure nur parati (defendi sin kontraŭ) la prenojn de la kontraŭulo, sen klopodi plenumi ankaŭ mem prenojn kontraŭ la kontraŭulon. Jen kelkaj specoj de la fermita lukto: longedaŭre parati sen kontraŭatako; ripetite deŝovi aŭ depuŝi la kontraŭulon de sur la tapiŝo; longe fiksteni la kontraŭulon premita sur la tapiŝon, sen klopodi apliki prenon; fiksteni longe ambaŭmane la manartikon de la sube kuŝanta kontraŭulo, aŭ fermi liajn kruojn en “tondilo”; ktp.

2. *Malregulaĵo* estas ĉia sinteno de la konkursanto kontraŭa al la konkursreguloj kaj al la sporteska batalo. Pro tio estas malpermesite interalie: kiki (piedfrapi), mordi, gratvundi, interbatadi, interpuŝadi; tiri orelojn aŭ harojn, tordi la fingrojn de la mano aŭ piedo, malhelpi la spiradon al la kontraŭulo; ektuŝi al li la vizaĝon inter la brovoj kaj buŝo; krampi sin al la tapiŝo aŭ al la vestaĵo de la kontraŭulo; paroli kun li dum la matĉo, aŭ disputi kun la juĝistoj, ktp.

3. *Malpermesitaj prenoj* estas tiaj prenoj, kiuj endanĝerigas la korpan bonstaton de la konkursanto, aŭ tiaj, kies celo estas turmenti la kontraŭulon, kaŭzante al li tian doloron, kiu igas lin rezigni pri la plua batalo. Konkrete malpermesitaj estas la sekvantaj prenoj:

a) En la klasikstila lukto:

Apliki ajnan prenon sub la linio de la koksoj; ganĉi (stumbligi) aŭ uzi iel ajn aktive la

krurojn kaj piedojn.

b) En la liberstila lukto:

Apliki piedtondilon sur la kapo, kolo aŭ korpo de la kontraŭulo; levi la kruron de la kontraŭulo, kuŝanta sur la tapiŝo, dum la atakanto sidas sur lia talio; ĉirkaŭturni la kontraŭulon per pera femurpreno; suprenklini la malsupran kruron de la kontraŭulo, dum la atakanto genuas en ties genukavo.

c) Kaj en la klasikstila kaj en la liberstila luktoj:

Estas malpermesite interalie plenumi la “duoblan nelsonon” antaŭendirekte, transkapiĝe al la kontraŭulo. Plenumi tiun prenon estas permesite nur flankdirekte kaj dum la plenumo estas malpermesite uzi aktive la krurojn kaj piedojn. (Ekz. fiksi la kontraŭulon per piede, aŭ paŝi inter liajn krurojn aŭ ekgenui inter ili.)

Estas malpermesite ĵeti aŭ faligi la kontraŭulon kap-al-tere sur la tapiŝon ĉe tiaj prenoj, kie la piedoj de la kontraŭulo dum la levo estas levetaj pli alten ol lia kapo. La preno estas plenumebla nur flankdirekte kaj la atakanta luktisto devas fali kune kun la kontraŭulo tiamaniere, ke lia genuo aŭ alia korpoparto ektuŝu pli frue la tapiŝon ol la ĵetata kontraŭulo.

Ne licas “rompi la ponton” tiamaniere, ke la kontraŭulo ŝovas la “pontumanton” (t.e. tiun, kiu estas en pontpozicio) en la direkto de lia kapo. Premi la ponton estas permesite nur flankdirekte aŭ malantaŭen. Levi kaj reĵeti la pontumantan luktiston sur la tapiŝon estas same malpermesite.

Se la brako de la luktisto lokiĝis post la dorson, ne licas suprentrudi ĝin ale al la ŝultro. La angulo inter la supra kaj malsupra brakaj devas esti minimume 90 gradoj.

Ne licas tordi la kapon de la kontraŭulo. Preni la kapon aŭ la kolon de la kontraŭulo per ambaŭ manoj licas nur, se la luktisto samtempe alprenas ankaŭ la brakon de la kontraŭulo al liaj kolo, resp. kapo. Preni la kapon aŭ kolon de la kontraŭulo per unu mano estas permesite ankaŭ sen la alpreno de la brako.

Kaze de malregula lukto kaj apliko de malpermesitaj prenoj la gvida juĝisto devas tuj interveni, ke la malregula lukto ĉesu, la intencata malpermesita preno ne estu efektivigata, aŭ ke ĉesu la malavantaĝo, kiun suferas la luktisto pro la aplikata malregula tekniko aŭ malpermesita preno, kiun la kontraŭulo aplikas. Konforme al la situacio li decidus, ĉu interrompi la matĉon, aŭ ĉu eblas ordigi la aferon sen interrompo.

Post antaŭa atentigo la sankcioj pro la supre vicigitaj malregulaĵoj, malregula lukto kaj malpermesitaj prenoj — depende de la graveco kaj ripetoj — estas: admono kaj esklado el la matĉo.

La admono povas esti: a) aŭtomata admono (aljuĝeble post la fino de nur unua rundo, se ĝis tiam neniu el la du konkursantoj atingis takseblan t.e. poentumeblan prenon aŭ neniu ricevis admonon), b) admono pro fermita lukto, c) admono pro malregula tekniko, aŭ malpermesita preno.

Post tri admonoj, aŭ pro grava malregulaĵo oni eskldas la luktiston al la matĉo. La luktisto, eskcludita el la matĉo, devas senprokraste forlasi la scenejon de la matĉo. La esklado el la matĉo rilatas nur la interrompitan matĉon. Se la eskcludito ne havas pli ol sume 6 punpontojn, li rajtas daŭrigi la konkurson.

La esklado el la matĉo estas valida, se por la esklado voĉdonas la gvida juĝisto, la poentjuĝisto kaj la tapiŝĉefo aŭ almenaŭ du el ili, sed la tapiŝĉefo nepre.

En tiu kazo, se la konkursanto kulpis tre nesportaskan konduton kontraŭ la kontraŭulo, kontraŭ membro de la konkursa juĝstaro aŭ kontraŭ la publiko, oni devas eskcludi lin el la konkurso. Al tio necesas la unuanima voĉdono de la tri supremenciitaj konkursaj juĝistoj.

La rezulton de la matĉo determinas la poentimo. Ĉiu aljuĝita proento validas nur, se la opinio de du konkursaj juĝistoj — praktike tiu de la gvida juĝisto kaj la poentjuĝisto — estas la sama. Se inter ili estas opinimalsameco, tiam decidus la opinio de la tapiŝĉefo.

Al la konkursa juĝistaro apartenas la sekvantaj specialaj konkursaj juĝistoj.

Per oftaj lokŝanĝoj elektante por si ĉiam la plej konvenan lokon, la *gvida juĝisto* gvidas la matĉon, zorgas, ke la matĉo disvolviĝu laŭ la reguloj, cele de kio li devas malhelpi ĉian ajn nesporteskan, kontraŭregulan konduton flanke de la konkursantoj. Kroma lia tasko estas la poentumado, kunlabore kun la poentjuĝisto kaj ev. kun la tapiŝĉefo.

Kaze de tuŝomdanĝero li devas laŭte nombri la sekundojn kun samtempa svingado de la rekta brako. Se li nombris 5 sekundojn, li aljuĝas 3 poentojn.

Al liaj taskoj apartenas ankaŭ la kontrolo de la tuŝumo. Por tio li kliniĝas al la tapiŝo kaj observas, ĉu ambaŭ ŝultroj tuŝas almenaŭ dum 1 minuto la tapiŝon. Se li trovas la tuŝumon valida, unu fojon li frapas mane sur la tapiŝon, poste levante la brakon signas, ke li kontrolis la tuŝumon.

Kondiĉoj de la valida tuŝumo estas krome, a) ke la kapo kaj la du ŝultroj de la konkursanto kuŝu ene de la areo de la luktotapixso; b) ke tuj antaŭ la kuŝumpozicio la tuŝumito estu havinta kontakton kun la kontraŭulo; c) ke la tuŝumo okazu antaŭ la rundofina gongobato.

Kiam la gvida juĝisto signis la tuŝumon, li atendas la opinion de la poentjuĝisto. Se tiu, levmontrante la respektivan tabuleton, samopinias, li koncedas la tuŝumon (t.e. rekonas kaj akceptas ĝin kiel validan) per fajfilsono, kiu samtempe signas ankaŭ la finon de la matĉo. Se la poentjuĝisto protestas per blanka tabuleto, tiam la tapiŝĉefo devas decidi.

Kiam la gvida juĝisto poentumas, la nombron de la aljuĝitaj poentoj li montras per la dikfingro (1 poento), per la dik- kaj montrofingro (2 poentoj) respektive per la dik-, montrokaj mezfingro (3 poentoj) de la dekstra mano por la blukolora kaj per tiuj de la maldekstra mano por la ruĝkolora konkursantoj.

La antaŭskribita vestaĵo por la gvida juĝisto estas: blanka pantalonino, blankaj ĉemizo aŭ pulovero kaj gimnastaj aŭ luktistaj ŝuoj. Sur la dekstra brako li devas porti bluan, sur la maldekstra brako ruĝan brakrubandon ĉ. 20 cm-ojn larĝan, inter la kubuto kaj manartiko.

Havante sian lokon apud la tapiŝo, la *poentjuĝisto* observas la disvolviĝon de la matĉo, kun plena rajto partoprenas en la juĝa kaj poentuma laboro de la gvida juĝisto. Al tio li havas po unu blankan, bluan kaj ruĝan tenilhavajn tn. voĉdontabuletojn. Kiam la gvida juĝisto signas tuŝumon, nepre li devas esprimi sian starpunkton. Nome, se li samopinias, tiam li levmontras la voĉdontabuleton samkoloran kun la koloro de la venkinto. Se li malsamopinias, kiel signon de protesto, li levas la blankan tabuleton.

Kiam la gvida juĝisto anoncas poenton aŭ admonon, sama— niere li esprimas sian konsenton aŭ kontraŭopinion.

Se li vidas tuŝumon, ankaŭ se la gvida juĝisto ĝin preteratentis kaj ne kontrolis, li devas signi ĝin per la koncerna tabuleto.

En ĉiuj kazoj, kiam li havas malsaman opinion lige kun la juĝoj de la gvida juĝisto, la rajton decidi havas la tapiŝĉefo.

Kromaj taskoj de la poentjuĝisto estas: precize registri la aljuĝitajn poentojn sur la poentfolio kaj noti ĉiun okazaĵon de la matĉo. La aljuĝitajn poentojn poste li publikigas al la publiko per levmontro de la poentmontra tabulo, dum la sumajn poentrezultojn li diskonigas helpe de elektra rezultindikilo.

Ĉe ĉiu tapiŝo, kie disvolviĝas konkurso, krom la gvida juĝisto kaj poentjuĝisto funkcias ankaŭ tn. *tapiŝĉefo*, same konkursa juĝisto kiel la aliaj du. Lia tasko estas direkti kaj kunordigi la laboron de la du aliaj konkursaj juĝistoj kaj en dubaj kazoj aŭ malsamopinio inter ili, li havas la devon decidi.

La tria admono al iu luktisto kaj sekve lia eskludo el la matĉo povas okazi nur, se ĉiuj tri funkciuloj samopinias. Al la koncedo de la tuŝumoj kaj al la aljuĝo de poentoj kaj admonoj sufiĉas la unuanima opinio de la gvida juĝisto kaj la poentjuĝisto.

La *tempomezura juĝisto* manipulas la gongon kaj la konkurshorloĝon. Je la fajfilsigno de la

gvida juĝisto li ŝaltas, resp. elŝaltas la konkurshorloĝon. Same li elŝaltas ĝin fine de la rundoj. Dum la matĉo li laŭte anoncas ĉiun minuton. Per gongobato li signas la komencon kaj finon de la rundoj.

Kromaj membroj de la konkursa juĝistaro estas la *prezidanto*, la *vicprezidanto*, la *konkursa sekretario*, la *informa juĝisto*, la *juĝisto ordigita apud la konkursantojn*, la *gvidanto de la aranĝkomitato*, la *peskomitato* el tri membroj kaj la *kuracisto*;

Esprimoj: Eŭropo-ĉampionado de liberstila lukto. Mondĉampionado de klasikstila lukto. Olimpika ĉampiono de klasikstila lukto de 1968, en la pezkategorio 82. Kun tuŝuma venko super la eksa mondĉampiono li fariĝis mondĉampiono de liberstila lukto de jaro 1963, en la pezkategorio 68. Alternativoj: a) ĉampiona (unualoke klasita) teamo de la Eŭropo-ĉampionado (mondĉampionado, olimpika ĉampionado) de lukto; b) Eŭropo-ĉampiona (mondĉampiona, olimpikoĉampiona) luktoteamo.

MANPILKADO

Uzante aktive nur la manojn, kaj obeante rigore la regulojn de la ludo, du teamoj de difinita membronombro vetludas dum difinita ludotempo kaj sur regula ludkampo unu kontraŭ la alia, klopodante sendi la pilkon kiel eble plej multajn fojojn en la golejon de la kontraŭulo, kaj — se necese — per tenaca defendludo malhelpi, ke la kontraŭula teamo ĵetu la pilkon en ilian golejon.

Oni aranĝas internaciajn manpilko-konkursojn kaj por viraj kaj por virinaj teamoj.

La sporta ludo manpilkado (vulgare: handbalo) estas ludata sur longkvadratforma ludkampo kun 44-metra longo kaj 22-metra larĝo. La du pli longaj limlinioj de la ludkampo estas la *flanklinioj* kaj tiuj du malpli longaj — la *bazlinioj*.

Ekster la du bazlinioj kaj la du flanklinioj oni devas certigi 2, resp. 3 m-ojn larĝan *elkurejon* por la ludistoj.

Meze de la bazlinioj staras po unu 3 m-ojn larĝa, 2 m—ojn alta *golejo* el lignaj fostoĵoj kun 8x8 cm-a transversa sekco. La du vertikalaj fostoĵoj estas nomataj *flankfostoĵoj*, la supra, horizontala fosto estas la *kverfosto*. La golejo devas esti farbita dukolora, alterne en po 20 cm-ojn longaj strioj. La trimetra linio inter la du vertikalaj fostoĵoj (flankfostoĵoj) estas la *golejlinio*.

6 m-ojn antaŭ la golejo, paralele kun la golejlinio troviĝas 3 m—ojn longa rekta linio, kiun ambaŭekstreme ĝis la bazlinio kontinuiĝas po unu 6 m-ojn radiusa kvaroncirklo, kun geometria centro ĉe la pli proksime vertikala golejfoŝto. Tiu rekta linio, kune kun la du kvaroncirkloj estas nomata *golejareo-linio*, ĉar ĝi kaj la koncerna parto de la bazlinio kune ĉirkanlimas la *golejareon*.

Paralele kun kaj 3 m-ojn antaŭ la golejareo-linio, ekde la bazlinio ĝis la bazlinio kuras intermita linio, la *linio de la libera ŝoto*. 7 metrojn antaŭ la mezo de la golejo, paralele kun la golejlinio troviĝas la unu metron longa *punlinio*, la loko de la *punŝotoj*.

La *mezlinio* interligas la mezon de la du flanklinioj kaj dividas la ludkampon en du *duonkampojn*.

Ĉiuj linioj estas indikitaj per 5 cm-ojn — la golejlinio per 8 cm-ojn — larĝa blanka linio.

La *pilko* estas globforma kaj devas esti ne tro plenbovita. Ĝi konsistas el interna *gumveziko* kaj ekstera *ledkovrilo*. La pilko de la viraj teamoj havas la periferion de 60 cm-oj kaj la pezon de 420-480 g-oj. La virina pilko havas 56 cm-an periferion kaj pezas 320-400 g-ojn.

La *manpilko-teamo* konsistas el 11 *ludistoj*, el kiuj 9 estas *kampludistoj* kaj 2 estas *goluloj* (9+2). Sur la ludkampo rajtas ludi ĉiam maksimume 7 (6+1) ludistoj, la ceteraj 4 (3+1) estas *ŝanĝludistoj*. Golulo neniam rajtas ludi kiel kampludisto, sed kampludisto povas anstataŭi la golulon.

La teamo devas komenci la ludon kun almenaŭ 5 ludistoj, kiu nombro estas pligrandigebla ĝis 7 ludistoj dum la daŭro de la ludo kaj eventualaj plilongigoj. Sed la ludo estas pluludenda, ankaŭ se la ludistonombro reduktiĝis sub la nombron 5.

La kampludistoj de la teamo surhavas uniforman sportveston, okulfrape diverĝan disde tiu de la golulo. Ĉiu ludisto portas surdorse almenaŭ 20 cm-ojn grandan vicnumeron. La golulo portas la numeron 1, la ŝanĝgolulo la numeron 11 kaj la kampludistoj la ceterajn numerojn de 2 ĝis 10.

La regularo diferencigas tn. enpaŝajn ludistojn kaj ŝanĝludistojn. La enpaŝaj ludistoj estas la ludistoj n-ro 6 kaj 7, kiuj (pro certaj taktikaj motivoj) paŝas eventuale nur pli malfrue sur la ludkampon. Al la enpaŝaj ludistoj apartenas krome tiuj ludistoj, kiujn — pro certaj malregulaĵoj — la ludgvidisto dum la daŭro de la matĉo pune elludigis por difinita nombro (3-5) da minutoj.

La enpaŝaj ludistoj devas enpaŝi (t.e. veni, resp. reveni sur la ludkampon) ĉiam ĉe la ŝanĝoloko de la teamo. Tiu ŝanĝoloko estas en la proksimeco de la tablo de la tempomezuristo, kaj tie devas restadi la enpaŝontaj enpaŝaj ludistoj kaj ankaŭ la ŝanĝludistoj.

Antaŭ ol paŝi sur la ludkampon, alivorte antaŭ enludigo, la enpaŝa ludisto devas anonci sin ĉe la konkursa sekretario kaj ĉe la tempomezuristo. Male, la ŝanĝo de la ŝanĝludistoj okazas sen sinanonco, estas nura regulo, ke la ŝanĝludisto rajtas surpaŝi la ludkampon, t.e. enludiĝi, nur kiam la ludisto, kiun li devas ŝanĝi, jam eliris el de la ludkampo, alivorte jam elludiĝis kaj estas jam en la ŝanĝoloko.

Ŝanĝoj povas esti farataj kiam ajn kaj kiom ajn foje dum la daŭro de la matĉo. Neregulajn ŝanĝojn la ludgvidisto punas per punŝoto, plenumate el tiu loko, kie la ŝanĝludisto ekludis. Se la ŝanĝludisto ripetas la malregulan ŝanĝon, la ludgvidisto punas lin per 2-minuta — kaze de pliaj ripetoj per po 5-minuta — elludigo.

La ludotempo de la manpilko-matĉoj konsistas el 2x30 — ĉe virinoj el 2x25 — -minutaj duontempo kun 10-minuta interpaŭzo.

Antaŭ la matĉo la ludgvidisto lotas en la ĉeesto de la du teamestroj. La bonŝanca teamo havas la rajton aŭ elekti duonkampon, aŭ komenci la ludon per la tn. komenca ĵeto. Dum la komenca ĵeto, plenumata en la mezo de la ludkampo fare de iu kampludisto, ĉiu ludisto devas esti sur sia propra duonkampo, kaj neniu kontraŭula ludisto rajtas veni pli ol 3 m-ojn proksime al la plenumanto de la komenca ĵeto. La komenca ĵeto ne povas rezultigi senpere golon (t.e. sen, ke la pilko ektuŝis antaŭe iun el la propraj aŭ kontraŭulaj ludistoj).

Post la interpaŭzo la du teamoj interŝanĝas la duonkampojn kaj ŝanĝas la rajton pri la komenca ĵeto.

Se post la fino de la dua duontempo la rezulto estas sendecida, post 5 minutoj sekvas nova loto, kaj 2x5 (ĉe virinoj 2x3,5) minuta ludotempo-plilongigo, mallonge: plilongigo, kun duonkampo interŝanĝo, sed sen interpaŭzo. Se ankaŭ la dua plilongigo ne rezultigas decidon, oni devas fiksi daton por pli nova matĉo inter la du teamoj.

Rilate la ludon per la pilko, estas permesite ĵeti, polmo- aŭ pugnobati, puŝi, kapti kaj haltigi la pilkon per unu aŭ ambaŭ manoj, per la brakoj, kapo, trunko, femuroj kaj genuoj, en ajna maniero, en ĉiu direkto. Teni la pilkon per unu aŭ ambaŭ manoj licas ne pli ol 5 sekundojn, eĉ se ĝi kuŝas sur la grundo. Licas fari ne pli ol 1 paŝojn kun pilko en la mano.

Licas ĵeti aŭ bati la pilkon sur la grundon kaj resaltiginte kapti ĝin unu- aŭ ambaŭmane. Sed 3 paŝojn aŭ 3 sekundojn post la kapto oni devas plupasigi ĝin al alia ludisto.

Ĉu loke, ĉu dumkure licas kiom ajn foje ade resaltigi la pilkon sur la grundo, sed nur per unu mano (unumana pilkokonduko). Se la ludisto kaptas la pilkon per unu aŭ ambaŭ manoj, interrompante per tio la unumanan pilkokondukon, tiam plej malfrue post 3 sekundoj aŭ paŝoj li devas plupasigi tiun al alia ludisto.

Ne licas mane ektuŝi la pilkon sinsekve du fojojn, se inter la du ektuŝoj la pilko ne ektuŝis la grundon, alian ludiston, aŭ la golejfoston. Ne licas ektuŝi la pilkon per la malsupraj kruroj kaj la piedoj, krom se la kontraŭula ludisto ĵetas ĝin sur la ludiston.

Detalaj antaŭskriboj reguligas la konduton de la ludisto kontraŭ la kontraŭula ludisto.

En la golejareo rajtas restadi nur la golulo. Per libera ŝoto estas punende, se kampludisto eniras la kontraŭulan golejareon kun pilko, aŭ sen pilko, sed kun la evidenta celo atingi avantaĝon per tio. Per punŝoto estas punende, se ludisto eniras sian propran golejareon cele de pli opurtuna defendludo.

La golulo rajtas parati kia ajn maniere, krom per la piedoj kaj kruroj, per kiuj estas permesite parati nur tiam, kaj nur tiel longe, dum la pilko celas la golejon aŭ la bazlinion. Kun la pilko li ne rajtas forlasi la golejareon.

La ludgvidisto aljuĝas golon, alivorte koncedas la golon, se la pilko kun sia tuta amplekso transiris la golejlinion, kondiĉe ke intertempe nek la golĵetanto, nek la ceteraj ludistoj kulpis malregulaĵon. Estas nomata memgolo, kiam ludisto — vole aŭ nevole — ajnmaniere sendas la pilkon en sian propran golejon.

Post ĉiu golo sekvas nova komenca ĵeto, plenumata de tiu teamo, kiu ricevis la golon.

La venkon en la mateo decidas la nombro, pli ĝuste la proporcio de la goloj, alivorte la golproporcio. Matĉo finiĝanta kun egala golproporcio estas nomata sendecida matĉo.

En la sporta ludo manpilkado oni diferencigas plurajn diversajn devigajn ĵetojn, plenumendajn post certaj okazaĵoj de la ludo, kiujn la ludgvidisto signas per fajfilsono. Tiaj ĵetoj estas la sekvantaj:

a) *Komenca ĵeto*. Jam klarigita.

b) *Golula elĵeto*, mallonge *elĵeto*. La elĵeton plenumas la golnlo post sukcesa parato, respektive ĝenerale ĉiun fojon, kiam la pilko venis en la golejareon. La elĵeton li devas plenumi ene de la golejereo, direktante la pilkon laŭeble al unu el la samteamaj ludistoj.

c) *Enĵeto* estas plenumenda ĉiun fojon, kiam la pilko transpasis la flanklinion. La enĵeton plenumas unu el la ludistoj de tiu teamo, kiu ne tuŝis la lasta la elirontan pilkon. La loko de la enĵeto estas ekster la flanklinio, tie, kie la pilko forlasis la ludkampon. El la enĵeto ne estas atingebla senpere golo.

ĉ) *Angulĵeto* (angulŝoto). Ĝi okazas, kiam la pilko transpasis la bazlinion ektuŝite laste de propra ludisto. Ĝin plenumas unu el la kontraŭulaj ludistoj el la angulo plej proksima al la loko, kie la pilko transiris la bazlinion. El angulĵeto estas atingebla senpere golo.

d) *Libera ĵeto*, alinome *libera ŝoto*. Longa lista fiksas la malregulaĵojn, pro kiuj — kiel punon — la ludgvidisto aljuĝas liberan ŝoton, malavantaĝan por la kulpinta teamo. Li aljuĝas ĝin ekz. pro malregula enludiĝo aŭ elludiĝo de la ludistoj; pro malregula ludo per la pilko; pro malregulaĵoj kulpitaj kontraŭ la kontraŭulo, aŭ ĉe la enĵeto, elĵeto, angulŝoto, libera ŝoto, punŝoto ktp.

La liberan ŝoton plenumas unu el la ludistoj de la kontraŭula teamo, nome tie, kie la malregulaĵo okazis. Se ĝi okazis inter la golejare-linio kaj la linio de la libera ŝoto, mallonge liberŝota linio, tiam la libera ŝoto estas plenumenda de ĉe la liberŝota linio. El libera ŝoto estas atingebla senpere golo, kvankam ne estas devige ŝoti la pilkon rekte al la golejo.

e) *Punŝoto*. Certajn malregulaĵojn la ludgvidisto devas puni per punŝoto. Tiaj estas ekz.: kruda regulmalobeo kontraŭ kontraŭulo; malregula fiaskigo de klara golsituacio de la kontraŭulo; intenca retroludo de la pilko al la propra golulo; malregula golulŝanĝo; ktp. la punŝoton plenumas unu el la kontraŭulaj ludistoj de ĉe la punlinio. La punŝoto estas ŝo-tenda ĉiam al la golejo.

f) *Ludgvidista ĵeto*. Kiam ambaŭ teamoj samtempe kulpas malregulaĵon, aŭ kiam iakaŭze, sed ne pro malregulaĵo, la lu-do estis interrompita, kaj poste estas daŭrigota, la pluan lu-don enkondukas la ludgvidista ĵeto. Tiam la ludgvidisto eksta-ras loke de la ludinterrompo kaj ĵetas la pilkon vertikale sur la grundon. Dum tio la ludistoj devas stari almenaŭ 3 metrojn distance de la ludgvidisto, ĝis la pilko ektuŝis la grundon.

Krom la prezidanto kaj vicprezidanto de la konkursa ju-ĝistaro la pli gravaj funkciuloj de la manpilkokonkurso estas: la ludgvidisto, la sekretario, la golindikistoj, la kuracisto kaj la masaĝisto.

La *ludgvidisto* havas la taskon zorgi pri la glata disvolviĝo de la matĉo. Helpe de la du golindikistoj li gvidas la matĉon laŭ la instrukcioj de la konkursa regularo. Li koncedas (aljuĝas) kaj nombras la golojn kaj punas ĉiun malregulaĵon kulpitan de la ludistoj. Tiucele kiel sankciojn li aljuĝas liberan ŝoton aŭ punŝoton kaj samtempe aŭ atentigas la kulpinton, aŭ — se necese — elludigas lin por 2 aŭ 5 minutoj, aŭ eskludas lin el la matĉo aŭ el la tuta konkurso.

La elludigita aŭ eskludita ludisto ne estas anstataŭigebla per alia ludisto. Se la ludgvidisto elludigas aŭ eskludas la golulon, tiu estas anstataŭigebla per la ŝanĝgolulo, sed unu el la kampuldistoj devas same forlasi la ludkampon por la daŭro de la puno.

La ludgvidisto gvidas la matĉon per fajfilo. Li fajfilsignas: ĉe ludkomenco; kaze de golo; ĉe malregulaĵo, kondiĉe, ke per tio li ne kaŭzas malavantaĝon al la alia teamo; se la pilko forlasis la ludkampon; antaŭ plenumo de komenca ĵeto, angul- aŭ punŝoto, kaj en pluraj aliaj okazoj

antaŭskribitaj.

La *sekretario* skribas la notlibron de la matĉo (matĉo-notlibron) kaj kune kun la tempomezuristo kontrolas la enpaŝon de la ludistoj.

La *tempomezuristo* kontrolas la tempon, krome la enpaŝon kaj elpaŝon de la ŝanĝludistoj, la puntempon de la elluditaj ludistoj, kaj kune kun la sekretario li kontrolas la enpaŝon de la enpaŝaj ludistoj. Fine de la du duontempoj kaj eventualaj plilongigoj per laŭta signo (gongobato) li signas la finon de la ludo.

La du *golindikistoj* indikas per flago la golon, la angulon, de kie la angulŝoto estas ĵetenda; la elĵeton; kaj tion, kiam ludisto eniris la kontraŭulan golejareon.

Dum la konkurso la ludgvidisto kaj liaj supraj helpantoj surhavas nigran veston.

Koncerne la sistemon, la manpilko-konkursoj povas disvolviĝi laŭ rekte elimina, laŭ rondbatala aŭ laŭ miksa sistemoj.

Disciplinoj:

1. *Vira manpilkado*

2. *Virina manpilkado*

La mondfederacio de la sportobranĉo manpilkado estas: International Handball Federation (IHF) (Esp-e: Internacia Manpilkista Federacio).

Esprimoj: Vira manpilko-ĉampionado aŭ ĉampionado de vira manpilkado. Eŭropo-ĉampionado de virina manpilkado. Internacia vira manpilko-turniro. La venkinta teamo de la manpilko-ĉampionado por la Eŭropo—pokalo de la Ĉampionaj Teamoj. Olimpikoĉampiona teamo de la vira manpilkado de 1968. Mondĉampiona virina manpilko-teamo. Ĉampionadoj de vira manpilkado por la Balta Pokalo kaj por la Pokalo Bukareŝto.

MODERNA PENTATLONO

La sportisto de la moderna pentatlonisto, nomata pentatlonisto, konkuras en la kvin disciplinoj de la sportobranĉo moderna pentatlonisto, nome en rajdo, skermo, pafado, naĝo kaj kuro, klopodante atingi kiel eble plej bonan suman rezulton kaj per tio kiel eble plej avanan klasigon. En la sportobranĉo moderna pentatlonisto konkuras nur viroj.

La taksado de la rezultoj okazas baze de sumigitaj poentvaloroj, akiritaj en la unuopaj disciplinoj. Nome en ĉiuj disciplinoj ĉiu atingita rezulto estas transkalkulata en poentojn, laŭ diversaj — por la unuopaj disciplinoj aparte aplikataj — kalkulmetodoj.

Laŭ speco la internaciaj konkursoj de moderna pentatlonisto povas esti: plurnaciaj konkursoj, kontinentĉampionadoj, mondĉampionado kaj olimpika ĉampionado.

Laŭ karaktero la konkursoj povas esti individuaj aŭ teamaj konkursoj. La membronombro de la teamoj estas 3 konkursantoj plus unu rezervulo ĉe la simplaj internaciaj konkursoj kaj 4 konkursantoj, el kiuj validas la rezulto nur de la 3 avantaj teamanoj, ĉe la mond- kaj olimpikaj ĉampionadoj.

En la unuopaj disciplinoj la pentatlonistoj estas nomataj ankaŭ laŭ la koncerna sportaktivado, nome: rajdisto, skermisto, pafisto, naĝisto kaj kuristo.

La disciplinojn oni devas disvolvi en la supra, resp. sekva vicordo, dum 5 sinsekvaj tagoj, ĉiun tagon po unu disciplinon.

Disciplinoj:

1. *Rajdo*

La unua disciplino de la sportobranĉo moderna pentatlonisto estas la rajdo, pli strikte rajdsalto tra 10-23 obstakloj, sur 1000-1500-metra vego, dum maksimume 6 minutoj. La rajdsaltovegon oni konsistigas el certa nombro da kurboj, kiujn mezkapabla ĉevalo povas trapasi. Deviga skemo pri tiu multkurba konduklinio de la vego — nomata: traco — ne estas, nur la numerigo de la obstakloj difinas la vicordon de la saltigoj. La longon de la vego oni devas mezuri tra la mezo de la obstakloj.

La antaŭskriboj koncerne la tipojn de la obstakloj, la kriteriojn de la eraroj kaj ĉiuj ceteraj cirkonstancoj ĝenerale identas aŭ similas tiujn, detale priskribitajn en la ĉapitro: sportobranĉo rajdo.

Senerara rajdo kun rapideco de 400 m-oj per minuto valoras 1100 poentojn. Ĉiu plusa sekundo rezultigas 5 minusajn poentojn, alinome punpoentojn, kiujn oni dekalkulas el la maksimuma poentosumo.

Minusajn poentojn rezultigas ankaŭ la sekvantaj eraroj:

a) halto aŭ rifuzo ĉe la sama obstaklo, la unuan fojon 30, la duan 60, la trian fojon 100 punpoentojn;

b) falo de la ĉevalo aŭ de la rajdisto ie ajn sur la vego: 80 punpoentojn;

c) obstaklorenverso ĉe renversebla obstaklo: 30 punpoentojn;

ĉ) malobeo ie ajn survege: 30 punpoentojn.

La regularo listigas krome ĉ. 20 erarojn, kiuj sekvigas la eskludon de la konkursanto el la konkurso. Tiaj estas interalie: komenci la saltigon antaŭ startigo; prokrasti la starton pli ol 60 sekundojn; montri la obstaklon al la ĉevalo antaŭ la starto; saltigi obstaklon ne apartenantan al la vego; saltigi nelaŭvice la obstaklojn; preteriri flagpordojn; ĉirkaŭiri turnoflagon kontraŭflanke; transpasi la 6-minutan tempolimon; forlasi la vegon ne transirinte la cellinion; la ĉevalo, aŭ la rajdisto aŭ ili ambaŭ kune forlasas la vegon, sen trairi ĝin ĝisfine; ĉe la postkonkurso pesado la rajdisto ne havas la devigan 75-kilograman suman pezon, ktp.

Se forkurinta ĉevalo falas, transsaltas obstaklon, kontraŭflanke ĉirkaŭiras flagon, aŭ transpasas la start-, resp. cellinion, oni ne rajtas puni la konkursanton.

Ĉe la disciplino rajdo la sekvantaj konkursaj juĝistoj havas specialajn taskojn:

La *teknika juĝisto* kontrolas la ekipaĵon de la rajdisto antaŭ surĉevaligo. La vestaĵo estas antaŭskribita, same la mezuroj de la spronoj kaj rajdbastono. Startnumeroj estas porteblaj sur la brusto, la dorso kaj la du brakoj.

La *pesjuĝisto* kontrolas la devigan pezon de la rajdistoj antaŭ kaj post la konkurso. La minimuma deviga pezo estas 75 kg-oj, kiu inkluzivas ankaŭ la pezon de la selo, la subsela kovrilo kaj la brido.

La *surĉevaliga juĝisto* transdonas al la rajdisto 20 minutojn antaŭ la starto la lote asignitan ĉevalon, kune kun la necesa rajdilaro. Surĉevaliĝi antaŭ la permeso de la surĉevaliga juĝisto ne estas permesite.

La *startjuĝisto* startigas la konkursantojn laŭ la vicordo de la startolisto kun 5-minutaj interpaŭzoj. Li startigas per flagosigno, kiun antaŭas la nombrado de la antaŭaj 5 sekundoj, jene: “kvindek ses, kvindek sep, kvindek ok, kvindek naŭ, ek!” kaj ĉe la lasta vorto li eksvingas de supre malsupren la startoflagon.

La *obstaklojuĝistoj* kaj *pordojuĝistoj* registras la startnumeron de la trapasantaj konkursantoj, atentis kaj notas la eventualajn erarojn.

La *celjuĝisto* signas la alceliĝon de la rajdisto per malsuprensvingo de la celflago.

La *tempomezuraj juĝistoj* — almenaŭ du, kun unu plusa, rezerva stophorloĝo — mezuras la tempon pasintan inter la starto kaj alceliĝo.

2. Skermo

La dua disciplino de la moderna pentatlonon estas la skermo, pli strikte spadado. Ĉiu parbatalo konsistas el ununura asalto, kiu daŭras ĝis la unua trafo, respektive 3 minutojn, se trafo ne okazas. Samtempaj du reciprokaj trafaj ne validas. Kaze de sentrafa asalto ambaŭ skermistoj estas taksataj venkitaj.

La konkurso disvolviĝas laŭ rondoŭbatala sistemo, el kio sekvas, ke ĉiu skermas kontraŭ ĉiu. Se la ensemblo nombras malpli ol 21 skermistojn, tiam oni ripetas la rondoŭbatalon, do ĉiu skermas dufoje kontraŭ ĉiu.

Tiu skermisto, kiu venkis en la 70 % de la asaltoj, atingas 1000 poentojn. Pli aŭ malpli multe de venkoj rezultigas difinitan kvanton da plusaj, resp. minusaj poentoj, elkalkulitaj laŭ specialaj reguloj.

Ankaŭ se ne okazis efektiva trafo, la asaltogvidisto devas aljuĝi tn. puntrafon al tiu skermisto, kiu spite antaŭan atentigon ambaŭpiede transpaŝas la malantaŭan limlinion; kiu spite antaŭan atentigon faras tiajn sturmatakojn, sekve de kiuj ambaŭpiede li transpasas la flanklinion, kun la celo eviti trafojn per tio; kiu intence prokrestas la daŭrigon de la parbatalo; uzas sian armilon kiel ĵetarmilon, aŭ uzas ĝin per ambaŭ manoj; kiu intence pikas ne kontraŭ la kontraŭulon, aŭ faras tiajn sturmatakojn, kiuj finiĝas per kruda ekpuŝo al la kontraŭulo.

Al la skermisto oni aljugas unu punpoenton, se post atentigo konstateble li helpas venki al sia kontraŭulo. Se tio ripetiĝas ankaŭ en alia asalto, li estas eskludebla el la pluaj asaltoj de la disciplino.

La skermisto surhavas spadistan veston. Krome validas ĝenerale ĉiuj ceteraj reguloj de la disciplino spadado de la sportbranĉo skermo.

La deviga lingvo de la disciplino estas la franca; la plej necesajn francajn komandovortojn entenas la naciaj regularlibroj de la sportbranĉo.

En la disvolvo de la disciplino skermo pli specialajn funkciojn havas la sekvantaj konkursaj juĝistoj.

La asaltogvidisto gvidas la parbatalojn, okupinte sian lokon tiel, ke samtempe li povu vidi ambaŭ skermistojn kaj la elektran trafsignon.

La tempomezura juĝisto mezuras la puran skermotempon, t.e. la tempodetalojn inter la komandovortoj “ek!” kaj “half!”

3. Pafado

La tria disciplino de la moderna pentatlonon estas la pafado, pli strikte pafado per etkalibra pistolo sur 160x45 cm (160x45 cm) al 25 m-oj.

La pafado povas esti ajnatipa unupafa aŭ aŭtomata pistolo aŭ revolvero kun maks. 6 mm-a kalibro. Ĝi devas havi malfermitajn celilon kaj celgrajnon, pretigitan en la fabriko.

Post 2 provaj pafadoj estas plenumendaj 20 taksataj pafadoj en kvar serioj. Post po 10-sekundaj paŭzoj la celtabulo aperas por 5 sekundoj, dum kio oni devas plenumi unu pafadon. Post la kvina pafado sekvas la trafindikado kaj poste komenciĝas la sekva serio. Al la plenumo de la pafadoj la konkursanto rajtas uzi nenian apogilon, li devas pafi el unu, libera mano.

Kaze de paneo ĉe la pafado aŭ pafaĵo, sen fari ion ajn al la pafado, la pafisto devas ĝin meti sur la tablon, poste fari du retropaŝojn kaj silente mansigni al la pafgvidisto. Post la fino de la daŭranta serio la pafgvidisto kunvokas la apelkomitaton, kaj ili ekzamenas la kaŭzon de la paneo. Se la pafisto ne kulpis pri la paneo, li rajtas ripeti la pafadon.

Se ĉe la indikado oni trovas pli ol 5 trafadojn sur ies celtabulo, tiam tiu devas ripeti la serion. Se la nova serio havas pli altan suman trafvaloron ol la 5 plej bonaj trafadoj de la antaŭa serio, tiam validas la 5 plej bonaj trafadoj de la unua serio. Se la rezulto de la ripetita serio estas pli malbone ol la 5 plej malbonaj trafadoj de la unua serio, tiam validas la kvin plej malbonaj de la unua serio. Se la valoro de la ripetita serio estas inter tiu de la 5 plej malbonaj kaj 5 plej bonaj trafadoj de la unua serio, tiam validas la nova serio.

Por atingi 1000 poentojn la pafisto devas plenumi 194 trafadunojn. Ĉiu opa plusa aŭ minusa trafaduno pliigas aŭ reduktas la rezulton per 22 poentoj.

La instalaĵo de la pafado, nome tiu de la pafstacioj kaj de la indikejo, krome la reguloj koncerne la disvolvon de la disciplino ĝenerale samas kun tiuj ĉe la responda disciplino de la sportbranĉo pafado. La oficiala lingvo de la disciplino estas la franca.

La pli gravaj funkciuloj ĉe la disvolvo de la disciplino estas la sekvantaj konkursaĵaj juĝistoj.

La pafogvida juĝisto gvidas la pafkonkurson. Antaŭ la komenco de la konkurso li kontrolas la fidindan funkciadon de la instalaĵoj. Dum la konkurso li zorgas pri la severa pafada disciplino, kaj devas malhelpi ĉian agon aŭ sintenon de la pafistoj, kiu eventuale povus kaŭzi akcidenton. Se necese, li rajtas interrompi la konkurson. Oni nomas lin ankaŭ *pafgvidisto*.

La *indikejestro* direktas la laboron de la indikistoj.

Ĉe ĉiu pafstacio, 2 metrojn apud la pafisto havas sian lokon la *pafstaci-juĝisto*, por registri ĉiun plenumitan pafadon de la pafisto.

4. Naĝo

La kvara disciplino de la moderna pentatlonon estas la naĝo, pli strikte 300-metra naĝo en laŭplaĉa naĝmaniero. La konkurso estas disvolvata aŭ en baseno (50-, 33,3-, aŭ 25-metra), aŭ eventuale sur naĝvego instalita en lago aŭ rivero.

3:54-sekunda (tri-minuta plus kvindekkvar-sekunda) temporezulto havigas 1000 poentojn al la konkursanto. Ĉiu plusa aŭ minusa sekundo aldonas 6 minusajn resp. plusajn poentojn al la rezulto.

La konkurso konsistas el necesa nombro de tempokurumoj, laŭ kies rezultoj oni elkalkulas la poentvaloron de la naĝistoj. Cetere koncerne ĉiujn detalojn kaj cirkonstancojn de la naĝkonkurso validas la regularo de la mondfederacio de la sportbranĉo naĝo, traktata koncize en la ĉapitro naĝo de tiu ĉi studo.

5. Kuro

La kvina disciplino de la moderna pentatlonon estas la kuro, pli strikte 4000-metra terrenkuro sur varia natura vego kun maksimume 60-100-metra suma niveldiferenco.

Per 14:15-sekunda temporezulto la kuristo elmeritas 1000 poentojn. Ĉiu plusa aŭ minusa sekundo aldonas 3 minusajn resp. plusajn poentojn al la rezulto.

La startejo kaj la celo, indikataj de ruĝaj flagoj, devas esti proksime unu de la alia kaj la tracon de la kurvego oni devas indiki tiel, ke la kuristoj facile orientiĝu de unu indikilo ĝis la

alia. Laŭlonge de la vego la konkursa juĝistaro starigas pordojn, kiujn la kuristoj devas trakuri. La pordojn reprezentas dekstre ruĝa, maldekstre blanka flagoj. Cetere apartan vegdesegon oni elpendigas antaŭ la konkurso.

La startigon plenumas la *startjuĝisto* kun unuminutaj interpaŭzoj, laŭ la vicordo de la oficiala startolisto. 30 kaj 10 sekundojn antaŭ la starto li atentigas la kuriston, poste li laŭte nombras de 56 ĝis 59, kion sekvas la komandovorto “ek!” kun la semtempa malsuprensvingo de la startoflago.

La konkursanto devas sekvi la indikitan veglinion. Kie la vegon indikas nur pordoj, tie gravas nur kuri tra ili. Ĉe ambaŭflanke kontinue indikita vego la kuristo devas resti inter la du flanklinioj. Se la vegon indikas nur unu sola traclinio, pli ol 2 metrojn deĝi de ĝi ne estas permesite. Atingita kuristo devas doni lokon al la lin antaŭonta.

Ĉe la pordoj restadas po unu vegjuĝisto kun la tasko noti la trakurintojn en la vegjuĝista registrilo, kiun subskribita li transdonas al la prezidanto de la konkursa juĝistaro post la trakuro de la lasta konkursanto.

Havante sian lokon en la plilongigo de la cellinio, almenaŭ 3 *tempomezuraj* juĝistoj mezuras la temporezulton de la alceliĝantaj konkursantoj. Unu el ili estas la *gvida tempomezuristo*, kiu samtempe plenumas la funkcion de la celjuĝisto.

La mondfederacio de la sportobranĉo moderna pentatlonado estas: Union Internationale du Pentathlon Moderne (UIRM). Esp-e: Internacia Modernpentatlonista Unio.

Esprimoj: Mondĉampionado de moderna pentatlonado. La hungaraj modernpentatlonistoj partoprenas la internaciajn konkursojn kaj ĉampionadojn de moderna pentatlonado ĉiam kun konsiderindaj rezultoj. — Li farigis la unualoka klasito de la disciplino skermo de la individua Eŭropo-ĉampionado de moderna pentatlonado. — Olimpikoĉampiona teamo de moderna pentatlonado. — En la du disciplinoj rajdo kaj pafado, krome en la kunmetita konkurso de la individua mondĉampionado de moderna pentatlonado venkis la bulgara modernpentatlonisto N.N.

NAĜO

La naĝisto naĝas certajn naĝdistancojn laŭ diversaj — por la koncerna disciplino antaŭskribita — naĝmaniero kaj klopodas atingi kiel eble plej bonan temporezulton.

La trejnoj kaj konkursoj de la sportobranĉo naĝo disvolviĝas en regule longaj, larĝaj kaj profundaj, kovritaj (tegmentitaj) aŭ subĉielaj naĝbasenoj, mallonge basenoj aŭ alivorte naĝejoj. Kroni la oficialaj (enbasenaj) diversaj disciplinoj de la naĝista mondfederacio estas aranĝataj naĝkonkursoj kompreneble ankaŭ en lagoj, riveroj kaj maro.

La baseno priservanta internaciajn naĝkonkursojn havas la sekvantajn antaŭskribitajn mezurojn: longo = 50 m-oj; larĝo = 21 m-oj; profundo = minimume 1,80 m-oj. Basenon preparitan por sporta naĝo oni nomas *naĝvego*. Tiu preparo inkluzivas, ke la basenon en ĝia tuta longo oni dividas en 8 striojn nomatajn *naĝlenoj*, mallonge *lenoj*. La larĝo de unu leno estas 2,5 m-oj. Ekster la 1-a kaj 8-a lenoj po 50 cm-ojn larĝa strio, nomata morta spaco, dividas la randon de la baseno disde la du ekstremaj naĝlenoj.

En la tuta longo de la vego la limon inter la lenoj indikas *lendividaj metalkabloj*, alkroĉitaj al hokoj ĉe ambaŭ finoj de la baseno. La kablojn subportas 5-10 cm-ojn diametraj, strikte intertuŝiĝantaj aerplenaj ujoj flosantaj sur la akvo.

Ĉe unu el la du mallarĝaj flankoj de la baseno troviĝas la startejo por la neĝkonkursoj. La konkursantoj startas de sur 8 *startoŝtonoj*, kiuj estas 0,5x0,5 m-ojn ampleksaj, supre iom deklivaj cementblokoj, konstruitaj borde de la baseno, 0,5-0,75 m-ojn alte super la akvospegulo. Ili estas de dekstre maldekstren vicnumeritaj. La starton de la dorsonaĝistoj servas tn. *startoteniloj*, enkonstruitaj en la vando de la baseno sub la startoŝtonoj.

Kromaj ekipaĵoj de la naĝovego estas la turnindikilo por la dorsonaĝistoj, la revoka ŝnuro kaj la elektraj tuŝlamenoj.

La *turnindikilo* estas per flagetoj provizita ŝnuro, streĉita transverse de ĉiuj lenoj 1,8 m-ojn super la akvosurfaco kaj 0,5 m-ojn antaŭ ambaŭ frontvandoj de la baseno. Ĝi atentigas la proksimiĝantajn dorsonaĝistojn, ke la turnovando estas jam proksime.

15 m-ojn distance de la startejo, en certa alto super la akvospegulo, same transverse de la tuta naĝovego, estas pendigita la *revoka ŝnuro*. Ĝi estas facile malligebla kaj rapide mallevebla ĝis la akvonivelo, por indiki per ĝi al la startintoj, ke la starto ne estis regula (ne sukcesis) kaj pro tio ĝi devas esti ripetata.

La *elektraj tuŝlamenoj* estas 60 cm-ojn larĝaj kaj ĉ. 2,5 m-ojn longaj maldikaj metalplatoj, muntitaj sur la celflanka basenvando; en ĉiu leno. La duona larĝo de la lamenoj estas sub la akvonivelo. Pere de la tuŝlamenoj elektra aparato registras — kun centonsekunda precizeco — la alvenan vicordon de la konkursantoj, kiuj alceliĝante frape ektuŝas la tuŝlamenon.

La antaŭskribita akvotemperaturo estas 23-25 C° (Celsiusaj gradoj).

En internaciaj naĝkonkursoj la konkursa juĝistaro konsistas almenaŭ el la sekvantaj funkciuloj: 1 prezidanto, 1 startisto, 1 gvida tempomezuristo, po 3 tempomezuristoj por ĉiu opa naĝleno, 1 gvida celjuĝisto, po 3 celjuĝistoj por ĉiu opa naĝleno, po 1 turnojuĝisto ĉe ambaŭ finoj de ĉiu leno, 2 vegjuĝistoj, 1 rezultopublikisto, 1 notisto, 1 sekretario.

La prezidanto de la konkursa juĝistaro, la konkursa sekretario kaj la notisto havas difinitajn gvidajn resp. administrajn farendojn tre similajn al la taskoj de la samaj funkciuloj ĉe la ceteraj sportobranĉoj.

La ĉefa tasko de la *startigisto* estas la startigo de la konkursantoj en la sinsekvaj kurumoj. Tiucele li staras ĉe unu el la flankoj de la baseno, 5 m-ojn distance de la startlinio, tiel, ke la startontoj povu lin vidi kaj aŭdi, kaj la tempomezuristoj povu lin vidi. La startigo okazas per pistolpafo, fajfilsono aŭ komandovorto. Kaze de malregula starto li ripetigas la starton. En tio lin helpas la apliko de la revoka ŝnuro. Antaŭ la startigo de la kurumo li ricevas signon disde la prezidanto, kiu signo sciigas al li, ke ĉiu konkursanto kaj konkursa juĝisto estas startopreta.

La *gvida tempomezuristo* asignas al ĉiu tempomezuristo ties sidlokon kaj la lenon, por kiu tiu respondecas. Por ĉiu leno li designas (elektas kaj komisias) po tri tempomezuristojn kaj krome restas du rezervaj tempomezuristoj por lia dispono. Post la kurumo li kolektas de ĉiu la tempomezurajn blankedojn.

La *tempomezuristoj* mezuras la tempon de la konkursanto naĝanta en ilia asignita naĝleno. Por tio ili uzas stophorloĝon oficiale aprobitan antaŭ la konkurso. Dum la kurumo la tempomezuristoj estas sidantaj malantaŭ la vico de la startoŝtonoj. (Nome, ĉar la oficialaj naĝdistancoj estas ĉiam rondaj 100 metroj, la startovando estas samtempe ankaŭ la celvando.) Je la startosigno ili ŝaltas sian stophorloĝon. Kiam la konkursantoj naĝas jam la lastan lenlongon, la tempomezuristoj venas tute proksime al la celvando, kaj elŝaltas (haltigas) la stophorloĝon, kiam la konkursanto finis regule la kurumon, t.e. atingis la celon kaj ektuŝis per unu mano la frontan basenvandon (celvandon, tuŝlamenon). La mezuritan tempon ili tuj registras sur la tempomezura blankedo, kiun poste ili transdonas al la gvida tempomezuristo. La stophorloĝon ili rajtas nulumi (restarigi la montrilon al la cifero nulo) nur je la instrukcio de la gvida tempomezuristo. — Kaze de instalitaj elektraj startigiloj, tuŝlamenoj kaj tempomezura aparato la mezurado de la temporezultoj okazas instrumente, sed ankaŭ la tempomezuristoj mezuras, por preventi konfuzon kaze de paneo.

La gvida celjuĝisto a) donas instrukciojn al la celjuĝistoj. Nome li elektas tri el ili, kaj ordonas al ili atenti tiun konkursanton, kiu atingas la celon la unua. Same li komisias po tri el ili por atenti la dualokan, la trialokan ktp. alceliĝantojn.

b) Designas la turnojuĝistojn, nome po unu al la du ekstretoj de ĉiu leno.

c) Post la kurumo kolektas la blankedojn, sur kiuj la celjuĝistoj registris la rezulton de sia observo.

Ridante sur altano konstruita en la plilongigo de la cellinio la *celjuĝistoj* bone vidas la tutan vegon kaj la cellinion. Post ĉiu kurumo la celjuĝisto konstatas kaj sur aparta blankedo registras, ke kiu el la konkursantoj alceliĝis tioma-loka en la vicordo, kioman li devas priatenti.

Starante ĉe la du ekstretoj de la lenoj, la *turnojuĝistoj* kontrolas en sia asignita leno la regulan turniĝon de la naĝistoj. Krome ili nombras la plenumitajn turnojn kaj sciigas al la konkursanto, kiom da naĝendaj lenlongoj li havas ankoraŭ. Okaze de stafetkonkurso ili kontrolas, ĉu la konkursanto estas ankoraŭ en kontakto kun la startejo en la momento, kiam la alceliĝanta samteameno ektuŝas la celvandon.

La du *vegjuĝistoj* designas la prezidanto de la konkursa juĝistaro. Ili havas sian lokon ambaŭflanke de la naĝbaseno kaj kontrolas, ĉu la konkursantoj obeas la regulojn de la naĝospeco aplikendajn en la konkurna disciplino.

La *rezultopublikisto* publikas helpe de laŭtparolilo la konkursrezultojn, kiujn li ricevas de la konkursa sekretario.

Baze de la kvar oficialaj naĝmanieroj, aplikataj en la naĝkonkursoj, la sportbranĉo naĝo dividiĝas en kvin subbranĉojn: brustonaĝo, papilinaĝo, dorsonaĝo, rapidnaĝo kaj miksonaĝo.

A) Brustonaĝo

Kuŝante bruste sur la akvo, la brustonaĝisto antaŭenpuŝas deire de la brusto samtempe ambaŭ siajn manojn sur aŭ sub la akvosurfaco, poste energie dismalfermas flankdirekte la etenditajn brakojn kaj movas ilin rondmove malantaŭen ĝis la femuroj, fine retiras la manojn denove sub la bruston. Dum tio la linio de la ŝultroj restas konstante paralela kun la akvospegulo. Samtempe kun la movo de la brakoj li tiras la krurojn sub la ventron tiel, ke la piedoj estas kunmetitaj (fermitaj) kaj la genuoj dismetitaj (dismalfermitaj), post tio li kike rektigas la krurojn en diskuran pozicion, kion sekvas la kunmeto (kunfermo) de la kruroj en kunkuran pozicion. La supren- kaj malsuprenmovado de la kruroj en la vertikala ebena estas malpermesita. La priskribitaj taktoj de la brako- kaj krurmovo ade ripetiĝas dum la tuta daŭro

de la brustonaĝo kaj ĉiuj tiuj movoj devas disvolviĝi en horizontala ebena. La antaŭenpuŝo de la brakoj kaj la malantaŭenkiko de la kruroj devas okazi sinkrone.

Ĉe la turno kaj alceliĝo la brustonaĝisto devas ektuŝi la vandon ambaŭmane, en la sama alteco, kun horizontalaj ŝultroj. Naĝo sub la akvo, krom nur unu brako- kaj krurmovo post la turno, estas melpermesita.

Disciplinoj:

1. *100-metra vira brustonaĝo*
2. *100-metra virina brustonaĝo*
3. *200-metra vira brustonaĝo*
4. *200-metra virina brustonaĝo*

B) Papilinaĝo

La papilinaĝisto naĝas same surbruste. Ambaŭ brakojn li antaŭensvingas samtempe kaj simetrie super la akvo, kaj same sinkrone kaj simetrie li poste malantaŭentiras ilin en la akvo. La torako kuŝas sur la akvo kaj la linio de la ŝultroj devas esti paralela kun la akvosurfaco. Ĉiun movon ĉe la kruroj li devas fari samtempe kaj simetrie. La ripetita samtempa supren- kaj malsuprenmovo de la kruroj en la vertikala ebena estas permesita.

Ĉe la turnoj kaj alceliĝo li devas ektuŝi la vandon per ambaŭ manoj samtempe kaj en la sama alteco, kun horizontalaj ŝultroj. Post starto kaj turno la papilinaĝisto rajtas fari unu aŭ pli da piedmovo kaj unu brakotiron, per kiuj li leviĝas sur la akvosurfacon.

Disciplinoj:

1. *100-metra vira papilinaĝo*
2. *100-metra virina papilinaĝo*
3. *200-metra vira papilinaĝo*
4. *200-metra virina papilinaĝo*

C) Dorsonaĝo

La dorsonaĝisto atendas la starton en la baseno, tenante sin mane per la startotenilo. Je la startosigno en dorso-sur-akva pozicio li forkikas sin disde la startovando kaj dum la tuta kurumo li devas naĝi surdorse, ĝis la kapo, aŭ la antaŭensvingita mano aŭ brako ektuŝis la vandon ĉe la alceliĝo aŭ ĉe la lenofina turno. Ĉe tiu lasta estas permesite, ke li turnu sin ĉirkaŭ la longakso de sia korpo, post kiam li jam ektuŝis la vandon per la antaŭa parto de la korpo. Post la plenumita lenofina turno li devas retumi sin sur la dorson, antaŭ ol liaj piedoj forlasis la vandon. Koncerne la brako- kaj krurmovon la regularo ne havas antaŭskribojn, ili estas do laŭplaĉaj.

Disciplinoj:

1. *100-metra vira dorsonaĝo*
2. *100-metra virina dorsonaĝo*
3. *200-metra vira dorsonaĝo*
4. *200-metra virina dorsonaĝo*

Ĉ) Rapidnaĝo

La nocio rapidnaĝo signifas, ke la naĝisto rajtas apliki ajnan naĝmanieron al li pleje konvenen, por atingi plej rapide la celon. Ĉe lenofina turno li povas ektuŝi la turnovandon per iu ajn parto de la korpo. Limigoj estas nur ĉe la subbranĉo miksonaĝo, kie la rapidnaĝo ne povas enhavi elementojn el la naĝmanieroj brustonaĝo, papilinaĝo kaj dorsonaĝo.

Disciplinoj:

1. *100-metra vira rapidnaĝo*
2. *100-metra virina rapidnaĝo*
3. *200-metra vira rapidnaĝo*

4. 200-metra virina rapidnaĝo
5. 400-metra vira rapidnaĝo
6. 400-metra virina rapidnaĝo
7. 800-metra rapidnaĝo (nur por virinoj)
8. 1500-metra rapidnaĝo (nur por viroj)
9. 4x100-metra vira stafeta rapidnaĝo
10. 4x100-metra virina stafeta rapidnaĝo
11. 4x200-metra stafeta rapidnaĝo (nur por viroj)

D) Miksonaĝo (kvarnaĝo)

La naĝisto de la miksonaĝaj disciplinoj kaj la kvarmembra miksonaĝa stafetteamo (la kvarnaĝisto kaj la kvarmembra teamo de stafeta kvarnaĝo) naĝas kontinue kvaroble certalongan subdistancon, ĉiun subdistancon laŭ alia antaŭskribita naĝmaniero, en la sekvanta vicordo: papilinaĝo, dorsonaĝo, brustonaĝo kaj rapidnaĝo. En la disciplinoj de la miksonaĝo la rapidnaĝa naĝmaniero devas esti sena je ajna movelemento ĉerpita el la tri aliaj naĝmanieroj.

Disciplinoj:

1. 200-metra vira miksonaĝo (kvarnaĝo)
4x50-metra subdistancoj
2. 200-metra virina miksonaĝo (kvarnaĝo)
Kiel ĉe la vira
3. 400-metra vira miksonaĝo (kvarnaĝo)
4. 100-metra subdistancoj
4. 400-metra virina miksonaĝo (kvarnaĝo)
Kiel ĉe la vira
5. 4x100-metra vira stafeta miksonaĝo (kvarnaĝo)
6. 4x100-metra virina stafeta miksonaĝo (kvarnaĝo)

En la disciplinoj brustonaĝo, papilinaĝo kaj rapidnaĝo la starto okazas per salto. Je la signo de la prezidanto de la konkursa juĝistaro la startontoj paŝas sur la malantaŭan parton de la supro de la startoŝtono. Je la atentigo "prete!" de la startigisto ili okupas startpozicion sur la antaŭa parto de la startoŝtono kaj je la startosigno ili saltas en la akvon kap-al-akve.

La startontaj dorsonaĝistoj startas en la akvo. Je donita signo ili eniras la akvon kaj posteniĝas laŭlonge de kaj vizaĝe al la startovando de la baseno. Je la atentigo "prete!" ili prenas la startotenilon, ĉiu en sia naĝleno, kaj tenas ĝin, sen delasi (malpreni) ĝin ĝis la starto. Post la donita startosigno ili forkikas sin for de la startovando kaj komencas la surdorsan naĝon, mallonge dorsonaĝon.

Depende de la nombro de la sinanoncintoj (anoncitoj) la internaciaj naĝkonkursoj dividiĝas ĝenerale en tri (kvaronfinalo, duonfinalo, finalo), aŭ du (duonfinalo, finalo), eventuale en unu (finalo) etapojn. Kaze de trietapa konkurso la konkurso komenciĝas per la kvaronfinalaj antaŭkurumoj (1-a etapo). La distribuo de la ensemblo, nome la egalnombra divido de la pli fortaj kaj malplifortaj naĝistoj en la unuopajn antaŭkurumojn okazas laŭ precizaj antaŭskriboj celantaj la plejan realecon kaj senpartiecon. Kiel bazo servas al tio la plej bonaj pli fruaj rezultoj de la konkursantoj.

La duonfinalajn mezkurumojn oni kunmetas

a) ĉe la disciplinoj kun 100-metra naĝdistanco el po du avanuloj de la disvolvigitaj antaŭkurumoj;

b) ĉe la disciplinoj kun 200-metra aŭ pli granda naĝdistanco el difinita nombro da konkursantoj plenumintaj la antaŭkurumojn kun absolute plej bonaj temporezultoj.

La finalon eniras tiom da avanaĵaj konkursantoj (elektitaj laŭ la supraj metodoj a) aŭ b), kiom da lenoj havas la neĝvego.

Ene de unu kurumo la distribuo de la konkursantoj en la naĝlenojn okazas laŭ la sekvanta maniero. La plej bona naĝisto resp. teamo naĝas en la meza leno, se la lenonombro estas malpara kaj en la 4-a aŭ 3-a, se la vego estas 8- resp. 6-lena. La dua plej bona naĝas maldekstre, kaj la tria naĝas dekstre de la plej bona naĝisto, kaj tiel plu.

La stafetajn naĝojn plenumas kvarmembraj stafetteamoj.

La mondfederacio de la sportobranĉoj naĝo, plongo, akvopilkado kaj arta naĝo, unuvorte tiu de la naĝosporto estas: Fédération Internationale de Natation Amateur, mallongite FINA. (Bsp-e: Internacia Amatora Naĝista Federacio.)

FINA rezervas por si la rajton aranĝi la olimpikajn ĉampionadojn kaj la tn. region-ĉampionadojn (ekz. Eŭropo-ĉampionado, Karibregion-ĉampionado, Ameriko-ĉampionado ktp.) de naĝo (mondĉampionado de naĝo ĝis nun ne estis aranĝita, sed estas planata). FINA mem funkcias kiel aranĝkomitato ĉe la olimpika ĉampionado kaj delegas membron en la aranĝkomitaton de la region-ĉampionadoj de naĝo. Tiu delegito havas la taskon zorgi pri tio, ke ĉiuj antaŭskriboj kaj reguloj de FINA estu obeataj dum la ĉampionado.

Kaze de levitaj protestoj kontraŭ konkursantoj aŭ membroj de la konkursa juĝistaro (la proteston oni devas skribe transdoni al la prezidanto de la konkursa juĝistaro) la aranĝkomitato ekfunkcias kiel apelkomitato kaj faras siajn neapeleblajn decidojn.

Al la olimpikaj naĝoĉampionadoj ĉiu lando povas anonci (enskribigi) po unu konkursanton por ĉiu el la disciplinoj, senkonsidere de ties plej bona pli frua temprezulto. Se iu lando intencas anonci pli ol unu, maks. 3 konkursantojn, tiam ĉiuj anoncitoj devas havi jam plenumitan temporezulton konforman al la temponormo difinita fare de FINA.

Por ĉiu teama disciplino estas anoncebla nur po unu teamo el ĉiu lando, sed ili devas esti elektitaj el la permesita maksimume 38-membra vira resp. 55-membra virina naciaj trupoj de la lando. Tiuj nombroj inkluzivas ĉiujn konkursantojn partoprenantajn en la diversaj disciplinoj de ĉiuj kvar sportobranĉoj de la naĝosporto.

Al la Eŭropo-ĉampionado ĉiu nacio rajtas anonci po 2 konkursantojn por ĉiu disciplino, sen limigoj.

En la olimpikaj naĝkonkursoj aĝlimigo ne estas. En la Eŭropo-ĉampionado de neĝo la junulara aĝkategorio estas kalkulata ĝis la fino de la 15-a jaro. Ekde la komencita 16-a jaro la konkursanto estas jam konsiderata plenkreska naĝisto.

Esprimoj: Konkurso de naĝo aŭ naĝkonkurso. Olimpika ĉampionado de naĝo. Ĉampionino de naĝo aŭ naĝoĉampionino. Mondĉampiono de la 100-metra virina dorsonaĝo. Olimpika rekordo (Eŭropo-rekordo, mondrekordo) de 400-metra vira rapidnaĝo. Eŭropo-ĉampiona teamo de la 4x100-metra virina stafeta miksonaĝo (4x100-metra virina stafeta kvarnaĝo). En la bulgara nacia naĝotrupo, partoprenanta la Eŭropo-ĉampionadon de naĝo, estas reprezentataj tri sportobranĉoj de la naĝosporto, nome la naĝo, la plongo kaj la akvopilkado. La nederlanda olimpika nacia naĝotempo alvenis.

PAFO

Uzante la pafilon permesitan en la koncerna disciplino kaj tenante sin en la antaŭskribita korpopozicio (kuŝa, stara aŭ genua pozicio), la pafisto faras difinitan nombron da pafoj sur senmovajn aŭ moviĝantajn celtabulojn, respektive sur suprenĵetitajn argildiskojn dum certa tempodaŭro kaj klopodas atingi plejeble multe da trafoj kun alta valoro.

La plenumo de unu pafado havas tri fazojn, nome la ŝargon, la *celadon* kaj la *elpafon*.

Depende de la tipo, la pafado estas ŝargebla aŭ per unuopa(j) *kartoĉo(j)* (unu, du aŭ ses), aŭ per *kartoĉujo* entenanta certan nombron da kartoĉoj. Post la ŝargo oni streĉas la pafisorton, kondiĉe ke tio jam ne okazis aŭtomate dum la ŝargo.

Antaŭ ĉiu unuopa pafado la pafisto kun koncentrita atento celas per unu okulo la trafendan celon. La preciza celado kaj sukcesa trafo postulas bonegan okulon kaj trankvilajn nervojn.

La mekanika kondiĉo de la preciza celado estas, ke la celnoĉo (troviĝanta sur la *celilo*), la *celgrajno* (ĉe la ekstremo de la pafitubo) kaj la mezo de la celo konsistigu tri punktojn de sama geometria linio. Ĉe pafado al pli granda distanco ol 100 m-oj estas necese, ke la celilo estu alĝustigita al la celdistanco.

Dum konstanta celado okazas la elpafado. Sekve de delikata, grada premo de la montra fingro sur la klavon, ĉe unu punkto malfiksiĝas la streĉita *pafisorto* kaj ĝia liberiĝinta forto antaŭenpuŝas la frapobolton (ĉe kelkaj pafiloj la ĉanon) kontraŭ la *prajmon*. La forta frapo ekbruligas la eksplodmaterialon de la prajmo, sekve de kio ekbrulas ankaŭ la pulvo en la *kuglujo* de la kartoĉo. La disprema forto de la ekestanta gaso elĵetas la kuglon tra la tubo kun kreskanta rapideco.

Apartaj antaŭskriboj instrukcias en okazo de *paneo*, t.e. neatendita nefunkcio pro difekto en la pafilo aŭ pro la neekbrulo de la prajmo (la pafilo paneis, alivorte malpafis).

La trejnoj kaj konkursoj de la sportobranĉo pafado disvolviĝas en *pafejoj* instalitaj laŭ la bezonoj de la koncernaj pafdisciplinoj, la lastaj sub la direktado de la *gvida juĝisto*.

La pafejo havas du ĉefajn partojn, nome la pafstacion kaj la indikejon, respektive — ĉe diskopafado — la ĵetejon. En la *pafstacio* troviĝas la *paflokoj*.

La nombro, mezuroj kaj interdistanco de la paflokoj, kiel ankaŭ iliaj formoj kaj instalaĵoj varias laŭ la postuloj de la unuopaj pafdisciplinoj.

En la *indikejo* aŭ *indikstacio* — ĝenerale en trafsekura ŝirmejo — troviĝas la *indikistoj*, kiuj interŝanĝas aŭ movas la celtabulojn kaj indikas (komunikas) la trafojn parole, telefone, per *indikodiskoj* aŭ sur elektra montrotabulo, laŭ internacie valida, ĉe ĉiu subbranĉo aparte difinita indiksistemo.

En la *ĵetejo* aŭ *ĵetstacio* staras la maŝinoj, kiuj — funkciigataj helpe de elektra aŭ mekanika teledirektado — ĵetas la argilajn diskojn. Ankaŭ la ĵetejo estas en trafsekura ŝirmejo, sub la nivelo de la tersurfaco.

La pafado okazas sur *celtabulojn* aŭ sur *argildiskojn*.

La celtabuloj — konforme al la karaktero de la unuopaj pafdisciplinoj — estas aŭ cirklaĵoj aŭ figuraj. Ili estas interŝanĝeblaj kaj iuj ankaŭ moveblaj.

Ĉiu speco de la cirklaĵoj konsistas el dek koncentraj cirkloj kun egala diferenco inter la sinsekvaj radiusoj. La ringoforman spacon inter du cirkloj kaj ankaŭ la areon de la plej interna cirklo oni nomas *trafkampo*, aŭ *cirklokampo*, aŭ mallonga nur *cirklo*. La cirkloj havas diversan valoron, nomatan *cirklovaloro*. La plej interna cirklo havas la valoron de 10 *unuoj*, alivorte la cirklovaloro de la plej interna cirklo estas 10. La valoro de la sekvantaj cirkloj estas laŭvice 9, 8, ... ktp. unuoj kaj la plej ekstera cirklo valoras 1 unuon. Komprenibile la trafoj havas tiun cirklovaloron, en kiu cirklo ili troviĝas. Post la plenumo de la antaŭskribita nombro da pafadoj oni adicias la cirklovaloron de la unuopaj trafoj, por konstati la definitivan *trafrezulton* de la pafado. La pafrezulton oni esprimas per la suma cirklovaloro, mezurata en cirklounuoj.

Ekz. la pafisto plenumis sume 352 cirklounuojn, alivorte lia trafrezulto estas 352 cirklounuoj.

La numero de la cirkloj samas kun ilia cirklovaloro. Oni diras do: cirklo 9, cirklo 5; trafo en la cirklo 4, ktp. Certa nombro da internaj cirklokampoj (ekde cirklo 4 aŭ 5) estas nigraj kaj la ceteraj — blankaj. Validas ĝenerale nur la trafoj en la cirkloj 10, 9 kaj 8. La pafisto mistrakis la celon, se la trafo estas ekster la cirklo 1. La pafon sur cirklan celtabulon oni nomas mallonge punktopafo, kontraste al la figurpafo. En la diversaj pafdisciplinoj oni uzas diversmezurajn cirklojn celtabulojn, konformajn al la pafdistanco kaj pafitipo. Ilian mezuron oni difinas per du nombroj dividitaj per oblikva frakcistreko (ekz. 46/31 mm). La unua nombro donas la diametron ĉe la plej granda cirklo kaj la dua tiun de la plej granda nigra cirklo.

Koncerne la figurajn celtabulojn, en internaciaj konkursoj oni uzas du tipojn: a) la tn. olimpikan ombrofiguron, kiu reprezentas homan figuron de 160 cm-a alto kaj 45 cm-a larĝo. En la mezo de la figuro troviĝas 10x15 cm-ojn granda ovala trafkampo kun cirklovaloro de 10 unuoj, kaj ĉirkaŭ ĝi 9 koncentraj ovaloj kun amplekso grade kreskanta je 10 resp. 15 cm-oj, kaj kun la cirklovaloro de 9 ĝis 1 unuoj; b) la figuron de apro (v. detale ĉe la koncerna disciplino).

Pri la argildiskoj informas la priskribo de la diskopafaj disciplinoj.

Konsidere, ke la pafekzercoj disvolviĝas dum uzado de vivdanĝeraj pafiloj, en la tuta pafejo devas regi ordo kaj disciplino. Ĉiuj aktivadoj de la pafistoj, indikistoj ktp. estas strikte antaŭskribitaj, kaj ili faras ĉion je komandovortoj aŭ komandosignoj donitaj de la gvida juĝisto.

En certa nombro de la ĉisubaj subbranĉoj oni trovas aparte virajn kaj virinajn disciplinojn. La ceterajn disciplinojn, kie la vira aŭ virina karaktero ne estas indikita, povas partopreni kaj viraj kaj virinaj pafistoj kun egala taksa do.

La konkursoj en ĉiuj disciplinoj povas esti kaj individuaj kaj teamaj.

La sportbranĉo pafado dividiĝas en la sekvantajn 12 subbranĉojn:

- A) Pafado per aerfusilo
- B) Pafado per norma etkalibra fusilo
- C) Pafado per etkalibra sportfusilo
- Ĉ) Pafado per militfusilo
- D) Pafado per grandkalibra sportfusilo
- E) Pafado per aerpistolo
- F) Pafado per norma pistolo
- G) Pafado per sportpistolo
- Ĝ) Pafado per grandkalibra pistolo
- H) Pafado sur kurantan apron
- I) Diskopafado laŭ trapa sistemo
- J) Diskopafado laŭ skida sistemo

A) Pafado per aerfusilo

Estas uzebla ajnatipa piŝtoĥava, 4,5 mm-ojn kalibra fusilo, funkcia per premo de aero aŭ karbondioksido. Maksimuma pezo: 5 kg-oj. La celgrajnon ĉirkaŭprenas maks. 5 cm-ojn longa kaj 2,5 cm-ojn diametra tn. celgrajnotunelo, kio ebligas pli precizan celadon. La celilo povas esti fermita aŭ nefermita. La uzo de la fusilrimeno aŭ alia apogilo resp. fiksilo ne estas permesita. Pafaĵo: kartoĉo kun kuglo el plumbo aŭ alia mola materio.

La pafado okazas al 10 metroj, sur 46/31 mm-an cirklan celtabulon.

Disciplinoj:

1. *Vira pafado per aerfusilo*

10/40 (10 provaj kaj 40 taksataj) pafado en stara pozicio dum 1 horo kaj 30 minutoj.

2. *Virina pafado per aerfusilo*

Kiel ĉe la vira pafado.

B) Pafo per norma etkalibra fusilo

Estas uzebla ajnatipa, 5,6 mm-ojn kalibra fusilo kun maks. pezo de 5 kg-oj, kaj kun celgrajnotunelo maks. 5 cm-ojn longa kaj 2,5 cm-ojn diametra. La celnoĉo resp. la celilo povas esti nefermita aŭ fermita. La uzo de la fusilrimeno estas permesita krom en la stara pozicio. Pafaĵo: ajnatipa plumbokugla kartoĉo.

La pafo okazas al 50 m-oj, sur 162,4/112,4 mm-an cirklan celtabulon.

Disciplinoj:

1. *Vira kuŝa pafo per norma etkalibra fusilo*

15/60 pafoj, ĉiu estas taksata pafo sur apartan celtabulon. Paftempo: 2 horoj.

2. *Virina kuŝa pafo per norma etkalibra fusilo*

Kiel ĉe la vira pafo.

3. *Vira kunmetita pafo per norma etkalibra fusilo*

Po 6/20 pafoj en ĉiuj tri pozicioj, ĉiu estas aparta pafo sur apartan celtabulon. Paftempo: 2 horoj kaj 30 minutoj.

4. *Virina kunmetita pafo per norma etkalibra fusilo*

Kiel ĉe la vira pafo.

C) Pafo per etkalibra sportfusilo

Estas uzebla ajnatipa, 5,6 mm-ojn kalibra fusilo kun suma pezo de 8 kg-oj. Iajjn-tipa celadinstalaĵo estas permesita krom tiu optika. Pafaĵo: kartoĉo kun kuglo el plumbo aŭ alia mola materio.

La pafo okazas al 50 m-oj sur 162,4/112,4 mm-an cirklan celtabulon.

Disciplinoj:

1. *60-pafa kuŝa pafo per etkalibra sportfusilo*

15/60 pafoj, ĉiu taksata pafo sur apartan celtabulon. Paftempo: 2 horoj.

2. *40-pafa kuŝa pafo per etkalibra sportfusilo*

10/40 pafoj, ĉiu pafo sur apartan celtabulon krom tiuj provaj. Paftempo: 1 horo kaj 30 minutoj.

3. *40-pafa stara pafo per etkalibra sportfusilo*

10/40 pafoj, ĉiu pafo aŭ ĉiu po du pafoj sur apartan celtabulon. Paftempo: 2 horoj.

4. *40-pafa surgenua pafo per etkalibra sportfusilo*

10/40 pafoj, ĉiu pafo aŭ ĉiu po du pafoj sur apartan celtabulon. Paftempo: 1 horo kaj 45 minutoj.

5. *120-pafa kunmetita pafo per etkalibra sportfusilo*

Po 10/40 pafoj en ĉiuj tri korpopozicioj, ĉiu pafo aŭ ĉiu po du pafoj sur apartan celtabulon. Paftempo: 5 horoj kaj 30 minutoj.

Ĉ) Pafo per militfusilo

Estas uzebla ajnatipa, maks. 8 mm-ojn kalibra fusilo kun maks. pezo de 5 kg-oj kaj longo de 1,25 m-oj. Ĝi povas havi ajnatipan nefermitan aŭ fermitan celilon. Pafaĵo: metalkugluja kartoĉo.

La pafo okazas al 300 m-oj, sur 100/160 cm-an cirklan celtabulon.

Disciplino:

Pafo per militfusilo

Po 6/20 pafoj en ĉiuj tri korpopozicioj, po 10 pafoj sur unu celtabulon. Paftempo: 2 horoj kaj 30 minutoj.

D) Pafo per grandkalibra sportfusilo

Estas uzebla ajnatipa, maks. 8 cm-ojn kalibra fusilo kun maks. 8 kg-a pezo. La celilo povas esti nefermita aŭ fermita. Uzo de optika celadinstalaĵo estas malpermesita. Pafaĵo: metalkugluja

kartoĉo.

La pafado okazas al 300 m-oj, sur 100/160 cm-an cirklan celtabulon. En ĉiuj 4 disciplinoj oni plenumas po 10 taksatajn pafadojn sur unu celtabulon.

Disciplinoj:

1. *Kuŝa pafado per grandkalibra sportfusilo*

10/40 pafadoj dum 1 horo kaj 30 minutoj.

2. *Stara pafado per grandkalibra sportfusilo*

10/40 pafadoj dum 2 horoj.

3. *Surgenue pafado per grandkalibra sportfusilo*

10/40 pafadoj dum 1 horo kaj 45 minutoj.

4. *Kunmetita pafado per grandkalibra sportfusilo*

Po 10/40 pafadoj en ĉiuj tri korpopozicioj dum 5 horoj kaj 30 minutoj.

E) Pafado per aerpistolo

Estas uzebla ajnatipa piŝtoĥava, 4,5 mm-ojn kalibra pistolo, funkcia per premo de aero aŭ karbondioksido, kun la maksimumaj mezuroj de 42 cm-a longo, 20 cm-a alto, 5 cm-a larĝo kaj 1,5 kg-a pezo. La pafado okazas al 10 m-oj, sur 156/60 mm-an cirklan celtabulon.

Disciplinoj:

1. *Vira pafado per aerpistolo*

10/40 pafadoj en stara pozicio, po du taksataj pafadoj sur unu celtabulon. Pafotempo: 1 horo kaj 30 minutoj.

2. *Virino pafado per aerpistolo*

Kiel ĉe la vira pafado.

F) Pafado per norma pistolo

Estas uzebla ajnatipa, 5,6 mm-ojn kalibra pistolo aŭ revolvero, kun maksimumaj mezuroj de 153 mm-a tublongo kaj 1,36 kg-a pezo. Uzo de optika celadinstalaĵo ne estas permesita. Pafado: "Long Rifle" kartoĉo kun kuglo el plumbo aŭ alia mola materio.

La pafado okazas al 25 m-oj.

Disciplinoj:

1. *Virina 30+30-pafa kunmetita stara pafado per norma pistolo*

La disciplino konsistas el du malsamaj pafokzercoj: a) 5/30 pafadoj sur 50/20 cm-an cirklan celtabulon, po 5 pafadoj sur unu celtabulon. Post 5 provaj pafadoj dum 8 minutoj sekvas 6 kvinpafaj serioj sur apartajn celtabulojn dum po 6 minutoj.

b) 5/30 rapidpafadoj sur 160/45 cm-an homfiguranta celtabulon (olimpikanta ombrofiguranta). Post unu kvinpafa serio el provaj pafadoj sekvas 6 kvinpafaj taksataj serioj, ĉiuj 30 pafadoj sur la saman celtabulon. Kaj la provaj kaj la taksataj pafadoj estas plenumadaj dum po 3 sekundoj, kun 7-sekundaj paŭzoj.

2. *20+20+20-pafa kunmetita stara pafado per norma pistolo*

La pafado okazas sur 50/20 cm-an cirklan celtabulon. Post sume 5 provaj pafadoj, plenumitaj dum 150 sekundoj, sekvas 3x4 kvinpafaj taksataj serioj, plenumadaj: la unuaj 4 serioj dum po 150 minutoj, la duaj 4 serioj dum po 20 minutoj kaj la triaj 4 serioj dum po 10 minutoj, ĉiam po 5 pafadoj sur unu celtabulon.

G) Pafado per sportpistolo

Estas uzebla ajnatipa, 5,6 mm-ojn kalibra pistolo sen pezolimo, kun ajnasistema celadinstalaĵo krom tiu optika. Pafado: plumbokugla kartoĉo.

La pafado okazas al 50 m-oj, sur 50/20 cm-an cirklan celtabulon, en stara pozicio.

Disciplino:

Pafado per sportpistolo

15/60 pafoj, po 5 taksataj pafoj sur unu celtabulon. Paftempo: 2 horoj kaj 30 minutoj.

Ĝ) Pafopostoj per grandkalibra pistolo

Estas uzebla ajnatipa pistolo aŭ revolvero kun kalibro de 7,62 ĝis 9,65 mm—oj kaj kun limigita tublongo. La pafopostoj okazas al 25 m-on.

Disciplino:

Pafopostoj per grandkalibra pistolo

La disciplino konsistas el du malsamaj pafekzercoj:

- a) 5/30 pafopostoj sur 50/20 cm-an cirklan celtabulon en stara pozicio. Post 5 provaj pafopostoj dum 8 minutoj sekvas 6 kvinpafaj serioj dum po 6 minutoj.
- b) 5/30 rapidpafopostoj sur 160/45 cm-an celtabulon (olimpikan ombrofiguron), en stara pozicio. Post unu kvinpafa prova serio sekvas 6 kvinpafaj taksataj serioj, ĉiuj serioj dum po 3 sekundoj, kun 7-sekundaj paŭzoj.

H) Pafopostoj sur kurantan apron

La pafisto, starante en la pafstacio regule aranĝita, pafas al celtabulo montranta apron kurantan ripetite de dekstre maldekstren, poste de maldekstre dekstren, 50 m-ojn antaŭ la pafstacio, kun ĝi paralele. En la indikejo la celtabulo trakuras 10-metran malfermaĵon inter du pafrezistaj muroj, dum 5 sekundoj en la malrapidaj kaj dum 2,5 sekundoj en la rapidaj kurumoj. Unu trakuro estas nomata kurumo. Unu aŭ du pafopostoj estas plenumendaj, dum la apro estas videbla en la malfermaĵo. En la mezo de la aprofigura celtabulo estas lokita ŝanĝebla cirkla celtabulo kun 10 cirkloj de 2,5 ĝis 25 cm-ojn radiusaj. En la indikejo la trafopostoj oni montras per diverskoloraj indikdiskoj. Nome la diskon la indikisto metas sur la trafon kaj la koloro de la disko indikas la trafvaloron.

Estas uzebla ajnatipa aŭtomata aŭ neaŭtomata, 5,6 mm-ojn kalibra fusilo kun maks. 5 kg-a pezo. Ĉiaspeca celilo aŭ cellorno estas uzeblaj. Pafopostoj: 5,6 mm-a kartoĉo havanta kuglujon kun centra aŭ periferia prajmo.

Disciplino:

Pafopostoj sur kurantan apron

I) Diskopafopostoj laŭ trapa sistemo (vulg. trapopafopostoj)

La diskopafisto laŭ trapa sistemo (vulg. trapistoj) pafas en stara pozicio sur argilajn diskojn suprenĵetitajn per specialaj ĵetmaŝinoj.

La diskopafopostoj laŭ trapa sistemo konsistas el la ĵetstacio kaj la pafstacio.

La ĵetstacio estas rekta foso, en kiu troviĝas 15 ĵetmaŝinoj en 5 triopaj grupoj. La mezaj maŝinoj de la grupoj staras 5 metrojn diste unu de la alia. La maŝinojn funkciigas manipulistoj per elektro, aŭ mekanike. Ili restadas en konvena loko, por vidi kaj aŭdi la pafopostojn. La direkto kaj alteco de la ĵettrajektorio estas antaŭskribitaj. La mezuroj de la argilaj diskoj estas: diametro = 11 cm-oj, dikeco = ĉ. 25 mm-oj, pezo = ĉ. 100 gr-oj.

En la pafstacio, 15 m-ojn distance de la ĵetstacio, fronte al la mezaj maŝinoj de la maŝingrupoj troviĝas 5 pafopostoj.

La konkursoj disvolviĝas en sespersionaj pafgrupoj, en kiujn estas dividitaj la membroj de la diverslandaj teamoj.

La devigan nombron da diskoj la pafistoj pafas en 25-opaj serioj, sen provaj pafopostoj.

Ĉe la komenco de la pafserio 5 pafistoj de la sama pafgrupo okupas la 5 pafopostojn. La sesa membro atendas ĉe la 1-a (plej maldekstra) pafopostoj. Je la startosigno de la gvida ĵetisto la pafistoj en la pafopostoj petas sian diskon per interkonsentita komandovorto, post kio tiu devas esti tuj ĵetata. La maŝintriopo ĵetas ĉiujfoje nur unu diskon, alterne iu el la tri maŝinoj. La

pafistoj en la pafloko faras unu aŭ du pafojn sur sian propran diskon. La disko estas rigardebla trafita, se videble parto disiĝas de ĝi, aŭ se ĝi tute disrompiĝas,

Pafinte, la pafisto en la unua pafloko transdonas la lokon al la atendanta sesa grupano kaj iras al la dua pafloko. Simile agas ankaŭ la ceteraj; la pafinto en la kvina pafloko iras atendi al la unua pafloko. Ĉio ĉi ripetiga, ĝis ĉiu pafis sur siajn 25 diskajn (ĉu trafinte ilin, ĉu ne).

Uzebla estas ajnatipa ĉasfusilo kun ŝrota kartoĉo ĝis 12 mm-a kalibro, 70 mm-a kartoĉlongo kaj 2,5 mm-a ŝrotdiametro. Uzo de nigrafuma pulvo kaj lumspura kartoĉo estas malpermesita.

Disciplinoj:

1. *Vira individua diskopafilo laŭ trapa sistemo*

200 diskaj en 8 serioj.

2. *Virina individua diskopafilo laŭ trapa sistemo*

Kiel ĉe la vira diskopafilo.

3. *Vira teama diskopafilo laŭ trapa sistemo*

150 diskaj en 6 serioj.

4. *Virina teama diskopafilo laŭ trapa sistemo*

Kiel ĉe la vira diskopafilo.

En la praktiko unue oni disvolvas la teaman disciplinon, kiu servas samtempe ankaŭ kiel selekta antaŭfinalo por la individua disciplino. La individuan disciplinon partoprenas jam nur certa nombro de avanaĵ klasitoj, kiuj pafas jam nur la ankoraŭ mankantajn 2 seriojn.

J) Diskopafilo laŭ skida sistemo

(vulg. skidopafilo)

Sekvante la regulojn de sia disciplino la diskopafisto laŭ skida sistemo (vulg. skidisto) pafas en stara pozicio sur difinitan nombron da argilaj diskaj suprenĵetitaj per specialaj ĵetmaŝinoj.

En la diskopafilo laŭ skida sistemo (vulg. skidopafilo) troviĝas 8 paflokoj. 7 el ili, kun 8-metra interdistanco unu de la alia, situas sur la arko de cirklo havanta 12,20 m-an radiuson. La 8-a pafloko situas proksime de la cirklocentro.

La paflokojn signas simplaj palisetoj fiksitaj en la grundo.

La diskaj estas ĵetitaj el du ĵetoturoj. La 1 m-on alta turo staras proksime de la 1-a (plej maldekstra) pafloko kaj la 3 m-ojn alta troviĝas proksime de la 7-a pafloko. La ĵettrajektorioj estas antaŭskribitaj. La funkciigo de la ĵetmaŝinoj, la diskomezuroj kaj la uzeblaj pafiloj estas la samaj, kiel tiuj ĉe la diskopafilo laŭ trapa sistemo.

La konkursoj disvolviĝas en kvinmembraj pafgrupoj. La grupo komencas la pafon ĉe la 1-a pafloko. Laŭ fiksa vicordo ĉiu pafas po unu pafon sur diskon ĵetitan unue el la alta, poste el la malalta turoj. Post tio la grupo iras al la 2-a, 5-a ktp. paflokoj kaj agas same.

Fininte la pafon ĉe la 8-a pafloko, la grupo denove vizitas la 1-an, 2-an, 6-an kaj 7-an paflokojn, kie unu post la alia ĉiu faras po du pafojn (rapidpafojn) sur du diskajn ĵetitajn sinkrone el la du turoj.

Disciplinoj:

1. *Vira individua diskopafilo laŭ skida sistemo*

200 diskaj en 8 serioj.

2. *Virina individua diskopafilo laŭ skida sistemo*

Kiel ĉe la vira diskopafilo.

3. *Vira teama diskopafilo laŭ skida sistemo*

150 diskaj en 6 serioj.

4. *Virina teama diskopafilo laŭ skida sistemo*

Kiel ĉe la vira diskopafilo.

En la praktiko oni disvolvas unue la teaman disciplinon, ktp., kiel ĉe la diskopafilo laŭ trapa

sistemo.

La mondorganizo de la sportbranĉo pafo estas: Union Internationale de Tir (UIT), Esperante: Internacia Pafista Unio.

Esprimoj: Pafkonkurso. Mondĉampionado de pafo per militfusilo. Olimpikoĉampiona teamo de pafo per sportpisto. La tri avanaj klasitoj de la Eŭropo-ĉampionado de pafo per grandkalibra sportfusilo. En la disciplino vira kuŝa pafo per norma etkalibra fusilo de la Kopenhaga internacia pafkonkurso venkis la svisa konkursanto N.N. kun sume 583 cirkloj; la trafrezulto de la dualoka klasito estis 567 cirkloj. En la Eŭropo-ĉampionado de pafo de jaro 1967 en Amsterdamo, en la disciplino virina individua diskopafo laŭ trapa sistemo venkis la itala s-ino N.N. kun la suma trafrezulto de 178 diskoj.

PIEDPILKADO

Sur ludkampo kun difinitaj mezuroj kaj dum fiksita tempodaŭro du teamoj, konsistantaj el po 11 ludistoj, vetludas unu kontraŭ la alia, nome obeante la internacie antaŭskribitajn 17 regulojn de la sportobranĉo piedpilkado ili strebas sendi la pilkon pere de superece stakema ludo en la kontraŭulan golejon, respektivo klopodas malhelpi per konvene forta defendludo, ke la kontraŭula teamo povu elbatali golon, priludante la pilkon kaj en la ataka kaj en la defenda ludo unuavice per la piedoj, eventuale per la kapo, sed — escepte la golulon — neniam per la manoj.

La piedpilkado (vulg. futbalo) estas unu el la mondscale plej disvastiĝintaj kaj popularaj sportaj ludoj, altiranta en tre multaj landoj eksterordinare grandan nombron da simpatiantoj. Speciala — konsiderinde grandnombra — kategorio de tiuj simpatiantoj estas la t.n. *zelotoj*, kiuj fanatike kaj kvazaŭ sektece solidaras kun sia favorata teamo, ĉeestas ties matĉojn, laŭte entuziasmigante la ludistojn kaj sentas iliajn venkon aŭ malvenkon siaj propraj venko aŭ malvenko.

La piedpilko-teamo (vulg. futbalteamo, futbal-dekunuo) konsistas el unu golulo kaj dek *kampludistoj*. Kvankam la regularo ne distingas, oni kutimas diferencigi inter ili — konforme al iliaj taskoj — avanulojn, halfojn kaj arierulojn.

La *golulo* — starante en la *golejo*, aŭ en ĝia senpera proksimeco — faras ĉion eblan, por malhelpi golon en sia golejo. Al tio li uzas sian tutan korpon, klopodante — se eble — mane kapti la pilkon, flugantan aŭ ruliĝantan en la golejon. Brave plenumitaj *paratoj* (per kapto aŭ forbato), kelkfoje helpe de virtuozaĵaj sinĝetoj, vekas merititan ovacion flanke de la spektantaro. Sukcese kaptinte la pilkon, direktitan al la golejo, la golulo elkikas (elsendas per piedfrapo) aŭ elĵetas ĝin el la golejareo en la ludkampon.

La tasko de la avanuloj estas ĉiam pli proksimiĝi al la kontraŭula golejo helpe de harmonia interludo, por en la plej konvena momento ŝoti, kiki aŭ kapumi la pilkon en la reton de la golejo. Harmonia estas la ludo inter la samteamaj ludistoj, se ili pasigas la pilkon per precize alcelitaj kikoj unu al la alia kun celkonscia taktiko, nome laŭeble al tiu, kiu estas momente en libera pozicio (nekovrata). Intertempe ne mankas okazoj, kiam la ludisto estas devigata konduki sola la pilkon, *driblante* ĝin duma certa tempo, ĝia li povas pasigi (transludi) ĝin al iu el la kunludantoj. “Dribli” signifas superruzi la kontraŭulon per lertaj piedfintoj kaj tiamaniere malhelpi lin akiri la pilkon. “Ŝotas” la piedpilkisto, kiam per forta ekmovado li pafe kikas (piedfrapas) la pilkon, plej ofte celante la golejon, aŭ plenumante *liberan ŝoton*.

La tasko de la *arieruloj* estas malhelpi, ke la kontraŭulaj avanuloj povu porti la pilkon en la proksimecon de ilia golejo. Per lerta ludo ili rabas la pilkon for de la atakantaj avanuloj, alivorte ili *depilkas* la kontraŭulon, kaj per t.n. *liberiga ŝoto* — se eble — ili sendas ĝin al la transa duonkampo, aŭ almenaŭ transludas ĝin al proksima samteamano.

La *halfoj* helpas laŭnecese al la avanuloj en la atako, aŭ al la arieruloj en la defendludo.

En la klasika piedpilkado la skemo de la posteniĝo de la kampludistoj estis la sekvanta.

En la plej antaŭa batallinio, nomata *linio de la avanuloj*, aŭ *avanula linio* ludis 5 ludistoj. Jen ilia nomo laŭ vicordo komencata da maldekstre:

1. *Maldekstra avanulo* (vulg. maldekstra sturmanto, m. alulo, m. ekstremulo)
2. *Mezmaldekstra avanulo* (vulg. mezmaldekstra sturmanto)
3. *Meza avanule* (vulg. meza aturmanto, centrulo)
4. *Mezdekstra avanulo* (vulg. kiel ĉe 2.)
5. *Dekstra avanulo* (vulg. kiel ĉe 1.)

En la meza linio, nomata *linio de la halfoj*, alinome *halfa linio*, ludis 3 ludistoj:

1. *Maldekstra halfo* (vulg. maldekstra mezludisto, m. mezulo)
2. *Meza halfo* (vulg. centra mezludisto, centra mezulo, centrohalfo)

3. *Dekstra halfo* (vulg. kiel ĉe 1.)

La malantaŭan batallinion, nomatan *linio de la arieruloj*, alinome *arierula linio* konsistigas du ludistoj, nome la

1. *Maldekstra arierulo* (vulg. maldekstra defendanto) kaj la

2. *Dekstra arierulo* (vulg. kiel ĉe 1.)

La modernstila piedpilkado konservis el la klasika ludostilo la tri batalliniojn, sed la nombro de la ludistoj ene de tiuj linioj alternas laŭ la sistemo, aplikata el la pluraj modernaj ludsistemoj. Unu el la plej disvastiĝintaj ludsistemoj estas la t.n. sistemo 4-2-4, kie en la avanula linio mankas la meza avanulo, el la halfa linio mankas la meza halfo kaj en la arierula linio ludas kiel plusaj, la mezmaldekstra kaj la mezdekstra arieruloj.

La piedpilkoludo, ludata inter du teamoj, estas nomata *piedpilko-matĉo* (vulg. futbalmatĉo). La matĉo disvolviĝas sur *piedpilko-ludkampoj*, mallonge *ludkampoj* 100-110 m-ojn longa kaj 64-75 m-ojn larĝa. La du longaj limoj de la ludkampoj estas nomataj *flanklinioj*, la du mallongaj estas la *gollinioj*, kaj estas indikitaj — same kiel ĉiuj ĉisube menciitaj ceteraj linioj de la ludkampoj — per dika blanka strio. La ludkampoj estas dividita en du *duonkampojn* per la *mezlinio*, ĉe kies ambaŭ ekstretoj staras flagoj.

Meze de ambaŭ gollinioj staras po unu *golejo* el du vertikalaj *fostoj* ĉ. 10 cm-ojn dikaj, kun ĉ. 7,4 m-a interspaco. La du vertikalajn fostojn supre interligas horizontala *kverfosto* samdika en 2,5 m-a alto. (La du vertikalajn fostojn oni nomas: flankaj golejfosto, mallonge flankfosto, kaj tiun horizontalan: supra fosto aŭ kverfosto.) Fone de la golejo reto haltigas la pilkon.

Ĝis 5,5 m-oj antaŭ, dekstre kaj maldekstre de la golejo (t.e. en 5,5x18,5 m-a amplekso) etendiĝas la t.n. *golej-areo*. Nur ene de tiu areo la golulo havas la rajton mane tuŝi la pilkon.

Ĝis 16,5 m-oj antaŭ kaj dekstre resp. maldekstre de la golejo (t.e. en 16,5x40,5 m-a amplekso) etendiĝas la t.n. *punareo* kaj 11 m-ojn antaŭ la mezo de la golejo estas indikita la *punpunkto*. Ĉiu pli grava malregulaĵo, kulpita ene de la punareo far la defendanta teamo, tiras post si *punŝoton* plenumitan el la punpunkto.

Sur la kvar angulpunktoj de la ludkampoj staras *angulflagoj*. Unu metron diametra sektoro de tiuj anguloj estas nomata *angulareo*. Tie oni plenumas la *angulŝoton*, se la pilko transpasis la golejlinion, tuŝinte laste hejmkampan ludiston, inkluzive de la golulo. Se la pilko transpasis la flanklinion, oni plenumas *enĵeton*. La angulŝoton kaj enĵeton plenumas iu el la alia teamo ol kiu laste tuŝis la pilkon.

La *ludotempo* konsistas el 2x45 minutaj *duontempoj* kun 5 minuta paŭzo. Kaze de egalstato la ludo estas plilongigebla por 2x10 minutoj.

La ludistoj krom la golulo surhavas unuforman (tiun de la lando aŭ sia sportunuiĝo) piedpilkistan sportveston. La koloro de la sportvesto de la golulo devas diferencii disde la koloro de ambaŭ teamoj.

La matĉon gvidas la *ludgvidisto* (vulg. futbaljuĝisto) kun la kunhelpo de la du *linijuĝistoj*. Konante bone la regulojn de la piedpilkado, la ludgvidisto gvidas la matĉon — helpe de fajfil-kaj mansignoj — senpartie, zorgeme atentante kaj punante ĉian malregulaĵon, por certigi tiamaniere la disciplinitan ludon. Tiucele li disponas pri la sekvantaj sankcioj.

a) Atentigo.

b) Punŝoto: libere ŝotata el la punpunkto.

c) *Rekta libera ŝoto*: el kiu la ŝotanto povas rezultigi rektan golon.

ĉ) *Nerekta libera ŝoto*: oni povas atingi golon nur se krom la plenuminto de la nerekta libera ŝoto almenaŭ unu ludisto tuŝis aŭ priludis la pilkon.

La rektan kaj nerektan liberajn ŝotojn oni plenumas el la loko de la kulpita malregulaĵo, respektive el la punpunkto, se la malregulaĵon kulpis la defendanta teamo (punŝoto). Ĉe ambaŭ liberaj ŝotoj kaj ĉe la punŝoto la kontraŭulaj ludistoj devas stari en difinita distanco disde la ŝotanto.

d) *Eskludo* de la kulpinto el la plua ludo.

e) Ĉesigo de la matĉo.

La du linijuĝistoj — akompanante laŭlonge de la flanklinio la movon de la pilko — faras signon al la ludgvidisto, se la pilko transpasas la flanklinion aŭ golejlinion.

Malregulaĵoj punendaj per rekta libera ŝoto;

a) Intencaj agoj kontraŭ kontraŭulan ludiston:

ganĉi (stumbligi) lin (aŭ provi);

puŝi lin perforte kaj danĝere;

puŝi lin de malantaŭe;

plandumi (plandume kiki), kiki aŭ mane bati lin (aŭ provi);

kapti, firmteni aŭ retiri lin per mano;

salti kontraŭ lin.

b) mantuŝi (mane tuŝi) la pilkon.

Malregulaĵoj punendaj per nereкта libera ŝoto:

a) Danĝera ludo (agoj, kiuj ne estas krudaj, sed minacas vundi la kontraŭulon).

b) *Ofsajdo*. Ofsajdas, alivorte estas en ofsajdo, aŭ en ofsajda pozicio tiu ludisto, kiu troviĝas sur la kontraŭula duonkampo kaj en la momento, kiam la pilko estas priludata de alia ludisto, staras pli proksime de la golejlinio ol la pilko, escepte se du ludistoj de la defendanta teamo staras ankoraŭ pli proksime de la golejlinio ol li.

c) Nesporteska sinteno de iu ludisto kontraŭ la ludgvidisto.

ĉ) Ceteraj malregulaĵoj.

La mondfederacio de la sportobranĉo piedpilkado estas: Fédération Internationale de Football Amateur (FIFA). Esp-e: Internacia Amatora Piedpilkista Federacio.

Esprimoj: Eŭropo-ĉampionado de piedpilkado. La piedpilko-matĉon inter la tutmonda kaj la brazila elektitaroj gajnis la brazila teamo kun la rezulto 3:2 (tri per du). Solene oni transdonis al la portugala ludisto N.N. La migran premion “Ora Pilko”, fonditan por la plej bona piedpilkisto de la jaro. La finalo de la ĉampionado por la Eŭropo-pokalo de la Ĉampionaj Teamoj finiĝis kun la venko de la itala klubteamo Lazio. En la dua etapo de la mondĉampionado de piedpilkado, post la disvolvo de la rimbatalo en la kvar grupoj, la unualokaj klasitoj de la grupoj fariĝis la elektitaroj de Ĉeĥoslovakio, Cejlono, Anglio kaj Meksiko. La venkinto de la ĉampionado por la Pokalo de la Foirurboj fariĝis la teamo de Varsovio. Eŭropo-ĉampiona, mondĉampiona kaj olimpikoĉampiona piedpilko-teamoj. En la ĉampionado por la Pokalo de la Pokalgajnintaj Piedpilko-teamoj venkis la klubteamo Valencia.

PLONĜO

La plonĝisto saltas de sur difinite altaj forsaltiloj en akvon, prezentante en la aero diversajn devigajn kaj libere elektitajn plonĝfigurojn de altagrada tekniko kaj arta, plaĉa plenumo.

La internaciaj plonĝkonkursoj disvolviĝas en subĉielaj aŭ tegmentitaj naĝejoj konstruitaj laŭ la antaŭskriboj de la mondfederacio de la naĝosporto (naĝo, plonĝo, akvopilkado kaj arta naĝo) FINA, kaj ekipitaj per plonĝinstalaĵo kun mezuroj same oficiale normitaj.

La modela oficiala plonĝinstalaĵo konsistas el 10 forsaltiloj, nome a) el tri forsaltiloj 1 m-on altaj (super la akvospegulo), kun 0,6 m-a larĝo kaj 4,5 m-a longo; kaj el tri forsaltiloj 3 m-ojn altaj, kun 0,8 m—a larĝo kaj 5 m-a longo. La 1 kaj 3 metrojn altaj forsaltiloj estas nomataj *plonĝotrampiloj* (plonĝotrampoloj), mallonge *trampiloj*: 1-metra kaj 3-metra trampiloj;

b) el du 5 m-ojn altaj, unu 7,5 m-ojn alta kaj unu 10 m-ojn alta forsaltiloj kun 1,5, 1,5 kaj 2 m-a larĝo kaj po 6 m-a longo. Tiuj forsaltiloj estas nomataj plonĝoturoj, mallonge turoj, nome 5-metra, 7,5 metra (sep-komo-kvin-metra) kaj 10-metra turoj.

La antaŭa ekstremo de la forsaltiloj devas elstari 1,5 m-ojn (ĉe la 1- kaj 3-metraj minimume 1,25 metrojn) super la akvon antaŭ la basenrando.

La plonĝon plenumitan de sur trampilo oni nomas *trampiloplonĝo* kaj la plonĝon plenumitan de sur turo oni nomas *turplonĝo*.

La konkursantoj plenumas plonĝon aŭ senalkure aŭ kunalkure. Ĉe senalkura plonĝo la konkursanto estas okupinta startpozicion, kiam li staras jam ĉe la forsalta ekstremo de la trampilo, resp. turo. En startpozicio la konkursanto staras rektakorpe kun etenditaj brakoj fermitaj al la flankoj, aŭ altenrektigitaj. Neregula startpozicio rezultigas dekalkulon de 1-3 poentoj el la definitiva poentnumero. Ĉe kunalkura plonĝo la konkursanto estas okupinta la startpozicion, kiam li jam estas preta fari la unuan paŝon de la alkuro.

Kaze de antaŭensalta trampiloplonĝo aŭ turplonĝo la konkursantoj rajtas plenumi la plonĝon laŭplaĉe kunalkure aŭ senalkure, la konkursa ĵurio prijuĝas la plonĝon ĉiam kiel kunalkuran plonĝon.

Kaj sur la trampilo kaj sur la turo la alkuro devas konsisti el almenaŭ 4 kurpaŝoj. La forsalto ĉe trampiloplonĝo devas esti farata per ambaŭ piedoj; ĉe turplonĝo ankaŭ unupieda forsalto estas permesita. Kaze de senalkura plonĝo la plonĝisto ne rajtas saltadi sur la forsaltilo.

Plonĝo plenumita tro proksime de la fino de la trampilo (aŭ turo), kiel ankaŭ plenumo de plonĝo el tia manstaro, kie la antaŭskribita momenta sekura ekvilibro ne estas konstatebla, rezultigas 1-3 minusajn poentojn.

La plonĝoj estas plenumebaj: a) kun rekta korpo — *rektakorpe*; b) kun movo de karmo = *karpomove* aŭ *karpe*; c) kun suprentiritaj genuoj = *kaŭre*.

a) Ĉe la rektakorpa plonĝo la korpo povas esti klinita nek kokse, nek genue, la piedoj devas esti rektigitaj kun fingroj plandodirekte streĉitaj.

b) Ĉe karpomova (karpa) plonĝo la korpo estas kokse klinita, sed la genuoj estas rektigitaj kaj la piedfingroj estas malsuprenstreĉitaj.

e) Ĉe la kaŭra plonĝo la tuta korpo estas kuntirita, la genuoj estas kunmetitaj, la manoj kuŝas sur la kruroj, la piedfingroj estas malsuprenstreĉitaj.

La plonĝisto plenumas *saltumon*, kiam forlasinte la forsaltilon li faras en la aero 360-gradan transkapan turniĝon antaŭen aŭ malantaŭen, plenumante la saltumon rektakorpe, karpomove aŭ kaŭre, t.e. se li forsaltas piede, tiam post la saltumo li atingas la akvon en stara pozicio, se li komencas la plonĝon el manstaro, tiam post la saltumo li enakviĝas kap-al-akve.

Speco de la rektakorpa saltumo estas la tn. *flugsaltumo*, kiam la plonĝisto flanke disetendas la brakojn (vulg. hirundo-saltumo). Dum plenumo de flugsaltumo almenaŭ ĝis la duono de la saltumo devas esti klare videbla la rekta korpoteno.

Ĉe duona kaj plena tordosalto ne licas komenci la tordon tuj ekde la forsalto. Ĉe karpa

tordosalto unue devas okazi la karpomovo kaj nur poste povas komenciĝi la tordo.

Ĉe ĉia plongo la enakviĝo devas okazi ĉiam per vertikala aŭ proksimume vertikala kaj rekta korpo, kun malsuprenstreĉitaj piedfingroj. Ĉe kap-al-akva enakviĝo la brakoj estu rektigitaj en la longoakso de la korpo. La fingroj de la du manoj tuŝu unu la alian. Ĉe pied'-al-akva enakviĝo la brakoj estas rektaj kaj premitaj al la flankoj.

Jen sekvas la terminoj de la antaŭskribitaj plongospecoj, dividitaj en 6 grupojn. Al ĉiu plongospeco apartenas sperta klasifa vicnumero (ankaŭ ĉi-sube indikita) kaj po tri nombroj, nomataj gradoj de malfacileco, konsiderataj ĉe la taksado laŭ tio, ĉu la plongon oni plenumis rektakorpe, karpomove aŭ kaŭre. Tiujn gradvalorojn indikas aparta tabelo ĉi tie ne aldonita, sed en la naciaj konkursregularoj trovebla.

I. *Plongoj antaŭen.*

Kapsalto antaŭen (vicnumero: 101); saltumo antaŭen (202); unu-kaj-duonobla saltumo antaŭen (103); duobla saltumo antaŭen (204); du-kaj-duonobla saltumo antaŭen (105); triobla saltumo antaŭen (106); tri-kaj-duonobla saltumo antaŭen (107); flugsalto antaŭen (112); unu-kaj-duonobla (113) ... duobla (114) ... kaj du-kaj-duonobla (115) flugsaltumoj antaŭen; saltumo antaŭen kun unu-kaj-duonobla flugsaltumo (116).

II. *Plongoj dorsen.*

Kapsalto dorsen (201); saltumo dorsen (202); unu-kaj-duonobla (203) ... duobla (204) ... kaj du-kaj-duonobla (205) saltumoj dorsen; flugsalto dorsen (212); unu-kaj-duonobla flugsaltumo dorsen.

III. *Plongoj inversaj.* (vulg. aŭerbaŝ-plongoj)

Kapsalto inversa (301); saltumo inversa (302); ktp. 303-305, 312-313) analoge al grupo II.

IV. *Plongoj internen.* (vulg. delfenplongoj)

(401-405, 412-413) tute analoge al grupo II. (Kapsalto internen ktp.)

V. *Tordoplongoj.*

Duontorda kapsalto antaŭen (5111) ... dorsen (5211) ... inversa (5311) ... kaj internen (5411); plentorda kapsalto antaŭen ... ktp. (5112-5412); duontorda saltumo antaŭen ... ktp. (5121-5421); plentorda saltumo antaŭen ... ktp. (5122-5422); unu-kaj-duontorda saltumo dorsen (5223) ... kaj inversa (5323); dutorde saltumo antaŭen (5124); duontorda unu-kaj-duonobla saltumo antaŭen (5131) ... dorsen (5231) ... kaj inversa (5331); plentorda unu-kaj-duonobla saltumo antaŭen (5132) ... kaj internen (5432); unu-kaj-duontorda unu-kaj-duonobla saltumo dorsen (5233) ... kaj inverse (5333); dutor-da unu-kaj-duonobla saltumo antaŭen (5134) ... kaj internen (5434). du-kaj-duontorda unu-kaj-duonobla saltumo dorsen (5235) ... kaj inversa (5435); tritorda unu-kaj-duonobla saltumo antaŭen (5136); plentorda du-kaj-duonobla saltumo antaŭen (5152); dutorda du-kaj-duonobla saltumo antaŭen (5154).

VI. *Plongoj el manstaro.*

Kapsalto el manstaro (610); renversiĝo el manstaro (611); saltumo antaŭen el manstaro (612); duobla saltumo antaŭen el manstaro (614); piedsalto antaŭen el manstaro (631); kapsalto inversa el manstaro (632); saltumo inversa el manstaro (633).

La konkursa juĝistaro de la plongkonkursoj konsistas el la prezidanto, la poentjuĝistoj kaj du sekretarioj. En olimpikaj kaj kontinent-konkursoj funkcias 7, en ceteraj internaciaj konkursoj 5 poentjuĝistoj, apartenantaj laŭeble ĉiu al alia partoprenanta nacio.

La *poentjuĝistoj* (ĵurio) havas sian lokon — se eble — ambaŭflanke de la plonginstalaĵo. Post ĉiu plongo je la signo de la prezidanto ili komunikas la fare de si aljuĝitan poentvaloron por la plenumita plongo. La komunikado okazas en la olimpikoj aŭ aliaj altgradaj konkursoj per elektra indiktabulo, kiu samtempe montras la aljuĝitan poenton de ĉiu juĝisto. Ĉe ceteraj konkursoj la juĝistoj levmontras tabuletojn kun numero.

La *sekretarioj* adicias la poentvalorojn de unu plongo, forstrekante la du ekstremajn valorojn. La sumon ili multiplikas per la nombrovaloro de la grado de malfacileco. Se funkcias

7 poentjuĝistoj, la sekretarioj krome multiplikas la rezulton per 3/5. Venkas tiu konkursanto, kiu atingis plej altasuman poentvaloron.

La poentjuĝistoj poentumas la plenumon per poentvaloroj de 0 ĝis 10, kun duonpoentaj diferencoj. Ĉe la taksado ili devas konsideri la alkuron, la forsalton, la teknikon kaj leĝe-recon en la aero kaj la enekviĝon.

En la olimpikoj kaj kontinent-ĉampionadoj en la kvar plonĝdisciplinoj povas partopreni po unu konkursanto en iu ajn lando, senkonsidere de lia pli frue stingita plej alta sumo de malfacileco-gradoj. Se iu lando volas partoprenigi pli ol unu (maks. 3) konkursantojn en iu disciplino, tiam la anoncitoj devas esti jam atingintaj en pli frua konkurso tian nivelon de suma grado de malfacileco, kian FINA antaŭskribis por la koncerna ĉampionado.

La sportbranĉo plonĝo havas du subbranĉojn. Ili estas la tramliloplونĝo kaj la turplونĝo.

A) Tramliloplونĝo

La 1- kaj 3-metra tramliloj estas pretigitaj el duraluminio aŭ artmaterio. Sub la tramlilo metala cilindro, movebla de 0,5 ĝis 1,5 metrojn ekde la malantaŭa ekstremo, ebligas al la konkursanto, ke li ĝustigu antaŭ ĉiu sia plونĝo la elastecon de la forsaltilo laŭ sia propra deziro. La tramlilon kovras kokostapiŝo por preventi glitfalon. La akvoprofundeco antaŭ kaj sub la forsalta ekstremo de la 1- kaj 3-metra tramliloj devas esti 3,5 — 4 m-oj.

En gravaj internaciaj plونĝkonkursoj en la disciplinoj vira kaj virina tramliloplونĝoj oni uzas la 3-metran (3 m-ojn altan) tramlilon.

La konkurso konsistas el 5 devigaj kaj 6 (ĉe virinoj 5) elektitaj plونĝoj, kiuj lastaj estas elektendaj ĉiu el alia jam menciita plونĝogrupo. La devigaj plونĝoj estas la sekvantaj: — kapsalto antaŭen — kapsalto dorsen

— kapsalto inversa

— kapsalto internen

—duontorda kapsalto antaŭen.

La devigaj plونĝoj estas plenumebaj rektakorpe, karpomove aŭ kaŭre.

Se la ensemblo konsistas el pli ol 12 konkursantoj, tiam oni aranĝas antaŭfinalon kaj finalon. En la antaŭfinalo la konkursantoj prezentas la 5 devigajn plونĝojn kaj 3 (virinoj 2) libere elektitajn plونĝojn. 12 avanj konkursoj eniras la finalon.

Disciplinoj:

1. *Vira tramliloplونĝo*

2. *Virina tramliloplونĝo.*

B) Turplونĝo

La forsaltilo de la plونĝturo ne estas elasta. Por plenumi la plونĝojn la konkursanto rajtas libere elekti inter la 5- aj 10-metra turoj. La 7,5-metran turon oni uzas nur esceptokaze. La deviga akvoprofundeco estas 5 m-oj.

Disciplinoj:

1. *Vira turplونĝo*

La konkurso konsistas el 6 libere elektitaj plونĝoj, ĉiu el alia plونĝogrupo, kun la suma valoro de 11,2 malfacilecogradoj, krome el 4 ceteraj. nelimitaj libere elektitaj plونĝoj, same ĉiu el alia plونĝogrupo.

Se la konkursantoj nombras 16 aŭ malpli, tiam oni aranĝas nur finalon. Se ili estas pli multaj, tiam oni aranĝas antaŭfinalon. En la antaŭfinalo la konkursantoj devas prezenti la supremenciitajn 6 limitajn libere elektitajn plونĝojn, kaj unu senlimigan plونĝon. 12 avanjuloj eniras la finalon, kie ili prezentas la ceterajn 3 senlimigajn plونĝojn. La finrezulton de la konkursanto konsistigas la suma poentvaloro ricevita por la 6 limitaj kaj 4 nelimitaj plونĝoj.

2. *Virina turplونĝo*

La konkurso konsistas el 4 devigaj plونĝoj kaj 4 libere elektitaj plونĝoj, ĉiu el alia

plonĝogrupo. La 4 devigaj plonĝoj samas kun la unuaj kvar devigaj plonĝoj de la disciplino trampiloplonĝo kaj estas laŭplaĉe plenumebaj rektakorpe, karpomove aŭ kaŭre.

Se la ensemblo konsistas el pli ol 12 konkursantoj, tiam oni aranĝas antaŭfinalon, kie la konkursantoj prezentas la 4 devigajn kaj unu libere elektitan plonĝojn. La 12 avanlokaj konkursantoj eniras la finalon, kie ili prezentas la ceterajn 5 plonĝojn.

Esprimoj: Eŭropo-ĉampionado de plonĝo. La nacia trupo de la francaj plonĝistoj konsistas el po 2 viraj kaj virinaj trampiloplonĝistoj kaj el 2 viraj kaj 1 virina turplonĝistoj.

RAJDO

En harmonie kunago kun sia bone dresita, inteligenta, obeeme, laŭ korpokonstruo kaj fortostato taŭga rajdĉevalo la rajdisto plenumas saltigojn, dresrajdajn aŭ terenrajdajn taskojn kun la celo atingi avanan klasigon kaj por si kaj por sia ĉevalo en la ĉiversaj rajdkonkursoj.

El tiu ĉi difino sekvas, ke la sportobranĉo rajdo havas tri ĉefajn agadsferojn alivorte subbranĉojn, kiuj estas

- A) Rajdsalto
- B) Dresrajdo
- C) Terenrajdo

Ĉiujn konkursojn de la sportobranĉo rajdo rajtas partopreni ankaŭ virinoj kun egalaj kondiĉoj, ŝancoj, postuloj kaj taksado kun la viroj. Eĉcepto estas la virina Eŭropo-ĉampionado de rajdo, kiu estas aparta konkurso por la virinaj rajdistoj.

La teknikan plenumon de la konkursantoj prijuĝas kaj taksas, la klasigan vicordon difinas kaj deklaras la konkursa juĝistaro. Ĉe la tn. internaciaj rajdkonkursoj, kiel ankaŭ ĉe la pli altgradaj konkursoj ol tiuj, la kunmeto de la konkursa juĝistaro devas esti internacia, t.e. la membroj estas elektitaj el diversaj nacioj.

La trupestroj (komisiita estro de la tuta partoprenanta nacia trupo), respektive manke de tiuj la posedantoj aŭ rajdantoj de la ĉevaloj, partoprenantaj la konkurson, havas la rajton levi proteston kontraŭ unu el la partoprenantaj ĉevaloj, rajdistoj aŭ teamoj, pro kaŭzoj listigitaj en la konkursa regularo. La skriban proteston oni devas transdoni ene de difinita tempo al la prezidanto de la konkursa juĝistaro. Se la juĝo de la konkursa juĝistaro ne kontantigas la protestlevinton, li levas proteston kontraŭ tiu juĝo — alivorte li apelas al la apeljuĝistaro, formita speciale fare de la konkursa aranĝkomitato el 4 oficialaj personoj. La apeljuĝistaro havas la taskon decidi definitive pri la protestoj levitaj al ĝi kontraŭ la juĝo de la konkursa juĝistaro.

La rajdilaro de la rajdĉevalo konsistas el la brido, la selo kaj el ceteraj akcesoraĵoj.

La *brido* estas kaprimenaro sidanta sur la kapo de la ĉevalo. Ĝiaj partoj estas la naz-, frunt-, vert-, kol-, kaj mentonrimeno, krome la du vangrimenoj. Tiuj lastaj kroĉtenas la *trenson* (nomatan ankaŭ buŝfero aŭ brido en la vulgara lingvo), faritan kutime el fero, sed kelkfoje ankaŭ el gumo aŭ ledo. Ĉe la rajdo oni uzas aŭ simplen, tn. *ĉevalidan trenson*, aŭ *streĉan tronson* (mentonĉenan trenson). Al la ringoekstretoj de la trenso estas alkroĉitaj la *gvidrimenoj*, nome po unu ambaŭflanke ĉe ĉevalida trenso kaj po du ĉe streĉa trenso.

En la sportobranĉo rajdo oni uzas nur la anglan selon. La *selo*, konsistanta el ledo, havas antaŭan kaj malantaŭan *selobulojn* kaj malpeza fera skeleto donas masivecon al ĝi. Du ledaj *selfolioj* kovras la flankojn de la ĉevalo, sub ili la *ventrogurto* kaj *ventrorimeno*, streĉitaj ĉirkaŭ la ventro de la ĉevalo, tenas fikse la selon. Super la selfolioj pendas la *piedingrimenoj* kun la *piedingoj*.

Ceteraj akcesoraĵoj estas la okul-, tenden-, kaj maleolŝirmilo.

La ĉevaloj havas diversan koloron. Ĉe la difino de la koloro de la ĉevalo estas konsiderataj du faktoroj, nome la koloro de la kovra hararo, alinome kurthararo, kiu kovras la tutan korpon de la ĉevalo, kaj tiu de la longharoj, kiuj estas la kolharoj, la vostoharoj, la palpebro- kaj lipharoj.

Ĉi-sube estas vicigitaj la bazaj grupoj de la ĉevalkoloroj. Ene de tiuj grupoj troviĝas sennombraj variacioj, kolornuancoj. La plej karakterizaj (po 2-7) kolorsubgrupoj havas sian apartan nomon en la naciaj fakterminologioj, sed krei adekvatajn Esperantajn terminojn por ili estas jam ekster la kadroj de tiu ĉi studo.

La ĉefaj ĉevalkoloroj:

1. *Blankaj koloroj*. Kaj la kovra hararo kaj la longharoj estas blankaj.

2. *Nigraj koloroj.* Ambaŭ hartipoj estas nigraj.

3. *Bejaj koloroj.* La longharoj estas nigraj, la kovra hararo estas pli-malpli rugebruna kun pluraj kolornuancoj. (Mi mencias, ke anstataŭ “beja” (vidu en PIV) mi preferus la vorton “peja”. Estas ja tute nekutime kaj kontraŭregule, ke radikoj havu samtempe kaj substantivan karakteron kun certa signifo: bejo (turka altrangulo), kaj adjektivan karakteron tute alisencan: beja (ĉevalkoloro). La akcepto de la formo “peje” eliminus la malbonŝancan homonimion. Cetere la temanta ĉevalkoloro en la hungara lingvo estas nomata “pej”).

4. *Brunaj koloroj.* La longharoj povas havi nuancojn ekde la flaveblanka ĝis la malhelbruna, kaj la kovra hararo tiujn ekde la helbruna ĝis la nigrebruna. Ĉe la sama ĉevalo la du hartipoj estas jen samnuancaj jen malsamnuancaj, sed la longharoj estas neniam nigraj.

5. *Prujnaj koloroj.* La kapon kaj la kruojn kovras unukolora baza kovra hararo (bruna, nigra), sed sur la kolo kaj trunko, inter la bazkoloraj kurtharoj troviĝas pli-malpli dense dissemataj blankaj kurtharoj. Depende de la nuanco de la baza koloro kaj de la kvanto de la blankaj haroj estas diferencigitaj pli da kolorsubgrupoj.

6. *Grizaj koloroj.* La griza koloro de la ĉevalo estas propre la iom-post-ioma proaĝa griziĝo de la animalo. Dum tiu griziĝa proceduro ĉiam pli da blankaj haroj aperas kaj inter la kurtharoj — sur la tuta korpo, do ankaŭ sur la kapo kaj piedoj — kaj inter la longharoj. Depende de la baza koloro estiĝas pluraj distingeblaj kolorsubgrupoj.

7. *Falvaj (ne flavaj!) koloroj.* Tiu koloro inkluzivas nuancojn ekde la pale kremflava ĝis la pale malhelgriza aŭ palebruna.

8. *Buntaj koloroj.* Sur la blanka bazo aperas grandaj koloraj makuloj dissemataj sur la tuta korposurfaco.

Oni kutimas nomi la ĉevalojn ankaŭ laŭ ilia koloro. Ekz.: Du belaj prujnaj virĉevaloj estis jungitaj al la kaleŝo. — La falva bele saltis la obstaklon, sed la peja kaj la griza stumblis kaj falis, dum la bruna nur renversis la obstaklon kaj plugalopis.

La ĉevalo, uzata por la celoj de la sportbranĉo rajdo (kiel ankaŭ tiuj ĉevaloj, kiujn oni uzas por ia ajn alicela, nesporta rajdo), estas nomata *rajdĉevalo*, kontraste al la t.n. *jungĉevalo*, kiun oni jungas antaŭ kaleŝon, veturilon, ĉaron, plugilon, ktp.

Laŭ alia klaŝifo oni diferencigas

- a) pursangajn,
- b) duonpursangajn,
- c) fridsangajn ĉevalojn kaj
- ĉ) poniojn.

La minimuma aĝo de la uzebla rajdĉevalo estas 4 jaroj.

Laŭ sekso oni distingas: virĉevalon, ĉevalinon kaj kastriton.

A) Rajdsalto

La subbranĉo rajdsalto, alinome saltigo, havas la celon kapabligi la ĉevalon transalti obstaklojn de diversaj aspektoj, altoj kaj larĝoj, lokitajn en difinitaj distancoj unu de La alia, laŭlonge de certalonga vojstreko nomata obstaklovego, aŭ rajdsaltovego aŭ saltigovego. La rajdsalto-konkursoj estas tiaj konkursoj, kie oni prijuĝas la rajdiston kaj ĉevalon sur obstaklovego, inter diversaj cirkonstancoj.

Laŭlonge de la rajdsaltovego estas starigitaj obstakloj de diversaj formoj kaj tipoj, en nombro kaj kun interdistancoj laŭ la antaŭskriboj de la koncerna disciplino. Tiuj obstakloj devas havi la aspekton de solideco kaj imponan formon; de antaŭe ili devas vekti la impreson de nerenversebleco, tamen efektive ili ne povas esti alfiksitaj kaj devas esti facile renverseblaj.

Jen iliaj ĉefaj tipoj:

a) *Vertikalaj obstakloj.* Ĉiuj iliaj konsistelementoj havas sian lokon en la sama vertikala ebena. Tuj antaŭ ili ne povas esti forsaltigaj stango, heĝo, teramaseto aŭ foso.

b) *Longaj obstakloj*. Ili estas tiel konstruitaj, ke ili igu la ĉevalon salti kaj alton kaj longon.

c) *Akvoŝoso*. Ĝi estas simpla ŝoso plena de akvo, kun aŭ sen malalta heĝo aŭ stango ĉe la forŝalta flanko. La randon de

-216-

la ŝoso borderas maldika blanka lato.

c) *Duobla, triobla, plurobla obstakloj*. Ili konsistas el du, tri aŭ pli da obstakloj kun 7 ĝis 12 m-a (ĉe ĉasŝaltigo ĝis 7 m-a) interdistanco inter la unuopaj obstakloj. Ĉiun eron de la plurobla obstaklo la rajdisto devas saltigi aparte, eron post ero. Okaze de halto, rifuzo (klarigo pli malfrue), aŭ falo de la ĉevalo la tuta plurobla ŝaltigo estas ripetenda.

d) *Terbenkoj, malsuprenŝaltejoj, krutejoj, grimpejoj*. La terbenkoj estas terŝtupoj, teramasoj, cele de obstakloj metode lokitaj ĉe certaj partoj de la vego. Ili devigas la ĉevalon suprensalti, resp. malsuprensalti. Inter la supren- kaj malsuprenŝaltejo, respektive inter la malsupren- kaj suprenŝaltejo estas lokitaj ankoraŭ unu aŭ pli da kromaj obstakloj. Ĉiu obstaklo estas aparte saltigenda.

La krutejoj, alinome grimpejoj, estas 6-8 m-ojn altaj krutaj terflankoj, kiujn la ĉevalo povas nur grimpe supreniri kaj same grimpe, ofte side, glite malsupreniri.

e) *Plane fermitaj obstakloj*. La obstaklo estas nomata plene fermita, se post ensaltigo la rajdisto venis en lokon, kiun

li povas forlasi nur helpe de pli nova saltigo (elsaltigo), aŭ

se la konkursa juĝistaro kvalifis ĝin tia. Tiaj estas ekz. la tn. "kvadrato", "sesangulo", "bovokaĝo" ktp. Ĉe tiuj ĉi obstakloj kaze de eraro la saltigo ne estas ripetenda ekde la komenco. Se la ĉevalo elsaltas ĉe neregula flanko, ĝi estos eskludita. Okaze de halto aŭ falo de la ĉevalo ene de la fermita obstaklo la rajdisto devas eliri per saltigo ĉe la regula flanko. Se tion dum 60 sekundoj li ne faras, oni eskludas lin al la konkurso.

En la invitilo kaj programo de la Oficialaj Internaciaj Rajdkonkursoj (klarigo pli poste) oni devas indiki la mezurojn (longo kaj larĝo) de la rajdsaltovego, nomata ankaŭ obstaklovego aŭ saltigovego. La areo de la vego devas esti ĉirkaŭbarita.

La rajdsaltovego estas tiu vojlinio, kiun la ĉevaloj devas sekvi, por povi plenumi la disciplino. Ĝian oficialan longon oni devas difini laŭ 1-2-metra precizeco, ĝia traco (mezlinio) pasu ĉiam meze de la obstakloj. La radiuson de la kurboj oni mezuras laŭ la turnokapablo de mezkvalita rajdĉevalo. La longo de la vego devas ne superi la sesdekoblon de la nombro de la obstakloj. La startlinio devas esti ne pli ol 25 m-ojn distance de la unua obstaklo kaj la distanco inter la lasta obstaklo kaj la cellinio devas esti inter 15 kaj 25 m-oj.

60 minutojn antaŭ la komenco de la disciplino oni devas publike elmontri (elpendigi) la detalan vegdesegnon, pretigitan laŭ striktaj antaŭskriboj. Laŭlonge de la veglinio po unu ruĝa (dekstramane) kaj blanka (maldekstramane) flagoj indikas la startojn, la ekstrecojn de la obstakloj, la devigajn trapasejojn kaj la celon. Se la rajdisto — pro eraro — trapasas kontraŭdirekte iun el la flagoparojn, li devas turni sin kaj reveni sur siajn proprajn spurojn, por trarajdi inter la flagoj ĝustadirekte. Nur poste li rajtas saltigi la sekvan obstaklon.

Detalaj antaŭskriboj precize difinas, ke kiam oni konsideras la diverstipajn obstaklojn renversitaj. La esenco de tiuj antaŭskriboj estas, ke la falo de ajna parto de la obstaklo aŭ la falo de ties ajna apoga aŭ fiksiga akcesoraĵo sekve de ektuŝo far la ĉevalo, estas konsiderenda obstaklorenverso, kiun sekvas aljuĝo de punponto aŭ puntempo al la konkursanto.

Same estas fiksitaj la diversaj kazoj de la tn. malobeco al la reguloj. Tiuj kazoj simile rezultigas punpontojn aŭ punsekundojn. Jen la kazoj de la malobeco: a) *Korektita veĝeraro*. Nome veĝeraro estas, se la konkursanto trairas la vegon nekonforme al la elpendita vegdesegno (preteratentas la turnoflagojn, saltigas la obstaklojn ne laŭvice, saltigas obstaklojn ne apartenantajn al la vego aŭ preterlasas devigajn). Sonorilo atentigas lin pri la eraro, kaj li devas korekti la eraron, ripetante la vegstrekon ekde la punkto de devojĝo. Nekorektita

vegeraro sekvigas eskludon el la konkurso. — b) *Halto*. Momenta halto antaŭ salto, sen ektuŝi la obstaklon, ne estas konsiderata halto. — c) *Rifuzo* estas, se la ĉevalo, ŝirinte sin el sub la regado de la rajdisto, rifuzas transsalti la obstaklon, preteriras ĝin, aŭ transsaltas ĝin ekster la flagoparo. — ĉ) *Kontraŭstaras* la ĉevalo, se ajnmaniere ĝi sukcesas eltiri sin el la antaŭenmovo per halto, retropaŝo, fardo de duona aŭ plena rondo, baŭmo ktp. Pli longa ol 60 sekunda kontraŭstaro rezultigas ĝenerale la eskludon de la ĉevalo el la konkurso. — d) Koncerne *falojn* temas pri aa) *falo de la rajdisto*, se lia korpo disiĝas disde la ĉevalo tiom, ke li devas denove surĉevaliĝi; bb) *falo de la ĉevalo*, se ĝiaj ŝultroj kaj postaj ekstuŝas la teron, resp. La obstaklon kaj la teron. e) *Nelegala helpo* estas, kiam eksterulo helpas al la rajdisto aŭ al la ĉevalo dum la plenumo de la disciplino. Rekonduko de forkurinta ĉevalo kaj helpo ĉe surĉevaliĝo ne estas rigardataj nelegala helpo, sed ekz. redono de faligita rajdbastono — jes.

La konkursa juĝistaro tenas kontakton kun la rajdanta konkursanto pere de sonorilo. Per tiu oni donas la startosignon, haltigas — se necese — la rajdanton kaj donas per ĝi poste permeson al la plua rajdo, ripetigas la neregulan saltigon kaj per ripetitaj longaj sonorigoj oni signas la eventualan eskludon el la konkurso.

La konkursa regularo konigas en longa listo la kazojn de la eskludo el la konkurso.

Oni nomas vegtempo la tempodaŭron pasigitan de la konkursanto inter la startejoj kaj la celo. El la vegtempo estas dekalkulenda la tempodaŭro de tiuj eventualaj fazoj de la plenumo, kiam la tempoperdo ne estis la kulpo de la konkursanto. Tiuj kazoj estas detale difinitaj. Okaze de falo, vegeraro, rifuzo, ordigo de la rajdilaro, enseliĝo ktp. oni ne haltigas la stophorloĝon.

Por ĉiu disciplino estas aparte difinita tn. baztempo, indikenda ankaŭ sur la vegdesegno. La transpason de tiu baztempo oni punas per punpoentoj aŭ punsekundoj. Por la plenumo de la disciplino la konkursanto disponas la duoblon de la baztempo. Kiu transpasas la limon de tiu tempodaŭro, nomata tempolimo, estos eskludita el la konkurso.

La vestaĵo de la konkursanto estas antaŭskribita. La rajdilaro povas esti laŭplaca, sed uzo de ĉiaspeca okulŝirmilo aŭ kapomasko estas malpermesita.

La minimuma pezo de la konkursantoj — kune kun la selo — (??mankas linio??) rajdas en vira sido; pezo laŭplaĉa ĉe virinoj en virina sido. Se la pezo de la rajdisto estas malpli ol 75 kg-oj, oni metas kompensajn krompezaĵojn sur la selon.

La malregulaĵojn, resp. erarojn, kulpitajn inter la startejoj kaj celo oni kalkulas en punpoentoj aŭ en punsekundoj, depende de la aplikata kalkulsistemo, alinome poentuma sistemo. Koncerne la kalkuledon estas uzataj, nome tri malsamaj reguloj: la reguloj A., B. kaj C.

Ĉe la regulo A. la erarojn oni kalkulas en punpoentoj kaj ĝi estas aplikebla kun aŭ sen alkalkulo de la vegtempo.

Ĉe la unua metodo oni ne rigardas la vegtempon kaj la klasigan vicordon rezultigas nur la sumigo de la punpoentoj ricevitaj pro la kulpitaj obstakloeraroj kaj temperaroj. Okaze de egalstato de la tri avanaĵoj oni dividas la premion. Okaze de egalstato ĉe la unualoka klasigo oni povas apliki ankaŭ aŭ dufojan koncizigan (alinome kuntiritan aŭ kurtitan) kromkurumon — mallonge: kromkurumon — kun la eventuala alkalkulo de la vegtempo en la dua kromkurumo; aŭ unufojan kromkurumon kun vegtempo-alkalkulo.

Ĉe la dua metodo oni sumigas la obstaklo-punpoentojn kaj la punpoentojn pro la transpaso de la baztempo. Kaze de egalstato ĉe ajnaloka klasigo decidas la pli bona vegtempo. Kaze de egalstato ĉe la unualoka klasigo oni aŭ dividas la premion, aŭ aplikas unufojan kromkurumon kun vegtempo-alkalkulo.

La antaŭskriboj de la du metodoj estas aplikeblaj ankaŭ miksite, sed estas grave, ke la konkursproklamo precize fiksas ĉiujn detalojn koncerne la aplikon de la variantoj entenataj en la du metodoj.

La regularo detale traktas la punendajn erarojn kaj la aljuĝendajn punpoentojn.

Ĉe la reguloj B. kaj C. la erarojn oni kalkulas en punsekundoj, al kiuj oni aldonas la vegtempon.

La reguloj B. kaj C. diferencas unu de la alia nur pro ilia malsama punsekundo-sistemo, en la regularo detale klarigita.

Por povi decidi pri unualoka klasigo inter egalstataj konkursantoj de iu ajn rajdsalta disciplino, la konkursa juĝistaro aplikas unu, aŭ se necese pli da tn. koncizigoj (t.e. kuntiritaj, kurtitaj kromkurumoj, mallonge kromkurumoj). La koncizigoj estas ripetitaj kurumoj kun malpliigita nombro de obstakloj (de tie la nomo: koncizigo, alie kuntirita, kurtita kromkurumo), sed disvolvigitaj cetere laŭ la reguloj validaj por la originala vego de la disciplino. La obstaklonombro de la koncizigo ne povas esti malpli ol la duono de tiu de la ĵusantaŭa kurumo, sed neniel malpli ol ses. Se post la unua koncizigo restas ankoraŭ egalstataj rajdistoj, sekvas la dua, kun eventuale ankoraŭ pli malpliigita obstaklonombro, kaj tiel plu, ĝis restas unusola venkinto. Post la kvara aŭ kvina koncizigo la konkursa juĝistaro rajtas interrompi la konkurson kaj deklari ĉiujn restintojn egalstate unualokaj klasitoj. Disciplinoj:

1. *Pujsanco*

La celo de la disciplino estas demonstri, kiomgrade la ĉevalo estas kapabla salti altajn obstaklojn. La vego konsistas el 6-8 vertikalaj obstakloj almenaŭ 1,40 m-ojn altaj. Kaze de sama nombro da punpoentoj, ĉe la unualoka klasigo oni aplikas koncizigon kun malpliigita nombro da plialtigitaj kaj/aŭ plilarĝigitaj obstakloj. La konkurson oni prijuĝas laŭ regulo A.

2. *Ĉassaltigo*

La celo estas prijuĝi la obeemon kaj gvideblon de la ĉevalo. La vego konsistas el zigzaglinia traco sen deviga vojlinio, nur la numero de la obstakloj montras la vicordon de la saltigoj. — La obstakloj estas variaj, iuj povas esti tiaj, ke la rajdisto devas elseliĝi kaj mane transkonduki la ĉevalon. Prijuĝo laŭ reguloj B. aŭ C., konforme al la konkursproklamo. La eraroj estas punataj per sekundoj, kiujn oni aldonas al la vegtempo de la konkursanto.

3. *Amerika saltigo*

Tiu ĉi konkurson oni kuras por temporezulto, tra mezgradaj obstakloj. Por ĉiu konkursanto la vego finiĝas ĉe la unua eraro, sendepende de ties karaktero (renversita obstaklo, malobeo, falo ktp.).

Koncerne la disvolvigon la konkursaranĝantaro rajtas antaŭskribi du variantojn:

a) ili difinas la maksimuman nombron de la saltendaj obstakloj;

b) ili difinas certan tempodaŭron (ne pli ol 90 sek.), dum kiu la konkursanto devas saltigi kiom eble plej multe da obstakloj.

Anstataŭ punpoentojn la konkursantoj ricevas po du poentojn por ĉiu saltita kaj po unu poenton por la renversita obstakloj. Venkas, kiu atingis plej multe da poentoj.

4. *Barriersaltigo*

Tiu ĉi disciplino estas speciala ekzameno pri lerto kaj saltokapablo. Laŭlonge de la vego oni starigas 6 vertikalajn obstaklojn en formo de sammezuraj stangoj, 11 m-ojn distance unu de la alia, kaj aŭ samalte (ekz. 1,20 m-oj) aŭ laŭ ascendaj altoj (ekz. de 1,10 ĝis 1,60 m-oj).

La konkursantoj plenumintaj la unuan kurumon senerare aŭ kun sama malpleja nombro da eraroj, ripetas la saltigon tra la samaj 6 obstakloj tiomfoje, ĝis restas unu venkinto. Se 4-5 kurumoj ne decidas pri la definitiva rezulto, tiam la konkursa juĝistaro rajtas ĉesigi la konkurson kaj deklari la restintajn rajdistojn egalstate unualokaj klasitoj. La disciplino disvolviĝas laŭ regulo A., sen tempomezurado.

Aparta grupo de la rajdsaltigo-disciplinoj estas la stafetsaltigoj. En tiuj disciplinoj partoprenas teamoj el du aŭ pli da rajdistoj. La vego longas ĝenerale 600 m-ojn kaj havas ĉ. 12 obstaklojn. Se unu el la rajdistoj senerare trarajdis sian vegon, la sekvanta devas lin ŝanĝi kaj komenci sian vegon. La startlinion transpasas nur la unua, la cellinion nur la lasta rajdisto de la teamo.

Uzataj estas la sekvantaj disciplinoj de la stafetsaltigo.

5. Stafetsaltigo kun bastontransdono

La tuta teamo paŝas samtempe sur la vegon. La unua rajdisto — kun ŝanĝbastono enmane — trarajdas la vegon ekde la startejo ĝis la lasta obstaklo, kiun saltiginte li transdonas la bastonon al la sekva rajdisto de la teamo. Same agas la ceteraj teamanoj. La vegtempo estas kalkulata de la starto ĝis la alceliĝo de la lasta membro de la teamo. Prijuĝo laŭ reguloj A., aŭ B., aŭ C.

6. Stafetsaltigo kun starto el fermitejo

La tuta teamo paŝas samtempe sur la vegon kaj eniras ĉirkaŭbaritan areon nomatan “stafetkorto”. Krom la unua rajdisto neniu el la teamo rajtas eliri la stafetkorton antaŭ ol lia antaŭulo plenumis la saltigojn sur la vego kaj revenis tien. La vegtempo estas kalkulata ekde la starto de la unua teamano ĝis la alceliĝo de tiu lasta. La prijuĝon de la konkurso la konkursproklamo povas antaŭskribi laŭ la reguloj A., aŭ B., aŭ C.

7. Stafetsaltigo laŭ Amerika maniero

La disciplino disvolviĝas laŭ tiu ĝenerala regulo, ke post la unua eraro de iu ajn el la teamanoj devige sekvas ŝanĝo, t.e. la sekvanta rajdisto daŭrigas la saltigojn. Koncerne la disvolvon ekzistas 4 alternativoj, el kiuj oni elektas kaj antaŭskribas unu por la konkurso. Tiuj alternativoj estas la jenaj:

La konkurso de la teamo daŭras,

- a) ĝis la unua eraro de la lasta teamano, kiam oni “elsonorigas” lin, sekve ankaŭ la teamon;
- b) ĝis la teamo plenumis tiom da vegorondoj, el kiom da personoj ĝi konsistas. Dumtempe ĉiun eraron postsekvas ŝanĝo, do la sama rajdisto povas reveni plurajn fojojn en la konkurson;
- c) certan difinitan tempodaŭron, resp. finiĝas pli frue, se la lasta teamano kulpis sian unuan eraron pli frue, kaj pro tio oni elsonorigis lin. Kompreneble en tiu ĉi alternativo ĉiu teamano venas nur unu fojon en la konkurson;
- ĉ) certan difinitan tempodaŭron, dum kiu la teamanoj klopodas atingi kiel eble plej multe da bonaj saltigoj, ŝanĝante sinsekve unu la alian post ĉiu eraro, ĝis oni sonorigas la tempofinon.

Ĉe la prijuĝo ĉiu plenumita saltigo valoras 2 poentojn kaj ĉiu renversita obstaklo valoras 1 poenton.

8. Premio de la nacioj

Tiu ĉi disciplino estas aranĝebla nur en la oficialaj internaciaj konkursoj, kaj ĝi estas deviga por ĉiu nacio partoprenanta la konkurson per almenaŭ tri konkursantoj. Nome la kompleta teamo de la disciplino Premio de la nacioj konsistas el 4 rajdistoj kun po unu ĉevalo, sed oni taksas nur la rezulton de la tri plej bonaj teamanoj. Ĉiu nacio rajtas partoprenigi nur unu nacian teamon. La konkursantoj rajdas la vegon dufoje, en la sama tago. Se necese, oni aplikas unufojan koncizigon. La disciplinon rajtas partopreni nur tiaj ĉevaloj, kiuj jam partoprenis almenaŭ unu disciplinon de la disvolviĝanta oficiala internacia konkurso.

La deviga nombro de la obstakloj estas 13-14, kun alteco inter 1,30 kaj 1,60 m-oj. La largeco de la akvofoso — sen la forsaltiga stango aŭ heĝo — estas almenaŭ 4 m-oj. La longaj saltigejoj (obstakloj) estas 1,50-2,20 m-aj kun laŭproportia alteco. Devigaj estas du 1,50 m-aj vertikalaj kaj almenaŭ ses aliaj, minimume 1,40 m-ojn altaj obstakloj. La veglongo estas 800 m-oj, enhavanta almenaŭ unu duoblan aŭ trioblan, sed ne pli ol tri duoblajn aŭ unu duoblan plus unu trioblan saltigejojn.

B) Dresrajdo

La celo de la dresrajdo estas: harmonie disvolvi la organismon kaj kapablojn de la ĉevalo. El tio ĉi sekvas, ke oni devas formi la ĉevalon samtempe trankvila, obeema kaj atentema, por

realigi tiamaniere la kompletan akordon inter la rajdisto kaj ĉevalo.

Ekzercoj.

En la pozicio “*halt*” la ĉevalo estas atentema, senmova; staras rekte kaj ekvilibre sur ĉiuj kvar piedoj, prete ekiri je la plej milda helpo de sia rajdisto. Ĝia kolo estas elegante tenata, kun verto levita, la kapo estas iom antaŭ (albruste) la vertikalo, la buŝo estas mola, la ĉevalo maĉas la trenson kaj tra la senmovaj gvidrimenoj ĝi tenas molan kontakton kun la manoj de la rajdisto.

El ĉiuj irmanieroj (paŝado, troto, galopo) la transiro al “*halt*” devas okazi grade, leĝere kaj mallonge.

La *paŝado* estas antaŭeniga irmaniero, kie la piedoj de la ĉevalo sekvas unu la alian en bone distingebla kvaropa ritmo, kaj konservas tiun ritmon dum la tuta daŭro de la paŝmovo.

Oni diferencigas mezan, kolektitan, etenditan kaj liberan paŝadojn.

La *meza paŝado* estas decida, regula, malrigida, sen tre etendi la longon de la paŝoj. La ĉevalo vigle, sed trankvile paŝadas, la kvar hufoklakoj estas precize percepteblaj.

En la *kolektita paŝado* la ĉevalo restas apoganta sin kaj decide antaŭeniras. La kolo iom leviĝas kaj pliarkiĝas. La kaplinio estas proksime de la vertikalo. Buŝe ĝi apogas sin al la leĝere tenataj gvidrimenoj. La longo de la paŝoj estas malpli ol ĉe la meza paŝado. La malantaŭaj hufoj paŝas senpere post la spurojn de tiuj antaŭaj. La movo restas laŭtakta kaj vigla, la piedvicordo regula.

En la *etendita paŝado* la ĉevalo etendas siajn paŝojn pli longaj, sen perdi la regulecon de la hufoklakoj. La malantaŭaj piedoj eksplicite transpaŝas la spurojn de la antaŭaj hufoj. La rajdisto lasas al la ĉevalo etendi sian kapon post la vertikalon, sen ke ĝi perdu la apogon.

La *libera paŝado* estas ripoziga irmaniero. La gvidrimenoj estas tute malstreĉitaj, sekve la ĉevalo povas laŭplaĉe etendi kaj movi la kolon.

La *troto* estas dutakta irmaniero, kie la taktojn disigas momenta ŝvebo. Dum tiu ŝvebo la ĉevalo antaŭensvingas ĉiam po du diagonale malsamajn piedojn kaj poste ĝi ektuŝas la teron per tiuj ĉi antaŭa kaj malantaŭa piedoj.

Oni diferencigas mezan, kolektitan — alinome kurtan — kaj longan trotojn.

La *meza troto* estas meza irmaniero inter la kurta kaj longa trotoj. La ĉevalo decide antaŭenmovas sin, vigle ĝi uzas sian postaĵon, ekvilibrite kaj malrigide ĝi apogas sin helpe de la gvidrimenoj. La paŝoj devas esti plejeble egalritmaj kaj la malantaŭaj piedoj paŝas en la spurojn de la antaŭaj piedoj.

La *kolektita aŭ kurta troto* la iome levita kolo donas al la ŝultroj pli da movlibereco en ĉiu direkto. Antaŭensvingiĝante sub la pezo de la korpo, la postaĵo konservas la forton de la impeto spite la reduktitan rapidecon. La paŝolongoj plimalgrandiĝas, sed la paŝoj fariĝas pli viglaj kaj pli leĝeraj.

En la *longa troto* la ĉevalo faras la plej longajn paŝojn, sen eltiri sin el sub la regado de la rajdista mano, nek apogas sin sur la trenson. La kolo plilongiĝas, la antaŭenmovo de la ŝultroj, antaŭensvingitaj de la postaĵo, fariĝas pli intensa, sen levigi pli alten.

En la kolektita troto la rajdisto *sidtrotas*, en meza kaj longa troto li *sidtrotas aŭ levtrotas*, konforme al la antaŭskribo de la ekzercio.

La *galopo* estas tia irmaniero, en kiu tri hufoklakoj sekvas unu la alian. Ekz. ĉe la dekstramana (dekstraflanka) galopo la unua klako estas tiu de la malantaŭa maldekstra piedo, la dua klako estas la samtempa teratingo de la malantaŭa dekstra kaj antaŭa maldekstra piedoj, la tria estas la klako de la antaŭa dekstra piedo. Tion sekvas ŝvebo, kiam ĉiuj kvar piedoj estas en la aero, antaŭ ol la malantaŭa maldekstra piedo denove atingis la teron.

Oni diferencigas mezan, kolektitan — alinome kurtan — kaj longan galopojn.

La *meza galopo* estas meza irmaniero inter la kolektita kaj longa galopoj. De la kapo ĝis la vosto la ĉevalo formas rektan linion kaj libere movas sin en natura ekvilibro. La galopsaltoj estas spacogajnaj, samlongaj kaj la movo estas ritma. La postaĵo disvolvas kreskantan

movantan forton.

Ĉe la *kolektiita aŭ kurta galopo* la ŝultroj estas senpezigitaj, liberaj kaj moviĝemaj, la postaĵo aktiva kaj elasta. La movoj de la ĉevalo estas pli levitaj, sen la reduktigo de la antaŭeniĝo.

En la *longa galopo* la kolo etendiĝas, la nazo staras plimalpli antaŭe, la galopsaltoj plilongiĝas, sen ke la ĉevalo perdas iom ajn el sia trankvileco kaj leĝereco.

La *kontraŭgalopo* (dum rajdeja rondrajdo) estas loziga (malrigidiga) elemento. La kurbiteco de la vertebro de la ĉevalo estas kontraŭa al tiu de ĉevalo adaptiĝanta al la arko de la rondo.

Estas nomata *saltoŝanĝo*, kiam la ĉevalo ŝanĝas la galopon ajnmanan en tiun alimanan dum ununura galopsalto. La saltoŝanĝo estas ĝusta, se la ŝanĝo okazas post la tria takto, dum la ŝvebo.

La “saltoŝanĝo kun intermeto de kelkaj paŝoj” signifas, ke el galopo la rajdisto transkondukas la ĉevalon en paŝadon, kaj la engalopigo alimanan okazas post kelkaj efektivaj paŝoj.

La *retropaŝado* estas retroa movo de la ĉevalo. Ĝi estas dutakta: la diagonalaj piedoj sinkrone moviĝas.

Kromaj, specialaj irekzercoj estas:

la *flankiro*, kiu subgrupigas je la ekzercoj “*ŝultro internen*”, *traverso*, *ranverso*, *duonflankiro*, kaj *seria duonflankiro*;

la *kurboj*, kun la ekzercoj *cirklo*, *serpentinio*, *okformo*;

la *piruetoj*, kun la ekzercoj *duonpirueto* kaj *pirueto*;

la *pasagŝo* kaj

la *piafo*.

Kiel en la subbranĉo rajdsalto, tiel ankaŭ en la subbranĉo dresrajdo oni aranĝas konkursojn. La celo de tiuj konkursoj estas gardi la arton de la rajdo kontraŭ alfrontitaj misvojoj.

En la lernado de la rajdoarto tri ŝtupoj sekvas unu la alian. El la materialo de tiuj tri ŝtupoj oni kunmetis po unu disciplinon.

Disciplinoj:

1. *Premio Sankta Georgo*

Ĝia programo inkluzivas tiujn taskojn, surbaze de kiuj unuparte estas prijuĝebla, ĉu la ĉevalo volonte obeas al ĉiuj postuloj de la klasike rajdo, aliparte estas mezurebla la grado de ĝia dresiteco, kiu ebligas, ke ĝi plenumu la taskojn mole, leĝere, sen ajna superflua fortostreĉo.

Tiun ĉi disciplinon rajtas partopreni iu ajn ĉevalo, escepte la tri unualokajn klasitojn de la Grandpremio de la Dresio, disvolvita en oficiala internacia dresrajdo-konkurso, en la olimpikoj, en la Eŭropo- aŭ mondĉampionado de dresrajdo. Same ekskluditaj estas el la disciplino la ĉevaloj gajnintaj la unuan premion en la disciplino Intermediero, disvolvita en oficiala internacia dresrajdo-konkurso, kiel ankaŭ tiuj, kiuj gajnis dufoje unuan premion en la disciplino Premio Sankta Georgo, disvolvita en oficiala internacia dresrajdo-konkurso.

2. *Intermediero*

Ĝia celo estas grade kaj sen nocio al ilia organismo, alkiutimigi la ĉevalojn, plenumintajn senerare la disciplinon Premio Sankta Georgo, el la plej altgradaj postuloj de la disciplino Grandpremio de la Dresio.

La Intermedieron rajtas partopreni ĉiu ĉevalo, escepte tiujn, kiuj atingis dufoje unualokan klasigon en la disciplino Grandpremio, disvolvita kadre de oficiala internacia dresrajdo-konkurso, de la olimpikoj aŭ de iu el la Regionaj ludoj. Krome estas ekskluditaj tiuj, kiuj atingis trifoje unualokan klasigon en la disciplino Intermediero, kadre de oficiala internacia dresrajdo-konkurso.

3. *Grandpremio de la Dresio*

La Grandpremio estas dresrajdo-konkurso sur alta nivelo, en kiu manifestiĝas la perfekta malrigidiĝo de la ĉevalo. Ĝi inkluzivas ĉiujn irmanierojn de la lernorajdo, krome ankaŭ la fundamentojn de la klasika altaskolo de la rajdo.

En tiu disciplino povas partopreni iu ajn ĉevalo sen limigoj, escepte tiujn, kiuj jam tri fojojn partoprenis en la disciplino Grandpremio, okaze de la olimpikoj. Kadre de unu konkurso la sama ĉevalo rajtas partopreni en ne pli ol du, sed nepre najbarŝtupaj disciplinoj.

En ĉiu internacia dresrajdo-konkurso la konkursa juĝistaro konsistas el tri membroj-juĝistoj. Ĉiuj tri havas po unu sekretarion. Krome oni komisiis iun por funkcii kiel flankjuĝisto.

Rigoraj antaŭskriboj reguligas la manieron de la poentumado. La juĝistoj taksas la plenumojn per poentoj kun valoro de 0 ĝis 10. La individua klasigo okazas laŭ la suma valoro de la ricevitaj poentoj.

Por povi pli facile decidi inter avansancaj konkursantoj, en certaj disciplinoj oni aplikas la tn. revokon, nome la rajdisto devas prezenti duan fojon aŭ la jam rajditan, aŭ alian difinitan ekzercoserion. En la oficiala internacia dresrajdo-konkurso, olimpikoj kaj Regionaj ludoj la revoko estas deviga. Ĉe la taksado de revokitaj rajdistoj oni elkalkulas la mezvaloron de la du plenumitaj ekzercoserioj.

Inter la teamoj venkas tiu, ĉe kiu la suma rezulto de la 3 plej bonaj teamanoj estas la plej bona.

C) Terenrajdo

La celo de la terenrajdo estas, ke la rajdisto pruvu siajn rajdkapablon, rapidan decidipovon, perfektan konon pri la irmanieroj de la ĉevalo kaj pri la ĝusta aplikado de tiuj irmanieroj sur la tereno. Koncerne la ĉevalon la terenrajdo estas ekzameno pri lerto, kondukeblo, kuraĝo, saltopreteco, persisto kaj rapideco. La terenrajdo disvolviĝas sur la tereno, t.e. ekster urboj kaj vilaĝoj, tra kampoj, arbaroj, montoj kaj valoj, do sur teritorio por rajdkonkursoj tute ne preparita. La konkursantoj devas trarajdi difinitan distancon laŭ indikita vojlinio. Tiu vego aŭ estas provizita per obstakloj, aŭ estas senobstakle, depende de la speco de la disciplino kaj de la konkursproklamo.

Disciplinoj:

1. Steplo

Tiu disciplino estas individua obstaklokonkurso disvolvita en konstanta aŭ improvizita konkursejo konstruita kaj aranĝita kiel obstaklotereno. La konkursantoj trarajdas la vegon individue, unuope, kaj la klasigon oni difinas baze de la valoraj poentoj kaj baze de la punaj poentoj ricevitaj pro la kulpitaj eraroj.

La nombro de la obstakloj estas 6. Ili estas parte heĝoj, parte fosoj. Grave estas, ke ili aspektu tuta naturaj kaj terenecaj.

2. Kroso

La konkurso disvolviĝas sur la tereno, laŭ vojlinio provizita per obstakloj kaj limita per flagoj. La indikita traco estas sekvenda. La venkendaj obstakloj estas rekoneblaj, flage limitaj. La konkursantoj startas unuope. La taksado okazas baze de la valoraj kaj punaj poentoj.

La nombro de la obstakloj estas 6. Ili estas precipe terbenkoj, grimpejoj, krutejoj.

3. Terenkonkurso

Ĝi disvolviĝas sur vojoj, padoj kaj tereno, aŭ ekskluzive nur sur la tereno, kun aŭ sen obstakloj. La konkursdistanco estas 25-35 km-oj, kaj estas plenumenda seninterrompe. De la starto ĝis la celo la vojlinio povas esti indikita kaj devige sekvenda, aŭ estas laŭplaĉa.

4. Distanrajdo,

kun distanco de pli ol 35 km-oj, disvolvata sur tereno. La distanco estas rajdenda dum unu tago, kun devigaj haltoj.

5. Plurtaga distanrajdo,

plenumata dum pluraj sinsekvaj tagoj.

— o — o —

Oni diferencigas la sekvantajn konkursospecojn.

a) *Naciaj Rajdkonkursoj*, kiujn partoprenas nur tiuj konkursantoj, kiuj apartenas al tiu nacia federacio, en kies lando la konkurso disvolviĝas.

b) *Amikecaj Rajdkonkursoj*, kies plurajn disciplinojn rajtas partopreni ankaŭ rajdistoj de nur unu fremda nacio. Tiuj partoprenas individue, surbaze de invito.

c) *Internaciaj Rajdkonkursoj*, kies plurajn disciplinojn rajtas partopreni diversnaciaj rajdistoj, alvenintaj surbaze de invito.

ĉ) *Oficialaj Internaciaj Rajdkonkursoj* aŭ ĉampionadoj, kiujn oni aranĝas kun la permeso de la mondfederacio. La naciaj federacioj sendas siajn elektitajn konkursantojn oficiale al tiuj konkursoj. La mondfederacio de la sportobranĉo rajdo estas: Fédération d'Equitation Internationale (FEI). Esp-e: Internacia Rajdista Federacio.

d) *Regionaj Rajdkonkursoj* (Regionaj Ludoj)

Tiuj estas la Eŭropo-ĉampionadoj (ev. alia kontinent-ĉampionado) de rajdo kaj la mondĉampionadoj de rajdo.

e) *Olimpikaj Rajdoĉampionadoj*

Ĉiu supra konkursospeco havas aparte siajn tri konkurso-subbranĉojn, nome la rajdosalto-konkurso, la dresrajdo-konkurso kaj la tritagan rajdkonkurso, nomatan vulgare militario. Tiuj konkurs-subbranĉoj aŭ konkurskategorioj estas aranĝataj apartigitaj unu disde la alia, kaj tempe kaj loke sendependaj unu de la alia. Konsekvence estas aranĝataj ekzemple: naciaj rajdsalto-konkursoj, naciaj dresrajdo-konkursoj, naciaj tritagaj rajdkonkursoj; amikecaj dresrajdo-konkursoj ktp.; internaciaj tritagaj rajdkonkursoj ktp.; oficialaj internaciaj rajdsalto-konkursoj ktp.; Eŭropo-ĉampionado de dresrajdo, ktp.; olimpikaj tritagaj rajdkonkursoj ktp.

La rajdsaltigo-konkursojn kaj la dresrajdo-konkursojn traktas la supraj ĉapitroj A. kaj B. Estas klarigenda ankoraŭ la tria kategorio, la *tritaga rajdkonkurso*, alinome *militario*.

Por povi konstati, kiomgrade la rajdisto majstras la tri subbranĉojn de la sportobranĉo rajdo kaj ke kiom multflanke estas uzebla la ĉevelo, oni aranĝas ankaŭ kunmetitajn konkursojn. La plej kompleta, en la oficialaj internaciaj kaj olimpikaj rajdkonkursoj sole aranĝata kunmetita konkurso estas la tritaga rajdkonkurso. De la konkursanto ĝi postulas grandan sperton en ĉiuj branĉoj de la rajdo, perfektan scion ĝuste rajdi sian ĉevalon inter ĉiaj ajn cirkonstancoj. Kiel rezulton de la bona dresiteco, de la ĝuste planita kaj korekte plenumita hardado, flanke de la ĉevalo ĝi postulas plej multflankan uzeblecon.

La tritagan rajdkonkurson partoprenas po unu 4-membra teamo de la partoprenantaj nacioj kaj kromaj individuaj konkursantoj. Nome la konkursantojn oni taksas ankaŭ individue, kio koncernas ankaŭ la teamojn.

La unua tago estas la tago de la dresrajdo. La duan tagon oni disvolvas la terendisplinojn kaj la trian tagon venas la vico de la rajdsalto-konkursoj. La konkursoj disvolviĝas ĝenerale laŭ la antaŭskriboj de la tri subbranĉoj, kun certaj specialaj kaj necesaj modifoj.

En unu jaro teorie ĉiu Eŭropa lando — kiu havas nacian federacion — rajtas aranĝi po unu oficialan internacian rajdkonkurson el la sama konkurskategorio. En ekstereŭropaj landoj po du konkursoj estas aranĝeblaj. Tamen praktike ekz. en Eŭropo en unu jaro estas aranĝataj ne pli ol ĉ. 15 oficialaj rajdosalto-konkursoj, malpli multe da oficialaj internaciaj tritagaj rajdkonkursoj, kaj — escepte la jaron de la olimpikoj, kiam tute ne estas — ĝenerale nur unu oficiala internacia dresrajdo-konkurso, kiun patronas la mondfederacio mem, kaj pro tio ĝi estas konsiderata la plej grava dresrajdo-konkurso de la jaro.

Esprimoj: La Eŭropo-ĉampiono de rajdsalto de 1971. La nacia teamo de Italio akiris la unualokan klasigon en la mondĉampionado de dresrajdo de la jaro 1967 en Montrealo. En la ĉijara mondĉampiona teamo de rajdsalto konkursis ankaŭ du virinaj rajdistoj. La olimpika

ĉampiono de la individua rajdsalto de jaro 1964 fariĝis la sveda N.N. Ĉiujn tri unualokajn klasigojn de la olimpika ĉampionado de dresraĵdo de 1968 gajnis la rajdistoj de Eŭropaj nacioj. La olimpikoĉampiona teamo de la tritaga rajdkonkurso — alinome la unualoke klasita teamo de la olimpika ĉampionado de militario — akiris unualokan klasigon en du subbranĉoj de la ĉampionado, nome en dresraĵdo kaj en terenraĵdo, dum en la tria, t.e. en la rajdsalto ili sukcesis elbatali la valoran dualokan klasigon. La ormedala teamo de la Eŭropo-ĉampionado de militario.

REMO

Turnante la dorson al la veturdirekto, la remisto sidas sola aŭ kun unu aŭ pli da remistoj-kunuloj en unu el la konkursaj remboatoj, kaj — depende de la tipo de la boato — li remas per unu aŭ du remiloj certan distancon, klopodante kiel eble plej rapide alceliĝi la boaton per streĉo de sia forto kaj apliko de la plej konvena remostilo, kompreneble en disciplinita kunlaboro kun la ceteraj samboatanoj, se li remas en plurpersona boato.

Sidante vizaĝe al la veturdirekto, la stiristo sidas ĉe la malantaŭo de la boato, kaj stiras ĝin t.e. per la tirŝnuro li movas la rudron de la boato, per teni ĝin en la ĝusta direkto.

La mondfederacio de la sportbranĉo remo estas: Fédération Internationale des Sociétés d'Aviron (FISA). Esp-e: Internacia Federacio de la Remistaj Asocioj.

La remkonkursejo (nomata remvego, mallonge vego) havas difinitajn mezurojn antaŭskribitajn de FISA, aparte por la diversaj konkursospecoj. Por la olimpikoj, mond- kaj kontinent-ĉampionadoj estas devigaj la ĉisube konigataj mezuroj, dum en la ceteraj internaciaj konkursospecoj estas certagradaj allasoj, certaj permesitaj devioj.

La longo de la vego estas por viroj 2000, por virinoj 1000 m-oj, kun plusa 100-metra libera akvo post la celo. Ĝia larĝo devas certigi po 15 m-ojn larĝan remostrion — nomatan *remleno*, mallonge *leno* — por 4-6 formacioj (boatoj), krom se ĉiu leno de la vego estas ĝisfine indikita per buoj en ĉiu 20 m-oj (sistemo Albano), en kiu kazo sufiĉas 12,5 m-ojn larĝaj lenoj. La profundeco de la akvo povas esti 2 m-oj, se la fundo estas egalnivela, sed ĝi devas esti 3 m-oj, se la fundo estas malegala. Se la konkurso okazas sur rivera akvo, la flurapideco ne povas esti pli ol 6 m-oj/minuto.

Ĉe la startejo — kaj ĉe stagna kaj ĉe rivera akvo — la uzo de fiksitaj startinstalaĵoj (ankrita pontono en ĉiu remleno) estas deviga. Se la vego ne ampleksas la tutan larĝon de la akvospegulo, tiam ĝiaj du flanklinioj estas indikataj de buoj en ĉiu 50 metroj. Post ĉiu 250 m-a distanco (250, 500, 750 ktp.) la buoj havas alian koloron. Ĉe la distancoj 500, 1000, kaj 1500 m-aj super la vego estas streĉenda ŝnuro. Sur tiu ŝnuro super ĉiu leno pendas po unu grandmezura tabulo por montri la direkton. Ĉe ĉiu 500-metra distanco la tabuloj ŝangas sian formaton aŭ koloron. Se oni ne povas streĉi ŝnuron super la vego, tiam oni devas apliki la sistemon Albano.

La celon indikas la linio de flagumitaj buoj flosantaj fine de ĉiu remleno.

La konkursantoj de la remkonkursoj estas remistoj aŭ stiristoj. Dum la konkursoj ili devas disciplineme obei la konkursan regularon, surhavi sian uniforman nacian aŭ kluban sportveston. Sur la boatoj devas esti alfiksita la asignita startnumero, bone videbla ankaŭ de pli malproksime. La plumo de la remiloj devas esti farbita laŭ la naciaj koloroj de la formacio. Por preventi pli gravajn difektiĝojn okaze de eventuala kolizio, 4 cm-ojn radiusa blanka globo el masiva gumo devas esti surmuntita sur la pruo de ĉiu boato eĉ dum la trejnoj.

La korpopezo de la viraj remistoj estas maksimumita kaj tiu de la ambaŭseksaj stiristoj estas minimumita. La meza pezo de la membroj de vira formacio — escepte la stiriston — ne povas esti pli ol 67,5 kg-oj kaj neniu el la membroj povas esti pli ol 70 kg-ojn peza. La malsupra pezolimo de stiristo estas 50, kaj tiu de stiristino 40 kg-oj. La mankantan pezdiferencon (ĉe viroj ĝis 10, ĉe virinoj ĝis 5 kg-oj) oni devas kompletigi per krompezajoj. Se necesas pli da krompezajo, la stiristo ne rajtas konkursi.

Internaciajn remkonkursojn rajtas partopreni nur konkursantoj apartenantaj al tia nacia remista unuiĝo, klubo ktp., kiu estas membro de FISA.

Koncerne la formon, materion kaj mezurojn de la boatoj partoprenantaj en la konkurso estas nenio fiksita kaj antaŭskribita.

Depende de la nombro de la partoprenantaj formacioj en iu disciplino, la konkurso disvolviĝas en unu aŭ pli da etapoj. Se la nombro de la partoprenantaj formacioj ne superas la

nombro de la lenoj de la remvego, tiukaze la konkurso konsistas el ununura finala kurumo. Se pro la granda nombro da partoprenantaj formacioj aŭ malmulta nombro da lenoj la konkurso estas disvolvata ekz. en tri etapoj, tiam la unualokaj klasitoj de la kvaronfinalaj kurumoj kaj la plej bona dualoka venas en la duonfinalon. La unualokaj kaj la plej bona dualoka de la duonfinalaj kurumoj batalas por la tri unuaj lokoj en la finalo.

La membroj de la konkursa juĝistaro, havantaj specialajn funkciojn en la disvolvo de la remkonkursoj, estas: la startjuĝisto, la vegjuĝisto kaj la celjuĝistaro, konsistanta el la gvida celjuĝisto kaj necesnombraj celjuĝistoj kaj tempomezuristoj.

La *startjuĝisto* — kiel ankaŭ la ceteraj juĝistoj de la remkonkursoj — estas kvalifikita konkursa juĝisto, kiu plenumas siajn taskojn sub la gvido de la vegjuĝisto. La loko de la startjuĝisto estas malantaŭ la startlinio, en la akso de la vego, sur konvene elstaranta plata estrado, konstruita sur fiksita (ankrita) floso. Li havas unu ruĝan flagon kaj sonorilon. La formacioj partoprenantaj la sekvan kurumon, devas anonci sin ĉe la startejo plej malfrue 5 minutojn antaŭ la starto, de kiu tempopunkto ĝis 20 sekundoj post la starto ili estas discipline subordigitaj sub la disponon de la startjuĝisto.

La ĉefaj taskoj de la startjuĝisto estas:

a) Antaŭ la starto li kontrolas la regulan posteniĝon de la unuopaj formacioj ĉe la startejo, kiu estas aŭ simpla startlinio, formata el buoj ĉe ĉiu leno (kaze de stagna akvo), aŭ vico de startpontoj (kaze de rivera akvo). La formacioj de la unuopaj kurumoj devas kolektiĝi ĝustatempe, kaj por ne ĝeni la antaŭan kurumon ili prenas pozicion laŭ startnumera vicordo, sur rivera akvo jam 100 m-ojn kaj sur stagna akvo 50 m-ojn antaŭ la startejo. En tiu posteniĝo ili proksimiĝas al la startejo, kiam venas la vico de ilia kurumo.

b) Kiam ĉe la startejo ĉiu formacio — alivorte la tuta ensemblo — estas startopreta, la startjuĝisto startigas la kurumon voĉe (helpe de megafono) kaj samtempe ankaŭ per ruĝa flago. En internaciaj konkursoj la atentigaj kaj startigaj komandvortoj estas ĝenerale en franca lingvo: “Êtes vou pretes?” (Ĉu pretaj?) kaj post iom da paŭzo: “Partez!” (ek!). — Se iu el la formacioj komencas remi antaŭ la starta komandovorto, aŭ se pro alia kaŭzo la startjuĝisto trovas la starton neregula, ene de 20 minutoj li revokas la ensemblon kaj ripetas la starton. Al tio li uzas flagon kaj la sonorilon.

La startjuĝiston helpas en lia laboro la starthelpisto, kies tasko estas precize starigi la boatojn en rekta linio. Tion farinte li donas signon al la startjuĝisto per blanka flago.

La *vegjuĝisto* havas la taskon gvidi la disvolviĝon de la kurumoj laŭ la antaŭskriboj de la konkursa regularo. 20 sekundojn post la starto li transprenas la formaciojn kaj postsekvas la ensemblon — starante en motorboato — ĝis la lasta boato transpasis la cellinion.

Ekde la enboatiĝo ĉe la t.n. enboatiĝa floso ĝis la elboatiĝo la formacioj staras sub la disciplina inspektado de la konkursaj juĝistoj, precipe sub tiu de la vegjuĝisto. Tiun formacion, kies membroj, aŭ iuj el ili ne sekvas liajn instrukciojn, la vegjuĝisto rajtas eskcludi el la temanta disciplino. En pli grava kazo li sugestas al la konkursa juĝistaro la definitivan eskcludon de la kulpintaj konkursantoj el la ceteraj disciplinoj de la sama tago, aŭ de la tuta konkurso.

La vegjuĝisto estas ekipita per po unu blanka kaj ruĝa flagoj kaj per unu laŭtparolilo, aŭ unu sonorilo. Se pro ajna kaŭzo li devas haltigi la kurumon, tion li faras per la flirtigo de la ruĝa flago kaj per sonorilsigno, resp. voĉe, helpe de la megafono. Dum la kurumo li devas atenti, ke neniuj formacioj eliru el sia leno. Ja tio facile povas okazi tie, kie la unuopaj lenoj ne estas aparte indikitaj per buoj, precipe ĉe kurbohavaĵoj, kie iuj el la formacioj remantaj en la pli eksteraj arkoj eventuale trarankoras la kurbon kaj havigas al si tiamaniere senrajtan avantaĝon. Nome se la vego havas kurbon, tiam la startejo estas konforme ŝtupigita, ke ĉiu leno estu egallonga. Se sekve de la forlaso de la propra leno la formacio akiris al si avantaĝon, aŭ kaŭzis malavantaĝon al alia formacio, tiukaze la vegjuĝisto devas eskcludi la kulpintan formacion el la kurumo.

Kolizio estiĝas, se la boato aŭ remiloj de du aŭ pli da formacioj intertuŝigas aŭ interpuŝigas. Se la kolizio liaopinie estis nur supraĵa kaj influis nenies temporezulton, tiam la vegjuĝisto rajtas lasi la ensemblon plukonkursi, sen eskludi la kulpintan formacion.

Estas konsiderata *perturbo*, se la remiloj de du formacioj, venintaj tro proksimen unu al la alia, dum pli longa tempo, sen intertuŝiĝo — “muelante” — krucas en la aero aŭ en la akvo la vojon unu al la alie. Same *perturbo* estas, se iu formacio, transirante en la najbaran lenon, antaŭas la tiean formacion kaj ĝenas ĝin per la akvokirlo estigita per la remiloj. La vegjuĝisto atentigas la formacion pri la antaŭvidebla aŭ kulpita *perturbo*. Kaze de pli grava *perturbo* aŭ kolizio li eskludas la kulpan formacion el la kurumo, resp. el la koncerna tuta disciplino.

Se la kurumo disvolviĝis sen malregulaĵo, la vegjuĝisto faras signon per la blanka flago. En la ĉampionadoj de FISA dum la kurumoj la vegjuĝiston postsekvas vicvegjuĝisto en alia motorboato. Tiam la vegjuĝisto ĝenerale postsekvas la svarmon de la avanaj formacioj, atentante ne ĝeni per la ondoj de la motorboato la antaŭeniĝon de la ceteraj formacioj.

La *celjuĝisto* atentigas la alceliĝon de la formacioj kaj registras la alvenan vicordon per helpo de simpla instrumento nomata celkontrolilo. En dubaj kazoj la pli precizan konstataĵon certigas la fotoj de la celfotilo.

La formacio atingis la celon, se la pruo (vulg. nazo) de la boato transiris la cellinion. En la momento de la celtrapaso ne devas troviĝi ĉiuj remistoj en la boato, sed la stiristo nepre jes. Kaze de egalstato inter du aŭ pli da formacioj pli nova kurumo decidas pri la klasigo.

La *tempomezuristoj* havas la taskon mezuri la temporezulton de la unuopaj formacioj.

La internaciaj remkonkursoj havas la sekvantajn specojn:

a) Ĉampionadoj publikigitaj de FISA: mondĉampionadoj (okazigitaj ĉiun kvaran jaron, du jarojn post la olimpikoj), olimpikoj, kontinent-ĉampionadoj. Virinaj formacioj povas partopreni nur la kontinent-ĉampionadojn, la du aliajn ne.

b) Internaciaj konkursoj sur vegoj rekonataj de FISA.

c) Internaciaj konkursoj sur vegoj kun reduktitaj postuloj.

ĉ) Renkontoj de diversnaciaj klubotrupoj sur vegoj konformaj al la internaciaj antaŭskriboj.

En la jara kongreso de FISA oni elektas la landojn, kiuj aranĝos la sekvontjarajn ĉampionadojn. La loko de la viraj kaj virinaj kontinent-ĉampionadoj ne devas esti la sama. Principe du sinsekvajn mondĉampionadojn en Eŭropo sekvas unu ekster Eŭropo.

Sekve de la du aplikataj remmanieroj la sportobranĉo remo dividigas en du subbranĉojn, kiuj estas la unuremila kaj la duremila remoj.

A) Unuremila remo

Du, kvar aŭ ok remistoj — kun aŭ sen stiristo — sidante en la boato unu post la alia, remas per po unu remilo, nome la duono triborde, la ceteraj baborde, ĉiu malsamflanke ol siaj antaŭulo kaj malantaŭulo. Disciplinoj:

1. *Unuremila duopa remo kun stiristo* (nur por viroj) (du remistoj kun po unu remilo)

Nomo de la formacio: Unuremila duopo kun stiristo

2. *Unuremila duopa remo sen stiristo* (nur por viroj)

Nomo de la formacio: Unuremile duopo sen stiristo

3. *Vira unuremila kvaropa remo kun stiristo* (kvar remistoj kun po unu remilo)

Nomo de la formacio: Vira unuremila kvaropo kun stiristo

4. *Virina unuremila kvaropa remo kun stiristo*

Nomo de la formacio: Virina unuremila kvaropo kun stiristo

5. *Unuremila kvaropa remo sen stiristo* (nur por viroj)

Formacio: Unuremila kvaropo sen stiristo

6. *Vira unuremila okopa remo kun stiristo* (ok remistoj kun po unu remilo)

Formacio: Vira unuremila okopo kun stiristo

7. *Virina unuremila okopa remo kun stiristo*

Formacio: Virina unuremila okopo kun stiristo

B) Duremila remo

Unu, du aŭ kvar remistoj — kun aŭ sen stiristo — sidante unu post la alia, remas per po du remiloj. Disciplinoj:

1. *Vira duremila solopa remo*
(unu remisto kun du remiloj)
Nomo de la formacio: Vira duremila solopo
2. *Virina duremila solopa remo*
Formacio: Virina duremila solopo
3. *Vira duremila duopa remo*
(du remistoj kun po du remiloj)
Formacio: Vira duremila duopo
4. *Virina duremila duopa remo*
Formacio: Virina duremila duopo
5. *Vira duremila kvaropa remo kun stiristo*
(kvar remistoj kun po du remiloj)
Formacio: Vira duremila kvaropo kun stiristo
6. *Virina duremila kvaropa remo kun stiristo*
Formacio: Virina duremila kvaropo kun stiristo

Esprimoj: Remkonkurso aŭ konkurso de remo. Konkurso de unuremila duopa remo kun stiristo, aŭ konkurso de la unuremilaj duopoj kun stiristo. Eŭropo-ĉampionado de virina duremila solopa remo, aŭ Eŭropo-ĉampionado de la virinaj duremilaj solopoj. Mondĉampiona formacio de vira unuremila okopa remo kun stiristo, aŭ mondĉampiona formacio de la viraj unuremilaj okopoj kun etiristo. Olimpika ĉampionado de vira duremila duopa remo, aŭ olimpika ĉampionado de la viraj duremilaj duopoj. Olimpikoĉampiona formacio de la vira duremila duopa remo.

SKERMO

Sekvante la regulojn de la sportobranĉo, la skermisto klopodas trafi pike (ĉe rapiro kaj spado) respektive pike aŭ tranĉe (ĉe sabro) la validan korposurfacon de sia kontraŭulo pere de sia skermilo tenata en unu mano, samtempe celas malhelpi, ke la kontraŭulo sukcesu atingi validan trafon sur li.

La ĉefaj kvar agogrupoj de la skermoaktivado (konsistantaj ĉiuj el pluraj simplaj aŭ malsimplaj variantoj) estas: la *atako*, la *parato*, la *riposto* kaj la kontraŭriposto.

La atako estas tiu iniciativa ago, en kiu la skermisto direktas la armilon al la kontraŭulo kaj antaŭeniĝante seninterrompe minacas ĝis la momento de la *trafo* la validan korposurfacon de la kontraŭulo.

La parato estas tia perarmila sindefenda ago, kiu malhelpas la sukceson de la atako de la kontraŭulo.

La riposto estas la ataka ago de tiu skermisto, kiu paratis la kontraŭulan atakon.

La kontraŭriposto estas la ataka ago de tiu, kiu paratis la riposton.

La movojn ĉe la skermanta mano kompletigas specialaj piedmovoj kun lerta kaj rapida tekniko.

La skermokonkursoj disvolviĝas en ĉambrego, sur 1,8-2 metrojn larĝa kaj — depende de la armilspeco — diverslonga (12-24 m) *skermoplanko* el ligno, linoleumo, gumo, plasto ktp. Ĉe la subbranĉoj rapirado kaj spadado la trafojn signas elektra trafsignilo, cele de kio la skermoplankon kovras metalfadena kovrilo. Ĝenerale la skermoplanko kuŝas sur podio 0,5 m-ojn alta. La konkursantoj surhavas konvenan vestaĵon inkluzive de skermokasko, por preventi vundiĝon. Ĉe uzo de trafsignilo la skermovesto estas el metalfadena ŝtofo.

La skermiloj havas oficiale fiksitajn mezurojn.

La batalon decidanta pri venko, aŭ malvenko inter du skermistoj, aŭ du teamoj oni nomas *matĉo*. Por distingi, oni parolas pri individua kaj teama matĉoj. La individua matĉo konsistas el du — se necese, el tri — *asaltoj*, nome du gajnitaj asaltoj estas necesaj por venki en la matĉo.

Unu asalto daŭras 6 (ĉe virinoj 5) minutojn, respektive ĝis la ricevo de 5 (ĉe virinoj 4) trafoj ĉe unu el la du skermistoj. Se ĝis la fino de la asaltotempo neniu el la du konkursantoj ricevis la maksimuman nombron da trafoj, oni kompletigas la nombron de la pli multaj ricevitaj trafoj ĝis 5 (ĉe virinoj ĝis 4) kaj per la sama plusa nombro oni pliigas la sumon de la ricevitaj trafoj ĉe la alia. Tiu kompletigita trafproporcio estos registrata oficiala. Se ĝis la fino de la asaltotempo la du skermistoj ricevis samnombran aŭ neniom da trafoj, ili ambaŭ estos registrataj venkitoj.

Inter du asaltoj de la matĉo estas duminuta paŭzo, kaj la konkursantoj lokŝanĝas reciproke.

La teama skermomatĉo konsistas el tiom da individuaj matĉoj, kiom estas la produto de la anonombroj de la du teamoj (principe 16).

La individuajn matĉojn gvidas la *prezidanto* de la konkursa juĝistaro. Li staras ĉe la mezlinio de la skermoplanko, en konvena distanco de ĝi, por povi bone atenti la aktivadon de ambaŭ konkursantoj. Lin helpas kvar *flankjuĝistoj*, starigitaj dekstre kaj maldekstre de la prezidanto ĉe ambaŭ flankoj de la skermoplanko. Se la trafojn signas elektra trafsignilo, tiam la kvar flankjuĝistojn — jam superflujajn — anstataŭas du *plankjuĝistoj* kiuj atentis, ĉu la skermiloj ne ektuŝis hazarde la skermoplankon, ĉar ankaŭ en tiu kazo la trafsignilo montras trafon, kompreneble netaksendan.

La skermokonkursoj povas esti individuaj aŭ teamaj (kun kvar membroj). La batalon inter du aŭ pli da teamoj oni nomas renkonto.

La konkursojn oni disvolvas laŭ rondo, aŭ rekte elimina, aŭ miksa sistemoj. La rekte elimina sistemo povas esti kompletigita per la konsolbatalo de la venkitoj.

En okazo de egalstato inter du konkursantoj decidis pli nova, t.n. egalstata matĉo pri venko kaj malvenko. En okazo de egalstato inter du teamoj (t.e. se la nombro de la venkoj kaj

ankaŭ tiu de la donitaj kaj ricevitaĵoj egalas), la teamestroj elektas po unu teamanon, kaj ilia egalstata matĉo decidas pri venko inter la du teamoj.

Se la konkursanto kulpas malregulaĵon, ĉe la unua la prezidanto atentigas lin, ĉe la dua aljuĝas al li unu punan trafon, kaj ĉe la tria li eskaldas lin el la plua konkurso.

Detale instrukciaj reguloj pri la farendoj, se iu konkursanto aŭ teamo — pro ajna kaŭzo — retiras sin el la komencita konkurso.

Konforme al la tri armilspecoj, la sportobranĉo skermo dividiĝas en tri subbranĉojn:

- A) Rapirado
- B) Spadado
- C) Sabrado

A) Rapirado

La rapiristo klopodas atingi pikan trafon per sia skermilo nomata rapiro sur la valida korposurfaco de la kontraŭulo, nome brustflanke ekde la kolumo ĝis la malsupra limo de la ingveno, kaj dorsflanke ekde la kolumo ĝis la interlinio de la koksopintoj, escepte la du brakojn ambaŭflanke.

La rapiro konsistas

- a) el la rekta, longa (maks. 90 cm), mallarĝa kaj fleksebla ŝtala klingo kun longkvadrata transversa sekco kaj kun butono ĉe la pinta ekstremo por preventi vundigon;
- b) el la fusto, per kiu la rapiro estas tenata;
- c) el la duonsfero-forma ŝtala konko, kiu ŝirmas la pugnon.

La longo de la skermoplanko estas 12 m.

Disciplinoj:

1. *Vira rapirado*
2. *Virina rapirado*

B) Spadado (nur por viroj)

La spadisto klopodas atingi pikan trafon per sia skermilo nomata spado sur la valida korposurfaco de sia kontraŭulo, nome senescepte sur la tuta korpo.

La spado konsistas

- a) el la rekta, longa (maks. 90 cm) kaj mallarĝa ŝtala klingo kun triangula transversa sekco kaj kun butono ĉe la pinta ekstremo;
- b) el la fusto;
- c) el la konko.

La longo de la skermoplanko estas 24 m.

Disciplino:

Spadado

C) Sabrado (nur por viroj)

La sabristo klopodas atingi tranĉan aŭ pikan trafon per sia skermilo nomata sabro sur la valida korposurfaco de la kontraŭulo, nome ambaŭflanke sur la tuta supra korpoparto — inkluzive de la kapo kaj la brakoj — ĝis la interlinio de la koksopintoj.

La sabro konsistas

- a) el la rekta, longa (maks. 88 cm), meze fleksebla mallarĝa klingo kun preskaŭ longkvadrata transversa sekco kaj kun butono ĉe la pinta ekstremo;
- b) el la fusto, taŭga por fari tranĉon kaj pikon;
- c) el la konko.

La longo de la skermoplanko estas 14 m.

Disciplino:

Sabrado

La mondfederacio de la sportobranĉo skermo estas: Fédération Internationale d'Escrime (FIE). Esp-e: Internacia Skermista Federacio.

Esprimoj: Skermokonkurso, aŭ konkurso de skermo. Sabrokonkurso, aŭ konkurso de sabrado. Unualoke klasita spadisto. Spadkonkurso, aŭ konkurso de spadado. Ĉampiono de virina rapirado. Internacia rapirkonkurso. Sabro-mondĉampionado, aŭ mondĉampionado de sabrado. Mondĉampiono de vira rapirado. Eŭropo-ĉampionado de sabrado. Olimpikoĉampiona virina rapirteamo.

Kun asaltoproporcio 2:1 (du per unu) li venkis kontraŭ la turka konkursanto, Ismet, kaj per la gajno de tiu decida matĉo li akiris la olimpikan ĉampionecon (la titolon de olimpika ĉampiono) en la disciplino sabrado. En la itala teamo, partopreninta la Eŭropo-ĉampionadon de spadado, sukcese skermis N.N., La pasintjara mondĉampiono de spadado. La svisa nacia (elektita) rapirteamo fariĝis la unualoke klasita teamo de la mondĉampionado de virina rapirado.

SKETADO

Havante paron da specialaj glitiloj, nomataj sketoj, kaj fiksitaj sur la plandumo kaj kalkanumo de siaj sketŝuoj, la sketisto plenumas kurojn aŭ prezentas artajn ekzercojn kaj diversajn dancojn sur glacio.

Sekve de tio la sportbranĉo sketado havas tri subbranĉojn, kiuj estas

- A) Sketkuro
- B) Artosketado
- C) Glacidanco

La mondorganizo de la sportbranĉo sketado estas: International Skating Union (ISU).
Esp-e: Internacia Sketista Unio.

A) Sketkuro

Streĉante sian forton, aplikante la plej konvenan stilon kaj sekvante la specialajn konkursregulojn, la sketkuristo kuras sur preparita sketkurejo nomata sketkurvego (kurejo ĝenerale el artefarita glacio) per specialaj sketoj certan nombron da cirkloj, por plenumi la distancon de la koncerna sketkur-disciplino, kaj atingi la celon kun kiel eble plej bona temporezulto.

La internaciaj sketkurkonkursoj disvolviĝas sur sketkurvegoj de tipo "Standard". Ĝi estas fermita, ovala veĝo, konsistanta el du paralelaj, — t.e. unu interna kaj unu ekstera — kurstrioj, nomataj sketkurlenoj, mallonge lenoj, kaj dividitaj unu de la alia per strio el neĝo, aŭ 5 cm-ojn larĝa kolora linio farbita sur la glacio, aŭ koloraj lignoŝtipoj fiksitaj je certa distanco unu de la alia.

Ambaŭ lenoj konsistas el po du rektoj (rektaj sektoroj) kaj po du duoncirkloj (kurbaj sektoroj) kun radiuso de 25 resp. 30 m-oj. Sur unu el la rektoj, ĉe ĝia fino, estas la celo. Ĉiam sur la kontraŭa rekto, nomata *kruciĝa rekto*, troviĝas la 70 metrojn longa *kruciga zono*. La startejo estas jen sur la *celrekto*, jen sur la kontraŭa rekto, depende de la kurdistanco.

En internaciaj sketkurkonkursoj oni disvolvas ĉiam nur *parostartajn* konkursojn. Tio signifas, ke samtempe konkuras du (malofte unu) sketistoj. Ili startas sur la sama rekto, male al la tn. persekutaj konkursoj (en internaciaj konkursoj ne aplikataj), kie la du konkursantoj startas sur malsamaj rektoj.

La du konkursantoj startas unu apud la alia (se la starto okazas sur la celrekto) aŭ je ioma distanco unu de la alia (se ili startas sur la kruciĝa rekto), ĉiu sur sia propra leno, ricevita per lotumo. La starto okazas je pistolpafado aŭ flagosigno, en kontraŭhorloĝa direkto. Kiam la du konkursantoj atingas la komencon de la kruciĝa zono, ili reciproke interŝanĝas la lenojn, nome la interna konkursanto transiras sur la eksteran lenon kaj inverse. Tiu interŝanĝo devas okazi ĉiun fojon, kiam la du sketistoj trapasas la kruciĝan rekton, t.e. kiom da rondoj, tiom da interŝanĝoj. Tiu manovro ebligas, ke ili ambaŭ kuru tiom da internaj rondoj kiom da eksteraj rondoj, kio egaligas reciproke ilian kurdistancon. Se en la kruciĝa zono ili renkontiĝas, por eviti kuron de unu kontraŭ la alian, nome kolizion, kaj sekve falon kaj vundiĝon, la regulo antaŭskribas, ke tiu, kiu venas el la interna leno, devas certigi la eblecon — se necese, per malrapidiĝo — ke la alia, venanta el la ekstera duoncirklo, povu trapasi antaŭ li.

Se unu el la du antaŭas la alian per unu tuta rondo, alivorte se unu *supercirklas* la alian, la antaŭito rajtas postsekvi la alian ne pli proksime ol 5 metroj. Tiu distanco povas grade malpliigi kaj fine ĉesi nur tiam, se la antaŭito proksimiĝas al la antaŭulo kun la videbla decida volo antaŭi lin kaj ne nur por fruktuzi la reduktiĝintan aerreziston strikte malantaŭ la alia.

La konkursojn gvidas kaj disvolvas la konkursa juĝistaro, el kiuj pli specialajn taskojn plenumas la sekvantaj fakjuĝistoj kaj funkciuloj.

La *startigisto* alvokas la parojn al la startejo, surbaze de la pretigita startolisto. Poste

lotume li decidas, kiu startos en la ekstera, resp. interna lenoj. Fine li startigas la konkursantojn per pistolpafo aŭ flagosigno.

La *celjuĝisto* havas la taskon observi, kiu el la du atingas la unua la celon. Se la distanco inter la du alceliĝintoj estis malpli ol 5 m-oj, li prijuĝas la distancon kaj sciigas ĝin al la gvida tempojuĝisto, escepte, se ankaŭ celfotilo funkcias. Same estas lia tasko konstati, se eventuale la paro alvenis egalstate (samtempe) en la celo.

La *tempomezuradaj juĝistoj*, mallonge *tempjuĝistoj* mezuras la daŭron de la sketkuro ekde la starto ĝis la celo. Dum la kuro ilia loko estas ĝenerale ĉe la celo, kie — en konvena vetero — ili povas vidi la pistolfumon aŭ flagosignon de la startigisto. Kaze de nebulo aŭ neĝado, en la momento de la starto ili restadas ĉe la startejo kaj poste ili transiras al la celo.

Ĉiun kurumon mezuras 3 tempjuĝistoj kaj 1 *suplementa tempjuĝisto*, uzante al tio stophorloĝon (haltigeblan horloĝon). Validas la sama tempovalorero sur almenaŭ du horloĝoj, aŭ la meza tempovalorero, se la tri horloĝoj montras malsamajn valorojn. La mezurado de la suplementa tempjuĝisto estas konsiderata nur, se iu el la tri pro ajna kaŭzo ne povis mezuri.

La *gvida tempjuĝisto* direktas la aktivadon de la tempjuĝistoj.

La *cirklonombro-juĝisto* informas la konkursantojn pri la nombro de la ankoraŭ plenumendaj cirkloj. Tiucele li havas plurajn rondajn tabulojn, el kiuj bone videble li almontras la respektivan tabulon, kaj se necese, ankaŭ laŭvoĉe li sciigas la nombron de la ankoraŭ kurendaj cirkloj al la preterkuranta konkursanto. Lia loko estas apud la celo. Se funkcias du cirklonombro-juĝistoj, tiam ili aparte almontras la tabulojn, unu al la internalena, la alia al la eksteralena konkursanto. Cetere la nombrado de kaj informado pri la cirkloj povas okazi ankaŭ pere de elektra numertabulo, kiun funkciigas la cirklonombro-juĝisto.

La du *lenjuĝistoj*, postenitaj ĉe la mezo de la du kurbaj sektoroj, ekster la kurkampoj, kontrolas, ĉu la konkursantoj ne forlasas dumkure sian lenon. Krome ili atentigas ankaŭ la regulan leninterŝanĝon en la kruciĝa zono.

La *kruciĝa lenjuĝisto* staras ĉe la fino de la kruciĝa zono, 70 cm-ojn interne de la linio dividanta la du lenojn kaj direktas la konkursantojn per flagosigno sur la ĝustan lenon (de sur la interna sur la eksteran kaj inverse). Li kontrolas la ĝustan plenumon de la interŝanĝo kaj atentigas, ke la konkursanto, venanta el la interna duoncirklo, ne malhelpu la alian en la trapaso.

Disciplinoj:

a) Mallongaj distancoj

1. 500-metra vira sketkuro

2. 500-metra virina sketkuro

3. 1000-metra vira sketkuro

4. 1000-metra virina sketkuro

5. 1500-metra vira sketkuro

b) Longaj distancoj

6. 1500-metra virina sketkuro

7. 5000-metra vira sketkuro

8. 3000-metra virina sketkuro

9. 5000-metra sketkuro (nur por viroj)

10. 10 000-metra sketkuro (nur por viroj)

Laŭ konsisto la konkursoj de sketkuro estas

a) Unudistancaj

b) Kunmetitaj (plurdistancaj).

En la unudistancaj konkursoj oni konkuras nur en unu disciplino, kaj laŭ la tie atingita rezulto li estas klasata kaj premiata.

En la kunmetitaj konkursoj la sketistoj konkuras en du, tri aŭ kvar disciplinoj, kaj post la sumigo de la rezultoj de la unuopaj disciplinoj oni taksas kaj klasigas la konkursantojn,

deklaras kaj premias la avanulojn.

En la unudistancaj konkursoj la parigo de la konkursantoj por la unuopaj kurumoj okazas per loto.

Ĉe la du- kaj tridistancaj kunmetitaj konkursoj la parigo de la kurparoj por la kurumoj okazas per loto nur antaŭ la unue kurota disciplino (konkursdistanco). Por la kurumoj de la sekvaj disciplinoj (konkursdistancoj) la kurparojn oni parigas baze de la klasigoj atingitaj en la ĵusantaŭa disciplino.

La kvardistancaj kunmetitaj konkursoj konsistas el po du mallongdistancaj kaj longdistancaj disciplinoj. Aparte oni lotas la parojn de la unue kurotaj mallonga kaj longa konkursdistancoj, kaj ĉe la aliaj du distancoj oni parigas baze de la klasiga vicordo de la jam kuritaj mallonga, resp. longa konkursdistanco.

En la unudistanca konkurso la klasigo okazas surbaze de la mezurita temporezulto. Se pli da konkursantoj plenumas la saman temporezulton, ili ĉiuj ricevas la saman klasigon, kaj la klasiga vicnumero de la konkursanto ilin postsekvanta dependas de la nombro de ĉiuj lin antaŭintaj. Por klarigi per ekzemplo: Se tri konkursantoj plenumis la saman plej bonan temporezulton kaj kvin la sekvantan plej bonan rezulton, kaj denove du aliaj inter si la saman rezulton ktp., tiam la konkurso havas 3 unualokajn, 5 kvaralokajn kaj du naŭalokajn ktp. klasitojn.

En la dudistanca konkurso venkas, kiu (aŭ kiuj) venkis en ambaŭ distancoj. En la tridistanca, — kiu (kiuj) venkis alme— naŭ en du, kaj en la kvardistanca, kiu (kiuj) venkis almenaŭ en tri disciplinoj. Se tiaj ne estas, tiam oni adicias la poentanombrojn plenumitajn en ĉiuj unuopaj distancoj de la koncerna konkurso, kaj venkas, kiu havas la malplej grandan sumigitan poentonombro.

La poentumo okazas jene: en la 500-metra distanco la poentonombro samas kun la nombro de la plenumitaj sekundoj; en la ceteraj distancoj la nombro de la sekundoj oni multiplikas per 1/2 ĉe la 1000-metra, per 1/3 ĉe la 1500-metra, per 1/6 ĉe la 3000-metra, per 1/10 ĉe la 5000-metra kaj per 1/20 ĉe la 10 000-metra distancoj.

La sistemo de la konkursoj estas ĝenerale unuetapa kaj la klasigan vicordon donas la temporezultoj. En la olimpikoj, mond- kaj Eŭropo-ĉampionadoj la disvolvo de la kvardistanca kunmetita konkurso diferencas disde la ceteraj nur per tio, ke la kvaran, t.e. la laste disvolvitan disciplinon — kiu estas ĉiam la plej longa distanco — partoprenas jam nur maks. 16 konkursantoj. Ili estas la 16 avanuloj de la pli frue plenumita, malplilonga longdistanca disciplino. Sed validas ankaŭ kroma kompletiga regulo, kiu antaŭskribas, ke la 8 plej bonaj konkursantoj laŭ la suma poentumo de la tri unuaj disciplinoj devas esti nepre inter la 16. La tri unuaj disciplinoj (pli korekte: subdisciplinoj) estas konsidereblaj do kiel la antaŭfinalo kaj la plenumo de la lasta distanco, kiel la finalo de la kvardistanca kunmetita konkurso.

Esprimoj: Sketkur-konkurso, aŭ konkurso de sketkuro. 1000-metra vira sketkur-konkurso, aŭ konkurso de 1000-metra vira sketkuro. La unualoka klasito de la 500-metra virina sketkuro, en la kvardistanca kunmetita sketkur-konkurso. Mond-ĉampiono de la vira 3000-metra sketkuro. La tri avanlokaj klasitoj de la 1500-metra virina sketkuro. En la Eŭropo-ĉampionado de sketkuro, en la virina dudistanca kunmetita sketkur-konkurso, konsistanta el 500-metra kaj 3000-metra sketkuroj, venkis la franca sketistino, fraŭlino N.N., stariginte novan mondrekordon en ambaŭ subdisciplinoj. La olimpikoĉampiona vira sketkuristo N.N. atingis sian pasintjaran mondrekordon en la disciplino 5000-metra sketkuro. En la disciplino 1000-metra virina sketkuro tri konkursantoj plenumis la saman temporezulton, sekve de kio ĉiuj tri estis deklaritaj trialokaj klasitoj.

B) Artosketado

La artosketisto — sola aŭ en gea duopo — prezentas sur glacio devigajn kaj kun muzika

akompano kaj dum fiksita tempodaŭro plenumitajn libere elektitajn sketekzercojn, klopodante akiri kiel eble plej altan poentonombro pere de plaĉaj, harmoniaj movoj de arta nivelo kaj pere de malfacilaj saltoj, turniĝoj kaj piruetoj, efektivigitaj kun altagrada lerto kaj gracieco.

La konkursojn de artosketado oni disvolvas en tegmentita aŭ subĉiela sketkonkursejo, mallonge sketkampoj, sur glacio artefarita aŭ natura. La konkursa sketkampoj devas esti longkvadratformaj, kun longo inter 53-60 kaj larĝo inter 26-30 m-oj, kaj ĉirkaŭita per barilo.

La konkursoj de artosketado havas du aspektojn. Nome, se la ekzercon prezentas unu persono (viro aŭ virino), tiam temas pri konkurso de solopa artosketado, kaj se ĝin prezentas du — ĉiam unu viro kaj unu virino — persnoj, tiam temas pri konkurso de para artosketado.

a) La konkursoj de *solopa artosketado* konsistas el 1. devigaj ekzercoj, 2. antaŭskribitaj saltoj kaj turniĝoj, 3. libere elektitaj ekzercoj. Ĉiu partoprenanto prezentas unue la 1-an kategorion, poste la 2-an kaj la 3-an.

1. La devigaj ekzercoj konsistas el du alternativaj ekzercogrupoj al po tri ekzercoj. Tiuj ekzercoj estas kunmetitaj el strikte difinitaj sketfiguroj-elementoj, kiel: cirkloj, maŝoj, paraĝoj, 3-oj, duoblaj 3-oj, kontraŭ-3-oj, turnoj, kontaraŭturnoj ktp.

2. La antaŭskribitaj saltoj kaj turniĝoj inkluzivas same du alternativajn ekzercogrupojn el po du saltoj kaj unu turniĝo.

La po du alternativojn de ambaŭ kategorioj — en detala priskribo — la konkursaranĝantaro sciigas jam pluraj monatojn pli frue el la partoprenantoj. Antaŭvespere de la konkurso oni lote elektas unu el la du alternativoj kiel devigan per la konkursantoj.

Ĉiun figuron de la deviga ekzerco la konkursantoj plenumas sinsekvo po tri fojojn per la dekstra kaj maldekstra piedoj. La ekzercojn de la antaŭskribitaj saltoj kaj turniĝoj ĉiu prezentas du fojojn.

Ĉe ambaŭ kategorioj la poentjuĝistoj — t.e. la ĵurio — aparte taksas ĉiun ekzercen per poentoj kun valoroj de 0 ĝis 6. Cele de pli nuancita taksado la poentoj havas ankaŭ dekonajn valorojn, ekz. 3,2; 4,7 ktp. (Tio validas ankaŭ ĉe la para artosketado kaj ĉe la glacidanco.) Ĉe la pritakso de la unuopaj figuroj, elementoj aŭ ekzercoj la poentjuĝistoj konsideras unue — dum la plenumo — la eksteran aspekton de la ekzerco. Dezirataj estas: regula akiro, vigla kaj egalritma glito, senpena, glata kaj plaĉa prezento kun trankvilaj, leĝeraj kaj graciaj movoj, kaj svingo sufiĉa por la disvolvo de la ekzerco. Due, — post la ekzerco — surbaze de la spuroj sur la glacio ili devas prijuĝi la formon kaj simetron de la figuro, krome la purecon de la eĝospuroj — mallonge: eĝoj — kaj de la turnoj, kaj fine la ĝustan sekvadon de la longituda kaj transversa aksoj de la ekzerco. Eraraj estas ekzempla la duobla eĝo (nome la sketo havas du eĝojn, sed la figurojn oni devas plenumi plej ofte aŭ sur la dekstra aŭ sur la maldekstra eĝo, ŝanĝante kelkfoje la eĝojn konforme al la karaktero de la figuro), kiko per la flirta piedo antaŭ eĝoŝanĝo ktp.

3. La libere elektitan ekzercon (ĝian koreografion) kunmetas kaj la akompanan muzikon elektas ĝenerala la trejnisto unianime kun la konkursanto. Ĉe la kunmeto ili devas atenti, ke la ekzerco enhavu necesan nombro da valoraj elementoj, sen apliki elementojn malpermesitajn. La ekzerco devas havi harmonian konstruon perfekte akordigitan kun la muziko. Leĝeraj movoj, plaĉa korpotano, ideriĉeco kaj asprimado da la karaktero de la muziko, — jen la ĉefaj postuloj da la sukcesa partopreno en la konkurso. La ekzerco daŭras ĉe la viroj 5, kaj ĉe la virinoj 4 minutojn.

La libere elektitaj ekzercoj — ankaŭ tiujn de la para sketado kaj la glacidanco — la poentjuĝistoj poentumas per du poentnombroj: unu por la teknika valoro, la alia por la arta efiko.

Disciplinoj:

1. *Vira solopa artosketado*
2. *Virina solopa artosketado*

b) La konkurso de *para artosketado* konsistas el

1. mallonga programo,
2. libera sketado.

1. En la mallonga programo la konkursanta paro davas prezenti 6 bazelementojn dum ne pli ol 2 minutoj. La regularo fiksas 3 ekzercgrupojn el po 6 diversaj bazelementoj, kial ekz.: duobla Salchow (individua salto); sida rotacio (para); mortorotacio dorsdirekten, eksteren (para); ensalta pesil-rotacio (individua); duobla lazo (kometa levo); duobla Axel Paulsen (levo); duobla Rittberger (individua salto); duobla diskruo Lutz (levo); cirkloforma kaj serpenta paŝserioj ktp.

En la antaŭa mondĉampionado oni lote elektas kaj ĝis la 1-a de majo publikigas unu el la ekzercgrupoj kial devigan mallongan programon por ĉiuj konkursoj aranĝotaj fare de ISU.

2. La 5-minuta libera sketado — koncerne ĝian tuton — de— vas esprimi la paran sketadon de du personoj. Fojfoje ili rajtas disiĝi por mallonga tempo, sed tio ne rompas la harmonion de la ekzerco. Saltoj, en kiuj unu helpas la alian, devas montri kontinuan ascendan kaj descendan turnomovon. Ĉe levo la levanto rajtas teni la levaton nur super la koksoj. La elementojn kunligas harmoniaj paŝoj kaj movoj en plena akordo kun la muziko. La paroj estas ĉiam geaj.

Disciplino:

Para artosketado

Krom la kutima stabo al la konkursa juĝistaro apartenas 6-membra ĵurio el unu *ĵuriestro* kaj 7 *poentjuĝistoj*. La poentjuĝistoj estas provizitaj per surkartonaj poentnumeroj, nome unu serio de 0 ĝis 6 nigraj por la entjeraj kaj per unu serio de 0 ĝis 9 ruĝaj por la frakciaj nombroj. Post la plenumita ekzerco, je la signo de la ĵuriestro la poentjuĝistoj leve montras la aljuĝitan poentonombrojn helpe de sia poentmontra tabulo.

Havante lokon proksime de la ĵuriestro, la *tempomezuristo* mezuras la daŭron de la libera sketado kaj sciigas al la ĵuriestro, se la ekzerco daŭris pli aŭ malpli longe ol antaŭskribite.

Esprimoj: Konkurso de vira solopa artosketado. Mondĉampiono de vira solopa artosketado, aŭ mondĉampiono de la vira solopa artosketado. Eŭropo-ĉampiono de la virina solopa artosketado. Ŝi estas elstara artosketistino. La trialoka klasito de la olimpika ĉampionado de virina solopa artosketado. Konkurso de para artosketado. La olimpikoĉampiona duopo de la para artosketado. La unualoke klasita duopo de la Eŭropo-ĉampionado de para artosketado. La soveta artosketista duopo gajnis la unualokan klasigon de la mondĉampionado de para artosketado. Dum la 10-minuta paŭzo oni refreŝigis la glacieron de la sketkampo per speciala glaciglatiga aparato. La mondĉampiona (Eŭropo-ĉampiona, olimpikoĉampiona) artosketista duopo.

C) Glacidanco

Kun muzika akompano kaj dum fiksita tempodaŭro, la glacidancisto — en gea duopo — prezentas tri devigajn kaj unu libere elektitan dancon sur glacio.

La sketkampo, servanta la konkurson de glacidanco, havas la samajn formon kaj amplekson kiel tiu de la artosketado, ja tiuj konkursoj disvolviĝas ĝenerale kune kun la konkurso de artosketado, sur la sama sketkampo, kiel lasta, sed kun la pli antaŭaj en arta kvalito samvalora disciplino.

La glacidanco-konkurso havas du partojn. Unue ĉiuj konkursantoj prezentas la tri devigajn dancojn kaj poste, la sekvan tagon, venas la vico de la libere elektita danco.

1. Kiel konstantaj devigaj dancoj estas difinitaj 12 dancoj en 4 grupoj. Antaŭvespere de la konkurso oni lote elektas unu el la grupoj, kaj tiuj 3 dancoj estas prezentendaj en la konkurso.

Jen la 4 grupoj:

a) Eŭropa aŭ Amerika valso. — Rocker Foxtrot. — Silver Samba.

- b) Viena valso. — Paso Doble. — Tango.
- c) Stellumo valso. — Kilian. — Argentina valso.
- c) Westminster valso. — Quickstep. — Blues.

Ĉiuj taktoj, ĉiuj paŝoj de la supraj dancoj estas detale kaj precize fiksitaj en la koncerna regularo. Kiam ĉiu prezentis la unuan dancon, tiam venas la vico de la dua kaj poste de la tria dancoj. La ĵurio — same el 8 membroj, kiel ĉe la artosketado — prijuĝas: la sinkronecon de la movoj kun la muziko, la adaptiĝon de la movoj al la karaktero de la muziko, la stilon de la dancanta paro kaj la akordon inter ili ktp.

2. La libere elektita danco, alinome *kiro* daŭras 4 minutojn. La ĵurio taksas ĉiun dancon — same kiel ĉe la artosketado — per du poentonombroj, de 0 ĝis 6, kun uzo de dekonaj valoroj. Per la unua poentonombro oni taksas la teknikan plenumon, nome la malfacilecon de la elementoj, la variecon kaj la originalecon. Per la dua poentonombro oni taksas la harmonian kunmeton de la ekzerco, la adaptadon al la muziko, la proporcian lokigon de la ekzerco sur la sketkampo, la kontinuan moviĝon, la simetrian inter la danco kaj la muziko kaj fine la korpotenon.

Disciplino:

Glacidanco

Esprimoj: Konkurso de glacidanco aŭ glacidanco-konkurso. Eŭropo-ĉampionado kaj mondĉampionado de glacidanco. La mondĉampiona angla glacidancista duopo. La dualoke klasita duopo de la Eŭropo-ĉampionado de glacidanco. La svisa glacidancista duopo prezentis la plej alte poentumitan kiron, tamen ili sukcesis atingi nur la malsupran ŝtupon de la venkopodio, ĉar la devigajn dancojn ili plenumis kun meza rezulto. Eŭropo-ĉampiona paro de glacidanco. La bronzmedala duopo de la ĉi-jara Eŭropo-ĉampionado de glacidanco. La tri avanloke klasitaj paroj de la mondĉampionado de glacidanco.

SKIADO

Surhavante paron de skioj kaj vestaĵon ĝenerale uzatan en la skisporto, kaj atentante la regulojn de la koncerna disciplino, la skiisto descendas, kuras aŭ saltas sur neĝkovrita tereno laŭlonge de signita glitvojo, respektive helpe de konstruita skisaltejo, kaj klopodas atingi kiel eble plej bonan temporezulton, resp. poentonombro. Krom en la disciplino salto li uzas ankaŭ paron da skibastonoj.

En konkursoj la konkursantoj portas startnumeron sur la brusto kaj dorso.

La konkursojn gvidas kaj kontrolas, kaj koncerne la rezultojn juĝas kaj decidas la konkursa juĝistaro. La konsisto de la juĝistaro alternas laŭ la pretendoj de la unuopaj disciplinoj, el kio sekvas, ke krom la prezidanto, vicprezidanto, sekretario kaj la kuracisto kun la sanitara personaro, al la konkursa juĝistaro povas aparteni *startjuĝistoj* aŭ *startigistoj*, *pardjuĝistoj*, *celjuĝistoj*, *saltjuĝistoj*, *tempomezuristoj* ktp.

La esenca ilo de la skiado estas la skio. Konforme al la tri ĉefaj skiaktivadoj ekzistas tri specoj de skio:

a) *descenda skio*: 2-2,10 metrojn longa, kun ligaĵo fiksa, kiu ne permesas levi la kalkanon;

b) *kura skio*: same 2-2,10 m-ojn longa, el ligno malpeza, kun ligaĵo permesanta libere levi la kalkanon;

c) *salta skio*: 2,20 — 2,30 m-ojn longa, pli peza, ktm ligaĵo kiel ĉe la kura skio.

La plandon de la salta skio trakuras de la antaŭa ekstremo ĝis tiu malantaŭa tri paralelaj *noĉoj*, la aliaj du specoj de skio havas nur po unu noĉon.

Ĉe la descendaj kaj kuraj disciplinoj la startigo kaj pomezurado okazas laŭ la sekvantaj manieroj.

En okazo de bona videblo aŭ aŭdeblo, la startigo okazas per flagosigno, respektive per fajfilsigno. En tiu kazo la celjuĝisto ŝaltas la tempomezuran horloĝon laŭ tiuj signoj.

Cetere pli multe da mekanikaj helpinstalaĵoj servas la tempomezuradon. Ekz. la telefona aŭ radiotelefona startigo, kie la komandvorton de la startjuĝisto telefone aŭdas la celjuĝisto kaj sammomente ŝaltas la horloĝon.

La kondukilan brilsignilon — muntitan ĉe la celo — funkciigas piede la startanta konkursanto en la startejo.

La kondukila tempomezurilo ekfunkciigas la tempomezuran horloĝon per elektra signo ĉe la starto, kaj haltigas ĝin same per elektra impulso (kiun estigas la forŝiro de la celrubando fare de la enkuranto) ĉe la celatingo.

La fotoĉela tempomezurilo simile ŝaltas kaj malŝaltas la tempomezuran horloĝon, aŭ registras sur paperrubando la startan kaj alvenan tempojn de la konkursanto.

La sportbranĉo skiado havas tri subbranĉojn:

A) Alpaj disciplinoj

B) Nordaj disciplinoj

C) Skibiatlono

A) Alpaj disciplinoj

grupo a) Descendoj

La skiisto rapidege descendas sur dekliva glitejo — nomata *descendvego* — laŭ vojstreko indikita per necesa nombro da tn. *kontrolpordoj*, kiuj eĉ ĉe la pleja rapideco ebligas sekvi la difinitan vegon kaj samtempe evitigas danĝerajn terendetalojn. Dum la descendo la skiisto atentas la regulojn de la disciplino kaj helpante sin ankaŭ per siaj skibastonoj klopodas atingi kiel eble plej rapide la celon.

La kontrolpordojn reprezentas po du samkoloraj flagoj ĉ. 1 metron longaj kaj 50 cm-ojn larĝaj, streĉitaj sur po du mallarĝaj stangoj ĉe ambaŭ flankoj de la pordo. La flagoj staras 1

metron super la neĝsurfaco kaj havas bluan aŭ alterne bluan kaj ruĝan kolorojn. La interdistenco de la du flagoj, t.e. la larĝeco de la kontrolpordo ne estas fiksita en la regularo.

Disciplinoj:

1. *Vira descendo*

La niveldiferenco de la veĝo inter la startejoj kaj celo estas minimume 250 m-oj kaj la longo: min. 500 m-oj.

2. *Virina descendo*

Min. niveldiferenco: 200 m-oj; min. longo: 400 m-oj.

grupo b) Slalomoj

La skiisto descendas sur dekliva glitejo — nomata *slalomvego* — Laŭ zigzaga vojstreko, indikita per ĉ. 60 numeritaj kontrolpordoj, alinome *slalompordoj*. Ĉe ĉiu pordo la skiisto faras la necesan direktoŝanĝon, helpante sin lerte per siaj skibastonoj, kaj atentante la regulan pordotrapason klopodas atingi kiel eble plej bonan temporezulton.

La slalompordoj konsistas el po du mallarĝaj stangoj kun 3,2 — 4 metra interdistanco kaj elstaras 1,8 metrojn alte el la neĝo. Sur la supro de la du stangoj estas fiksita ĉ. 25x25 cm-a flageto samkolora. La sinsekve ripetiĝanta kolorvicordo de la pordoflagoj estas: blua, ruĝa, flava.

Almenaŭ la kvarona parto de la glitvojo devas havi pli ol 30 gradan krutecon kaj multe da ŝanĝoj en la direkto kaj deklivangulo.

La konkurso de slalomo (slalomkonkurso) konsistas el du kurumoj sur malsamaj veĝoj, kaj ili ambaŭ estas taksataj.

1. *Vira slalomo*

Niveldiferenco: de 70 ĝis 220 m-oj; longo: de 300 ĝis 600 m-oj.

2. *Virina slalomo*

Niveldiferenco: de 70 ĝis 150 m-oj; longo: de 300 ĝis 400 m-oj.

grupo c) Slalomego

La skiisto descendas sur dekliva glitejo — nomata *slalomegvego* — laŭ vojstreko preskaŭ samlonga kiel tiu de la slalomvego, sed havanta ĉ. duoblan niveldiferencon kaj duonan kvanton da kontrolpordoj. Ĉe ĉiu pordo la skiisto faras la necesan direktoŝanĝon helpe de siaj skibastonoj, atentante la regulan pordotrapason kaj klopodas atingi la celon dum laŭeble plej mallonga tempo.

La slalomegvego havas ondan terenon, kiun krutaj deklivoj kaj malebenejoj igas varia.

La kontrolpordoj, kies larĝo varias inter 4-6 m-oj, konsistas el du duoblaj stangoj, sur kiuj estas streĉita po unu flago 70 cm-ojn longa kaj 50 cm-ojn larĝa, en 1 metra alto super la neĝsurfaco. Du flagoj de sama pordo estas samkoloraj, la altere uzataj pordkoloroj estas ruĝa kaj blua.

La konkurso de slalomego (slalomegokonkurso) povas esti unu- aŭ du kuruma.

Disciplinoj

1. *Vira slalomego*

Niveldiferenco: de 200 ĝis 400 m-oj; longo: de 500 ĝis 600 m-oj.

2. *Virina slalomego*

Niveldiferenco: de 150 ĝis 300 m-oj; longo: de 300 ĝis 400 m-oj.

B) Nordaj disciplinoj

grupo a) Skikuro

Sekvante rigore la regulojn de la disciplino kaj uzante siajn skibastonojn, la skiisto finkuras sola aŭ en duopo certan vojstrekon de difinita distanco, nomatan *skikurvego* kaj indikitan per diversaj indiktabuloj, sur ebena aŭ alterne supren- kaj malsuprendirekte dekliva t.e. onda skitereno, klopodante atingi kiel eble plej bonan temporezulton. La kurdistancoj — kun

proporciaj niveldiferencoj — alternas inter 3-50 km-oj. La permesita sumo de la unuopaj ascendoj (supreniroj) ene de ĉiu oficiala kurdistanco estas difinita. La plej granda kontinua ascendo, ne interrompita de almenaŭ 200 m-a ebena aŭ descenda etapo, ne povas havi pli grandan niveldiferencon ol 100 m-on ĉe la viroj kaj 75 m-ojn ĉe la virinoj.

La startejoj kaj la celo estas ĝenerale samloke.

Okaze de 20 km-aj aŭ pli longaj kurdistancoj oni instalas unu aŭ du dumvojjajn refreŝiĝejoj, kie la konkursantoj povas ricevi varmajn kaj nutrajn (senalkoholajn) trinkaĵojn, krome biskvitojn, ĉokoladon ktp.

Disciplinoj:

1. *2-kilometra skikuro* (nur por virinoj)
Suma ascendo: 30-50 m-oj.
2. *3-kilometra vira skikuro*
Suma ascendo: 50-100 m-oj.
3. *3-kilomejra virina skikuro*
Suma ascendo: 50-80 m-oj.
4. *5-kilometra vira skikuro*
Suma ascendo: 150-200 m-oj.
5. *5-kilometra virina skikuro*
Suma ascendo: 150-200 m-oj.
6. *10-kilometra vira skikuro*
Suma ascendo: 300-450 m-oj.
7. *10-kilometra virina skikuro*
Suma ascendo: 250-300 m-oj.
8. *15-kilometra skikuro* (nur por viroj)
Suma ascendo: 450-600 m-oj.
9. *30-kilometra skikuro* (nur por viroj)
Suma ascendo: 750-1000 m-oj.
10. *50-kilometra skikuro* (nur por viroj)
Suma ascendo: 1200-1500 m-oj.

grupo b) Stafeta skikuro

Ĉiuj unuaj kurontoj de la teamoj, partoprenantaj en la disciplino stafeta skikuro, startas kune en la startejoj, kaj helpante sin per du skibastonoj, ili finkuras difinitan distancon inter la cirkonstancoj kaj laŭ la reguloj de la disciplino skikuro. La suma ascendo povas esti maks. 150 m-oj. Post ŝanĝo, efektivigita per simpla ektuŝo en la t.n. ŝanĝozono, ankaŭ la ceteraj teamanoj finkuras unu post la alia sian kurdistancon. Venkas tiu teamo, kies lasta skikuristo la unua atingas la celon.

Disciplinoj:

1. *3x5-kilometra stafeta skikuro* (nur por virinoj)
2. *3x10-kilometra stafeta skikuro* (nur por viroj)
3. *4x10-kilometra stafeta skikuro* (nur por viroj)

grupo c) Skipatrolado

La 3-5 membra skipatrolo kuras difinitan distancon inter la cirkonstancoj kaj ĝenerale laŭ la reguloj de la disciplino skikuro. La tuta teamo startas samtempe kaj dum la kuro la membroj povas helpi unu al la alia. Dumvoje ili faras pafekzercojn aŭ aliajn ekzercojn laŭ la apartaj antaŭskriboj de la aktuala konkurso. Tiuj ekzercoj influas la temporezulton de la patrolo. Ĉe la alceliĝo la longo de la patrolo t.e. la distanco inter la unua kaj lasta enkuranto de la patrolo, ne povas esti pli ol 20 metroj.

Disciplino:

Skipatrolado

Distanco: unu el la viraj skikurdistancoj, laŭ la elekto de la konkurs-aranĝantaro.

grupo d) Skisalto

La disciplino skisalto disvolviĝas sur faksperte konstruita kaj zorge preparita skisaltejo, nomata *skisalto-vego*, aŭ *skisalto-remparo*.

Klopodante atingi kiel eble plej longan kaj plej alte poentumitan salton, la skisaltisto — sekvante la regulojn de la disciplino kaj ne uzante skibastonojn — plenumas la sekvantajn fazojn de la disciplino skisalto: li startas en la *startejo*, faras svingodonan alkuron sur la *alkura deklivo*, forsaltas de sur la *saltoplato*, post kelksekunda flugo li atingas la grundon (surteriĝas) sur la *surteriĝa deklivo* kaj bremsante haltas sur la *elkurejo*. Dum la flugo kaj alteriĝo la skisaltisto atentigas la ĝustan korpotenon, kiun — nome la kvaliton de la salto — la *saltjuĝistoj* poentumas. La longon de la salto mezuras la *distancmezuristoj*.

Krom la suprenomitaj partoj (startejo, alkura deklivo, saltoplato, surteriĝa deklivo, elkurejo) al la skisaltovego apartenas ankaŭ la *turo de la (3-5) saltjuĝistoj* (alinome poentjuĝistoj, aŭ ĵurio). Ĝi situas en la plej konvena loko, de kie la juĝistoj vidas la tutan salton.

La sumo de la porkvalitaj kaj porlongecaj poentoj donas la rezulton.

Kromaj funkciuloj de la disciplino skisalto estas:

a) La *remparestro* respondecas pri la preparo de la remparo kaj li donas la permeson al ĉiu sekvanta salto.

b) La *platfermisto* etendas flagon kruce tra la saltoplato post ĉiu salto. Tio signas saltomalpermeson. Je la signo de la remparestro li malfermas la saltoplaton.

c) La *startisto* en la *startoturo* startigas la sekvantan saltiston, kiam la platfermisto signas liberan vojon.

Disciplino:

Skisalto (nur por viroj)

grupo e) Norda kunmetita disciplino

Tiu ĉi disciplino konsistas el la subdisciplinoj 15-kilometra skikuro kaj skisalto sur skisalta remparo kun difinitaj mezuroj.

Disciplino:

Norda kunmetita disciplino (nur por viroj)

C) Ski-biatlono (nur por viroj)

Tiun ĉi subbranĉon konsistigas du sportaktivadoj, nome la skikuro kaj la pafado. Disciplinoj:

1. Individua ski-biatlono

Dum 20-kilometra skikuro la biatlonisto faras po 5 pafadojn dufoje en kuŝa kaj dufoje en stara pozicioj sur cirkla celtabulon. La trafrezulto influas la temporezulton. Uzeblaj estas ĉiaj neaŭtomataj fusiloj ĝis 8-milimetra kalibro.

2. Stafeta ski-biatlono

La tripersona aŭ kvarpersona teamo stafete kuras 3x7,5 respektive 4x7,5 km-ojn. Dumvoje ĉiu membro faras po 8 pafadojn unufoje en kuŝa kaj unufoje en stara pozicioj sur po 5 rompiĝemajn objektojn (botelo ktp.). Pro la mistrafoj la stafetisto devas fari punajn rondkurojn ĉirkaŭ la pafejo. Venkas la teamo, kiu dum la plej mallonga tempo atingas la celon.

— o — o —

La mondfederacio de la sportbranĉo skiado estas: Fédération Internationale de Ski (FIS).
Esp-e: Internacia Skiista Federacio.

Esprimoj: Skikonkursoj, aŭ konkursoj de skiado. Alpaj skiĉampionadoj. Eŭropo-ĉampiono de vira descendo. Mondĉampiono de virina slalomego. Olimpika rekordo de 15-kilometra skikuro. En la 2-kilometra skikuro ŝi nur atingis la Eŭropo-rekordon, sed en la 5-kilometra virina skikuro ŝi ne nur venkis la malnovan Eŭropo-rekordon, sed eĉ starigis novan

mondrekordon. La publiko entuziasme ovaciis la olimpikoĉampionan teamon de la 3x10-kilometra stafeta skikuro. La norvega nacia teamo gajnis Eŭropo-ĉampionecon en la disciplino skipatrolado, disvolvita sur 15-kilometra distanco. En la vintraj olimpikoj de jaro 1972, sur la skisaltoremparo de Sapporo arda batalo disvolviĝis inter la plej elstaraj skisaltistoj de la mondo, por la tri avanaj klasigoj. Kadre de la Eŭropo-ĉampionado de skiado, en la disciplino individua skibiatlono, la unualokan klasigon akiris svisa konkursanto, dum en la stafeta skibiatlono la teamestro de la finna stafetteamo paŝis sur la plej altan ŝtupon de la venkopodio.

SLEDADO

Sidante sola aŭ en duopo sur speciala sledo kaj traveturante la rektojn kaj kurbojn de konstruita aŭ natura sledvego, la sledisto aplikas konvenan veturteknikon kunigitan kun lerto kaj kuraĝo, por atingi kiel eble plej grandan rapidecon kaj alveni la celon kun bona temporezulto.

La internaciajn sledkonkursojn partoprenas viraj kaj virinaj konkursantoj.

La mondfederacio de la sportobranĉo sledado estas: Fédération Internationale de Luge (FIL). Esp-e: Internacia Sledista Federacio.

La sportaktivado sledado disvolviĝas sur sledvegoj, kiuj povas esti naturaj aŭ konstruitaj.

La naturaj sledvegoj estas ordinaraj arbarvojoj, kiuj — havante la permesitan deklivogradon (maks. 10 %) kaj minimume 15 m-ojn radiusajn kurbojn — povas esti uzataj por sporta sledado, sen speciala konstrulaboro, escepte eventualan transkonstruon de unuopaj kurboj, kiuj iom superpasas la regulan mezuron. Per fikstreto de la neĝo kaj ebenigo de la kelkloke malebena vojgrundo la naturaj sledvegoj estas pretigeblaj dum kelkaj tagoj. La grundo de la naturaj sledvegoj estas do malmola neĝo, kontraste al la konstruitaj sledvegoj, kies grundo estas glacio. Sekve de tiu cirkonstanco la natura sledvego ne ebligas tian rapidecon, kien la konstruitaj sledvegoj ebligas. Aliparte la natura sledvego estas bona lernejo por la estontaj sledkonkursantoj.

La dua speco de la sledvegoj estas tiuj *konstruitaj*, al kiuj apartenas du tipoj: la bobvego kaj la sportsledvego.

La *bobvego* estas ŝtupo inter la natura sledvego kaj la sportsledvego, servanta al la sledistoj kiel bona ekzerco kaj trejnejo, antaŭ ol ili komencas la sledadon sur sportsledvego. La plej granda descendorapideco, atingelbla sur bobvego, estas 120 km-oj per horo. Tio motivas, ke sur bobvego oni povas veturi nur per sportsledo aŭ boboj, ĉar tiuj estas stireblaj. La uzo de ordinaraj sledoj sur bobvego aŭ sportsledvego estas danĝera kaj malpermesita.

La longo de la bobvego estas inter 1000 kaj 2000 m-oj. Ĝin karakterizas la relative granda interdistanco inter la kurboj, — se ni komparas ĝin kun la sportsledvego, — kaj la pli granda kurboalteco (1-6 m-oj) ol tiu en la sportsledvego. *Kurboalteco* oni nomas la altecon de la *kurbovando*, konstruita laŭlonge de la ekstera rando de la kurbo. La kurbovando estas deklive leviĝanta plilarĝiĝo de la vego. Pelate de la centrifuga forto, en la kurbo la sledo surglitas la konkave oblikvan vandsurfacon kaj tie ĝi daŭrigas la veturon ĝis ia fino de la kurbo. La alteco de la kurbovando malhelpas, ke la svingo de la rapidega malsuprenlito, nomata descendo, elflugigu la slediston el de la vego. La minimuma longo de la kurboradiuso estas 10 m-oj.

La *sportsledvego* havas relative pli multe da kurboj ol la bobvego, kio ne permesas atingi tiel grandan rapidecon, kiel sur bobvego. La meza rapideco estas ne pli ol 100 km-oj per horo. Sur la ĝenerale 1000-1200 m-ojn longa sportsledvego la dense sinsekvantaj, minimume 8 m-ojn radiusaj kurboj postulas pli grandan atenton kaj lerton ol sledado sur bobvego kaj la malfacilecon ankoraŭ pliigas la relative pli malaltaj kurbovandoj (0,5-4 m-aj). Internaciajn sportsledkonkursojn oni disvolvas sur sportsledvegoj.

La konstruitaj sledvegoj sekvas ĝenerale la linion de uzataj arbaraj-montaj vojoj, sed ili estas transformitaj, transkonstruitaj konforme al la postuloj de la du sledvegotipoj. Grave estas, ke la sledvego havu meze ne pli ol 10 %-an deklivecon. La fundo de la vego devas esti ne pli larĝa ol 1,50-1,80 m-oj kaj ĝin borderas ambaŭflanke remparo kun 70-grada interna vando. En la kurboj la vego laŭnecese plilarĝiĝas kaj havas ĉe la ekstera rando laŭbezone altan kurbovandon.

La someran terlaboron vintre kompletigas la finpretigo de la vego. 10 cm-a neĝtavolo kaj kelkagrada frostoj jam ebligas tion. Unue oni fikstretas la neĝon sur la grundo de la vego, poste kovras ĝin per neĝokaĉo, kiu estas miksaĵo de neĝo kaj abunde da akvo. La sternitan kaj

glatigitan neĝokaĉon oni lasas frostiĝi, poste delikate aspergas ĝin, ke la glacia grundo fariĝu ankoraŭ pli glata.

La sportilo, uzata en la sportbranĉo sledado estas la *sportsledo*. Ĝi estas speciala sledotipo, evoluigita por la celoj de la sledkonkursoj. Ĝiaj ĉefaj partoj estas la du glitiloj, la du holmoj, la du konzoloj kaj la sidilo.

La *glitiloj* konsistas el la *supra, ligna glitilo* (farita ĝenerale el fraksenligno), al kies suba faco estas alŝraŭbita la *malsupra, fera glitilo*. Maldika ŝtallameno, nomata *glitplando* kaj nitita al la suba rando de la fera glitilo donas glatan glitsurfacon al la du glitiloj.

La du *holmoj* estas lignaj stangoj paralelaj kun la du glitiloj. Ili estas fiksitaj antaŭe al la suprenarkanta ekstremo de la glitiloj (ili estas nomataj *glitilkornoj*) kaj meze kaj malantaŭe ili estas subportataj pere de la antaŭa kaj malantaŭa konzoloj.

La *sidilo* estas t.n. *gurtsidilo*, nome ĝi konsistas el gurtoj streĉitaj inter la du holmoj, ekde la antaŭa ĝis la malantaŭa konzoloj.

La du lignaj *konzoloj* fortike kaj elaste kuntenas la du glitilojn en la regula *spurdistanco* (maks. 48 cm-oj) kaj fiksas ankaŭ la du holmojn. La konzoloj konsistas el supra, horizontala parto kaj ambaŭflanke el po unu vertikala alo, kies suba ekstremo estas enkonstruita en la ligna glitilo. La du aloj ne estas paralelaj, sed iom diverĝaj, sekve de kio la glitiloj staras sur la grundo iom oblikve, pro kio la glitplandoj glitas ne sur sia plena surfaco, sed sur sia interna eĝo. Sur glacia vego tiuj eĝoj devas esti akraj, sed sur neĝaj vegoj oni aplikas rondigitajn eĝojn, cele de pli sekura stireblo.

Krome la tuta suba rekta parto de la glitilo havas ioman konveksan arkitecon (en la vertikala ebena). Glacia vego necesigas pli arkitan glitplandon, ĉar per tio reduktiĝas la frota surfaco kaj pliiĝas la rapideco. Sekura veturo sur neĝa vego necesigas malpli arkitan glitplandon.

La plej karakteriza propraĵo de la sportsleda estas ĝia fleksebleco, ŝuldebla al la manko de la kverstango, kiu ĉe la ordinara sledoj fikse kunligas la du glitilkornojn. Tiu fleksebleco donas al la sportsledo sekuran stireblon kaj samtempe eliminis la rapidecedon, kaŭzatan de la frotado de la perpieda stirado ĉe la ordinara (fikskonstruitaj) sledoj.

Dank' al tiu fleksebleco, la sportsledo estas stirebla laŭ du metodoj:

1. Pere de piedpremo sur la dekstran glitilon, se sekvas maldekstra kurbo, respektive sur la maldekstran, se la sledisto devas turni sin dekstren. Nome la premita antaŭa parto de la glitilo fleksiĝas internen, dum la elia restas rekta, kio rezultigas, ke la sledo kuras arkon en la dezirata direkto.

2. Per la levo de la antaŭo de la dekstra aŭ maldekstra glitiloj helpe de la gvidgurto, kroĉita al la du glitilkornoj. La rezulto estas same arko en la dezirata direkto.

La sportsledo havas konsiderinde malaltan sidilon (15 cm-ojn altan), relative grandan pezon (20 kg-oj) kaj larĝan spurdistancon (ĝis 48 cm-oj). Al tiuj tri faktoroj estas atribueblaj la eksterordinara stabileco kaj sekura kondukebleco de la sportsledo, ecoj tre gravaj kaj nemankeblaj en konkursoj disvolviĝantaj sur vegoj el glacio, kun rapideco atinganta ofte eĉ 100 km-ojn per horo.

La sportsledo havas kvar subtipojn, konformajn al la bezonoj de la viraj kaj virinaj solopaj kaj duopaj disciplinoj.

1. *Unusidloka sportsledo*, kun pli mallongaj glitiloj, taŭga por virinaj *sledsolopoj*. Ĝia longo estas 124 cm-oj kaj tiu de la sidfaco 49 cm-oj.

2. *Unu-kaj-duonsidloka sportsledo*, kun 128 cm-a longo kaj 35 cm-a sidfaco, por viraj sledsolopoj.

3. *Superlonga unusidloka sportsledo*, kun glitilmezuro de la unusidloka sportsledo, por eksterordinare grandstaturaj viraj konkursantoj.

4. *Dusidloka sportsledo* kun 135 cm-a longo kaj 66 cm—a sidfaco, por viraj sledoduopoj.

La konkursantoj de la sportobranĉo sledado devas esti vestitaj laŭ antaŭskribo. La vesto havu glatan surfacon kaj sidu malvaste sur la korpo. Ŝirmkasko, okulŝirmilo, gantoj, renŝirmilo, kubut- kaj genuŝirmiloj kompletigas la vestaĵon de la konkursa sledisto.

Koncerne la starton oni diferencigas flugan starton kaj staran starton.

La *fluga starto* povas esti kura aŭ salta startoj.

Ĉe la *kura starto* la sledisto ekstaras dekstre aŭ maldekstre de la sledo. La gurtmano tenas la gvidgurton kaj la holmon pli proksiman al la korpo, la alia mano tenas la alian holmon. Per kelkaj fortaj kurpaŝoj la sledisto ŝovas la sledon antaŭen sur la grundo, poste deflanke li saltas sur la sledon per speciala tekniko, tiel, ke la startlinion li jam devas transpasi en regula rajdsido.

La komenca pozicio de la konkursanto plenumanta *saltan starton* estas malantaŭ la sledo. Li prenas la du holmojn ĉe la antaŭa konzolo, kaj farante 3-4 svingsaltojn, dum kiuj li ŝovas la sledon antaŭ si, li saltas sur la sledon en rajdsidon. En la momento de la sursalto la du manoj malprenas la holmojn, dum kiu tempo la sola ligo inter la sledo kaj la konkursanto estas la gvidgurto.

En internaciaj sledkonkursoj deviga estas la *stara starto*, kiun la konkursantoj plenumas el speciale konstruita sledstartejo. Sur ambaŭ flankvandoj de la startejo vice surmontitaj *startkrampiloj* helpas la slediston, ke mane tirante kaj puŝante sin per tiuj krampiloj, li havigu al si kaj al la sledo la necesan komencan rapidecon.

Dum sledado la sledisto sidas sur la gurtsidilo, senpere post la antaŭa konzolo. Unu el la manoj (gurtmano) tenas la gvidgurton kaj la alia tenas la respektivan holmon proksime de la antaŭa konzolo. La supra parto de la korpo estas klinita malantaŭen tiel, ke la lumba parto de la spino kuŝas sur la remburita horizontala lato (kverlato) de la malantaŭa konzolo. Per tia korpoteno la konkursanto reduktas la aerreziston ĝis minimumo. Por orientiĝo la kapo estas levita. La kruroj estas etenditaj antaŭen. La interna parto &e la piedo kuŝas sur la ligna glitilo. La piedpintoj estas antaŭen- kaj internenstreĉitaj, por redukti ankaŭ per tio la aerreziston, kiu — ĉe tiel granda rapideco — estas jam konsiderinda.

La priskribita korpoteno validas por la rektadirekta veturo. Por povi sukcese traveturi (plenumi) la kurbojn da la veĝo, la konkursanto devas apliki specialan t.n. kombinteknikon. En la momento de la komenco de la kurboveturo la kombintekniko diktas tri samtempe enkondukendajn movaktivadojn:

1. Transloki la korpopezon.
2. Ektiri la gurton.
3. Ekpremi la glitilon per la piedo.

Por pritakti ekz. maldekstran kurbon:

al 1. Per kontinua leĝera movo oni translokas la korpopezon maldekstren, ale al la interna rando de la kurbo. Tio okazas per la levo de la dekstra ŝultro kun la samtempa tordo de la trunko maldekstren (maldekstra kurbopozicio). Per tio la pezo de la supra korpo translokiĝas sur la maldekstran flankon de la sledo, samtempe la froto de la maldekstra glitilo pliiĝas kaj la dekstra glitilo certagrade malsarĝiĝas. Dum la manovro la trankvila sido de la malsupra korp parto restas neŝanĝita.

al 2. La gurtmano ektiras la maldekstraflankan gurton, per kio la antaŭo de la maldekstra glitilo leviĝas kaj la pezo translokiĝas sur ĝian malantaŭan ekstremon, kiel same ankaŭ la turnopunkto de la veturo en la kurbo translokiĝas al la glitilfino.

al 3. Per la interna flanko de la dekstra piedo la konkursanto ekpremas la eksteran flankon de la dekstra glitilkorno. Pro tio aliiĝas la antaŭspuro (antaŭa spurdistanco) de la sledo, ĉar dum la maldekstra glitilo montras rekte antaŭen, la dekstra glitilo montras en maldekstra direkto.

La translokado de la korpopezo, la ektiro de la gvidgurto kaj la ekpremo per la piedo okazas sinkrone kaj rezultigas direktoŝanĝon maldekstren.

Kaze de tro akra kurbo sur la sportsledvego estas utila la apliko de la t.n. kalkantekniko, nome samtempe kun la unuflanka ektiro de la gvidgurto oni helpas levi la glitilon ankaŭ per la kalkano, hokinte ĝin sub la glitilkornon, apud la ekstremo de la holmo.

La veturo sur la kurbovando havas tri fazojn, nome la kurboenveturon, la kurbotraveturon kaj la kurboelveturon.

La manieron de la *kurboenveturo* determinas la profilo, dekliveco, longo kaj radiuso de la kurbo, sed ĝi dependas krome ankaŭ de la rapideco kaj de la taktiko de la sledisto, kiel ankaŭ de la kurboelveturo, t.e. ĉu sekvas nova kurbo aŭ rekto.

La *kurbotraveturo* konsistas el ascenda, meza kaj descenda sekcioj. Se la sledisto bone plenumis la kurboenveturon kaj ne ĉesas stiri la sledon ankaŭ en la meza sekcio, tiam la kurbotraveturo ĝenerale ne kaŭzas al li malfacilaĵojn kaj li povas koncentrigi sian atenton sur la kurboelveturon.

La *kurboelveturo* estas decida por la plua veturo en la sekvanta rekto aŭ kurbo. La bona kurboelveturo estas la dependaĵo de la ĝusta kurboen- kaj traveturo.

Tre grava estas la ĝusta stiro ĉe sinsekvaj kurboj kaj S-kurboj. La sinteno de la konkursanto dependas de la transira longo inter du kurboj. Pli longa (pli ol 10 m-oj) transiro permesas al la sledisto relokigi sin en la normalan pozicion kaj ĉe la enveturo en la sekvan kurbon komenci la novan stirmanovron. Do kaze de veturo tra kurbokombinaĵoj kun longaj transiroj ĉiu kurbo estas rigardenda kiel aparta, unuopa kurbo. Sed kaze de kurbokombinaĵoj kun malpli longaj transiroj (5-10 m-oj) la konkursanto ne havas tempon por repreni la normalan pozicion inter du kurboj. En la mallongaj kurbotransiroj li devas do kontinue translokadi la supran korpon de unu al la alia flanko. Sen la translokado de la korpopezo ne estas plenumbla sekura kurbotraveturo. Samtempe kun la korpopezo-translokado oni devas ankaŭ ŝanĝi la stirmanovron.

Sur la dusidloka sportsledo la *stiristo* sidas antaŭe. Se li tenas la gvidgurton per la maldekstra mano, tiam per la dekstra mano li tenas la dekstran holmon. Ligite al la kverlato de la antaŭa konzolo, mallonga, larĝa gurto kusas sur la dekstra, supra femuro de la stiristo. Ĝin tenas la malantaŭulo per la dekstra mano, kiu kuŝas sur la ventro de la stiristo, proksime de lia koksoosto. Tiamaniere strikta ligo kroĉas la du konkursantojn unu al la alia. La maldekstra mano de la malantaŭulo tenas la maldekstran holmon. La piedoj de la stiristo estas lokitaj kiel ĉe la unusidloka sledo. La piedoj de la malantaŭulo ripozas ambaŭflanke inter la ligna glitilo kaj la holmo.

Estas tre grave, ke la du konkursantoj harmonie kunagu, precipe en la kurboj ili devas samtempe kaj samritme translokadi la korpopezon.

Disciplinoj:

1. *Vira unuopa slededo*

La nomo de la formacio: vira sledunuopo

2. *Virina unuopa slededo*

Formacio: virina sledunuopo

3. *Duopa sledado* (nur por viroj)

Formacio: sledoduopo

La konkurso de la sledunuopoj konsistas el 4 kurumoj. La definitivan rezulton donas la mezvaloro de la kvar temporezultoj.

La sledoduopoj plenumas nur du kurumojn kaj taksatas la mezvaloro de la du rezultoj.

La nombro de la partoprenantoj el unu lando estas:

Olimpikoj: 4 viraj, 3 virinaj unuopoj kaj 2 duopoj;

Mondĉampionado: 8 viraj, 6 virinaj unuopoj kaj 4 duopoj.

Esprimoj: Mondĉampionado, Eŭropo-ĉampionado de sledado. La konkurso de la virinaj sledunuopoj. Li estis membro de la mondĉampiona sledoduopo en 1970. La dualoka klasito de

la olimpika ĉampionado de virina unuopa sledado. Finiĝis la unua kurumo de la Eŭropo-
ĉampionado de la sledoduopoj.

TABLOTENISO

Starante ĉe la du ekstretoj de longkvadrata tablo, nomata tablotenisotablo, kaj rigore obeante la regulojn de la ludo, po unu ludisto aŭ po unu ludistoparo ludas unu kontraŭ la alia, batante kaj ripetite rebatante per ligna batilo malgrandan elastan kaŭĉukan pilkon super malalta reto sur la kontraŭulan tabloduonon, klopodante plenumi la batojn tiel lerte kaj taktike, ke la kontraŭulo ne povu regule rebati la pilkon.

La sporta ludo tabloteniso disvolviĝas sur la 274x152,5 cm-ojn ampleksa kaj 76 cm-ojn alta plata surfaco de speciala tablo, nomata tabloteniso-tablo, mallonge tablo. La internaciaj tabloteniso-konkursoj estas aranĝataj en ĉambregoj aŭ sporthaloj, ĝenerale en formo de pluraj samtempaj matĉoj, kio necesigas, ke al ĉiu tablo apartenu 14x7 m-ojn area libera *ludospaco*, dividita per 75 cm-ojn alta *barilo* disde la ceteraj ludospacoj.

La randoj de la devige malhelverda tabloplato, nomata *ludfacio*, estas indikitaj per 2 cm-ojn larĝaj strioj, kiuj inkluzivas la du *bazliniojn* (la du pli mallongaj lateroj) kaj la du *flankliniojn*. En la mezo, paralele kun la bazlinioj, 183 cm-ojn longa kaj ĉ. 15 cm-ojn alta reto dividas la ludfacon en du *duonfacojn*. En la mezo de la tuta ludfacio, paralele kun la flanklinioj kuras la 3 cm-ojn larĝa *mezlinio*, atentata nur ĉe la porludaj matĉoj. La mezlinio dividas la du duonfacojn en po du *kvaronfacojn*, nomatajn dekstra, resp. maldekstra kvaronfacoj de la serviranto kaj dekstra, resp. maldekstra kvaronfacoj de la ricevanto.

La ludo okazas per unu *tabloteniso-pilko*, mallonge *pilko*, kaj per du, resp. kvar *tabloteniso-batiloj*, mallonge *batiloj*.

La pilko estas blanka, ĉ. 3.75 cm-ojn diametra, meze 2,45 gr-ojn peza kaj estas farita el kaŭĉuko aŭ plasto. Nur oficiale aprobitaj pilkoj estas uzablaj en konkursoj. Postulaĵo: falite el 30,5 cm-a alto sur specialan ŝtaloblokon ĝi devas resalti ĉ. 24 cm-ojn.

La batilo povas havi formon kaj mezurojn laŭplaĉajn. Ĝi devas esti farita el ligno kaj farbita malhela kaj malbrila. La *batfacio* povas esti tegita (surgluita) per maks. 2 mm—ojn dika grajnita gumo kaj eventuale per kroma 2 mm-ojn dika spongotavolo sub la gumo.

Ĉe la du ekstretoj (ĉe la bazlinioj) de unu tablo ludas samtempe po unu ludisto (solludo) aŭ po unu paro (parludo) unu kontraŭ la alia.

La elementa ero de la ludo estas la *bato*. La nocio bato inkluzivas baton donitan al la pilko pere de la batilo aŭ pere de la mano tenanta la batilon. La bato povas esti *serviro* aŭ *rebato*.

a) La serviro, plenumita de la *serviranto*, estas konforma al la antaŭskribo, se la regule suprenĵetita kaj forbatita pilko — sen ektuŝi la propran duonfacon — transflugas senektuŝe la reton kaj trafas ie ajn la kontraŭulan duonfacon, resp. ĉe parludo la dekstran kvaronfacon de la *ricevanto*.

b) La rebato estas regula, se atendinte unu (sed ne pli) alfrapiĝon de la pilko sur la propra duonfaco, la ludisto rebatas la pilkon tiel, ke — ĉu ektuŝinte la reton, ĉu ne — ĝi reflugu al la kontraŭula duonfaco kaj trafu ĝin ie ajn.

Komencata per serviro, la *batserio* estas diverslonga kontinua sinsekvo de rebatoj, alterne plenumataj de la du kontraŭuloj de la solludo, respektive disvolvita laŭ regula konstanta vicordo fare de la kvar ludistoj de la parludo. La batserio daŭras, alivorte la pilko *estas en ludo* ĝis la kulpado de la sekvantaj eraroj.

1. Se la pilko ektuŝis sinsekve dufoje la saman duonfacon.

2. Se la pilko ektuŝis sinsekve la du duonfacojn, sen ke iu el la ludistoj estus batinta ĝin inter la du ektuŝoj (kaze de pilko resaltinta pro kontraŭdirekta rotacio, alinome falsa giro).

3. Se iu ludisto ektuŝis sinsekve du aŭ pli da fojoj la pilkon per la batilo.

4. Se la pilko ektuŝas ie ajn la korpon aŭ veston de unu el la ludistoj.

5. Se iu ludisto faras *flugbaton*. t.e. rebatas la pilkon, antaŭ ol ĝi estus ektuŝinta la propran duonfacon.

6. Se la pilko, transfluginte la reton, falas sur la teron, sen ektuŝi antaŭe la kontraŭulan duonfacon.

7. Se iu ludisto ekmovas la tablon, aŭ ektuŝas ĝin per la libera mano, dum la pilko estas en ludo.

La kontraŭulo de la kulpinto de unu el la supraj eraroj gajnas unu poenton. Post ĉiu eraro komenciĝas nova batserio enkondukata per nova serviro. Post ĉiu atingita sumo de 5 poentoj (temas pri la suma poentonombro de la du partioj) kaj ĉe ĉiu pli nova poento ekde la poentostato 20:20 sekvas *servirŝanĝo*. Gajnas la *seton* tiu ludisto (paro), kiu akiras pli frue 21 poentojn, aŭ — kaze de poentostato 20:20 — tiu, kiu akiras 2-poentan avantaĝon.

Se 15-minuta ludo ne alportas venkon en la seto, ekvalidas la tn. *regulo de alternado*, kiu antaŭskribas, ke dum la plua disvolviĝo de la seto

a) post ĉiu finita batserio sekvas *servirŝanĝo*;

b) krom la serviron la serviranto rajtas plenumi sume nur 12 rebatojn. Se la ricevanto sukcesas rebati ĉiun *pilkovenon*, tiam li gajnis la batserion.

Ĉiuj supraj reguloj koncerne la ludon tute validas ankaŭ ĉe la perludaj matĉoj, kun tiu kompletigo, ke post la regula serviro kaj la regula rebato de la ricevanto sekvas rebati la *partnero* de la serviranto kaj poste tiu de la ricevanto, kaj la ludo daŭras plu laŭ tiu sama vicordo tute ĝis la fino de la batserio.

En la internaciaj tablotenis-konkursoj la matĉoj konsistas el pluraj setoj. Ekzistas nome tn. *matĉoj kun du gajnitaj setoj*, mallonge *duset-gajnaj matĉoj* kaj *matĉoj kun tri gajnitaj setoj*, mallonge *triset-gajnaj matĉoj*. La unuaj povas konsisti el 2 aŭ 3, la aliaj el 3, 4 aŭ 5 setoj.

Post ĉiu seto sekvas *lokŝanĝo* de la ludistoj. Ankaŭ post la 10-a poento de la decida seto sekvas lokŝanĝo. Inter la setoj paŭzoj ne estas, escepte unu 5-minutan paŭzon inter la tria kaj kvara setoj, se iu el la ludistoj tion petas.

Kiel jam menciite, la sportan ludon tabloteniso ludas du ludistoj unu kontraŭ la alia, tio estas la *solludo*, aŭ du paroj unu kontraŭ la alia, tio estas la *parludo*. La solludon ludas aŭ du viroj aŭ du virinoj. La parludon ludas aŭ du viraj, aŭ du virinaj, aŭ du geaj paroj. La solludo kaj la parludo estas individuaj ludoj, individuaj disciplinoj. Krom ilin oni ludas ankaŭ teamajn tablotenisoludojn. La matĉon inter du teamoj oni nomas teamomatĉo kaj ĝi konsistas el certa nombro da solludaj kaj parludaj matĉoj plenumataj de difinita nombro (3-7) da ludistoj. Surbaze de la rezulto de tiuj individuaj submatĉoj oni determinas la suman rezulton de la teamomatĉo kaj laŭ tiu rezulto oni premias la teamojn.

Disciplinoj:

1. *Vira solluda tabloteniso*
2. *Virina solluda tabloteniso*
3. *Vira parluda tabloteniso*
4. *Virina parluda tabloteniso*
5. *Gea parluda tabloteniso*
6. *Vira teama tabloteniso*
7. *Virina teama tabloteniso*

Cele de glata disvolvo de la konkurso (ĉampionado) la konkursa juĝistaro dezignas (komisias) necesan nombron da funkciuloj, nome ludgvidistojn, linijuĝistojn, tempomezuristojn, batnombroistojn kaj rezultindikistojn.

La *ludgvidisto* havas kiel ĉefan taskon gvidi la ludon dum la matĉoj kaj decidi pri ĉiuj diskutablaj demandoj. Dum la ludo li staras aŭ sidas ĉe unu el la ekstretoj de la reto, kaj tie li gvidas la ludon. Unu el liaj farendoj estas la poento— nombrado, t.e. post ĉiu atingita poento li komunikas la novan poentproporcion (poentostaton, batserio-proporcion), dirante unue la poentosumon de la serviranto de la sekvonta batserio kaj poste tiun de la ricevanto (ekz.: 9:14 = naŭ per dek kvar). Ĉe *servirŝanĝo* same li komunikas la poentostaton kaj poste aldonas la

nomon de la nova serviranto.

Post ĉiu finita seto li komunikas la setproporcion (seto-staton). Li atentigas la ludistojn pri la servirŝanĝo kaj lokŝanĝo, kaj ĝenerale zorgas pri tio, ke ĉiuj punktoj de la konkursa regularo estu obeataj. Liaj decidoj koncerne la rezulton de la matĉo estas definitivaj.

La nombradon kaj ĉiujn komunikojn la ludgvidisto devas fari, se eble, en unu el la akceptitaj oficialaj lingvoj (angla, araba, franca, germana, hispana, rusa) de la sportobranĉo, aŭ — se necese — helpe de interpretisto.

En internaciaj konkursoj krom la nombrado de la ludgvidisto ankaŭ elektra rezultindikilo funkcias, kiu per bone videblaj ciferoj sciigas al la konkursantoj kaj publiko la momentajn poentostaton de la seto kaj setostaton de la matĉo.

La *linijuĝisto* funkcias aŭ kiel flanklini-juĝisto aŭ kiel bazlini-juĝisto.

La *flanklini-juĝisto* havas sian lokon ĉe la flanklinio de la ludfaco, vid-al-vide al la ludgvidisto kaj observas la movadon de la pilko. En ĉiu okazo, kiam la pilko ektuŝas la flankon de la tablo sub la ebena de la tabloplato, li atentigas per la vorto “flankpilko”. Li devas decidi en tiaj diskuteblaj kazoj, kiam la pilko regule ektuŝis la flanklinion, sed tute ĉe la eĝo, pro kio ĝi ekglitis (glitpilko) kaj pluflugis en neatendita direkto.

La du *bazlini-juĝistoj* sidas en la plilongigo de la bazlinio kaj krom observi la “glitpilkojn” ili atentigas, ĉu la serviro okazas regule, t.e. malantaŭ la bazlinio. La funkciado de bazlini-juĝisto en mondĉampionado estas deviga, en ceteraj konkursoj konsilinda.

La *tempomezuristo* mezuras la ludtempon. Instrukcie de la ludgvidisto li dekalkulas la eventualajn *mortajn tempojn* (ekz. pro provizora ĉeso de la ludkapablo de iu ludisto sekve de negrava vundiĝo k.s.) kaj signas krome, kiam pasis la unuaj 15 minutoj de la seto, por ekvalidigi la tn. regulon de alternado.

La *batnombristo* ekfunkcias, kiam ekvalidis la regulo de alternado. Li nombras la batojn de la batserioj kaj signas per la vorto “halt!”, kiam la ricevanto sukcese plenumis sian 13-an rebaton.

La *rezultindikisto* manipulas la elektran rezultindikilon.

La mondfederacio de la sportobranĉo tablotenisisto estas: International Table Tennis Federation (ITTF). Esp-e: Internacia Tablotenisista Federacio.

Ĉi-sube estas prezentataj la plej gravaj konkursoj kaj ĉampionadoj de tablotenisisto.

1. *Mondĉampionado de tablotenisisto*

La mondĉampionadon oni aranĝas ĉiun paran jaron kaj ĝi inkluzivas ĉiujn 7 disciplinojn de la sportobranĉo. Por ĉiu disciplino estas fondita aparta porpokala ĉampionado, alivorte pokalĉampionado. Jen ili:

a) Por la disciplino vira teama tablotenisisto oni fondis la Pokalon Swaythling. Ĝia kompleta titolo estas: Mondĉampionado de vira teama tablotenisisto por la Pokalo Swaythling.

La ĉampionadon pertoprenas teamoj el maks. 5 ludistoj. La renkonton, t.e. la parbatalon inter du teamoj oni nomas teamomatĉo kaj ĝi konsistas el 3x3=9 duset-gajnaj solludaj matĉoj. La teamomatĉon partoprenas ĉiam nur 3 — alterne elektitaj — ludistoj el la 5-membra teamo. Tiuj 3 ludistoj ne estas ŝanĝeblaj per la ceteraj du ludistoj, dum daŭras la koncerna teamomatĉo. Venkas tiu teamo, kiu gajnis 5 solludajn matĉojn.

b) Por la disciplino virina teama tablotenisisto oni fondis la Pokalon Marcel Corbillon. La konkurso havas do la nomon: Mondĉampionado de virina teama tablotenisisto per la Pokalo Marcel Corbillon. La ĉampionadon partoprenas teamoj el maks. 4 ludistinoj. La teamomatĉo konsistas el 2x2=4 duset-gajnaj solludaj matĉoj, plenumitaj de po du ludistinoj el ambaŭ teamoj kaj krome el unu duset-gajna parludo, kiun jam rajtas partopreni unu aŭ du el la ceteraj du ludistinoj. En la teamomatĉo venkas tiu teamo, kiu gajnis tri individuajn submatĉojn, nome 3 solludajn aŭ 1 parludan kaj 2 solludajn matĉojn.

Ambaŭ teamaj konkursoj disvolviĝas laŭ miksa sistemo. Nome en la unua etapo oni formas

grupojn el po 4 teamoj kaj ene de tiuj grupoj disvolviĝas rondo-batalo, t.e. ĉiu teamo ludas kontraŭ ĉiu samgrupa teamo. La unualokaj klasitoj de tiuj grupaj rondo-bataloj eniras la sekvan etapon, ekde kiu la konkurso jam disvolviĝas laŭ rekte alimina sistemo.

Kaze de egalstato inter du aŭ pli da teamoj oni ekzamenas unue la proporciojn de la gajnitaj kaj malgajnitaj teamomatĉoj. Se tiu egalas; oni rigardas la proporciojn de la individuaj submatĉoj. Se ankaŭ tiu egalas, decidas la proporcio de la setoj kaj — se necese — fine tiu de la poentoj (batserioj).

La ceteraj 5 disciplinoj de la mondĉampionado estas la sekvantaj individuaj konkursoj:

c) Mondĉampionado de vira solluda tablotenisado por la Vazo St. Bride.

ĉ) Mondĉampionado de vira parluda tablotenisado por la Irana Pokalo.

d) Mondĉampionado de virina solluda tablotenisado por la Premio Geist.

e) Mondĉampionado de virina parluda tablotenisado por la Pokalo Pope.

f) Mondĉampionado de gea parluda tablotenisado por la Pokalo Heydusek.

Ĉiuj 5 ĉampionadoj disvolviĝas laŭ rekte elimina sistemo kaj la matĉojn oni plenumas ĝis 3 gajnitaj setoj.

2. *Eŭropo-ĉampionado de tablotenisado*

La ĉampionadon aranĝas ĉiun malparan jaron unu el la federacioj-membroj de la Eŭropa Tablotenisista Unuiĝo, laŭ la reguloj de la mondĉampionado. La ĉampionadon povas partopreni naciaj trupoj el maks. 10 membroj, egalnombro viroj kaj virinoj.

Por la 7 disciplinoj estas fondita po unu pokalo flanke de diversaj naciaj tablotenisistaj federacioj. Tiel por la vira teama tablotenisado fondis pokalon la Hungara Tablotenisista Federacio, por la virina teama tablotenisado la rumana, por la vira solopa tablotenisado la sveda k.t.p. Ili estas nomataj: Pokalo de la Hungara Tablotenisista Federacio, k.t.p.

3. *Eŭropo-Ligo de tablotenisado*

Ankaŭ tiu konkurso apartenas al la agosfero de la Eŭropa Tablotenisista Unuiĝo kaj ĉiu Eŭropa landa federacio povas delegi al ĝi po unu nacia teamo, ĉar temas nur pri teamaj ludoj. La konkurso dividiĝas en plurajn ligojn. La unuan, klasife plej altan ligan konsistigas 7-9 teamoj. La sekvaj dua kaj tria, klasife grade malpli altaj ligoj nombras same 7-9 teamojn, ev. konsistas el du teamgrupoj. Ene de unu ligo resp. grupo ĉiu teamo ludas kontraŭ ĉiu cetera teamo. Per elstara, sukcesa ludo la plej avanaj teamoj de la pli malsupraj ligoj povas eniri la pli altan ligan. — La teamomatĉo konsistas el 4 viraj kaj 1 virina solludoj, el 1 vira kaj 1 gea parludoj. La membronombro de la teamoj povas esti 4-7 ludistoj.

4. *Tablotenisado Eŭropo-Pokalo de klubteamoj*

La pokalkonkurso povas partopreni po unu trimembra klubteamo el ĉiu Eŭropa landa tablotenisista federacio. La konkurso de kaj la viraj kaj la virinaj teamoj — aparte unu de la alia — disvolviĝas laŭ la reguloj de la Pokalo Swaythling, laŭ rekte elimina sistemo. La teamomatĉojn oni ludas ĝis 5 gajnitaj submatĉoj, escepte la finalajn teamomatĉojn, kies ĉiuj submatĉoj estas ludendaj. — La pokalon por la viraj teamoj oferis Francio kaj por la virinaj teamoj Germana Federacia Respubliko. 5. Tablotenisado Eŭropo-Pokalo de la Foirurboj La pokalkonkurso rajtas partopreni po unu trimembra teamo el la Eŭropaj foir- kaj kongresurboj. La konkurso disvolviĝas baze de la regularo de la Pokalo Swaythling, laŭ rekte elimina sistemo, ĝis 5 gajnitaj duset-gajnaj submatĉoj. La venkinto de ĉiu renkonto (teamomatĉo) pluiras, la venkinto eliminiĝas (elfalas) el la konkurso. Revenĝa matĉo ne estas.

6. *Pokalo de la Eŭropaj ĉampionaj Tablotenisado-teamoj*

(Laŭ ĝia aparta regularo.)

Esprimoj: F-ino N. N. estas membro de la mondĉampiona tablotenisoteamo. Mondĉampiono de vira solluda tablotenisado. Eŭropo-ĉampiona paro de gea parluda tablotenisado. La venkinta teamo de la Eŭropo-Ligo de tablotenisado en 1971. En la dua fazo de la unuaetapa rondo-batalo de la Eŭropo-ĉampionado de tablotenisado la nacia teamo de Nederlando venkis tiun

de Belgio kun la poentproporcioj 18:21, 24:22, 21:16.

TENISO

Ludante sola, aŭ en duopo, sur difinite ludkampo, kontraŭ unu resp. du kontraŭuloj, la tenisisto sendas la tenispilkon — batante aŭ rebatante ĝin ripetite per sia rakedo — trans streĉitan reton sur la kontraŭulan duonkampon, plenumante la rebatojn regule, sed — se eble — kun taktiko, ke la kontraŭulo jam ne havu la eblecon regule resendi la pilkon.

La sportobranĉo teniso havas du subbranĉojn, nome la solludon, kie ambaŭflanke ĉe la reto ludas po unu ludisto unu kontraŭ la alia, kaj la parludon, kie du paroj ludas unu kontraŭ la alia.

A) Solludo

La ludo disvolviĝas sur subĉiela *ludkampo* kun areo de 23,77x8,23 m-oj. La grundo de la konkursaj ludkampoj povas esti razeno, aŭ nature tera grundo, skorio aŭ betono.

La pli longaj lateroj de la longkvadrat-forma ludkampo estas la du *flanklinioj*, la malpli longaj estas la du *bazlinioj*. Meze de la flanklinioj 91,5 cm-ojn alta reto dividas la ludkampon en du *duonkampojn*. La reton tenas maldika kablo streĉita inter du fostoj 15 cm-ojn pli altaj kaj starantaj unu metron ekster la flanklinio. Ambaŭflanke paralele kaj 6,4 m-ojn distance de la reto kuras la du *servirlinioj*, finiĝantaj ambaŭekstreme ĉe la flanklinioj. La mezon de la du servirlinioj interligas la *mezlinio* kaj dividas la interspacon de la du servirlinioj en po du *servirkortojn* ambaŭflanke de la reto.

La tutan ludkampon ĉirkaŭas elkurejo kun minimuma larĝo de 6,4 m-oj ĉe la bazlinioj kaj 3,6 m-oj ĉe la flanklinioj.

La konkurse disvolvita tenisludo estas nomata tenismatĉo, mallonge matĉo. La matĉo konsistas el *setoj*, la seto el *ludumoj* kaj la ludumo el *batserioj*.

La plej malgranda taksata ero de la tenisludo estas la batserio, kiu komenciĝas per *serviro* (plenumata de la *serviranto* kaj akceptata de la *akceptanto*) kaj finiĝas post certa nombro da batoj, t.e. da pasoj kaj repasoj de la pilko super la reto, ĝis eraro kulpita de unu el la du ludantoj. La kontraŭulo de la erarinto ricevas unu poenton.

Ĉe la serviro la serviranto ekstaras post la bazlinio, ĵetas la pilkon en la aeron, kaj antaŭ ol ĝi ektuŝus la teron, li batas ĝin per la rakedo. La tiel ĉi servirita pilko devas transpasi senektuŝe la reton kaj ektuŝi la grundon ene de la diagonale transa servirkorto. La serviritan pilkon la ricevanto rajtas rebati nur post tiu grundektuŝo. Dum la plua daŭro de la batserio ĉiu rebato estas regula, se la rebatita pilko ektuŝas la grundon de la transa duonkampo ie ajn, inkluzive la limliniojn mem. Antaŭ rebato la pilko rajtas ektuŝi la grundon nur unufoje, sed ankaŭ la tn. *flugbato* (se oni rebatas la pilkon antaŭ ol ĝi ektuŝus la grundon) estas valida, eĉ valora kaj por la kontraŭulo danĝera elemento de la ludo, precipe, se ĝi estas plenumita forte kaj direktite. Tiajn fortajn kaj direktitajn rebatojn oni nomas *ŝotoj*.

La batserio finiĝas, se a) la serviro — ankaŭ post ripeto — estas neregula; b) la pilko ektuŝas la grundon sinsekve dufoje; c) oni batas la pilkon en la reton; ĉ) la pilko ektuŝis la grundon ekster la ludkampo.

Se la ludisto gajnas la unuan batserion, li ricevas la unuan poenton, nomatan “dekkvin”. La dua gajno t.e. la dua poento estas nomata “tridek” kaj la tria “kvardek”. Se ekz. unu el la ludistoj, nome la serviranto gajnis du poentojn kaj la alia ankoraŭ neniom, tiam la poentproporcio estas “nul per tridek”. Se la serviranto havas unu kaj la ricevanto tri poentojn, tiam la poentproporcio estas “dekkvin per kvardek”. Se unu el la ludistoj akiras la kvaran poenton kaj la kontraŭulo havas nur du aŭ malpli da poentoj, finiĝas la ludumo. Se ambaŭ ludistoj havas po tri poentojn, la pozicio estas “egalo”. Unu poento post “egalo” nomiĝas “avantaĝo por la serviranto” aŭ “avantaĝo por la ricevanto”. Se la avantaĝulo gajnas ankaŭ la sekvan batserion, li gajnas per tio ankaŭ la ludumon. Se ne, la poentpozicio fariĝas denove “egalo” kaj tiu el la du venkas en la ludumo, kiu post iu egalo sukcesas gajni sinsekve du

poentojn.

La du ludistoj alterne serviras en la sinsekvaj ludumoj, nome tra unu ludumo servas la sama ludisto. La unua serviro de la ludumo okazas malantaŭ la dekstra duono de la bazlinio kaj poste alterne malantaŭ tiuj maldekstra kaj dekstra. Post ĉiu dua ludumo sekvas reciproka lokŝanĝo.

La seton gajnas tiu el la du ludantoj, kiu havas minimume ses — se necese pli da — gajnitajn ludumojn, sed nepre du ludumojn da avantaĝo.

La matĉo konsistas el 5 setoj por viroj kaj 3 setoj por virinoj.

Disciplinoj:

1. *Vira solluda teniso*
2. *Virina solluda teniso*

B) Parludo

La longo de la ludkampo egalas kun tiu de la solludo, nur la larĝo estas ambaŭflanke po 1,37 m-ojn pli granda. Sur la ludkampo estas indikitaj ankaŭ la flanklinioj de la solludo — nomataj ĉi tie servir-flanklinioj — por indiki la flankajn limojn de la servirkortoj, kiuj — konsekvence — havas la saman amplekson kaj celon, kiel tiuj de la solludo. Post la farita serviro, dum la plua batserio tiuj servirflanklinioj estas kompreneble preteratentendaj.

La du membroj de la paro alterne serviras, ĉiu tra unu tuta ludumo, kompreneble tiam, kiam la vico de la serviro estas ĉe ili. Same alterne ili akceptas la serviron, ĉiu el ili tra unu tuta ludumo, kiam la vico de la akcepto estas ĉe ili.

Ĉiuj ceteraj reguloj de la solludo senŝanĝe validas ankaŭ ĉe la parludo.

Disciplinoj:

1. *Vira parluda teniso*
2. *Virina parluda teniso*
3. *Gea parluda teniso*

La tenisomatĉojn disvolvas la konkursa juĝistaro. Krom el la konkursa prezidanto, la konkursa sekretario kaj iliaj anstataŭantoj, la konkursa juĝistaro konsistas el gvidaj juĝistoj alinome ludgvidistoj kaj linijuĝistoj.

La *ludgvidisto* — helpate de siaj *linijuĝistoj* — gvidas la matĉon el levita sidloko, staranta ĉe la mezo de unu el la flanklinioj. Detala regularo antaŭskribas liajn taskojn kaj rajtojn dum la ludo, kiel ankaŭ liajn farendojn antaŭ kaj post la ludo. Dum la matĉo li atentigas la regulan disvolviĝon de la ludo kaj registras en la ludgvidista notlibro la poentojn de la ludistoj. La poentojn ĉiun fojon li ankaŭ laŭte komunikas, kiel same laŭte li atentigas la ludistojn pri la kulpitaj malregulaĵoj, per mallongaj antaŭskribitaj esprimoj, kiaj ekz.: “ekstere!” (se la pilko ektuŝis la grundon ekster la ludkampo, resp. ekster la servirkorto); “reto — unu pilkon!” (ĉe serviro, se la pilko flugis kontraŭ la reton kaj falis cisflanke); “reto — du pilkojn!” (se la pilko ektuŝis la supran randon de la reto, sed pluflugis regule: tiam la serviro estas ripetebla ankoraŭ dufoje); “retoektuŝo!” (se unu el la ludistoj ektuŝis la reton per korpo aŭ rakedo); “pilkoektuŝo!” aŭ “korpoektuŝo!” (se la pilko ektuŝis ie ajn la korpon de unu el la ludistoj); “duobla!” (se la pilko ektuŝis sinsekve dufoje la grundon), “rakedo trans la reton!” (se — ĉu en defenda ĉu en ataka aktivado — iu el la ludistoj etendis la rakedon trans la reton); “piederaro!” (se la serviranto paŝis trans aŭ sur la bazlinion, antaŭ ol fini la komenciten serviron); ktp.

La linijuĝistoj havas diversajn specialajn taskojn, kiujn ili plenumas en difinitaj lokoj ĉirkaŭ la ludkampo. Jen iliaj farendoj:

2 *bazlini-juĝistoj* atentigas po unu bazlinion kaj signalas al la ludgvidisto, se la pilko fluge transpasis la bazlinion, sen ektuŝi antaŭe la grundon de la duonkampo.

4 *flanklini-juĝistoj* atentigas ĉe la solludo ambaŭflanke po du flankliniojn kun tasko simila al tiu de la bazlini-juĝistoj.

8 *flanklini-juĝistoj* funkcias ĉe la parludo, ĉar tie ankaŭ la servirflankliniojn atentis po du el ili anbaŭflanke.

2 *mezlini-juĝistoj* atentis, ĉu la siaflanka serviranto serviras en ĝusta loko, kaj ĉu la transflanka serviranto sendas la pilkon regule en la ĝustan servirkorton.

2 *servirlini-juĝistoj* atentis, ĉu la servirita pilko ne transflugas la servirlinion sen ektuŝi antaŭe la grundon.

1 *piederar-juĝisto* atentis, ĉu la serviranto ne transpaŝas aŭ surpaŝas la bazlinion dum la plenumo de la serviro. Li restadas ĉiam ĉe la bazlinio de la serviranto.

1 *retjuĝisto* sidas ĉe la ekstremo de la reto, kontraŭ la ludgvidisto, kaj signas, se la pilko ektuŝis la reton.

— o — o —

La teniskonkursoj estas dividataj ĝenerale laŭ rekte elimina sistemo, kun la privilegia enlistigo de la ellevitoj, t.e. la plej fortaj konkursantoj, resp. teamoj tuj en la duan etapon. Tamen estas aranĝataj specialaj konkursoj — kun malmulta nombro da partoprenantoj — kie oni aplikas la rondsatalan sistemon, krome ankaŭ konkursoj laŭ miksa sistemo, kie post la elimina sistemo en la unuaj antaŭfinaloj la venkintoj de la lasta aŭ du lastaj antaŭfinaloj rondsatalas inter si.

La mondfederacio de la sportobranĉo teniso estas: International Lawn Tennis Federation (ILTF). Esp-e: Internacia Tenisista Federacio. Internaciaj konkursojn rajtas partopreni nur tiuj landoj, kiuj estas membroj de ILTF.

Pli gravaj tenisĉampionadoj estas la sekvantaj:

1. *La Internacia Ĉampionado de Teniso por la Pokalo Davis*, aranĝata ĉiujare far la pasintjara landoĉampiono. La konkurso disvolviĝas unue interne de tri zonoj, nome en la Eŭropa, Amerika kaj Orienta zonoj, laŭ rekte elimina sistemo, kun certa nombro da ellevitaj landoj. En la antaŭfinalo la venkintoj de la Amerika kaj Orienta zonoj kaj la venkintoj de la du branĉoj de la lotumtabelo de la Eŭropa zono (Eŭropa zono “A” kaj Eŭropa zono “B”), sume kvar venkintoj rondsatalas por la unua loko. En la finalo la unualoka klasito de la antaŭfinalo batalas kontraŭ la pasintjara venkinto, la defendanto de la pokalo. La konkurson partoprenas nur viraj teamoj el 2-4 konkursantoj. Ĉe ĉiu renkonto la du teamoj ludas 4 solludajn kaj 1 parludan matĉojn ĝis 3 gajnitaj setoj.

2. *Pokalo Galea*, aranĝata ĉiujare por viraj tenisistoj ankoraŭ ne finintaj sian 21-an jaron. La konkurson partoprenas teamoj el 2-4 membroj. Ĉiu renkonto konsistas el 5 matĉoj, el kiuj 4 estas solludoj kaj 1 estas parludo, ĝia 2, resp. 3 gajnitaj setoj en la antaŭfinaloj kaj ĝis 5-5 setoj en la finalo. La konkurso disvolviĝas laŭ rekte elimina sistemo, en pli da grupoj en la antaŭfinaloj.

3. *La konkurson de teniso por la Pokalo de la Internacia Virina Federacio* rajtas partopreni trimembraj virinaj teamoj el la landoj apartenantaj al ILTF, Ĉe ĉiu renkonto la du teamoj ludas 2 solludojn kaj 1 parludon ĝis la gajnitaj setoj.

4. *En la konkurso de teniso por la Pokalo Annie Soisbault de Montaigu* batalas virinaj tenisistoj ne pli ol 21-jaraj. La teamoj konsistas el 3 ludistinoj. Ĉe ĉiu renkonto la du teamoj ludas 2 solludojn kaj 1 parludon ĝis du gajnitaj setoj.

5. *Pokalon Centropa* rajtas partopreni kvarembra (2 viroj kaj 2 virinoj) teamoj el Aŭstrio, Italio, Germana Federacia Respubliko, Hungario kaj Svislando. La konkursantoj ne povas esti pli ol 23-jaraj. La konkurso disvolvigas en ĉiuj 5 disciplinoj de la sportobranĉo kun matĉoj ĝis 2 gajnitaj setoj, laŭ rekte elimina sistemo.

Esprimoj: Teniskonkurso, aŭ konkurso de teniso. Tenisĉampionado aŭ ĉampionado de teniso. En la disciplino gea parludo de la konkurso de teniso por la Pokalo Centropa de jaro 1970 venkis la itala paro s-ino Eva Fabbri kaj Giuseppe Petrini, kun kvar gajnitaj kaj unu malgajnita matĉoj. La ĉampiona teamo de la konkurso de teniso por la Pokalo Galea de jaro

1968, post akra, sendecida batalo ĝis setproporcio 2:2, fine venkis en la kvina seto, kun ludumproporcio 7:5. La franca teamo venkis jam la trian fojon en la internacia ĉampionado de teniso por la Pokalo Davis, en la jaro 1972. La unualokan klasigon en la solludo akiris la nederlanda tenisisto N.N.

VELADO

(Menciindas, ke la ĝenerela termino “velado” inkluzivas krom la nocio velbarkado ankaŭ la nociojn velŝipado, glacivelado kaj sablovelado, tamen en la sporta terminologio, la termino velado estas rezervita ekskluzive por la sportobranĉo velbarkado, dum por la sportobranĉoj glacivelado kaj sablovelado oni devas uzi tiujn ĉi pli kompletajn formojn.)

La velisto, pli precize velbarkisto, sidas en sia velbarko kaj lerte manipulante sola, aŭ — depende de la klaso de la velbarko — kun la kolektiva kunago de siaj sambarkanoj, unu aŭ plurajn velojn kaj la rudron, klopodas faksperite utiligi la forton de la vento, por traveturi helpe de ĝi difinitan vegon kun sinsekve alternantaj diversaj direktoj, venki certajn obstaklojn kaj alceliĝi dum kiel eble plej mallonga navigtempo.

El tiu ĉi difino evidentas, ke la ĉefa postulaĵo de la sukcesa konkursa velado estas a) bone konstruita kaj ekipita velbarko, b) favoraj ventocirkonstancoj kaj c) fakscio kaj sperto al la direktado de la velbarko.

La ĉefaj partoj de ekipita velbarko estas: a) la barkokorpo kun la rudro, b) la masto, c) la velaro, c) la rigilaro kaj d) la ankro.

La *korpo* de la konkursaj velbarkoj estas pretigita ĝenerale el ligno, kelkfoje el aluminio, sed ĉiam pli disvastiĝas la barkokorpoj el artmaterialo. La formo kaj mezuroj (longo, larĝo, profundo, pezo) de la barkokorpoj estas diversaj kaj laŭ la klaso de la velbarko precize antaŭskribitaj.

Koncerne la eksteran ŝelon de la lignaj barkoj, pli frue estis uzata preskaŭ ekskluzive la t.n. *klinka* konstruo, kie la malsupra rando de la tabuloj, konsistigantaj la eksteran ŝelon, kuŝas sur la supra rando de la apuda tabulo. La pli posta metodo estas la *karavela* konstruo, t.e. la glata konstrumaniero, kie la rando de la tabuloj jam ne kuŝas unu super la alia, sed ili estas alĝustigitaj glate unu apud la alia kaj tiel fiksitaj sur la *ripoj* de la barko.

Ĉe kelkaj barkoklasoj en la barkokorpo estas enkonstruita ankaŭ kajuto.

Konsidere de la konstruo de la barko, la oficialaj velbarko-klasoj de IYRU, t.e. International Yacht Racing Union — Esp-e: Internacia Velbarkista Unio — apartenas al du ĉefaj barkotipoj, nome al la ŝvertaj velbarkoj kaj al la balastkilaj velbarkoj.

La *ŝvertajn velbarkojn*, alinome *jolojn* karakterizas la ŝverto, t.e. vertikala peza ferlameno, kiu — troviĝanta en la mezo ĉe la barkokorpo — estas laŭnecese sinkebla en la akvon aŭ suprentirebla en la t.n. *ŝvertokeston*. En sinkita pozicio ĝi donas la necesan stabilecon al la barko, ĉar parte ĝi malhelpas, ke la vento ŝovu la barkon en flanka direkto, parte, servante kiel kontraŭpezo, ĝi malhelpas, ke forta vento renversu la velbarkon. Dank' al la suprentireblo de la ŝverto, la ŝvertaj velbarkoj estas uzeblaj ankaŭ sur tute malprofunda akvo, kie — necesokaze — por preventi renversiĝon, la bezonatan kontraŭpezon liveras la anaro de la velbarko (la barkanoj) per sia propra pezo, sursidante la randon de la alventa barkoflanko kaj dorsdirekte plimalpli forte elkliniĝante, preskaŭ elpendante el la barko, ili “sidumas” la barkon, tiele kontraŭpezante la forton de la vento.

La *balastkilaj velbarkoj* portas pezaĵon, t.e. balaston el plumbo, fero aŭ ferbetono, alkonstruitan al la akvoflanka rando de la kilo de la barko. Tiu balasto konsiderinde pliiĝas la stabilecon de la velbarko kaze de forta vento kaj malhelpas ĝian renversiĝon. Male al la ŝverta velbarko ĝia malavantaĝo estas, ke okaze de breĉiĝo sur la *kareno*, aŭ se alikaŭze la barko pleniĝas de akvo, ĝi sinkas, dum la malpeza, ligna ŝverta velboato facile renversiĝas, sed ne sinkas.

La velado en jolo pretendas multe pli da atento, rapideco, lerto kaj persisto, ol tiu en balastkila barko. Veladi per tiu lasta estas kompreneble pli komforte. Ĝiaj ŝanceligoj — sekve de la profunde elstaranta balasto — ne estas tiel abruptaj, ekpuŝecaj. La veturo en balastkila velboato estas do pli trankvila, pli agrabla. La barkanaro ne estas devigata lokŝanĝi ĉe ĉiu

turniĝo. Ĝenerale — kun kelkaj esceptoj — la joloj estas sub, la balastkilaj velboatoj super la 25 m²-a velmezuro.

(En la plej novaj tempoj aperis tria velbarkotipo havanta duoblan barkokorpon. Ĝi estas la modernigita speco de la t.n. *katamarano*, la dukorpa fiŝista barko de la malajaj insuloj. La duobla barkokorpo donas tre grandan stabilecon al la velbarko.)

La karakterizaj indikoj de la velbarko estas la sekvantaj. 1. *Plena longo* = mezuro inter la du plej malproksimaj punktoj de la barkokorpo. 2. *Akvolinio-longo* kaj 3. *Akvolinio-larĝo* estas la pleja longo, resp. larĝo, mezurita en la ebena de la akvolinio (akvolinio estas tiu linio ĉirkaŭ la ekstera flanko de la barko, kie la akvosurfaco tuŝas la flosantan barkon). 4. *Mergo* = la plej granda profundeco de la barko disde la akvolinio. 5. *Akvodismeto* estas la volumeno de la dismetita akvo. 6. *Supreniga forto* estas la pezo de la dismetita akvo. 7. *Laterala surfaco* estas la areo de la flankprojekcio de la subakva barkoparto. 8. *Laterala pezopunkto* estas la pezopunkto de la laterala surfaco.

Al la malantaŭa ekstremo de la velbarko (kiu ekstremo estas nomata *spiegulo* ĉe la ŝvertaj velboatoj kaj *steveno* ĉe la balastkilaj velbarkoj) estas ĉarnfiksita la rudro (vertikala plato). Helpe de la *rudra stango* la velisto movas la rudron dekstren aŭ maldekstren laŭbezone, tiamaniere li direktas, faklingve *stiras* la velbarkon.

La materialo de la rudro estas ligno aŭ aluminio. La rudra stango estas farita ĝenerale el ligno. La rudro estas ankaŭ levebla kaj mallevebla.

La konkursaj velbarkoj, akceptitaj de IYRU, havas nur unu *maston*. La masto estas fiksita al la profundo de la barkokorpo. Ĝian stabilecon kaj masivecon certigas ŝtalŝnuroj, nomataj *stajoj*, alfiksitaj al la rando de la barko. Certagrada diversdirekta klino de la masto disde la vertikalo estas necesa ĉe la diversaj ventodirektoj. Ĉe dorsa kaj trikvarona vento oni klinas la maston iom antaŭen, ĉe duona vento iomete antaŭen kaj ĉe kvarona vento — iom malantaŭen.

La maston oni pretigas el trunko de koniferarbo, el pluraj laŭlonge dissegitaj kaj poste kungluitaj partoj. Ĉiam pli disvastiĝas la pretigo de kavohavaj mastoj, kio reduktas la pezon, sed ne influas la masivecon, nek la elastecon de la masto. Lastatempe oni ĉiam pli enkondukas la mastojn el aluminio.

La postan flankon de la masto, ekde la pinto ĝis la bazo trakuras ŝnuron-larĝa tuboforma entranĉaĵo, kiu ale al la eksteraĵo de la masto estas kelkajn mm-ojn malfermita. Por fiksi la grandvelon al la masto, oni entiras la ŝnurborderitan randon de la grandvelo en tiun entranĉaĵon. Sammaniere estas fiksita la malsupra rando de la grandvelo al la ligna malsupra velstango, nomata *bumo*.

La interna ekstremo de la bumo estas artike fiksita al la malsupra parto de la masto. En la direktado de la velbarko la bumo havas simile gravan rolon, kiel la rudro. Per la turnebla bumo oni povas starigi la grandvelon ĉiam en la plej oportuna pozicio, nome en la plej konvena angulo kun la direkto de la vento kaj de la atingenda celo. La arto de la direktado de la velbarko estas la fakscie harmonia manipulado de la rudro kaj bumo.

La *spinakbumo* servas la manipulon de la dorsventa velo, nomata *spinako*. La spinakbumo estas malpeza, rigida stango, kies longo egalas kun la distanco inter la masto kaj la fiksada loko de la ĵibo. Unu el ĝiaj ekstremoj estas kroĉita al ĉareto, rulebla sur ĉ. 1,5 m-ojn longa vertikala relo, muntita sur la antaŭa malsupra parto de la masto. Al la alia ekstremo de la spinakbumo estas fiksita unu el la du malsupraj anguloj de la spinako. Per la levo kaj mallevo de la spinakbumo estas reguligebla la pufeco kaj pere de tio la dimensio de la surfaco de la dorsventa velo.

La *gaf* estas la supra velstango de la t.n. gafaj (ne triangulaj, sed trapezoidaj) grandveloj. Ĝia formo similas tiun de la bumo.

La *transversaj stangoj* servas la kvardirektan stabiligon de la masto.

Esenca parto de la velbarko estas la diversaj samtempe aŭ alterne uzataj *veloj*, unuvorte

velaro. Ĝis la lastaj tempoj la suverena materialo de la veloj estis la kotona tolo, sed la nuntempaj konkursaj velbarkoj estas ekipitaj preskaŭ ekskluzive per veloj teksitaj el plastofadenoj.

La velotipoj en konkursoj plej ĝenerale uzataj, estas la sekvantaj.

Sur pli malgrandaj velbarkoj oni aplikas nur unu velon, nomatan *grandvelo* aŭ *ĉefvelo*. La *hisita* grandvelo estas ĝenerale ortangula triangulo, kun longa vertikala (kiom la masto longas) kaj malpli longa horizontala (fiksita sur la bumo) lateroj. Tamen ĉe kelkaj velbarko-klasoj oni uzas t.n. gafan ĉefvelon. La gafa velo ne estas triangula, sed trapezoidforma (kiel se oni tranĉus la supran trionon de la triangulo, ne horizontale, sed en oblikva linio, descendanta ale al la masto). Tiun — nome la solvelan — sistemon oni nomas *keta* velaro.

La antaŭa malsupra angulo de la grandvelo estas nomata *halsa* angulo, tiu malantaŭa estas la *skota* angulo kaj supre estas la *supra* angulo.

Ĉe velbarkoj kun velsurfaco pli ol 10 m²-ojn area, antaŭ la maston oni fiksas duan velon, laŭ formato similan, sed malpli grandan ol la grandvelo. Ĝi nomiĝas ĵibo. Ĝi ne havas malsupran velstangon, sed per ŝnuroj ĝi estas fiksita al la masto kaj al la *busprito*, aŭ al la antaŭa barkopinto. El ĵiboj la velbarko povas havi pli da specoj de diversaj grandecoj, por povi ŝanĝi ilin konforme al la ventoforteco. Tiu sistemo, nome la apliko de grandvelo plus ĵibo — do sume ne pli ol du veloj — estas nomata *slupa* velaro.

Kaj ĉe la keta, kaj ĉe la slupa velaro oni distingas *altan velaron*, kiam la grandvelo estas triangula kaj longa, — kaj *malaltan* aŭ *gafan* velaron kiam la grandvelo estas gafa velo.

Speco de la ĵiboj estas la plej granda ĵibo, nomata genuo, kiu en la dorsa kaj flanka ventoj tre efike plirapidigas la velbarkon. Ĝia antaŭentira forto estas tiel granda, ke ofte, — precipe kiam ne estas plena dorsa vento, — oni uzas ĝin anstataŭ spinakon, eĉ fiksita en ties loko. Per tiu velo la barko facile ŝanĝas direkton ankaŭ en dorsa vento, nome el dorsa vento en duonan venton, eĉ en kontraŭventan direkton, kio estas granda avantaĝo kontraste al la spinako, kiun tiacele oni devas transloki.

La sekva grava velospeco estas la diversaj tipoj de la jam menciita *spinako*, vulgare *dorsventa velo*. Dum sia evoluo tiu velotipo fariĝis ĉiam pli granda kaj pli pufa. Ekzistas jam speco similanta duonsferon. La malagrablan ŝanceliĝon de la barko, kiun kaŭzas la forta pufeco de la spinako, oni klopodas redukti per serio de rondaj malfermaĵoj sur la velsurfaco. Aro da kromaj horizontalaj breĉoj rezultigas, ke la trablovanta aero favore levas la velon konsiderinde pezan pro la granda amplekso.

Pluraj kromaj — ĉi tie ne detaligitaj — diversaj velospecoj kompletigas la velaron de la pli grandaj velbarkoj. Cetere la aplikebla maksimuma velareo ĉe la diversaj velbarko-klasoj estas aparte difinita en m²-oj.

Kaze de forta vento oni povas redukti la grandecon de la velaro. Tiun procedon oni nomas *refo*. Refi oni povas helpe de *refiloj*, t.e. de ŝnuretaro kudrita sur la velo. Tirante la ŝnurojn oni povas ligi faldojn sur la velo, sekve de kio la velsurfaco iĝas pli malgranda.

Ĉe pli malgrandaj velbarkoj alia metodo por redukti la surfacon, t.e. por refi, estas la sekvanta. Post malligo de la ŝnuro, oni tiras la forkan (internan) ekstremon de la bumo iom for de la masto kaj farante kelkajn turnojn al ĝi, volvas sur ĝin certan parton de la iom malhisita velo. Poste, remetinte kaj religinte la forkan ekstremon de la bumo, oni rehisas la velon ĝis la necesa streĉeco.

Kaze de tro forta vento aŭ ŝtormo — por preventi renversiĝon aŭ alian akcidenton — oni malhisas la grandvelon, *brajlas* ĝin, t.e. plene volvas ĝin sur la bumon, poste *ferlas* ĝin, t.e. fiksas la ĉirkaŭvolvitan velon al la bumo per maldika ŝnuro, nomata *ferlilo*.

La *rigilaro* de la velbarko konsistas el la *senmova* rigilaro, al kiu apartenas la diversaj *stajoj*, t.e. streĉaj metalŝnuroj, subtenantaj la maston, kaj la *mova rigilaro*, konsistanta el *ŝnuroj* (ŝpinitaj el plantaj fibroj aŭ metalfadenoj), *takeloj* (aparato el ŝnuro kaj pulioj por levi aŭ

streĉi), *hisiloj* (ŝnuro aŭ takelo por levi velon aŭ gafon), *lifto* (ŝnuro aŭ takelo por levi pinton de bumo), *ŝkoto* (takelo fiksita al la posta pinto de bumo aŭ al la posta malsupra angulo de velo por ĝustigi ĝin), *halso* (takelo aŭ ŝnuro ĉe la antaŭa malsupra angulo de velo, por plistreĉi la antaŭan randon), *refiloj* (ŝnuretaroj por ligi faldon en velo).

Sur libera akvo, sed ĝenerale ankaŭ kiam la velbarko albordiĝas en haveno (plej ofte ĉe la moleo), por fiksi la velbarkon oni ankras ĝin, t.e. mallevas la *ankron*. La mallevita ankro krampas sin al la fundo per siaj sokoĵoj. La ankro estas forĝita el fero, ĝi konsistas el la ankrotigo, el la du aŭ kvar sokoĵoj kun samnombraj sokobranĉoj, kiuj disbranĉiĝas ĉe la fino de la tigo. Al la alia ekstremo de la ankrotigo estas alfiksita ringo por la ankroĉeno. En la sportobranĉo velado — depende de la tipo resp. klaso de la velbarko — oni uzas diversajn ankrospecojn kun du aŭ kvar sokoĵoj. Inter ili troviĝas ankaŭ tipoj kun fermeblaj sokoĵoj.

La loko de la ankro estas difinita loko ĉe la nazo, t.e. la antaŭa ekstremo de la barkokorpo. Ĝi estas nomata ankrejo. (Por eviti konfuzon: ankrejo = loko de la ankro; ankradejo = loko de la ankrado, t.e. kie la velbarko ankras.) La levo kaj mallevo de la ankro okazas pere de *ankra vinĉo*. La longo de la ankroĉeno devas esti la kvaroblo de la meza akvoprofundeco. Kaze de pli longedaŭra ankrado oni uzas du ankrojn, kondiĉe ke la velbarko havas du da ili.

Efike de la pela forto de la vento la velbarko veturas, faklingve navigas. La lerta, fakscia navigado konsistas el serio da parte ne preterlaseblaj, parte en la donita momento ĝuste kaj energie plenumitaj manovroj. Jen la vicigo de tiuj manovroj aplikendaj dum la daŭro de la konkursoj.

- a) Ekveturo el la haveno aŭ el la ankradejo;
- b) starto ĉe la startlinio;
- c) velado en diversdirektaj ventoj;
- ĉ) direktoŝanĝo per ascendo;
- d) direktoŝanĝo per descendo;
- e) ĝiro;
- f) transfrapo;
- g) retroveturo;
- ĝ) alceliĝo ĉe la cellinio;
- h) albordiĝo en haveno;
- i) ankrado en libera akvo.

Ĉiuj el la vicigitaj manovroj havas siajn regulojn kaj strikte antaŭskribitajn farendojn. Kelkaj el tiuj manovroj estas ĉi-sube pli-malpli detale konigitaj.

Dank' al la evoluinta velada tekniko, la velbarko povas navigi ne nur en dorsa aŭ flanka ventoj, sed ankaŭ en kontraŭa vento, kun certangula devio disde la plena kontraŭventa direkto.

Parolante pri ventodirektoj oni devas distingi la *veran* kaj la *ŝajnan ventodirekton*. La ŝajna ventodirekto estas la direkto rezultiĝanta el du komponantoj, kiuj estas: a) la vera ventodirekto, kaj b) la propra kontraŭvento de la velbarko estigata per ĝia antaŭeniĝo.

Koncerne la venton kaj la momentan teoriantan veturdirekton (la plej mallonga distanco inter du sinsekvaj turnopunktoj de la vego), oni distingas 4 ĉefajn direktojn de navigado. Ili estas:

- a) navigado en *dorsa vento*;
- b) navigado en *trikvarona vento*, alinome en *raŭmo*;
- c) navigado en *flanka vento*, alinome en *duona vento*;
- c) navigado en *kontraŭa vento* (kontraŭ venton), alinome en *kvarona vento*.

La velbarko navigas en dorsa vento, kiam la direkto de la vento samas, aŭ preskaŭ samas kun la veturdirekto. En dorsa vento la direkto de la ŝajna vento identas kun tiu de la vera vento, sed estas konsiderinde malpli forta ol tiu, eĉ pli malfora ol la ŝajna vento en la trikvarona vento, kaze de samfora vera vento. El tio sekvas, ke la velbarko pasas pli malrapide en dorsa vento ol en trikvarona vento (en raŭmo).

En dorsa, sed ankaŭ en trikvarona ventoj la hiso de la spinako estas laŭcela, ĉar ĝia granda surfaco konsiderinde, eventuale 15-20 procente pliigas la rapidecon de la velbarko. Estas tre grave konstante atenti la ventodirekto-indikilon, muntitan sur la pinto de la masto kaj la ŝanĝiĝon de la ventodirekto oni devas senprokraste parati per la ŝanĝo de la veturdirekto. Minacas nome la danĝero, ke pro la ŝanĝiĝo de la ventodirekto la grandvelo transfrapiĝas al la alia flanko, sekve de kio la bumo, puŝiĝante kontraŭ la malantaŭan stajon, forte ektiras, eventuale rompas la maston. Se la vento plifortiĝas, estas konsilinde malhisi la spinakon.

Detalaj reguloj antaŭskribas cetere la aplikadon kaj manipuladojn de la diversaj veloj, la stiradon per la rudro, la ventotaktikon kaj la manieron de la manovrado, sume ĉiajn farendojn kaj sintenojn de la barkanaro dum la navigado en dorsa, kiel ankaŭ en la flankaj kaj kontraŭaj ventoj.

La barko velas en trikvarona vento, alinome en raŭmo, kiam la vera vento blovas iom dedorse (135°) kaj la angulo inter la ŝajna vento kaj la veturdirekto estas ĉ. 90° . Ankaŭ dum navigado en raŭmo estas pripensinde hisi la spinakon, por plirapidigi la antaŭeniĝon de la velbarko.

La barko velas plej trankvile en duona vento, alinome flankaj ventoj. La barko velas en duona vento, kiam la direkto de la vento estas perpendikla al la veturdirekto kaj la ŝajna vento fermas 40-80 gradan angulon kun la veturdirekto. Ĉar en flankaj ventoj la ŝanĝiĝo de la ventodirekto ne estas rimarkebla sur la velo, estas konsilinde ofte kontroli la ĝustan pozicion de la grandvelo, observante la ŝajnan ventodirekton, kiun montras la ventodirekto-indikilo, muntita sur la pinto de la masto.

Kaze de navigado en kontraŭa vento (en kontraŭvento) la velbarko veturas kompreneble ne plene kontraŭ la venton, ĉar tio estus neeble, sed la diversaj — tra jarmilojn evoluigitaj veladistemoj hodiaŭ jam ebligas konsiderinde reduktitan devion disde la absoluta kontraŭventa direkto. La angulo de tiu devio — depende de la tipo de la velbarko — varias inter 35-50 gradoj. La plej optimala angulo estas tamen pli granda, ol la velebla plej malgranda angulo, ĉar tiu lasta ebligas al la velbarko tre malrapidan antaŭeniron. Valoras do apliki la pli grandan, t.n. *optimalan angulon*, ĉar kvankam la veturata distanco tiukaze estas pli granda, tamen per la atingita pli granda rapideco oni gajnas pli da tempo.

El la suprediritaj evidencoj, ke por atingi iun signitan punkton de la veĝo, situantan en kontraŭventa direkto, la velisto devas navigi jen dekstre, jen maldekstre de tiu direkto, sekvante la optimalan angulon, ĝis fine li atingas la celitan punkton. Tiu laŭplana zigzaga, jen dekstra- jen maldekstradirekta navigmaniero estas nomata *krozado*. Dum la krozado la vento atakas jen la dekstran, jen la maldekstran flankon de la velbarko, pri kio la velisto diras, ke li velas *en dekstra blovumo*, alivorte *dekstrablovumo* respektive *en maldekstra blovumo*, alivorte *maldekstrablovumo*. La krozado estas do serio de sinsekvaj blovumoŝanĝoj, t.e. alternado de plimalpli longedaŭraj vetursekcoj en dekstra kaj maldekstra blovumoj. Por plenumi la krozadon kiel eble plej laŭplane kaj ekonomie, la velisto devas kunmeti sian ventotaktikon jam antaŭ la komenco de la konkurso.

La kroza sekco estas la plej interesa, plej varia kaj plej grava parto de la velbarko-konkurso. Ĝia speciala taktiko diktas apartajn specifajn aktivadojn. Jen ekzemploj: kiam du velbarkoj estas proksime unu de la alia, kiel klopodu unu el ili venigi la alian en t.n. senesperan situacion; kiel estas eble eltiri sin el senespera situacio; kio estas ferenda kaze de renkonto en la kroza sekco; la aplikenda taktiko kaze de pluraj proksimaj kontraŭuloj; taktiko inter du aŭ pluraj velbarkoj, se ili estas malproksime unu de la alia, nome kiel gardi la gvidan pozicion; kiel veni antaŭen el pli malantaŭa pozicio ktp.

Pri la scienco de la navigado kaj manovrado kaj pri la taktiko rajte aplikebla kontraŭ la kontraŭuloj detale instrukcias la konkursa regularo de la sportobranĉo velado, kaj amaso da faklibroj okupiĝas pri ili.

Jen kelkaj el la pli gravaj bazaj nocioj arbitre elektitaj.

La barkoflanko atakata de la vento estas la *alventa* aŭ *luva flanko*. La alia estas la *subventa* aŭ *lea flanko*. Post ĝiro aŭ transfrapo la luva flanko fariĝas lea flanko kaj respektive. Cetere la dekstra flanko de la velbarko, alinome *tribordo* estas nomata ankaŭ *verda flanko*, la maldekstra flanko — fake *babordo* — estas nomata ankaŭ *ruĝa flanko*, ĉar ĉe pli grandaj velbarkoj (ekde 25 m²) estas antaŭskribite uzi nokte verdan, resp. ruĝan lampojn sur la menciitaj flankoj.

La esprimo *blovumo* estas specife velada nocio, esprimanta la rilaton inter la vento kaj la barkoflanko. Kiel pli frue jam klarigite, la velbarko (ankaŭ la velisto) estas (velas) en dekstra blovumo, elivorte ĝi (li) navigas dekstrablovume, kiam la vento atakas ĝian dekstran flankon, alivorte, kiam la dekstra barkoflanko estas la luva (alventa) flanko. Inverse, la velbarko estas en maldekstra blovumo, alivorte ĝi velas maldekstrablovume, kiam la maldekstra barkoflanko estas la luva flanko.

La naviganta velbarko ĉiam estas en unu el la du blovumoj, krom en *plenventeco* (la longakso de la boato kuŝas plene kontraŭ la vento, kun nazo ale al la vento) kaj dum transfrapo aŭ ĝiro. Konforme al la aplikenda ventotaktiko, la velbarko aŭ navigas en longaj blovumoj (navigas longajn blovumojn), t.e. navigas longe en la sama blovumo, aŭ ofte ŝanĝante la blovumojn (farante oftajn blovumŝanĝojn) navigas mallongajn blovumojn, alivorte velas en mallongaj blovumoj. (Por eviti konfuzon: blovumŝanĝo ne estas do la ŝanĝo de la ventodirekto, sed ĝin estigas la velisto mem, manipulante la velon kaj la rudron tiel (vidu la manovrojn transfrapo kaj ĝiro), ke la vento ataku la alian flankon de la velboato.)

Klare poste estas tiu el du samblovume velantaj barkoj, kiu troviĝas post la imagita linio, tiritita al la plej malantaŭa punkto de la alia barko, perpendikle al ties longakso. La alia barko estas *klare antaŭe*.

Se el du barkoj, velantaj en la sama blovumo, neniu estas klara antaŭe aŭ poste, tiukaze la du barkoj *estas en kovro*, nome la alventa barko kovras la subventan barkon, ĉar forkovras ĝin de antaŭ la vento. La kovra spaco de iu velbarko estas longforma kuŝanta piramido, kies bazo estas la projekcio de la barkokorpo kaj velaro sur ebenon perpendiklan al la ventodirekto. La longo de la piramido estas 1-4 barkolongoj, depende de la ventoforteco.

Spite, ke du samblovumaj barkoj estas reciproke en pozicioj klare antaŭe kaj poste, tamen ili estas en kovro, se tria barko en sama blovumo velas inter ili, kaj estas en kovro kun tiuj du.

La terminoj *alventa barko* kaj *subventa barko* estas aplikeblaj nur ĉe tiaj samblovumaj barkoj, kiuj estas reciproke en kovro. Tiu barko, kiu kovras la alian for de la vento, estas la alventa kaj la alia estas la subventa barko.

Startas la velboato, kiam ajna parto de la barkokorpo, tiu de la barkanaro aŭ de la ekipaĵo transpasas la startlinion en la direkto de la unua signalo.

Alceliĝas la velboato, kiam ajna parto de la barkokorpo, tiu de la barkanaro aŭ de la ekipaĵo transpasas la cellinion el la direkto de la lasta signalo.

Ascendo estas direktoŝanĝo ale al la vento, plenumbla de la transfrapo ĝis la plenventeco.

Descendo estas direktoŝanĝo for de la vento, plenumbla de la plenventeco ĝis la komenco de la transfrapo.

Transfrapon plenumas la velisto, kiam li faras la blovumŝanĝon tiamaniere, ke la grandvelon de la barko, naviganta en proksimume dorsa vento, li transmetas al la alia flanko de la barko pere de la transmeto de la bumo. Kiam la bumo transiras la mezlinion, (t.e. la linion de la longakso de la barko), tiam la grandvelo staras kontraŭ la vento kun sia posta (libera) eĝo. En tiumomento komenciĝas la transfrapo kaj finiĝas, kiam la velo pleniĝis de vento en la alia blovumo.

Karakteriza manovro de la kroza sekcio (t.e. dum la velado kontraŭ venton) estas la *ĝiro*, kiun la velisto plenumas kontraŭ la vento. Por plenumi ĝin la velisto ascendigas la velbarkon ĝis plenventeco, de kie li descendigas ĝin ĝis la direkto de la nova blovumo.

Kaj la transfrapo, kaj la ĝiro pretendas sperton kaj lerton, por prezenti eventualan renversiĝon.

La velbarko navigas *strikte*, kiam ĝi proksimiĝas tiom al la kontraŭventa direkto, ke ĝi povas ankoraŭ favore antaŭeniĝi.

Obstaklo estas ĉiu objekto — ankaŭ veturanta akva veturilo — kiu estas tiom ampleksa, ke la velbarko, alveninte propran barkolongon distance al la obstaklo, devas fari konsiderindan veturdirektoŝanĝon, por povi preterpasi ĝin dekstre aŭ maldekestre. Estas rigardenda obstaklo ankaŭ ĉiu tia objekto, kiun la velbarko povas preterpasi nur unuflanke, inkluzive ankaŭ tian buon, kiu signas sablobenkon aŭ alian objekton, inter kiu kaj la buo ne estas eble senriske trapasi.

Sur ambaŭ flankoj de la supra parto de la grandvelo, ĉiu velbarko apartenanta al iu ajn velbarko-klaso rekonita de IYEU, devas porti

a) (dum konkurso sur eksterlandaj akvoj) la oficiale difinita(j)n litero(j)n de la koncerna lando;

b) la signon aŭ literon aŭ ciferon indikantan la klason de la velbarko;

c) la startnumeron.

En la internaciaj velbarko—konkursoj oni uzas ĉ. 40 diversajn antaŭskribitajn kodflagojn, kiuj parte publikigas certajn, de malproksime videblajn instrukciojn por la konkursantoj (ekz.: ruĝa flago = la vegosignalojn oni devas preterpasi laŭ la maldekstra mano; oblikvaj paralelaj ruĝaj kaj flavaj strioj = surmeto de savoveŝto estas deviga ktp.), parte indikas la velbarkoklason, kiun la instrukcio koncernas (ekz.: blua flagokampo limita supre kaj malsupre per flava strio = klaso Drako; blua-blanka-blua horizontalaj paralelaj flago-kampoj = klaso Fluganta Holandano ktp.).

La velbarko-konkursoj estas aŭ a) migraj konkursoj, aŭ b) vegokonkursoj.

La migraj konkursoj estas disvolvataj ĝenerale inter du aŭ pluraj havenoj de lago aŭ maro.

La vegokonkursoj disvolviĝas sur vegoj konstruitaj kaj instalitaj speciale por velbarko-konkursoj. La konstruo de tiaj vegoj estas tiel projektita, ke dum la navigado la velbarkoj devu veturi kaj en dorsa vento, kaj en duona aŭ trikvarona vento, sed almenaŭ la trionan parton de la konkurso konsistigas krozado. La nuntempe uzata, olimpiko-sistema velbarko-vego komenciĝas per krozostarto, kiun sekvas krozada vegsekcio. Post tio la velbarko navigas en duona aŭ trikvarona vento. Post pli nova krozada sekcio sekvas dorsa vento, kaj tria krozada sekcio antaŭ la celo finas la konkurson. La plenumenda naviglongo estas 20-25 km-oj sur vegareo de ĉ. 2-3x2-3 km²-oj.

La velbarko-konkursoj komenciĝas per fluga starto. Tio signifas, ke antaŭ la starto la formacioj (velboatoj) estas jam navigantaj malantaŭ la cellinio kaj je la startosigno ili — estantaj unuj pli proksime, aliaj malpli proksime de la cellinio — trapasas ĝin kaj komencas la konkurson.

Dum la konkurso la aktivadon de la konkursantoj influas ne nur la alternado de la vento kaj la efiko de la ondoj, sed ankaŭ la diversaj manovroj de la ceteraj konkursantoj-kontraŭuloj, kiel ankaŭ ilia pozicio ene de la ensemblo.

La internaciajn velbarko-konkursojn povas partopreni ankaŭ virinaj konkursantoj kune kun tiuj viraj kiel barkanoj de la sama velbarko, do ne apartigite.

La velbarko-konkurso, alinome *regato*, konsistas el certa nombro da *rundoj*. Propre ĉiu rundo estas aparta konkurso, disvolviĝanta ekde la starto ĝis la celo. Baze de la rezultoj, atingitaj en la unuopaj rundoj oni elkalkulas kaj difinas la definitivan klasigan vicordon de la tuta regato kaj deklaras kaj premias la avanlokajn klasitojn. La rezultojn de la unuopaj rundoj oni ne premias.

En la sportobranĉo velado la nocion disciplino anstataŭas tiu de la velbarko-klasoj. La mondfederacio agnoskas la sekvantajn 24 klasojn kiel oficialajn konkursoklasojn. (Bedaŭrinde

ĉe kelkaj klasoj mankas la specifaj indikoj, kiujn eĉ koste de la plej zorgaj strebadoj provizore ne estis eble akiri.) La sekvonta klasvicordo samas kun tiu en la Jarlibro de la mondfederacio.

1. *Internacia klaso "KVIN KOMO KVIN METROJ"*

Signo: 5,5. Tipo: balastkila. Velo: 26 m²-oj. Barkanoj: 3.

2. *Internacia klaso "C' KATAMARANO"*

Tipo: dukorpa. Barkanoj: 2. Ceteraj indikoj mankas.

3. *Internacia klaso "DRAKO"*

Signo: D. Tipo: balastkila. Velo: 20 m². Barkanoj: 3.

4. *Internacia klaso "SOLINGO"*

Signo: Ω, Tipo: balastkila. Velo: 22 m². Barkanoj: 3.

Olimpika klaso!

5. *Internacia klaso "STELO"*

Signo: stelo. Tipo: balastkila. Velo: 26 m². Barkanoj: 2.

Olimpika klaso!

6. *Internacia klaso "TEMPESTO"*

Signo: T. Tipo: transira inter tiuj ŝverta kaj balastkila. Velo: 23 m). Barkanoj: 2.

Olimpika klaso!

7. *Internacia klaso "470"* (Kvarcent sepdek)

Indikoj mankas.

8. *Internacia klaso "FLUGANTA HOLLANDANO"*

Signo: FD. Tipo: ŝverta. Velo: 15 m². Barkanoj: 2.

Olimpika klaso!

9. *Internacia klaso "5-0-5"* (kvin-nul-kvin)

Signo: 505. Tipo: ŝverta. Velo: 16 m². Barkanoj: 2.

10. *Internacia klaso "FINNA JOLO"*

Signo: ≈, Tipo: ŝverta. Velo: 10 m². Barkano: 1.

Olimpika klaso!

11. *Internacia klaso "FAJROGLOBO"*

Signo: ruĝa globo. Tipo: ŝverta. Ceteraj indikoj mankas.

12. *Internacia klaso "CONTENDBR"* (pron.: kontender)

Indikoj mankas.

13. *Internacia klaso "TORNADO"*

Signo: T. Tipo: dukorpa. Velo: 22 m². Barkanoj: 2.

14. *Internacia klaso "AUSTRALIS"* (pron.: aŭstralis)

Indikoj mankas.

15. *Internacia klaso "DEK DU METROJ"*

Signo: 12. Tipo: balastkila. Ceteraj indikoj mankas.

16. *Internacia klaso "SES METROJ"*

Signo: 6. Tipo: balastkila. Velo: 48 m². Barkanoj: 5

17. *Internacia klaso "OKMETRA KROZANTO"*

Signo: 8. Tipo: balastkila. Velo: 55 m². Barkanoj: 5.

18. *Internacia klaso "DEK-KVAR-FUTA DINGIO"*

Signo: 14. Tipo: ŝverta. Ceteraj indikoj mankas.

19. *Internacia klaso "DEK-DU-KVADRATMETRA ŜARPIO"*

Tipo: ŝverta. Velo: 12 m². Ceteraj indikoj mankas.

20. *Internacia klaso "FULMO"*

Signo: zigzaga fulmlinio. Ceteraj indikoj mankas.

21. *Internacia klaso "RUSTIKOLO"*

Signo: birdfiguro. Tipo: ŝverta. Velo: 11 m². Ceteraj indikoj mankas.

22. *Internacia klaso "VAURIEN"* (pron.: vorien)

Signo: V^r Ceteraj indikoj mankas.

23. *Internacia klaso "ENTREPRENO"*

Signo: E. Ceteraj indikoj mankas.

24. *Internacia klaso "KADETO"*

Signo: C. Tipo: ŝverta. Velo: 6 m². Barkano: 1.

Esprimoj: Eŭropo-ĉampionado de la internacia velbarko-klaso Kadeto. La unualoke klasita formacio de la internacia klaso Rustikolo, en la mondĉampionado de velado, de jaro 1970. Nun disvolviĝas la tria rundo de la olimpika regato de la internacia klaso Fluganta Holandano. Olimpika ĉampionado de velado. Franca velbarko gajnis la unualokan klasigon en la Eŭropo—ĉampionado de la internacia klaso Vaurien, en jaro 1965. Sveda konkursanto venkis en la regato de la internacia klaso Finna Jolo, en la olimpika ĉampionado de velado de jaro 1964. Jen la feliĉa barkanaro de la olimpikoĉampiona formacio de la internacia klaso Stelo de jaro 1968.